

ISBN 978 92 9017 122 5

I NTERNACIA
K ONGRESA
U NIVERSITATO

66-a SESIO

Rejkjaviko, Islando
20-27 julio 2013

Amri Wandel kaj Roy McCoy (red.)

Universala Esperanto-Asocio

Enhavo

Enkonduko	2
IKU 1 Otto Prytz (rektoro): <i>La “nov-norvega” lingvo Nynorsk, lanĉita de Ivar Aasen, kaj la Lingvo Internacia Esperanto, lanĉita de L.L. Zamenhof – similaĵoj kaj diferencoj</i>	3
IKU 2/AIS 1 Hannes Larsson: <i>La violono</i>	14
IKU 3/AIS 2 Tsvi Sadan: <i>Unu komuna lingvo, multaj malsamaj kulturoj: problemoj de interkultura komunikado en Esperanto</i>	33
IKU 4 Jane Edwards: <i>Krimo en malvarma klimato: la fenomeno de la skandinava krimromano</i>	46
IKU 5 Jouko Lindstedt: <i>Ĉu lingvoj evoluas simile al biologiaj specioj?</i>	58
IKU 6 Geoffrey Greatrex: <i>La du sortoj de la romia imperio</i>	67
IKU 7 Amri Wandel: <i>Aŭroro – la nordia lumo</i>	97
IKU 8 José Antonio Vergara: <i>La insula edeno de Darwin: la Galapagoj kaj la historio de evolu-biologio</i>	108
IKU 9 Věra Barandovská-Frank: <i>Insulo Thule vera kaj fikcia</i>	114

Enkonduko

La 66-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) okazas en la nordia insulo Islando. Rekorda parto de la prelegoj (5 el 9) rilatas ĉi-jare al la karaktero de la kongreslando (“insulo”, kiu ankaŭ aperas en la kongresa temo) kaj regiono (Nordio), ŝajne pli ol en ajna antaŭa IKU-sesio:

- “La ‘nov-norvega’ lingvo Nynorsk” (Otto Prytz, Norvegio);
- “Krimo en malvarma klimato” (Jane Edwards, Usono);
- “Aŭroro – la nordia lumo” (Amri Wandel, Israelo);
- “La insula edeno de Darwin” (José Antonio Vergara, Ĉilio);
- “Insulo Thule vera kaj fikcia” (Vera Barandovská-Frank, Germanio).

Kiel ĉiam, la IKU ofertas al la kongresanoj altnivelan klerigan varian elekton de prelegoj, ĉi-jare pri literaturo, geografio, astronomio, biologio, lingvistiko, historio kaj socilingvistiko.

La prelego-tekstoj kiuj aperas en tiu ĉi IKU-libro, estis zorge verkitaj de la prelegantoj, por ke vi povu bone elekti la prelegojn kiuj interesas vin kaj taŭgas por via kongresplano. Kelkaj antaŭaj volumoj de pasintjaraj IKU-libroj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la Libroservo de UEA. Krome, pluraj IKU-libroj estas konsulteblaj en la IKU-retejo de UEA <http://www.uea.org/dokumentoj/IKU/index.html>.

Kutime okazas kadre de IKU ankaŭ tri kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Ĉi-foje estas nur du, ne ĉar mankis ofertoj, sed ĉar la IKU-juĝkomisiono elektis nur la plej altnivelajn el la 18 proponoj, senprefere al proponoj pri kursoj. Ĉi-jare la konkurenco estis pli forta, ĉar preskaŭ ĉiuj proponoj estis tre altnivelaj kaj la komisiono bezonis du voĉdonajn rondojn por elekti la naŭ sukcesajn prelegojn. La prelegoj de Hannes Larsson, “La violono”, kaj de Tsvi Sadan, “Unu komuna lingvo, multaj malsamaj kulturoj”, estas samtempe partoj de la AIS-kursoj, kiuj konsistos el du daŭrigaj prelegoj aldone al la IKU-prelego por pli profunda traktado de la temo. La kunlaboro inter UEA kaj AIS kadre de la Universala Kongreso komenciĝis en 1995.

La resumoj de la prelegoj havas tradukojn en la angla, la franca kaj la islanda, por ekstera informado pri la scienca kaj eduka laboro en Esperanto. Tiel IKU kaj tiu ĉi libro povas esti utiligataj por demonstri la sciencan, fakan kaj edukadan aplikadon de Esperanto al eksteraj instancoj, kiel Unesko kaj scienc-rilataj kaj universitat-rilataj organizaĵoj.

Kontribuis al la libro unuavice la prelegantoj, kiuj verkis siajn prelegotekstojn ĝustatempe por aperigo en la libro, kaj la IKU-komisiono (aktuale Sabine Fiedler, Hans Michael Maitzen, Humphrey Tonkin, José Antonio Vergara, Jingen Wang kaj mi), kies anoj jam de multaj jaroj plenumas la taskon elekti la plej bonajn kaj taŭgajn proponojn. Provlegis Rob Moerbeek, kiel en antaŭaj jaroj, kaj denove la resumojn tradukis en la francan Yannick kaj Janine Dumoulin (reviziis: Claude Nourmont), kaj en la anglan Edmundo Grimley Evans (reviziis: Brian Moon). En la islandan tradukis Stefán Briem, Kristján Eiríksson kaj Steinþór Sigurðsson.

AMRI WANDEL

IKU-sekretario

Estrarano pri scienca kaj faka agado

La “nov-norvega” lingvo Nynorsk, lanĉita de Ivar Aasen, kaj la Lingvo Internacia Esperanto, lanĉita de L.L. Zamenhof – similaĵoj kaj diferencoj



Otto Prytz (rektoro)

Naskiĝis en norda Norvegio en 1943, diplomiĝis pri filologio kun la hispana lingvo kiel specialaĵo ĉe la Universitato de Oslo en 1972, kaj lekciis pri la hispana lingvo ĉe la sama universitato de 1978 ĝis 2005, kiam li emeritiĝis. Denaske blinda, li eklernis Esperanton kiel devigan lernobjekton ĉe porblindula lernejo en Trondheim en 1955, kaj membriĝis en la norvega Esperanto-movado en 1958. Li apartenis al la estraro de Norvega Esperantista Ligo de 1971 ĝis 2001, kaj prezidas la Ekzamenan Komisionon de la Ligo ekde 1998. Dum periodoj li havis funkciojn ankaŭ en Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. En 2004 li elektiĝis en la Akademion de Esperanto. Li publikigis kelkajn artikolojn pri hispana kaj Esperanta lingvistikoj.

Li prelegis en IKU ĉe la UK-oj 1990 kaj 2009, kaj en la Esperantologia Konferenco kadre de la UK 2011. Prytz multe okupiĝis pri diversaj aplikoj de la brajla sistemo. Li ellaboris brajlan version de la alfabeto de la nord-samea lingvo. De 1995 li prezidas la Norvegan Publikan Komisionon pri brajlo kaj partoprenas la laboron de normigo de brajlaj notacioj por diversaj fakoj.

Resumo

En 1813, antaŭ 200 jaroj, naskiĝis Ivar Aasen, kreinto – aŭ ĉu pli ĝuste kompilinto? – de la “nov-norvega” lingvo Nynorsk, unu el la du nunaj oficialaj “lingvoformoj” de la norvega lingvo. Inter Esperanto-parolantoj estas disvastigita la ideo, ke Nynorsk estas sukcesinta planlingvo, kaj ke ĝi kreiĝis en maniero komparebla kun la maniero, en kiu kreiĝis Esperanto. Bona okazo por esplori la verecon de tiu ideo estas Universala Kongreso okazanta en jubilea jaro de la naskiĝo de la kreinto de Nynorsk, kaj en lando, en kiu oni parolas la modernan lingvon plej proksiman al la “norena” aŭ mezepoka skandinava lingvo.

La prelego unue skizas la lingvan situacion en Norvegio en la mezo de la 19a jc., ekestintan pro tio, ke Norvegio dum pluraj jarcentoj apartenis al Danio ĝis 1814. Sed ankaŭ post tiu jaro la dana lingvo, nur pene komprenata de la norvega kampara loĝantaro, restis la oficiala lingvo de la sendependiĝinta Norvegio.

Aasen volis krei “norvegan popolan lingvon” bazitan sur la norvegaj dialektoj, kaj precipe sur la dialektoj plej proksimaj al la norena lingvo kaj malplej “degenerigitaj” de dana influo. Kiel rezulton de studvojaĝoj li publikigis vortaron kaj gramatikon pri “la norvega popola lingvo”.

La prelego nur mallonge skizas la postan evoluon de alproksimigo inter la dandevena “regna lingvo”, kiu poste ekhavis la nomon Bokmål = “libro-lingvo”, kaj la “kampara lingvo” de Aasen, kiu poste ekhavis la nomon Nynorsk.

La laboro de Zamenhof estas komparebla kun tiu de Aasen en unu aspekto: En la 19a jc. la lingva situacio en Eŭropo estis tia, ke internacian lingvon ne necesus inventi: oni povus ĝin simple *ekstrakti*. La lingvoj havis grandan stokon ne nur da komunaj vortoj, sed ankaŭ da komunaj parolturnoj. La kompilado de materialo por internacia lingvo surbaze de tiuj komunaj lingvoj estas komparebla kun la kompilado de materialo por norvega lingvo surbaze de norvegaj dialektoj, sed tie finiĝas la simileco.

Aasen ĉerpis sian materialon el dialektoj principe kompreneblaj inter si, kaj fiksis gramatikajn kategoriojn surbaze de relative malvasta gamo de gramatikaj sistemoj. Zamenhof ĉerpis la sian el lingvoj ne kompreneblaj inter si, kaj li devis elekti el vasta gamo, kiujn gramatikajn kategoriojn fiksi por Esperanto. Ni scias, ke li multe ŝanceliĝis antaŭ ol fari la definitivajn decidojn.

The “New Norwegian” language Nynorsk, launched by Ivar Aasen, and the International Language Esperanto, launched by L.L. Zamenhof – similarities and differences

Summary

The year 1813, 200 years ago, saw the birth of Ivar Aasen, the creator – or perhaps, better, compiler? – of the “New Norwegian” language Nynorsk, one of the two current official “language forms” of Norwegian. Among Esperanto speakers there is the idea that Nynorsk is a successful planned language, and that it was created in a manner comparable with the way that Esperanto was created. A good opportunity to investigate the accuracy of this idea is a World Esperanto Congress taking place in the anniversary year of the birth of the creator of Nynorsk and in a country that speaks the modern language closest to Old Norse, the mediaeval Scandinavian language.

The lecture first describes the language situation in Norway in the mid-19th century that came about through Norway’s having belonged to Denmark for several centuries up to 1814. But even after that year Danish, understood only with difficulty by the rural population of Norway, remained the official language of an independent Norway.

Aasen wanted to create a “Norwegian people’s language” based on the Norwegian dialects, mainly on the dialects closest to Old Norse and least “degenerated” by Danish influence. As a result of study trips he published a dictionary and grammar of the “Norwegian people’s language”.

The lecture only briefly sketches the subsequent development with a drawing together of the Danish-derived “state language”, which later acquired the name of Bokmål (“book-language”), and Aasen’s “rural language”, which later acquired the name of Nynorsk.

Zamenhof’s work is comparable with Aasen’s in one respect: in the 19th century the language situation in Europe was such that it was not necessary to invent an international language: one could simply extract it. The languages had a great stock not only of common words, but also of common phrases. Compiling the material for an international language based on these commonalities is comparable with compiling the material for a Norwegian language based on Norwegian dialects, but there the similarity ends.

Aasen drew his material from dialects that were in principle mutually comprehensible and determined grammatical categories based on a relatively narrow range of grammatical systems. Zamenhof drew his from languages not mutually comprehensible, and he had to choose from a wide spectrum which grammatical categories to put into Esperanto. We know that he hesitated a lot before making his final decisions.

La langue “néo-norvégienne” Nynorsk, conçue par Ivar Aasen, et la Langue Internationale Espéranto, conçue par L.L. Zamenhof – points communs et différences

Résumé

En 1813, il y a 200 ans, naissait Ivar Aasen, créateur – ou plus exactement compilateur? – de la langue “néo-norvégienne” Nynorsk, l’une des deux “normes linguistiques” officielles actuelles du norvégien. Parmi les espérantophones l’idée est répandue selon laquelle le Nynorsk est une langue construite qui a réussi, et qu’il a été créé d’une manière comparable à celle dont a été créé l’Espéranto. Bonne occasion pour explorer la véracité de cette idée que ce Congrès Universel qui se tient en l’année du bicentenaire de la naissance du créateur du Nynorsk, et dans un pays où l’on parle la langue moderne la plus proche du “vieux norrois”, la langue scandinave médiévale.

La conférence esquissera tout d’abord la situation linguistique en Norvège au milieu du 19e siècle, résultant du fait que la Norvège avait appartenu au Danemark pendant plusieurs siècles, jusqu’en 1814. Mais même après cette date la langue danoise, comprise à grand peine par les populations rurales norvégiennes, est restée la langue officielle de la Norvège devenue indépendante.

Aasen voulait créer une “langue norvégienne populaire” basée sur les dialectes norvégiens, et en particulier sur les dialectes les plus proches de la langue norroise et ayant le moins “dégénéré” par suite de l’influence danoise. Résultat de ses voyages d’étude, il publia un dictionnaire et une grammaire de la “langue populaire norvégienne”.

La conférence ne présentera qu’une brève esquisse de l’évolution ultérieure du rapprochement entre la “langue du royaume”, d’origine danoise, qui reçut par la suite le nom de Bokmål = “langue des livres”, et la “langue des campagnes” d’Aasen, qui reçut par la suite le nom de Nynorsk.

Le travail de Zamenhof est comparable à celui d’Aasen par un seul aspect: au 19e siècle la situation linguistique en Europe était telle qu’il n’était pas nécessaire d’*inventer* une langue internationale; il suffisait simplement de l’*extraire*. Les langues possédaient en commun un grand stock non seulement de mots, mais encore de tournures. La compilation de matériel pour une langue internationale sur la base de ces éléments communs est comparable à la compilation de matériel pour une langue norvégienne sur la base de dialectes norvégiens, mais là s’arrête la ressemblance.

Aasen a puisé son matériel dans des dialectes en principe mutuellement intelligibles, et a fixé les catégories grammaticales sur la base d’une gamme relativement limitée de systèmes grammaticaux. Zamenhof a puisé le sien dans des langues qui ne sont pas mutuellement intelligibles, et il a dû choisir parmi une vaste gamme quelles catégories grammaticales fixer pour l’Espéranto. Nous savons qu’il a beaucoup hésité avant de prendre les décisions définitives.

Nýja norska tungumálið, nýnorska, sett fram af Ivar Aasen, og alþjóðatungumálið esperanto, sett fram af L.L. Zamenhof – hvað er líkt og hvað er ólíkt?

Útdráttur

Árið 1813, fyrir 200 árum, fæddist Ivar Aasen, skapari – eða kannski réttara sagt safnari? – hins nýja norska tungumáls, nýnorsku, sem er annað tveggja núverandi opinberra forma norsku. Meðal esperantomælenda er sú hugmynd útbreidd að nýnorska sé velheppnað planmál og að sú sköpun sé sambærileg við hvernig esperanto var skapað. Gott tækifæri til að rannsaka sannleiksgildi þessarar hugmynda er heimsþing esperantista sem er haldið á afmælisári þess manns sem skapaði nýnorsku og í landi þar sem talað er það nútímatungumál sem næst stendur fornnorrænu, skandinavíska miðaldatungumálinu.

Í fyrirlestrinum er fyrst farið í stuttu máli yfir stöðu tungumála í Noregi á miðri 19. öld, sem var komin upp vegna þess að Noregur tilheyrði Danmörku í margar aldir til ársins 1814. Eftir það hélt danska, sem var torskilin íbúum norsku sveitanna, samt áfram að vera hið opinbera tungumál hins sjálfstæða Noregs.

Aasen vildi skapa “norskt alþýðumál” byggt á norskum mállýskum, og einkum á þeim mállýskum sem næst stóðu fornnorrænu og voru minnst “úrkynjaðar” vegna danskra áhrifa. Í kjölfar rannsóknarferða sinna gaf hann út orðasafn og málfræði “norska alþýðumálsins”.

Í fyrirlestrinum er aðeins fjallað lítillega um síðari þróun þar sem leitast var við að færa nær hvort öðru “ríkismálið” af dönskum uppruna, sem síðar var kallað “bókmál”, og “landsmál” Aasens, sem síðar var kallað nýnorska.

Starf Zamenhofs er að einu leyti sambærilegt við það starf sem Aasen vann: Á 19. öldinni var tungumálastaðan þannig í Evrópu að ekki þótti þörf á að finna upp alþjóðatungumál: einfaldlega væri hægt að draga það út. Tungumálin höfðu mikinn forða ekki aðeins af sameiginlegum orðum, heldur einnig af sameiginlegum föstum orðatiltækjum. Söfnun efniviðar fyrir alþjóðatungumál á grundvelli þessara algengu málhluta er sambærileg við söfnun efniviðar fyrir norsku á grundvelli norskra mállýskna, en þar endar líkingin.

Aasen dró að efnivið sinn úr mállýskum sem voru í meginatriðum skiljanlegar innbyrðis, og ákvað málfræðiflokka á grundvelli tiltölulega lítils úrvals af málfræðikerfum. Zamenhof dró efnivið sinn að úr tungumálum sem voru ekki skiljanleg innbyrðis, og hann varð að velja úr fjölmörgum kostum, hvaða málfræðiflokka skyldi ákveða fyrir esperanto. Við vitum að hann var mjög hikandi áður en hann ákvað sig endanlega.

La “nov-norvega” lingvo Nynorsk, lanĉita de Ivar Aasen, kaj la Lingvo Internacia Esperanto, lanĉita de L.L. Zamenhof – similaĵoj kaj diferencoj

(Noto: Inter rektaj krampoj [...] mi indikas la proksimuman prononcon de norvegaj vortoj (i.a. nomoj) aperantaj en la teksto, tiel, kiel oni prononcas ilin en la nuna norvega lingvo. La transskribo ne sekvas la Internacian Fonetikan Alfabeton, sed la Esperantan ortografion. Krome, akcento estas indikita per dekstrakorna supersigno (´), kaj longeco de vokalo estas indikita per dupunkto (:) post la vokalo. Tonemoj ne estas indikitaj. Norvegaj sonoj (fonemoj) ne ekzistantaj en Esperanto estas redonitaj per laŭeble proksimaj Esperantaj sonoj.)

Aasen kaj Nynorsk

Ĉi-jare oni celebras la 200-jaran jubileon de la naskiĝo de Ivar Aasen [i:var ó:sen]. Li naskiĝis la 5an de aŭgusto 1813 kaj mortis la 23an de septembro 1896. Li estas plej bone konata kiel “kreinto” de la “nov-norvega” lingvo *nynorsk* [ní:noŝk], lanĉita en 1848. Tiu lingvo ofte estas komparata kun alia lingvo “kreita” de unu persono, nome Esperanto, lanĉita en 1887 de Lazaro Ludoviko Zamenhof, kiu naskiĝis la 15an de decembro 1859 kaj mortis la 14an de aprilo 1917. En ĉi tiu prelego mi prezentos la ekeston kaj la evoluon de *nynorsk* kaj Esperanto, kaj konklude mi faros komparon inter tiuj du lingvoj, esplorante, kigrade la okazoj estas tiel paralelaj, kiel iuj volas kredi. Bona okazo por esplori tion estas Universala Kongreso de Esperanto, okazanta en jubilea jaro de la naskiĝo de la kreinto de *nynorsk*, kaj en lando, en kiu oni parolas la modernan lingvon plej proksiman al la *norena* aŭ mezepoka skandinava lingvo.

Unue mi diros ion pri la lingva situacio en Norvegio meze de la 19a jarcento. La dana, kiu estis oficiala skriba lingvo de Norvegio dum la tempo de ties unio kun Danio, plu-estis tia ankaŭ post la ĉesigo de la unio en 1814, kvankam la dana apenaŭ estis komprenata de la norvega kampara loĝantaro. Tamen en Norvegio ekzistis ankaŭ parolataj variaĵoj de la dana. Pluraj danaj oficistoj senditaj en Norvegon, fondis familion kaj ekis konstante loĝi tie. Ili parolis la danan, sed kun norvega prononco. La samon sendube faris ankaŭ norvegoj revenintaj post studado en Danio. Kaj kiam kamparaj homoj voĉlegis el la Biblio, ili tion faris en la dana, sed kun norvega prononco.

La dana do estis la lingvo de la potenculoj, dum la norvegajn dialektojn parolis la subprivilegiitoj. Ĉar potenco ordinare estas ligata al konservativismo, dum oni supozas, ke radikalaj movadoj iras de sube supren, la dana lingvo estis perceptata kiel konservativa. Ju pli norvega, des pli radikala. Ĉi tiu percepto ankoraŭ hodiaŭ estas renkontata en Norvegio. Tamen ĝi fontas el politikaj roloj, ne el lingvo-historio. Lingvo-historie la dana estas la plej radikala skandinava lingvo, t.e. tiu, kiu pleje malproksimiĝis de la lingvo norena, same koncerne gramatikon kiel koncerne prononcon.

Post kiam Norvegio fariĝis sendependa ŝtato (kvankam en persona unio kun Svedio), sentiĝis la neceso konstrui nacian identecon, kaj en tiu strebado gravis la lingvo. Ivar Aasen frue komencis proprainiciate esplori sian propran dialekton el Sunnmøre [súnmo:re] (la regiono ĉirkaŭ la urbo Ålesund [ó:lesun], pli-malpli mezvoje inter Bergeno kaj Trondhejmo), kaj la vivon de la kreskaĵoj en tiu distrikto. Li vojaĝis al Bergeno, por ke la tiea episkopo Jacob Neumann [já:kob nójman] pritaksu lian laboron. Al la episkopo tre imponis la lingvaj studaĵoj,

kaj partoj de ili aperis en Bergena gazeto en 1841. Ĉi tiuj artikoloj kaj la subteno de Neumann kaŭzis, ke Aasen ricevis ĉiujaran stipendion el la Norvega Societo por la Sciencoj, kun sidejo en Trondhejmo, por rondvojaĝi kaj esplori la norvegan popolan lingvaĵon. Li vojaĝadis 1843-47, aŭskultante diversajn dialektojn kaj notante vortojn, parolturnojn kaj gramatikajn formojn; li ankaŭ kolektadis proverbojn. La esplorado unuavice koncentriĝis pri la okcidenta parto, kie li supozis esti trovonta la dialektojn “plej bonajn”, sed Aasen vojaĝis tra grandaj partoj de la lando. Dum la kvar jaroj li travojaĝis pli ol 4000 kilometrojn, kaj norden li alvenis proksimume ĝis la Arkta Cirklo. Fininte la kvarjaran stipendian vojaĝon en 1847, li ekloĝis en Kristiania [kristiá:nia], la nuna Oslo, por la resto de sia vivo. Tamen li dum postaj 20 jaroj regule faris studvojaĝojn, ĉefe dumsomere.

En 1848 Aasen publikigis la libron *Det norske Folkesprogs Grammatik* [de noŝke fólkespro:ks gramatik] (gramatiko de la norvega popollingvo), reviziitan kiel *Norsk Grammatik* [noŝk gramatik] (norvega gramatiko) 1864. En 1850 aperis *Ordbog over det norske Folkesprog* [ú:rbu:k ó:ver de nóŝke fólkespro:k] (vortaro pri la norvega popollingvo), de pli ol 25 000 vortoj, reviziita kiel *Norsk Ordbog* [noŝk ú:rbu:k] (norvega vortaro) 1873. La unuaj ekzemplaj tekstoj en *landsmål* [lán(d)sмо:l] aperis en *Prøver af Landsmaalet i Norge* [pró:ver av lán(d)sмо:le i nóрге] (specimenoj de la kampara lingvo de Norvegio) en 1853. Ĉi tie necesas precizigi, ke la norvega vorto “land” estas plursenca. Ĝi povas respondi al la Esperanta “lando” en du sencoj: kiel politika aŭ geografia unuo, aŭ kiel “tero” kontraste al “maro”; sed ĝi ankaŭ povas signifi “kamparo” kontraste al “urbo”. La termino *landsmål*, kiun iuj norvegoj povus kompreni kiel “tutlanda lingvo”, origine estis intencita por signifi “kampara lingvo”, kontraste al urba. La unua eksperimento de norvega skriblingva formo fare de Ivar Aasen, “*Samtale mellem to bønder*” [sámta:le mélem tu: bón(d)er] (interparolo inter du kamparanoj) el 1849, aperis presforme en la norvega konservativa gazeto *Morgenbladet* (tre formala pron. [mórgenbla:det], tre malformala [mó:rnbла:e]).

Komence la laboro de Ivar Aasen akceptiĝis entuziasme; oni donis al li dumvivan stipendion egalan al profesora salajro, kaj liaj libroj rikoltis entuziasmegajn recenzojn kaj bone vendiĝis. La unuaj, kiuj provis verki en la nova norvega skriblingvo de Aasen, estis la t.n. Bergenaj norveglingvanoj (unuavice Jan Prahll [ja:n pra:l], Georg Grieg [gé:org grig] kaj Henrik Krohn [hénrik kru:n]), la Trondhejm-regionano Erik Sommer [é:rik sómer], kiu eldonis kajereton de “Historiaj Kantoj” en 1857, kaj la Telemark-ano Aasmund Olavsson Vinje [ó:smun ú:lavson vínje]. Neniu el tiuj konsideris la *landsmål* de Ivar Aasen kiel ion alian ol elirpunkton. En 1858 nur tri personoj eldonis tekstojn en *landsmål*: Aasen, Vinje kaj Prahll. Ĉiu el la triopo havis sian propran lingvaĵon, kaj neniu el tiuj lingvaĵoj estis senpere komprenebla por iu, kiu neniom scipovis da norena lingvo.

Ĉar Aasen neniam skribis grandan program-artikolon pri sia projekto, oni atribuis al li malsamajn prilingvajn vidpunktojn; unuj vidis en li burĝan naci-romantikiston, aliaj emfazas la pedagogiajn flankojn de lia projekto, rigardante Ivar Aasen kiel antaŭulon de la socialismo. La plimulto eble konsideris, ke Aasen havas iom el ambaŭ tendencoj. Por Ivar Aasen la plej arĥaikaj formoj estis la aŭtentikaj kaj plej bonaj. Temo, al kiu Aasen konstante revenadis, estas, kiel la uzo de “plenaj vokaloj” en la deklinaciaj finaĵoj donas al la *landsmål* pli grandan belsonecon ol la dana, kiu reduktis tiujn vokalojn al sia “eterna e”.

En la normaj skandinavaj lingvoj la substantivoj ne plu estas deklinaciataj laŭ kazoj; sed la difina artikolo – origine montra pronomo, kiel en multaj aliaj lingvoj – algluiĝis al la substantivoj kiel deklinaciaj finaĵoj. Sekve la substantiva deklinacio havas kvar formojn: nedifinan singularan, difinan singularan, nedifinan pluralan kaj difinan pluralan.

La formo de Aasen estas nomata “i-lingvaĵo”, ĉar finiĝas per -i la difina singularo de “fortaj” ingenraj substantivoj kaj la difina pluralo de neŭtraj substantivoj. En la hodiaŭa *nynorsk* la normala finaĵo de ambaŭ formoj estas -a, t.n. “a-lingvaĵo”.

La nedifina pluralo de virgenraj kaj ingenraj substantivoj finiĝas per -r. Por la difina pluralo origine aldoniĝis -ne (aŭ -na) al tiu finaĵo, sed en ĉiuj norvegaj dialektoj la -r- aŭ malaperis aŭ ŝanĝiĝis antaŭ -n-. Aasen tamen konservis -r- en difina pluralo, parte por alproksimigi la lingvon al la norena, parte por marki, ke en iuj dialektoj la -r- tamen lasis spurojn (ĉu -d- aŭ -t- ĉu palataligon de la -n-).

En ĉiuj dialektoj, ĉe la substantivoj estis kunfandiĝintaj la norenaj akuzativo kaj nominativo, sed la dativo plu ekzistis, kaj la plena norena plurala dativa formo estis enigita en la normon de Aasen kaj iom uziĝis, precipe en poezio.

En la skandinavaj lingvoj la verboj ne plu estas konjugaciataj laŭ la persono de la subjekto – same kiel en Esperanto. Ĝis iam en la unua duono de la 20a jarcento, tamen, en la normaj dana kaj sveda lingvoj, en prezenco kaj ankaŭ en preterito de “fortaj” verboj oni distingis ne inter ĉiuj personoj, sed inter singularaj kaj pluralaj verboformoj. Kelkaj arĥaikaj norvegaj dialektoj ankoraŭ posedas tian distingon, kaj Aasen kompreneble enigis ĝin en sian normon. En la hodiaŭa *nynorsk* ĝi ne ekzistas, nek en la aliaj skandinavaj lingvoj.

En la normo de Aasen la verboj havis ankaŭ subjunktivajn formojn, kaj prezencajn kaj preteritajn, sed tiuj ne estis multe uzataj. Tamen Vinje, en *Vojaĝaj memoroj el la somero 1860*, uzas multajn subjunktivojn, priparolante la belulinojn de Trondhejmo; sed, konscia pri la malofteco de tiuj formoj, li aldonas: “Por tiel belegaj pensoj mi devas uzi la tutan riĉecon de la lingvo.”

Ivar Aasen establis rigoran rangigon de la dialektoj depende de tio, kiom proksimaj ili estis al la norena. En la antaŭparolo al *Specimenoj de la kampara lingvo* li diras, ke la plej bonaj dialektoj estas tiuj de la okcidentaj regionoj Hardanger [hardánger], Voss [vos] kaj Sogn [songn], dum “la dialektoj norde de la montaro [en la regiono de Trondhejmo] estas inter la pli malbonaj aŭ pli kripligitaj”. Aasen malmulte profitis el siaj studoj de la nord-norvegaj dialektoj, ĉar la gramatikaj formoj, laŭ lia labora raporto, estis “ege malmultaj kaj simplaj”.

La okcidentaj skandinavlingvaj variaĵoj konservas la diftongojn **ei**, **au** kaj **øy**, dum la orientaj variaĵoj, al kiuj ĉi-kuntekste apartenas ankaŭ la normaj sveda kaj dana, monoftongigis la unuan el ili al **e** kaj la du aliajn al **ø**. Ankaŭ la monoftongajn dialektojn de la regiono Hedemarken [hé:demarken] (nord-oriente de Oslo) Aasen rapide povis ellasi kiel danecajn. Dum la tempo de Aasen la ĝenerala supozo estis, ke en la Mezepoko ekzistis unueca norvega nacia lingvo. Tamen postaj lingvistoj montris, ke estis diferencoj inter norvegaj dialektoj ankaŭ antaŭ mil jaroj, tiel ke multo el tio, kion Ivar Aasen kondamnis kiel danan influon, kripligon kaj “buŝan neglektemon”, efektive estas malnovaj kaj origine norvegaj formoj.

Kiam Ivar Aasen komencis sian kolektan laboron, furoris la naci-romantikismo. La ideoj de Herder, ke ĉiu nacio havas popolan spiriton, “Volksgeist”, kiu manifestiĝas en lingvo, literaturo, arto kaj aliaj kulturaj esprimiloj, karakterizis la naci(ism)an pensadon en Eŭropo dum la 1840-aj jaroj. Propra skriba lingvo gravis kiel simbolo de la memstareco de Norvegio, estante decida atestilo pri tio, ke la norvegoj diferencas de la danoj. Post proksimume 1860, tamen, la entuziasmo foris. Kvankam neniam temis pri forpreno de la stipendio de Aasen, lian laboron oni emis ignori, liajn librojn la recenzistoj emis malatenti, kaj la vendado marŝis tre malrapide. Estas proponitaj diversaj klarigoj de tiu etosŝanĝo; i.a. ke Aasen stagnis rilate al la ideologia evoluo. Aasen trafis la spiriton de la tempo, kiam li prezentis sian projekton en 1842, sed la naci-romantikismo kulminis en Norvegio en 1849. Tio, ke la lingvoformo de Aasen estis “pli norvega”, do ne plu estis nepre avantaĝa dum la 1850-aj jaroj. Alia faktoro,

kiu eble ludis rolon, estis la “skandinavismo”, movado precipe intelektula pri interfratiĝo de la skandinavaj popoloj. Por tiuj, kiuj pledis por komuna skandinava skriblingvo, *landsmål* apenaŭ estus taŭga alternativo. Tia, kia la normo de *landsmål* prezentiĝas en la definitivaj versioj de “Norvega Gramatiko” (1864) kaj “Norvega Vortaro” (1873), ĝi estas ege arĥaika, kun kompleksa gramatika sistemo kaj rigore purismaj reguloj pri la vortprovizo, laŭ kiuj precipe malaltgermanaj pruntvortoj komenciĝantaj per an- aŭ be- estas malpermesitaj. Inter la lastaj aferoj, super kiuj Aasen laboradis fine de la 1880-aj jaroj, estis la ankoraŭ nepublikigita disertaĵo *Målfusk* [mó:lfusk] (lingva fuŝaĵo). En ĝi li kritikis la *landsmål*-ajn verkistojn pro danismaj paŭsaĵoj; li esprimas malŝaton de multaj vortfaraj kreaĵoj de la renoma verkisto Arne Garborg [á:rne gá:rborg], kiel **norskdóm** [nóŝkdu:m] (norvegeco); kaj li kritikis malzorgan ĉiutagan parolon.

Dum la 20a jarcento okazadis reciproka alproksimiĝo inter *landsmål* kaj la lingvo originanta en la dana, poste ricevonta la nomon *Rigsmaal* [ríksmo:l], laŭ nuna ortografio *riksmål* (regna lingvo), kaj ankoraŭ pli poste *bokmål* [bú:kmo:l] (libro-lingvo). En la oficiala novnorvega oni realigis grandajn ortografiajn ŝanĝojn, forlasante la etimologiajn kaj purismajn normigajn principojn de Aasen favore al alproksimiĝo al la libro-lingvo kaj al la orient-norvegaj dialektoj. Ĉi tiu evoluo estis okazanta jam dum Aasen ankoraŭ vivis, sed ĝi akceliĝis per la decido pri la unua oficiala novnorvega normo en 1901. Ankaŭ en la vortprovizon oni laŭgrade enlasis multajn vortojn, kiujn Aasen malakceptis kiel nenorvegajn, sed la malpermeso de vortoj komenciĝantaj per an- kaj be- grandparte restis – kvankam por kelkaj oftaj vortoj kiel **betale** [betá:le] (pagi) oni ne plu proponas anstataŭajn vortojn. Ĉirkaŭ 1950 la alproksimiĝo estis atinginta tian stadion, ke fariĝis oficiala politiko labori por kunfando de la du lingvoformoj en komunan norvegan, *samnorsk* [sámnoŝk]. Tio vekis kontraŭstaron kaj inter la adeptoj de *riksmål*, la plej daneca variaĵo de *bokmål*, kaj inter la adeptoj de *nynorsk*, kaj la ideo forlasiĝis.

En la norvegaj lernejoj oni devas lerni ambaŭ lingvoformojn, unu kiel “ĉefan” kaj la alian kiel “flankan”, kaj ekzameniĝi pri ambaŭ. Kvankam ankoraŭ regas malkonsento pri la rolo de la “flanka” lingvoformo en la lernejo, ĝustas diri, ke la du lingvoformoj hodiaŭ kunvivas en relative paca kunezistado – almenaŭ kompare kun la lingvobatalo, kiu karakterizis Norvegon dum la plej granda parto de la 20a jarcento.

Same *bokmål* kiel *nynorsk* prezentas altan gradon de fakultativeco, kiun multaj instruistoj konsideras konfuza por la lernantoj. La brita lingvisto Peter Trudgill, kiu vidas la aferon el pli senpartia perspektivo, tamen opinias, ke ĉi tiu fakultativeco povas esti avantaĝa: oni povas elekti lingvajn formojn laŭeble proksimajn al sia propra parola lingvaĵo, kaj tamen uzi oficialan lingvon. Multaj lingvoj prezentas tiel grandan diferencon inter hejma lingvaĵo kaj oficiala lingvo, ke la oficiala lingvo estas perceptata kvazaŭ fremda lingvo.

Zamenhof kaj Esperanto

Lazaro Ludoviko Zamenhof elkreskis en Bjalistoko, kiu situas en la nuna nord-orienta Pollando, sed kiu dum la tempo de Zamenhof apartenis al Ruslando. La urbo estis plurlingva, oni parolis la polan, la rusan, la germanan kaj la jidan. Estante infano, Zamenhof spertis malamikecon inter la gentoj, kaj li opiniis, ke kaŭzo de tio estas, ke homoj ne komprenas unu la alian lingve. Devus eble fari lingvon tiom facilan, ke ĉiuj povu lerni ĝin, ne estante speciale dotitaj pri lingvolernado.

Jam dum la celebrado de sia 19-jara naskiĝtago, en decembro 1878, Zamenhof prezentis al siaj kunlernantoj tian lingvon, *Lingwe Uniwersala*. Li eĉ estis verkinta kanton en ĉi tiu lingvo, kiun oni komune kantis dum la celebrado. La kvar versoj diras (mi citas laŭ mia memoro, kvankam mi ne ĉeestis la celebradon): “Malamikete de las nacjes, / kadó, kadó,

jam temp' está. / La tot' homoze in familje / konunigare so debá." En Esperanta traduko la kanto tekstas: "Malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam temp' estas! La tuta homaro en familion unuigi sin devas." Ĉi tio kredeble estas la sola konservitaĵo el Lingve Uniwersala, sed ĝi sufiĉas por diri ion pri la strukturo de la lingvo. La nomo de la lingvo enhavas unu substantivon kaj unu adjektivon, kaj en la kanto aperas substantivoj en singularo kaj pluralo, kaj verboj en infinitivo, prezenco kaj imperativo.

En 1881 Zamenhof havis preta novan projekton, kiu iom diferencis kaj de Lingve Uniwersala kaj de la posta Esperanto. Konservitaj estas pluraj tekstoj en ĉi tiu lingvo. I.a. la verbo havis du pasintajn tempojn, ne malsimile al latinidaj kaj slavaj lingvoj; kaj la vortoj tendencis esti mallongigitaj preskaŭ ĝis rekoneblo.

La lingvo, kiun ni hodiaŭ konas kiel Esperanto, estis publikigita en 1887, sed estis ellaborita pli frue. Tamen al Zamenhof ne eblis publikigi ĝin antaŭ ol li edziĝis kaj lia bopatro financis la eldonadon. La unua lernolibro pri *Lingvo Internacia*, kiel Zamenhof mem nomis la lingvon, aperis unue ruslingve kaj poste pollingve, franclingve, germanlingve kaj anglalingve. La aŭtoro uzis la pseŭdonimon "Doktoro Esperanto". Baldaŭ *Lingvo Internacia* estis nomata "la lingvo de Esperanto", "la lingvo Esperanto" kaj fine nur "Esperanto".

Zamenhof ne estis lingvisto, li estis okulkuracisto. Sed jam kiel infano li scipovis la kvar lingvojn parolatajn en Bjalistoko. En la lernejo li krome lernis la francan, la latinan kaj la grekan. Ĉiuj tiuj lingvoj havas relative malsimplan formaron. En la gimnazio Zamenhof konatiĝis kun la angla, kaj per tio li malkovris, ke lingvo povas funkcii ankaŭ sen ampleksa kazosistemo kaj multaj verboformoj. Li komprenis, ke ĉiuj lingvoj estas sistemoj, sed ke la sistemeco ne estas konsekvence praktikata. Ankaŭ estis klare al li, ke granda parto de la vortprovizo – la t.n. fremdvortoj – estas komuna al multaj eŭropaj lingvoj, kaj ke same komunaj estas multaj parolturnoj. Kiel la sveda filologo Ebbe Vilborg iam diris en radioprelego: Dum la dua duono de la 19a jarcento la lingva situacio en Eŭropo estis tia, ke ne necesis **inventi** internacian lingvon: oni simple povus ĝin **ekstrakti**. Tion faris Zamenhof: li prenis elementojn konatajn el aliaj lingvoj, sistemigis ilin kaj forĵetis tion, kion li konsideris plimalimpliga balasto. Ĉi tion mi ilustras per kelkaj ekzemploj.

En multaj lingvoj la ortografio malbone respondas al la prononco: la litero c, ekzemple, povas esti prononcata jen k, jen s, jen ĉ, jen ĉ. En Esperanto la principo estas, ke unu litero ĉiam respondu al unu sono. Esperanto havas kelkajn sonojn, por kiuj la pura latina alfabeto ne posedas literon. Tiaj sonoj estas markataj per supersignitaj literoj. Ke la sono ŝ estas skribata s kun supersigno, estas nature. Same nature estus skribi la respondan voĉan sonon ĵ kiel voĉa s, t.e. z, kun supersigno. Tamen Zamenhof elektis j kun supersigno. La kialo ne povas ne esti, ke tiel la skriba bildo de vortoj kun tiu sono estas pli facile rekonebla. La franca vorto "journal" estas importita en Esperanton kiel **ĵurnalo**. Se tiu vorto estus skribita kun z, "žurnalo", laŭ slava modelo, ĝi ne estus facile rekonebla. Similajn "kompromisojn" Zamenhof faris koncerne kelkajn vortojn. Iu parto de pafilo germane nomiĝas "Hahn" = koko, sed france ĝi nomiĝas "chien" = hundo. La kompromiso fariĝis **ĉano!**, kun franceca ĉ kaj germaneca a.

Same en Lingve Uniwersala kiel en la pra-Esperanto de 1881, la akcento estis sur la lasta silabo en la verbaj tempoj, sed sur la antaŭlasta silabo en la ceteraj vortoj. En Esperanto ĝi ĉiam estas sur la antaŭlasta silabo en plursilabaj vortoj, same kiel principe okazas en la pola. (Ankaŭ en la svahila kaj en la keĉua, sed tiujn lingvojn Zamenhof ne konis!)

Multaj lingvoj havas "rekonilojn", kiuj aludas, al kiu vortklaso vorto apartenas. Vortfina -en en la germana, -er aŭ -ir en la franca, kaj -tj en la rusa signalas, ke eble (sed ne certe) temas pri infinitivo. En kelkaj latinidaj lingvoj multaj substantivoj kaj adjektivoj finiĝas per -o aŭ

-a, depende de ilia genro. Ĉi tion Zamenhof sistemigis en sia propra maniero. Li lasis ĉiujn substantivojn finiĝi per -o, ĉiujn adjektivojn per -a, ĉiujn infinitivojn per -i, ĉiujn prezencojn per -as, pluralon per -j, ktp. Tiel facilas determini, al kiu vortklaso vorto apartenas, kaj krome eliminiĝas ĉiuj neregulaj verboj. Se vi scias konjugacii unu verbon, vi scias konjugacii ĉiujn.

Multaj lingvoj uzas prefiksojn kaj sufiksojn por derivi vortojn. En la angla kaj la germana, la prefikso un- povas signifi “la malon”: la angla **unhappy** kaj la germana **unglücklich** (malfeliĉa) estas la malo de **happy** kaj **glücklich** (feliĉa). Sed en la etnolingvoj tiu rimedo ne estas uzata konsekvence. Kvankam “ami” anglalingve estas **love** kaj germanlingve **lieben**, anglalingvanoj ne diras ***unlove**, nek germanlingvanoj diras ***unlieben**, por esprimi “malami”. En Esperanto la uzo de la afiksoj estas sistemigita, kio draste reduktas la nombron da vortoj parkerigendaj. Esperanto havas ĉ. 10 prefiksojn kaj ĉ. 30 sufiksojn, kiuj povas relative libere kombiniĝi kun aliaj elementoj, kaj kiuj krome – malkiel en etnolingvoj – povas funkcii kiel propraj vortoj. Kiel sufikso -ec- indikas abstraktan kvaliton, sed **eco** kiel memstara vorto signifas “kvalito”. Kiel sufikso -em- indikas inklinon, sed kiel memstara vorto **emi** signifas “inklini”.

Konatan ilustraĵon de la fleksebleco, kiun la uzo de afiksoj donas al Esperanto, prezentas la radiko **san**: en etnolingvoj oni bezonas plurajn radikojn por diri **sano**, **saneco**, **sanigi**, **saniga**, **sanigilo**, **saniĝi**, **resaniĝi**, **malsana**, **malsano**, **malsanema**, **malsanulo**, **malsanulejo**. Tiaj derivaĵoj, tamen, emas “leksikiĝi”, t.e. ekhavi konstantan signifon. De **arbo** kaj **-aro** oni formis **arbaro**, kiu signifas tre specifan aron da arboj. Se iu intencus uzi tiun vorton pri alispeca aro da arboj, tiu intenco eble ne estus ĝuste komprenata. En la sama maniero, **vortaro** specialiĝis kiel “libroforma list(eg)o da vortoj, plej ofte ordigita laŭalfabete”, **preĝejo** estas komprenata kiel kristana templo, ne kiel ajna loko, kie oni preĝas, ekzemple moskeo. Iom post iom oni importadis en Esperanton pli da radikoj por igi la lingvon pli preciza. De **pafi** oni derivis **pafilo** kaj **pafilego**. Sed ĉar ekzistas multaj specoj de pafiloj, ekzemple **pistolo** kaj **revolvero**, la iama pafilo nun nomiĝas **fusilo**, kaj la iama pafilego nomiĝas **kanono**.

Ĉi tio kondukis al la nuna kunekzistado de du tendencoj en la evoluo de Esperanto, unu nomata **naturalismo**, konsistanta en tio, ke kiom eble plej multaj vortoj estu rekoneblaj el “naturaj” lingvoj, kaj unu nomata **skemismo**, konsistanta en tio, ke oni povu fari vortojn laŭ la propra “skemo” de Esperanto.

Dum la unua tempo leviĝis multaj protestoj kontraŭ detaloj en la lingvo, kaj ili estis esprimataj per impeto, kiu igus la norvegan lingvobatalon ŝajni kvazaŭ agrabla societa interbabilado. Mi mencias du.

1. Oni forte kritikis, ke Zamenhof elektis kiel kunigan konjunkcion la grekan **kaj**. Li devus elekti la latinan kaj latinidan **et** aŭ **e**.
2. Kial diable oni diru **estas**? Ja estus multe pli nature diri **esas**!

Venis multaj proponoj de reformoj de Esperanto, kaj surbaze de ili Zamenhof en 1894 elsendis projekton de reformita Esperanto por ĝenerala voĉdono inter la adeptoj de la lingvo. Kiel ekzemplan tekston li uzis “Patro nia” en origina kaj reformita Esperanto. El la 264 donitaj voĉoj 157 voĉdonis por konservo de Esperanto tia, kia ĝi estis.

Por sekurigi la unuecon de Esperanto la unua Universala Kongreso de Esperanto, en Bulonjo-ĉe-Marzo 1905, alprenis la verketon *Fundamento de Esperanto* kiel la netuŝeblan bazon de la lingvo. Ĝi konsistas el tri partoj: “Fundamenta Gramatiko”, simpla gramatiko kun 16 paragrafoj, en versioj franca, angla, germana, rusa kaj pola; “Universala Vortaro”, listo de Esperantaj vortoj kun tradukoj en la samajn kvin lingvojn; kaj “Ekzercaro”, konsistanta el ekzemplaj frazoj kaj mallongaj legaĵoj. La sama kongreso elektis larĝkonsistan “Lingvan

Komitaton”, kiu direktu kaj kontrolu la evoluon de Esperanto, i.a. per “Oficialaj Aldonoj” al la Universala Vortaro. Ekde 1908 la Komitato elektis inter siaj membroj 18-membran akademion. Post la dua mondmilito oni nuligis la Lingvan Komitaton kaj ampleksigis la Akademion de Esperanto al 45 membroj.

Estas konstruitaj multaj planlingvoj, kaj antaŭ kaj post Esperanto. La plimulto el ili estas skribotablaj projektoj teorie relative bone fundamentitaj, sed praktike ne tre bone funkciantaj. Unu aspekto, kiu diferencigis la Zamenhofan projekton de multaj aliaj, estis, ke Zamenhof ne kontentiĝis per nure teoria konstruado de la lingvo, sed ke li ankaŭ elprovis ĝin praktike. Tiu elprovado igis lin enkonduki vastsignifajn vortojn kiel **meti**. Li ne kontentiĝis antaŭ ol igi la lingvon flui, antaŭ ol sukcesi verki belsonajn poemojn kaj pensi libere en la nova lingvo. Rigardante la liston de tio, kion Zamenhof tradukis en Esperanton, ni komprenas, ke li volis konscie elprovi la lingvon en laŭeble multaj ĝenroj. Jen la listo:

Dickens: *La Batalo de l’Vivo*

Shakespeare: *Hamleto*

Gogol: *La Revizoro*

Molière: *Georgo Dandin*

Eŭripido: *Ifigenio en Taŭrido*

Schiller: *La Rabistoj*

Eliza Orzeszko: *Marta* (pola “samtempa” romano pri virina sorto)

Proverbaro (prilaboraĵo de plurlingva proverbaro kompilita de Marko Zamenhof, la patro de Ludoviko)

Ŝalom-Aleĥem: *La Gimnazio*

Heine: *La Rabeno de Baĥaraĥ*

H.C. Andersen: *Fabeloj*

La Malnova testamento

Pluraj el tiuj verkoj estas teatraĵoj, kaj oni rajtas supozi, ke Zamenhof tradukis verkojn el ĝuste tiu ĝenro pro tio, ke teatraĵoj estas faritaj por prezentiĝi parole.

Konkludo


La Zamenhofa kompilado de materialo por internacia lingvo surbaze de trajtoj komunaj inter malsamaj eŭropaj lingvoj estas komparebla kun la Aasen-a kompilado de materialo por norvega lingvo surbaze de norvegaj dialektoj, sed tie ĉesas la simileco.

Aasen ĉerpis sian materialon el dialektoj, kiuj principe estis kompreneblaj inter si, kaj li fiksas la gramatikajn kategoriojn laŭ relative malvasta kaj unueca aro da lingvosistemoj. Zamenhof ĉerpis la sian el lingvoj ne kompreneblaj inter si, li havis vastan gamon da diverĝantaj lingvosistemoj, inter kiuj elekti, kiam li devis decidi, kiujn gramatikajn kategoriojn havu Esperanto. Ni scias, ke li multe ŝanceliĝis antaŭ ol fari la definitivajn elektojn.

Esenca diferenco inter la ideo malantaŭ *nynorsk* kaj la ideo malantaŭ Esperanto estis, ke *nynorsk* estu kiel eble plej norvega aŭ norena, etnolingvo, dum Esperanto estu kiel eble plej facile lernebla, planlingvo. Tial la “distilaj metodoj” por ekstrakti *nynorsk* kaj Esperanto fariĝis malsamaj: la forĵetaĵo el la distilaĵo de *nynorsk* estis la danaĵoj, dum la forĵetaĵo el la distilaĵo de Esperanto estis la komplikaĵoj.

Nynorsk akiris oficialan statuson en Norvegio. Esperanto ne akiris similan oficialan statuson internacie, sed el ĉiuj planlingvoj lanĉitaj Esperanto estas la sola ĉiutage uzata ne nur kiel praktika komunikilo, sed ankaŭ kiel literatura kaj kultura esprimilo.

La violono



Hannes Larsson

Naskiĝis en Nokia, Finnlando, en 1931. Li diplomiĝis ĉe la Teknika Universitato de Helsinki. Sian karieron kiel inĝeniero li faris en Finnlando, Francio, Italio kaj Belgio. Li specialiĝis pri la rezisto de strukturoj kaj materialoj kaj laboris en du kampoj de pinta teknologio: la spaco (strukturoj kaj kontrolo de temperaturo de satelitoj), kaj la problemoj de strukturoj de nukleaj reaktoroj. Junaĝa Hannes interesiĝis pri la violono, ludis mem kaj estis unua violonisto de studenta simfoniorkestro. Li havas grandan kolekton de muziko por violono. Lia patro konstruis violonon, kiun Hannes nun posedas.

Resumo

La serio de tri prelegoj malfermos fenestron al multaj aspektoj de la violono, kiujn la publiko kutime ne komprenas aŭskultante violonmuzikon. Per desegnaĵoj kaj sonekzemploj la preleganto volas helpi la partoprenantojn ĝui la belan violonmuzikon, kompreninte la teknikajn problemojn kaj la faktorojn, kiuj influas la kvaliton de la sono.

La violono estas belforma instrumento, kies mirinde bela sono kapablas plenigi katedralon aŭ koncertejon kun simfoniorkestro. Unue estos prezentata la tuta familio de arĉinstrumentoj. La antaŭulo de la violono estis dukorda instrumento frotata per arĉo kun ĉevalharoj, uzata de nomadoj en centra Azio. De ĝi evoluis la bizanca lyra, la araba rebab kaj la eŭropa rebek. La moderna violono naskiĝis ĉirkaŭ 1525 en la ĉirkaŭaĵo de Milano. En norda Italio ekzistis multaj centroj de violonfaristoj: en la plej fama, Cremona, laboris la familioj Amati, Stradivari kaj Guarneri. Postaj violonfaristoj provis fari ŝanĝojn, sed neniu sukcesis superi la kvaliton de la modeloj de la italaj majstroj. La prezo de malnovaj violonoj atingis jam milionojn da eŭroj. Per desegnaĵoj kaj fotoj estos montrata la strukturo de la violono kaj klarigataj la etapoj de violonfarado. Ankaŭ la fabrikado de kordoj kaj la arĉo postulas grandan atenton.

Kio influas la kvaliton de la sono? Kompreneble, ĝi dependas de la kvalito de la violono, sed bona violonisto povas agi sur la sono precipe per la tekniko de arĉado kaj per ton-tremado. Estos klarigataj la fizikaj fenomenoj, kiuj aperas inter la arĉo kaj la frotata kordo, kie la sono naskiĝas. Oni povas rekoni la grandajn violonistojn ne nur laŭ ilia tekniko, sed ankaŭ laŭ la sono, kiun ili kapablas elserĉi el la violono. Komparo de novaj kaj malnovaj violonoj, kiujn ludis blinde profesiaj violonistoj, montris surprizan rezulton: modernaj violonfaristoj jam atingas la kvaliton de la italaj majstroj.

Poste estos klarigata la tekniko de violonludado: la diversaj teknikoj de arĉado, la rolo de la fingroj de la maldekstra mano, kaj la specialaj sonoj, kiujn oni povas fari (naturaj kaj artefaritaj flutsonoj). Violontekniko havis du epokojn: antaŭ Paganini kaj post Paganini. La unua epoko estos ilustrata per komponaĵoj de Vivaldi, Bach (kiu disvolvis la polifonion), Tartini (kiu komponis la sonaton “La trilo de la Diablo”) kaj Locatelli. Paganini revoluciis la violonludadon. Aŭdiĝos sonekzemploj de la koncĉertoj, variacioj kaj kapriĉoj de Paganini entenantaj la plej akutajn sonojn, rapidegajn duoblajn kordojn, duoblajn flutsonojn kaj “pizzicato” de la maldekstra mano.

Fine, grava parto de la prelego koncernos la muzikon. Unue temas pri la famaj violonistoj/komponistoj Vieuxtemps, Wieniawski, Sarasate kaj Ysaÿe. Due la grandaj komponaĵoj por la violono de la klasika kaj romantika epokoj. Poste la famaj pedagogoj kaj la plej grandaj violonistoj de la 20-a jarcento kaj la juna generacio de virtuozaĵoj de la violono, kun multaj ekstraktoj de muziko.

The violin

Summary

This series of three lectures will throw some light on many aspects of the violin that the general public does not generally appreciate when listening to violin music. Using drawings and sound samples the lecturer wants to help participants enjoy beautiful violin music with an understanding of the technical problems and the factors that influence the sound.

The violin is a beautifully formed instrument whose amazingly beautiful sound can fill a cathedral or a concert hall with a symphony orchestra. First, the whole family of string instruments will be presented. The forerunner of the violin is a two-stringed instrument played with a horsehair bow and used by nomads in central Asia. From this developed the Byzantine lyra, the Arab rebab and the European rebec. The modern violin originated in the Milan area around 1525. In northern Italy there were many centres of violin making; the Amati, Stradivari and Guarneri families worked in the most famous of them, Cremona. Later violin makers have experimented with changes, but none has managed to beat the quality of the models made by the Italian masters. The price of old violins has already reached millions of euros. Drawings and photos will show the structure of the violin and explain the stages in making a violin. The manufacture of strings and the bow also demands great attention.

What influences the quality of the sound? Of course, it depends on the quality of the violin, but a good violinist influences the sound mainly through the techniques of bowing and vibrato. The physical phenomena that appear between the bow and the string, where the sound is produced, will be explained. Great violinists can be recognised not only by their technique, but also by the sound they can conjure from the violin. A comparison of new and old violins, played blindfold by professional violinists, gave a surprising result: modern violin makers now attain the quality of the Italian masters.

Then the technique of playing the violin will be explained: the various bowing techniques, the role of the fingers and the left hand, and the special sounds that can be made (natural and artificial harmonics). Violin technique has had two eras: before Paganini and after Paganini. The first era will be illustrated with compositions by Vivaldi, Bach (who developed polyphony), Tartini (who composed the “Devil’s Trill Sonata”) and Locatelli. Paganini revolutionised violin playing. We will hear sound samples from the concertos, variations and caprices by Paganini that contain the highest notes, the fastest double chords, double harmonics and pizzicato with the left hand.

Finally, an important part of the lecture will examine violin music, firstly the famous violinist-composers Vieuxtemps, Wieniawski, Sarasate and Ysaÿe, secondly the great compositions for the violin from the classical and romantic eras, and then the famous teachers and the greatest violinists of the 20th century and the young generation of violin virtuosos, with many musical extracts.

Le violon

Résumé

La série de trois conférences donnera un aperçu sur de nombreux aspects du violon, que le public ne comprend généralement pas quand il écoute de la musique jouée au violon. A l'aide de dessins et d'illustrations sonores, le conférencier souhaite permettre aux participants de mieux apprécier la belle musique du violon, en ayant compris les problèmes techniques et les facteurs qui influent sur la qualité du son.

Le violon est un instrument aux belles formes, dont le son d'une étonnante beauté est capable d'emplir une cathédrale ou une salle de concert avec orchestre symphonique. Tout d'abord on présentera toute la famille des instruments à cordes frottées. L'ancêtre du violon était un instrument à deux cordes frottées par un archet muni de crins de cheval, utilisé par des nomades d'Asie centrale. De lui sont issus la lyra byzantine, le rebab arabe et le rebec européen. Le violon moderne est né vers 1525 aux environs de Milan. En Italie du nord existaient de nombreux centres de lutherie: dans le plus célèbre, Crémone, œuvraient les familles Amati, Stradivari et Guarneri. D'autres luthiers ont ultérieurement essayé de faire des modifications, mais aucun n'est parvenu à surpasser la qualité des modèles des maîtres italiens. Le prix de certains violons anciens a pu atteindre des millions d'euros. A l'aide de dessins et de photos on montrera la structure du violon et on expliquera les étapes de sa fabrication. La fabrication des cordes et de l'archet exige également une grande minutie.

Qu'est-ce qui influe sur la qualité du son? Bien sûr, elle dépend de la qualité du violon, mais un bon violoniste peut agir sur le son, en particulier par sa technique d'archet et par le vibrato. On expliquera les phénomènes physiques qui se manifestent entre l'archet et la corde frottée, là où naît le son. On peut reconnaître les grands violonistes non seulement à leur technique, mais encore au son enchanteur qu'ils sont capables de tirer du violon. Une comparaison entre des violons actuels et des violons anciens, joués en aveugle par des violonistes professionnels, a donné un résultat surprenant: les luthiers modernes atteignent déjà la qualité des maîtres italiens.

Ensuite on expliquera la technique de jeu du violon: les diverses techniques d'archet, le rôle des doigts de la main gauche, et les sons spéciaux que l'on peut produire (harmoniques naturels et artificiels). La technique du violon a eu deux époques: avant Paganini et après Paganini. La première époque est illustrée par des compositions de Vivaldi, Bach (qui a développé la polyphonie), Tartini (qui a composé la sonate "Le Trille du Diable") et Locatelli. Paganini a révolutionné le jeu du violon. On entendra des échantillons des concertos, variations et caprices de Paganini contenant les sons les plus aigus, des doubles-cordes très rapides, des doubles harmoniques et un pizzicato de la main gauche.

Enfin, une partie importante de la conférence concernera la musique. Il s'agit d'abord des célèbres violonistes-compositeurs Vieuxtemps, Wieniawski, Sarasate et Ysaÿe. Ensuite, des grandes compositions pour violon des époques classique et romantique. Et enfin des pédagogues célèbres et des plus grands violonistes du 20e siècle, et de la jeune génération de virtuoses du violon, avec de nombreux extraits musicaux.

Fiðlan

Útdráttur

Þessi röð þriggja fyrirlestra opnar gluggann að mörgum hliðum fiðlunnar, sem áheyrendur skilja ekki allajafna þegar þeir hlýða á fiðlutónlist.

Fyrirlesarinn leitast við að hjálpa þátttakendum að njóta hinna fögru fiðlutóna með hjálp skýringarmynda og hljóddæma, eftir að þeir hafa öðlast skilning á tæknilegum vandamálum og þáttum sem hafa áhrif á eðli tónsins.

Fiðlan er fagurlagað hljóðfæri, og hinn ótrúlegi hljómur hennar getur fyllt dómkirkjur sem tónleikahallir með sinfóníuhljómsveit. Fyrst verður gervöll fjölskylda strokhljóðfæra kynnt. Forveri fiðlunnar er tvístrengja hljóðfæri, upprunnið meðal hirðingja í Mið-Asíu, strokið með hrosshársboga. Úr því þróaðist býsanska lýran, hin arabíska rebab og hin evrópska rebek. Nútímafiðlan leit dagsins ljós í kringum 1525 í nágrenni Mílanó. Margar miðstöðvar fiðlusmiðar voru á Norður-Ítalíu: í þeirri frægustu, Cremona, störfuðu fjölskyldurnar Amati, Stradivari og Guarneri. Síðar reyndu fiðlusmiðir að betrumbæta fiðluna, en engum tókst að slá gömlu ítölsku meisturunum við. Gamlar fiðlur hafa selst á milljónir evra. Skýringarmyndir og ljósmyndir verða notaðar til þess að varpa ljósi á gerð fiðlunnar og skýrð verða stig fiðlusmiðinnar. Gerð strengja og boga er einnig sérlega mikilvæg.

Hvað hefur áhrif á tóninn? Það ræðst auðvitað af gerð og gæðum fiðlunnar, en góður fiðlari getur unnið að tóninum með bogatækni og vibratói. Eðlisfræði samspils boga og strengs, sem myndar tóninn, verður skýrð. Miklir fiðlusnillingar þekkjast ekki eingöngu af tækninni heldur einnig af tóninum sem þeir geta töfrað fram úr fiðlunni. Óvæntar niðurstöður fengust þegar atvinnufiðluleikarar gerðu blindan samanburð á gömlum og nýjum fiðlum: nútíma fiðlusmiðir eru búnir að ná ítölsku meisturunum.

Síðar verður fiðlutækni skýrð: hin margvíslega bogatækni, hlutverk fingra vinstri handar og sérstök hljóð sem framkalla má (tvær gerðir flaututóna). Fiðlutækni skiptist í tvö tímabil: fyrir og eftir Paganini. Fyrri tímabilið verður skýrt með verkum Vivaldis, Bachs (sem þróaði pólýfóníuna), Tartinis (sem samdi sönötuna “Djöflatrillan”) og Locatelli. Paganini gjörbylti fiðluleiknum. Sýnd verða hljóddæmi úr konsertum, tilbrigðum og kaprísum Paganinis sem innihalda hin hvellustu hljóð, leiftursnögg tvígrip, flaututónatvígrip og vinstrihandar pizzicato.

Síðast en ekki síst fjallar fyrirlesturinn um tónlistina. Í fyrsta lagi er talað um hina frægu fiðluleikara/tónskáld Vieuxtemps, Wieniawski, Sarasate og Ysaÿe. Í öðru lagi um hinar stóru fiðlutónsmiðar klassíska og rómantíska tímabilsins. Að lokum verður fjallað um hina frægu kennara og mestu fiðluleikara 20. aldar, sem og hina ungu kynslóð fiðlusnillinga með fjölda hljóddæma.

La violono

La familio de la arĉinstrumentoj

La arĉinstrumentoj estas instrumentoj kun kvar kordoj, kiujn oni frotas per arĉo provizita per ĉevalharoj. La grupo de la arĉinstrumentoj konsistas el violono, aldo, violonĉelo kaj kontrabaso. En simfoniorkestroj tiu grupo entenas dekojn da instrumentoj, inter kiuj la violonoj (unuaj kaj duaj violonoj) estas la plej multnombraj. Ankaŭ piano, gitaro kaj harpo estas kordinstrumentoj, kies kordojn oni frapas aŭ pinĉas. Sed ofte oni nomas la grupon de arĉinstrumentoj simple “la kordoj”, kiam ne estas risiko de konfuzo.

La violono estas la plej malgranda el la arĉinstrumentoj. La aldo tre similas la violonon, sed ĝiaj dimensioj estas je sesono pli grandaj ol tiuj de la violono. La kordojn de aldo oni agordas je kvinto sub la notoj de violono. Oni tenas la violonĉelon vertikala inter la kruroj kaj apogas ĝin sur la planko per pikilo, ĝiaj kordoj estas agordataj je okto sub tiuj de aldo. La kontrabaso estas uzata ankaŭ en ĵazo kaj oni tiam kutime pinĉas la kordojn. Kontrabaso povas eĉ esti solista instrumento. La plej fama virtuoza de kontrabaso estis Giovanni Bottesini, kiu vivis en la 19-a jarcento kaj kiun oni nomis la Paganini de la kontrabaso. Li komponis konĉertojn por kontrabaso kaj orkestro. Kontrabasoj donas la basvoĉon en simfoniaj orkestroj. Kelkfoje ili eĉ ludas ĉefrolon, ekzemple la elefanto en *La karnavalo de la bestoj* de Saint-Saëns.

Arĉkvarteto konsistas el du violonoj, aldo kaj violonĉelo. La sama vorto signifas komponaĵon por tiu ensemblo, kiun oni povas nomi ankaŭ arĉkvaropo.

Historio de la violono

La praviolono naskiĝis antaŭ pli ol mil jaroj ie en centra Azio, kie nomadoj uzis dukordan instrumenton, kiun ili frotis per ĉevalharoj. Ĝi estis facile transportebla, kaj ĉevalojn ili ja havis. Tiu instrumento disvastiĝis al multaj Aziaj regionoj: Ĉinio, Hindio, Bizanco. Ankoraŭ hodiaŭ la nacia instrumento de Mongolio estas Morin khuur. Ni aŭdis ĝin en la Azia kongreso de Ulanbatoro en 2010. Morin khuur estas dukorda arĉinstrumento kun ĉevalkapo. Oni tenas ĝin inter la kruroj, sed ne apogas ĝin sur la planko. Malgraŭ la kruda formo de la sonkesto ĝi havas mirinde belan sonon.

En Bizanco tiu instrumento nomiĝis *lyra*. La plej malnovan reprezentadon de *lyra*, eburan skulptaĵon sur bizanca sarkofago el ĉ. la jaro 1000, oni povas vidi en muzeo de Florenco. Oni ne miksu kun la liro, pinĉata kordinstrumento (mantenata harpo de la antikveco). Posteulo de la *lyra* ekzistas hodiaŭ en Kroatio, kie oni nomas ĝin lirica.

El la *lyra* araboj kreis sian arĉinstrumenton *rebab*, kiun ili alportis al Eŭropo. De ĝi evoluis la mezepoka instrumento *rebek*, kiun uzis la menestrelaj (mezepokaj poetoj-muzikistoj). Oni konstruas ankoraŭ nuntempe modernajn *rebek*-ojn, kiujn uzas muzikistoj por ludi mezepokan muzikon.

La violono aperis ĉ. 1525 en norda Italio. Resume, la violono estas heredaĵo, kiun ni ricevis de Aziaj nomadoj.



Najbaraj arĉinstrumentoj

Kelkfoje la familio de la vjoloj estas malprave prezentata kiel la antaŭuloj de la violono. Fakte, la violono evoluis sendepende de la vjolo. La gambovjoloj, kiujn oni tenas inter la kruroj, ekzistas en pluraj dimensioj. Gambovjolo estas seskorda arĉinstrumento, aperinta jam

fine de la 15-a jarcento. La gambovjolo estis tre ŝatata de aristokratoj. Ĝi eksmodiĝis post la franca revolucio. De kelkaj jaroj oni revivigis la gambovjolon. Jordi Savall estas la plej fama nuntempa gambovjolisto. La sono de gambovjolo estas malpli laŭta kaj malpli brila ol tiu de violono, tamen delikata, mistera kaj melankolia. De Sainte-Colombe (1640-1700) kaj Marin Marais (1656-1728) estis famaj gambovjolisto kaj komponistoj.

Alia malnova instrumento estas la *viola d'amore* (vjolo de amo). Ĝi apartenas al la kategorio *viola da braccio* (vjolo tenata per la brako). Kutime ĝi havas ses kordojn kaj ses "simptiajn kordojn", kiuj vibras pro resonanco. Ĝi estis tre ŝatata en la 17-a jarcento. *Viola d'amore* havas delikatan, misteran kaj allogan sonon. Vivaldi (1678-1742) tre ŝatis kaj ludis virtuoze ankaŭ tiun instrumenton, kvankam ĝi jam tute eksmodiĝis komence de la 18-a jarcento. Fabio Biondi (1961-), spertulo de baroka muziko, registris la 8 konĉertojn de Vivaldi por *viola d'amore*.

Violonfaristoj

La unua violono naskiĝis ĉ. 1525 ie en la ĉirkaŭaĵo de Milano, eble en Cremona. En norda Italio ekzistis ekde la 16-a jarcento multaj centroj de violonfaristoj. La plej fama estis Cremona, kie la familioj Amati, Stradivari kaj Guarneri kreis superajn violonojn. En Brescia agis Da Salò kaj Maggini. Alia centro estis Piacenza, kie laboris la familio Guadagnini. Vieuxtemps, Wieniawski, Ysaÿe kaj Grumiaux havis Guadagnini-violonon.

En Cremona la dinastio Amati laboris dum du jarcentoj. Niccolò Amati (tria generacio) instruis al Antonio Stradivari, la plej fama violonfaristo, kiu kreis 1100 instrumentojn. Alia lernanto de N.Amati estis Andrea Guarneri, kies nepo Giuseppe iĝis fama violonfaristo. Giuseppe studis ankaŭ ĉe Stradivari. Paganini havis Guarneri-violonon Il Cannone (la kanono). Tria lernanto de N.Amati estis Jakob Steiner, kiu konstruis bonegajn violonojn en Tirolo. Ili estis eĉ pli valoraj ol la italaj violonoj ĝis ĉ. 1800.




Antonio Stradivari (1644-1737) faris malgrandajn ŝanĝojn en la modeloj de siaj majstroj, esploris plibonigojn kaj zorgis pri ĉiuj detaloj de la konstruado. El la ĉ. 1100 instrumentoj, kiujn li kreis dum sia 93-jara vivo, ekzistas ankoraŭ ĉ. 650. En 2011 Stradivari-violono estis vendita por 12 milionoj da Eŭroj. Multaj famaj violonistoj havis/havas Stradivari-violonon (aŭ Guarneri-violonon). Junaj talentuloj ne povas aĉeti tiom multekostan instrumenton, sed sponsoroj aĉetas kaj pruntedonas ĝin.

En multaj aliaj landoj kreiĝis gravaj centroj de violonfarado. Mi mencias nur Füssen en Germanio kaj Mirecourt en Francio.

Violonfarado

La tri ĉefaj partoj de violono estas la korpo aŭ la sonkesto, la kolo kaj la kordoj. La korpo konsistas el la sontabulo kaj la dorso kunigitaj per la flankoj. Fine de la kolo estas la kapo kun la kejlaj por agordo.



Fingroplato estas gluita sur la kolo kaj plilongiĝas super la korpo. La kordoj estas fiksitaj al la agordkejlaj en la kapo kaj al la kordotenilo. La kordoj apogas sin sur la sileo (iom elstara randaĵo en la mallarĝa fino de la fingroplato) kaj sur la ponto. Oni frota la kordojn per arĉo meze de la spaco inter la fingroplato kaj la ponto. Mentonapogilo permesas teni la violonon sen apogi la mentonon sur la sontabulo.

Violono konsistas el 70 elementoj. La sontabulo estas farita el piceo, la dorso kaj la flankoj el acero. La dikeco de la sontabulo varias inter 2,5 kaj 3 mm, la dorso estas iom pli dika. La basa trabo aŭ basa strio estas gluita sub la sontabulo, ĝi kontribuas al la rigideco de la sontabulo. La sonfosto ne estas gluita, ĝi lokiĝas ĉ. 3 mm malantaŭ la dekstra piedo de la ponto. La sono tre dependas de la preciza loko de la sonfosto. La fingroplato, la kordotenilo kaj la mentonapogilo estas el ebano. Violonfaristo bezonas ĉ. tri monatojn por estigi violonon. La lasta operacio estas la vernisado, kiu postulas multe da tempo. La verniso donas al la violono belan aspekton kaj protektas ĝin de la humideco de l'aero kaj de la tuŝo.

Tiu malgranda (la sonkesto de violono estas longa 36 cm), malpeza (0,4 kg) kaj belforma instrumento havas mirinde belan sonon, kiu kapablas plenigi katedralon aŭ koncertejegon.

Trafe oni nomis la violonon “reĝino de la instrumentoj”.

En traktaĵoj pri violonfarado oni trovas ĉiujn indikojn pri la dimensioj ktp. Nuntempe violonfaristoj kopias Stradivari-violonojn. Mia patro estis ĝardenisto sed revis pri konstruado de violonoj. Post sia emeritiĝo li estigis violonon, kiun mi ankoraŭ havas. Li ne lernis la arton de violonfarado en lernejo aŭ ĉe violonfaristo sed uzis nur germanlingvan traktaĵon el la jaro 1920 [1] kaj kelkajn francajn librojn.

La bildo montras la ponton kaj la kvar kordojn kiel la violonisto vidas ilin. Violono agordiĝas laŭ perfektaj kvintoj. De maldekstre dekstren la kvar kordoj estas g, d, a, e. Sed oni nombras la kordojn per romiaj ciferoj: I = e, II = a, III = d, IV = g. La ponto havas du funkciojn. La kurba formo permesas samtempe ludi la du internajn kordojn. Ĝi transdonas la vibradon de la kordoj al la sonkesto. La kordo e estas el ŝtalo. La kordo a estas el ŝafintesto, la kordoj d kaj g el ŝafintesto aux plasto ĉirkaŭita de spiralo el alumina aŭ arĝenta fadeno.





Arĉo de violono estas longa 75 cm, la fasko de ĉevalharoj 65 cm. La diametro de la stango farita el pernambuko (ligno el Brazilo) varias inter 8 kaj 5 mm. Arĉo pezas 60 g. La fasko troviĝas inter la pinto kaj la tenilo, kiun oni povas movi per ŝraubo por streĉi la ĉevalharojn. François Xavier Tourte (1747-1835) estis la unua, kiu uzis pernambukon. Li perfektigis la arĉon serĉante la plej bonan formon kaj distribuon de rigideco laŭ la longo. Oni nomis lin la Stradivari de la arĉfaristoj.

Oni frotras la harfaskon sur peco de kolofono por krei adheron inter la arĉo kaj la kordoj. Kolofono estas rezino, restaĵo de la distilado de terebintino de pino.

La kvalito de violono (sekreto de Stradivari?)

Oni hipotezis, ke la kremonaj violonfaristoj uzis lignon el arboj dehakitaj dum la tiel nomata minimumo de Maunder, periodo de malvarmego (1625-1715), kiam la arboj kreskis malrapide. Sed la hipotezo ne estas pruvita. Ankaŭ neniuj metodo de sekigado kaj stokado povas esti taksata kiel supera.

La recepto de la vernisoj uzitaj en Cremona ne estas konata. Tamen, nuntempe oni agnoskas, ke la verniso ne povas multe ŝanĝi la sonkoloron; ĝi gravas nur por la aspekto kaj la rezisto en tempo.

En 2012 aperis raporto [2] pri scienca esploro koncerne komparon de malnovaj kaj novaj violonoj. Partoprenis ses violonoj: tri malnovaj (du Strad, unu Guarneri) kaj tri novaj. 21 profesiaj violonistoj ludis blinde. Oni ŝprucis parfumon sur la violonojn por malhelpi identigon. Ankaŭ la sciencistoj estis blindigitaj por eviti, ke ili montru apartan atenton mantene la malnovajn violonojn, kies komerca valoro atingis centoblon de la prezo de la novaj. La esploro donis surprizan rezulton. La profesiuloj ne kapablis distingi inter la malnovaj kaj la novaj instrumentoj. Kiel la plej bonan ili taksis unu el la novaj violonoj, kaj kiel la plej malbonan unu el la du Stradivari. La ĉefesploristo Claudia Fritz rekomendis, ke anstataŭ serĉi la kaŭzojn de la sonkvalito de malnovaj violonoj, oni esploru kiamaniere violonistoj taksas la kvalitojn de violono. Ni povas konkludi, ke 1) la modernaj violonfaristoj jam atingis la kvaliton de la italaj majstroj, 2) sur la merkato de malnovaj violonoj regas spekulacio.

La sonkvalito

La sonkvalito de violono dependas kompreneble de la kvalito de la violono. Sed la violonisto povas agi sur la sono de violono, precipe per la tekniko de arĉado. Gravas la pozicio de la arĉo (pli aŭ malpli proksima al la fingroplato aŭ al la ponto), la angulo de la arĉo (per la tuta larĝo de la fasko de ĉevalharoj aŭ per kelkaj haroj de la rando), la rapideco de la arĉomovo kaj la premo de la arĉo. La maldekstra mano partoprenas per kordotremigo kaj la kvalito de la kontakto inter la fingro kaj la kordo. Sume, gravas la arto de la violonisto vibrigi la kordojn.

Sed kio okazas fizike en la kontaktpunkto inter l'arĉo kaj la kordo, kie naskiĝas la sono? Imagu, ke violonisto premas sian arĉon sur kordo per la forto F kaj komencas tiri ĝin kun konstanta rapido. Pro la uzo de kolofono aperas frotforto, la kordo adheras al la arĉo. Sed kordo estas kiel risorto, kiu tiras malantaŭen proporcie al la distanco de la ripozloko. Kiam tiu elasta forto atingas maksimuman valoron, kiu egalas $\mu_s F$ (μ_s estas la statika frotkoeficiento), la kordo revenas malantaŭen kaj komencas vibri. Post pluraj cikloj, kiujn oni nomas "atako",


la vibrado stabilas. Oni esploris la vibradon teorie, per cifera simulado kaj per eksperimentoj [8]. La fenomenoj ankoraŭ ne estas perfekte komprenataj, sed mi povas doni la jenan simplan klarigon. Ĉiu ciklo de la vibrado konsistas el du partoj: 1) Adhero de la kordo al la arĉo kaj movo kun la rapido de la arĉo, 2) glitado en la kontraŭa direkto kun pli granda (8-obla ĝis 10-obla) rapido kaj 8-ona ĝis 10-ona daŭro. Dum la dua fazo la arĉo agas sur la kordo en la direkto de la arĉomovo per forto, kiu egalas $\mu_d F$, kie μ_d estas la dinamika frotkoeficiento. Tipaj valoroj estas $\mu_s = 0,7$ kaj $\mu_d = 0,2$. Oni vidas, ke la fizikaj fenomenoj ne estas linearaj, kaj tio estigas harmoniojn, t.e. influas la sonkoloron. Ludi violonon postulas la kapablon estigi harmonian vibradon de la frotata kordo (ĉiu violonisto posedas karakterizan atakon) kaj agi sur la vibrado por ŝanĝi la sonkoloron. Tie kuŝas la esenco de la esprimpovo de violonisto.

La tekniko de violonludo

Iu, kiu ne mem lernis ludi violonon, eble povas pensi, ke temas pri facila instrumento, se juĝi laŭ la ŝajna facileco montrata de bona violonisto. Mi donos ĉi-sube kelkajn klarigojn, kiuj espereble permesos al muzikamantoj eĉ pli ŝati violonon. Temas pri teknikoj de la dekstra mano kaj teknikoj de la maldekstra mano. Oni nomas dekstra mano la manon, kiu tenas la arĉon. Kompreneble, maldekstruloj tenas la arĉon per la maldekstra mano kaj ludas violonon kun inversigitaj kordoj.

Per la dekstra mano oni faras diversajn arĉadojn. La movoj nomiĝas *tiro* kiam la kontaktopunkto kun la kordo moviĝas en la direkto tenilo – pinto, kaj *puŝo* por la inversa movo. Oni uzas internacie francajn aŭ italajn vortojn por la diversaj teknikoj de arĉado.


Legato estas sinsekvo de pluraj notoj per la sama arĉomovo, la arĉo restas ĉiam en kontakto kun la kordo. *Martelé* estas farata per frapoj sur la kordo, unu aŭ pluraj notoj per la sama arĉomovo. *Staccato* estas sinsekvo de pluraj rapidaj notoj per la sama arĉomovo; inter ĉiu noto la arĉo haltas dum momenteto. Tio postulas lertan uzon de la fingroj kaj la pojno. *Spiccato* estas sinsekvo de rapidaj notoj, kie oni movas la arĉon per mallongaj movetoj tien-reen en la centra parto de la arĉo; inter la notoj la arĉo saltetas. *Ricochet* estas sinsekvo de rapidaj notoj per la sama arĉomovo, kie la arĉo saltetas inter la notoj. *Bariolage* estas sinsekvo de rapidaj notoj, kie ĉiu noto estas farita sur alia kordo; en la kutima bariolage oni uzas sinsekve la kvar kordojn g-d-a-e kaj inverse e-a-d-g. La violonisto movas la dekstran brakon en pendola maniero. Genia ekzemplo de bariolage en orkestra muziko estas En Saga (Fabelo) de Sibelius. Sur la 5-a paĝo de la partituro [3] la unuaj violonoj (dividitaj en kvar grupoj) kaj la duaj violonoj kaj la aldoj dividitaj en du grupoj ludas kun sordino sinsekvon de bariolage, dum paŭzo de la aliaj instrumentoj. Tio kreas mirindan, misteran etoson.



Wagner en sia *Waldesrauschen* (murmuro de l'arbaro) malsukcesis krei tian misteran etoson. Sed Sibelius estis mem violonisto kaj ne hezitis skribi tiujn paĝojn, kiuj postulas altnivelan virtuozecon de la violonistoj. Fakte, por fari la unuajn kvar tonojn de la unua linio, la fingro 1 sur la kordo g kaj la fingro 2 sur la kordo d estas en la sesa pozicio (vidu sube). La fingro 3 sur la kordo a kaj la fingro 4 sur la kordo e estas en la sepa pozicio. Estas tre malfacile trovi la ĝustajn lokojn de la fingroj en tiuj altaj pozicioj. Violonistoj de simfoniorkestroj estas altnivelaj teknikistoj. Tiu komponaĵo ne estas ludebla por amatora orkestro.


En *pizzicato* (pinĉado) oni pinĉas kordon per fingro de la dekstra mano (samtempe premante per fingro de la maldekstra mano la lokon de la dezirata noton). Konata komponaĵo estas *Pizzicato Polka* de la filoj Johann kaj Jozef Strauss.

Per la maldekstra mano la violonisto faras la diversajn notojn premante kordon per fingro. Tio estas unu el la malfacilaĵoj de violonludo. Kiun punkton premi? Eble vi jam suferis, kiam la filo de najbaro komencis lerni violonon. Malsame ol kun la piano, kie ĉiu klavo frapas difinitan noton, kaj la gitaro aŭ la mandolino, kiuj havas fretojn sur la fingroplato por difini la longon de la vibranta kordo, oni devas uzi la orelojn por ludi ĝuste kaj kutimigi la fingrojn trovi aŭtomate la ĝustajn lokojn.



Ni povas vidi ekzemple, kiamaniere oni ludas la notojn sur la g-kordo. Oni nomas la fingrojn de 1 (montrofingro) ĝis 4 (etfingro). La malplena g-kordo havas la longon 324 mm inter la sileo maldekstre kaj la ponto dekstre. Por ludi la noton a, oni devas scii, ke la frekvencoj de a kaj g rilatas kiel 9/8. Plie, la frekvenco estas inverse proporcia al la longo de kordo. Do, la longo de kordo por ludi a devas esti $8/9$ -oble la longo de la malplena kordo. Tio estas $8/9 \times 324 = 288$ mm. La unua fingro devas premi punkton situantan $324 - 288 = 36$ mm de la sileo. Ne 35,5mm aŭ 36,5 mm, ĉar oni aŭdus malĝustan noton. Same, por fari la notojn b, c kaj d, la dua, tria kaj kvara fingroj devas premi punktojn, kiujn montras proksimume la skemo. La kvara fingro faras la noton d, kiu estas je kvinto super g. Kvinto havas la rilaton $3/2$, do la kvara fingro devas premi punkton situantan je $1/3$ de la longo de la malplena kordo g. Ni povas observi, ke tiu noto d estas la sama, kiel la malplena kordo d.

La sekvanta skemo montras la lokojn de ĉiuj notoj de la gamo c maĵora sur la kvar kordoj.



Kompreneble, oni povas ludi la tutan kromatan gamon uzante ankaŭ la punktojn meze de la intervaloj de dutoj. Ĝis nun ni vidis la notojn en la tiel nomata unua pozicio, kie la maldekstra mano havas pozicion plej malproksime de la kapo de la violonisto. Por fari pli akutajn notojn sur iu ajn kordo, oni devas movi la manon al pli alta pozicio. Se ekzemple sur la kordo g la unua fingro ludas la noton b, tio estas la dua pozicio. Plej ofte la violonistoj uzas la neparajn poziciojn 1, 3, 5, 7 ktp. La ŝanĝo de pozicio devas okazi sen superflua bruo, elegante. En la pli altaj pozicioj la postulata akurateco de la fingro iĝas pli malfacila. Ekzemple en la sepa pozicio sur la kordo g la unua fingro ludas g je okto super la g de la malplena kordo. Ĉar okto havas la proporcion 2/1, la unua fingro devas premi ekzakte la mezan punkton de la kordo. La libera longo de la kordo estas duono de la longo de la malplena kordo g. Por ludi a en la sepa pozicio, la dua fingro devas nun premi punkton situantan en la distanco 18 mm de la unua fingro. Ju pli alten oni “grimpas”, des pli malgrandaj estas la distancoj inter la notoj. Tion oni vidas ankaŭ sur la gitaro: la fretoj estas des pli proksimaj unu al la alia, ju pli oni malproksimiĝas de la kolo. Ludi tre akutajn notojn sur violono postulas tre altan precizecon, kaj tio estas malfacila ankaŭ ĉar en la plej altaj pozicioj la mano estas streĉita, sen helpa apogo sur la fina flanko de la sonkesto.

Per la maldekstra mano violonisto povas fari *kordotremon*, kiu plibeligas la sonon. Kordotremo estas pli-malpli rapida cikla ŝanĝo de la frekvenco ĉirkaŭ la ĝusta frekvenco de la tono. Kordotremo povas esti trankvila, energia aŭ pasia. Ĉiu violonisto havas sian kordotremon, kiun oni facile rekonas. Tamen, kelkaj majstroj posedas plurajn kordotremojn, kiujn ili uzas laŭ la stilo de la komponaĵo.

Alia tekniko, kiun disvolvis precipe Paganini, estas la *pizzicato de la maldekstra mano*. (Samtempe violonisto povas ludi aliajn notojn per la arĉo). Ekzemple, per la kvara fingro oni povas pinĉi la kordon por ludi la noton prematan de la tria fingro. Sed noton prematan de la kvara fingro oni ne povas ludi *pizzicato* de la maldekstra mano. Tiam oni ludas rapidegan noton martelé per la arĉo; en sinsekvo de *pizzicatoj* de la maldekstra mano oni apenaŭ aŭdas, ke kelkaj notoj estas ludataj per la arĉo.

Sur violono oni povas ludi *duoblajn kordojn*. La arĉo frotas du kordojn kaj la fingroj de la maldekstra mano faras la deziratajn tonojn sur ambaŭ kordoj. Per la modernaj violonoj kaj arĉoj ne eblas ludi pli ol du kordojn samtempe (en kelkaj tipoj de violonoj la ponto estis malpli kurba kaj la arĉo estis treege kurba, tiam oni povis ludi tri aŭ kvar kordojn samtempe). En multaj komponaĵoj aperas akordoj kun tri aŭ eĉ kvar notoj. Violonisto faras tiam rompitan akordon, t.e. li/ŝi ludas unue la du plej malakutajn notojn kaj movas rapide la arĉon por ludi la du plej akutajn notojn.

Fine, per violono oni povas fari *flutsonojn*. Naturajn flutsonojn oni faras tuŝante (ne premante) la kordon en precizaj punktoj. La unua natura flutsono aperas kiam oni tuŝas la mezpunkton de kordo kaj frotas la kordon per arĉo. Tiam la du partoj de la kordo vibras kaj oni aŭdas sonon je okto super la baza tono de la kordo, sed kun multaj harmonoj (france *harmoniques*, germane *Obertöne*). Harmonoj havas frekvencon, kiu estas entjera oblo de la baza frekvenco. Tio kreas sonon iom similan al fluto. Tuŝante punkton je triono de la longo de la malplena kordo oni faras la duan naturan flutsonon, je okto kaj kvinto super la baza noto. Artefaritajn flutsonojn oni kreas premante kordon per la unua fingro en la dezirata loko kaj tuŝante la kordon per la kvara fingro je kvarono de la libera longo. Tiam ĉiu kvarono de la libera longo de la kordo vibras kaj aŭdiĝas sono je du oktoj super la baza noto. Por ludi melodion per artefaritaj flutsonoj, la violonisto devas daŭre movi la manon.

Evoluo de la tekniko antaŭ Paganini

La historion de violonludo oni dividas en du periodojn: antaŭ Paganini kaj post Paganini. Unue ni vidos, kiamaniere la tekniko evoluis antaŭ Paganini.

Jam en la 16-a jarcento italaj virtuozaĵoj atingis altan gradon de virtuozece. En Germanio violonistoj komencis enkonduki duoblajn kordojn. **Heinrich von Biber** (1644-1704) naskiĝis en la nuna Ĉeĥio kaj laboris post la aĝo de 26 jaroj en Salzburg. Li estis unu el la plej gravaj komponistoj por violono en la historio de la instrumento. Lia tekniko inkluzivis altajn poziciojn (ĝis la sepa), plurkordan ludon en komplika polifonio kaj la *scordatura*-teknikon, en kiu la kordoj estas agordataj alimaniere ol per kvintoj. Biber komponis sonaton, kiu estas antaŭulo de la polifonio de Bach.

La violonisto-komponisto **Arcangelo Corelli** (1653-1713) naskiĝis en Bologna, sed post 1679 li laboris ĉiam en Romo. Liaj komponaĵoj, precipe sonatoj, estas malmultaj sed li serĉis perfektecon. Corelli kreis la muzikan formon *concerto grosso*.

Antonio Vivaldi (1678-1742) estis pioniro de konĉertoj por solisto kaj komponis pli ol 200 konĉertojn, precipe por violono. Ĉiuj konas *La kvar sezonojn*. Lia nomo estas konektita al Venecio, kie li instruis dum preskaŭ 40 jaroj en Ospedale della Pietà, institucio por orfaj aŭ malriĉaj junulinoj. Sed li ankaŭ vojaĝis, en Germanio, Bohemio kaj la Nederlandoj. En 1740 la imperiestro de Aŭstrio invitis lin al Vieno por preni la oficon de muzikestro. Sed la imperiestro mortis kaj naŭ monatojn poste Vivaldi mortis en ekstrema mizero en Vieno.

Poste venis **Johann Sebastian Bach** (1685-1750), kiu disvolvis polifonion en la violonludado. Bach mem bone ludis violonon. Dum li loĝis en Coethen li komponis tri sonatojn kaj tri suitojn (kiujn li nomis partita) por violono sola. En la verkaro ili havas la numerojn BWV 1001-1006. Oni konsideras, ke lia ĉefverko estas *Chaconne*, lasta movimento de la dua partita [4].

Giuseppe Tartini (1692-1770) estis virtuozo, kiu komponis interalie la sonaton La trilo de la diablo. Iun nokton Tartini sonĝis, ke li faras pakton kun la Diablo, por la prezo de sia animo. Li konfidis sian violonon al diablo. Tiu ludis tiel belan sonaton, ke Tartini neniam povintus tion imagi. Li vekiĝis kaj provis reprodukti la sonaton, kiun li ĵus aŭdis. Sed vane. Laŭ Tartini, kvankam la sonato, kiun li tiam komponis estas unu el la plej belaj, kiujn li iam komponis, ĝi restas tre malpli valora ol la sonato, kiun li estis aŭdinta en sonĝo.

Pietro Antonio Locatelli (1695-1764) naskiĝis en Bergamo, kie li studis violonon kaj komponadon. En 1711 li instaliĝis en Romo, kie li restis dekon da jaroj. Li studis kun Corelli, kiu mortis du jarojn poste, kaj muzikis por nobeloj. Inter 1723 kaj 1728 Locatelli faris koncert-turneon en Italio kaj Germanio. Tiam li komponis multajn verkojn, kiujn li publikigis en Amsterdamo, kie li instaliĝis en 1829 kaj restis ĝis sia morto en 1764. En Amsterdamo Locatelli instruis violonon kaj tenis vendejon de italaj kordoj. Li estis la plej riĉa muzikisto de Amsterdamo. Lia Verko 3 entenas 12 violonkonĉertojn. Ĉiu el ili havas du Kapriĉojn, kiuj estas virtuozaĵaj kadenzoj por violono sola. La 24 kapriĉoj de Locatelli verŝajne inspiris Paganini komponi siajn 24 kapriĉojn.

Paganini

Niccolò Paganini (1782-1840) revoluciis la violonludadon. Li naskiĝis en Ĝenovo kaj mortis en Nice. Li lernis violonon ĉe sia patro kaj studis poste en Parma. Sed liaj instruistoj baldaŭ konstatis, ke li estas pli virtuozaj ol ili. Ni povas diri, ke Paganini estis memlerninto. Junaĝa li trejniis 10-12 horojn tage.

De 1810 Paganini faris tri grandajn koncertvojaĝojn en Italio. Lia famo jam atingis Vienon, kiam en 1828 li komencis turneon en Aŭstrio, Ĉeĥio, Germanio, Pollando, Francio kaj Britio. Ĉie li sorĉis la publikon. Kontribuis al tiu ekzaltiĝo ne nur la neniam antaŭe aŭditaj sonoj, sed ankaŭ lia aspekto: nigra vestaĵo, longa pala vizaĝo, krispa nigra hararo. La dagerotipo estis farita en la lastaj jaroj de la vivo de Paganini (Daguerre inventis la procedon en 1835).

Pri Paganini cirkulis multaj onidiroj kaj oni eĉ asertis, ke li havas pakton kun la diablo. Paganini gajnis multe da mono sed ankaŭ donacis monon, li ekzemple koncertis por bonfaraj celoj. Schubert, Rossini, Liszt kaj Berlioz admiris Paganini. Kiam Paganini aŭdis la simfonion de Berlioz, *Symphonie Fantastique*, li ploris. Poste li donacis al Berlioz 20000 frankojn, kio permesis al li komponi *Romeo et Juliette*. Berlioz dediĉis sian komponaĵon *Harold en Italie* (por aldo kaj orkestro) al Paganini.



Paganini iom post iom malsaniĝis. Post 1822 li suferis sifilison, kiun oni flegis per hidrargo, kaj tio kreis flankajn efikojn.

En 1836 Paganini venis al Parizo por fondi kazonon, sed tio ruinigis lin kaj li devis vendi siajn posedaĵojn, eĉ violonojn.

Mi mencias la teknikajn novaĵojn, kiujn disvolvis Paganini.

Li uzis la plej akutajn sonojn, kiujn oni povas atingi per la violono.

Unukorda ludado postulas la uzon de altaj pozicioj. Okazis, ke Paganini estis en malliberejo kaj restis nur unu kordo sur lia violono. Li komponis la variaĵojn sur la g-kordo (*Variacioj Moseo*) laŭ temo de Rossini.

Duoblajn kordojn Paganini ludis tre rapide.

Li inventis la duoblajn flutsonojn, kiuj estas tre malfacilaj.

Paganini ofte uzis *pizzicato* de la maldekstra mano.

Paganini komponis ses konĉertojn kaj multajn variaĵojn sur temoj el operoj. En liaj komponaĵoj la virtuozece atingis la plej altan gradon. Sed ili ofte entenas ĉarmajn melodiojn. Paganini ankaŭ bone ludis gitaron kaj komponis muzikon por violono kaj gitaro.

El la konĉertoj de Paganini la plej fama estas la unua en d-maĵ. Op.6. La tria movimento de la dua konĉerto estas la fama La Campanella (la sonorileto), laŭ kiu Liszt komponis sian La Campanella por piano.

La 24 kapriĉoj de Paganini estas la pinto de la violontekniko. Nur malmultaj virtuozejoj kapablas ludi ĉiujn sinsekve en pli ol unuhora koncerto. La 24 kapriĉoj esploras la plej malfacilajn teknikajn: duoblajn flutsonojn, *pizzicato* per la maldekstra mano, la plej akutaj notoj, rapidega dukorda ludo en tritoj, sestoj, oktoj kaj dektoj. Precipe la dektoj (okto plus trito) kreas mirindan senton en koncertejoj; ili estas tre malfacilaj ĉar ili postulas grandan amplekson de la fingroj de la maldekstra mano. Por klarigi tion, ni vidu kiamaniere oni ludas dukorde sur la g- kaj d-kordoj. La antaŭa bildo montras la poziciojn de la fingroj en la unua pozicio. Por ludi okton a-a la unua fingro premas la noton a sur la kordo g kaj la kvara fingro la noton a sur la kordo d. Por ludi sinsekvon de oktoj supren, estas du teknikoj. En la unua tekniko oni movas la manon unu tonon supren, premante la unuan fingron sur b de la g-kordo kaj la kvaran fingron sur b de la d-kordo (unu tono super a). Oni devas do movi la tutan manon supren por fari sinsekvon a-a, b-b, c-c, d-d ktp. En rapida ludo tio estas malfacila kaj kreas glitantan sonon. La dua tekniko estas per "fingrado". Por fari a-a la fingro 1 premas la noton a sur la g-kordo kaj la noton a sur la d-kordo oni faras per la fingro 3. Por fari b-b, la fingro 2 premas la noton b sur la g-kordo kaj la fingro 4 la noton b sur la d-kordo. Poste oni ŝanĝas rapide al la tria pozicio kaj ludas c-c per la fingro 1 sur la g-kordo kaj la fingro 3 sur

la d-kordo ktp. La fingroj estas iom streĉitaj. Sed por ludi dektajn la mano estas eĉ pli streĉita. Sed malgraŭ la eksterordinara malfacileco de la kapriĉoj ili estas agrablaj por la aŭskultanto pro la inventemo de Paganini. La 24-a kapriĉo estas la fama temo kun variacioj, kiu estis poste ekspluatata de aliaj komponistoj.

Violonistoj-komponistoj de la 19-a jarcento

Kvar grandaj violonistoj-komponistoj sekvis la periodon de Paganini.

Henri Vieuxtemps (1820-1881) naskiĝis en Verviers, Belgio, kie li studis violonon kaj ludis publike jam 6-jara. Poste li studis en Bruselo kaj koncertis en Parizo. En 1833, 13-jara, li vojaĝis al Germanio, kie li amikiĝis kun Louis Spohr kaj Robert Schumann, kiu komparis lin kun Paganini. 15-16 jara li studis komponadon en Vieno kaj Parizo. Lia unua konĉerto (kiu poste ricevis la numeron 2) naskiĝis tiam. La konĉerton No. 1 li premieris en Sankt-Peterburgo en la aĝo de 17 jaroj.

Post vojaĝo al Usono Vieuxtemps pasigis ses jarojn en la imperiestra kortego de Sankt-Peterburgo, komponis kvar pliajn konĉertojn kaj fondis tie violonlernejon. Berlioz mem laŭdis la belecon de la komponaĵoj de Vieuxtemps kaj diris: “se li ne estus tia granda virtuozo, oni deklarus lin granda komponisto”.

En 1850 Vieuxtemps instruis violonon en Bruselo; lia plej fama lernanto estis Eugène Ysaÿe. Sed du jarojn poste li instaligis en Frankfurt kaj poste en Parizo. 51-jara li denove venis al Bruselo kiel profesoro de violono. En la aĝo de 53 jaroj Vieuxtemps suferis atakon, kiu paralizis lin kaj haltigis lian karieron de violonisto. Lian klason en la konservatorio prenis Henryk Wieniawski.

Henryk Wieniawski (1835-1880) estis mirinfano. Li komencis lerni violonon hejme en Pollando. En 1843, apenaŭ 8-jara, li eniris la konservatorion de Parizo, kiun li finis 11-jara gajnante la unuan premion. Post internacia koncertvojaĝo li studis komponadon en Parizo kaj finis sian studadon 15-jara. Li tuj komencis sian internacian karieron kiel koncertisto en Eŭropo. En 1859, 24-jara, li instaligis en Sankt-Peterburgo, kie li kunfondis la konservatorion, kaj restis 13 jarojn. En 1872-74 li faris dujaran koncertvojaĝon al Usono kaj poste instruis violonon en Bruselo, kie Ysaÿe daŭrigis siajn studojn kun li. Wieniawski komponis tri konĉertojn kaj multajn aliajn brilajn komponaĵojn por violono.

Pablo Sarasate (1844-1908), laŭ sia tuta nomo Pablo Martín Melitón de Sarasate y Navascués, naskiĝis en Pamplono (Hispanio) kaj mortis en Biarritz (Francio). Sarasate estis mirinfano. Li debutis 8-jara kaj poste studis en Madrido. 12-jara li venis al Parizo por studi en la konservatorio violonon, solfeĝon kaj harmonion. 15-jara li komencis koncertvojaĝi en Eŭropo kaj la Amerikoj. Sarasate ofte vivis en Francio. Li estis ŝatata en la pariza societo. Sur sia vizitkarto li skribis simple Sarasate. Oni laŭdis liajn virtuozezan teknikon kaj ĉarmajn interpretadojn. Lalo kaj Saint-Saëns dediĉis al li komponaĵon. Liaj plej famaj komponaĵoj estas *Airs tziganes* (ciganaj kantoj) kaj *Carmen Fantazio*. Sarasate komponis multajn brilajn pecojn bazitajn sur la hispana folkloro.

Eugène Ysaÿe (1858-1931) daŭrigis la serion de famaj violonistoj-komponistoj-pedagogoj de la belga-franca skolo. Li naskiĝis en Liège kaj mortis en Bruselo. Li komencis studi violonon 5-jara kun sia patro kaj poste kun Vieuxtemps kaj Wieniawski. 28-jara li estis nomumita profesoro en la Konservatorio de Bruselo. Ysaÿe havis multajn famajn lernantojn, interalie Milstein studis ĉe li. Sed samtempe li koncertis en la tuta mondo. Oni nomis Ysaÿe la reĝo de la violono; Milstein diris la caro. Oni admiris la arton de Ysaÿe. Saint-Saëns, Franck, Chausson kaj Debussy dediĉis komponaĵojn al li. Ysaÿe komponis precipe ĉambromuzikon, interalie 6 sonatojn por violono sola.

Muziko por violono, la klasika kaj romantika periodoj

Ĉiuj grandaj komponistoj komponis por la violono [5]. Unue mi citos ok komponistojn inter la plej famaj, kiuj komponis konĉertojn por violono kaj orkestro.

Wolfgang Amadeus Mozart (1757-1791) komponis sep konĉertojn.

Ludwig van Beethoven (1770-1827) komponis la konĉerton en d-maĵ. Op. 61.

Felix Mendelssohn (1809-1847), unu el la unuaj romantikuloj, komponis du konĉertojn. La plej fama estas en e-min. Op. 64.

Johannes Brahms (1833-1897) komponis la konĉerton en d-maĵ. Op. 77.

Max Bruch (1838-1920) estis germana komponisto, kies konĉerto Op. 26 estas en g-minora.

Piotr Ilich Tchaikovski (1840-1893) komponis la konĉerton en d-maĵ. Op. 35.

Antonin Dvořak (1841-1904) komponis la konĉerton en a-min. Op. 53.

Jean Sibelius (1865-1957) komponis la konĉerton en d-min. Op. 47.

En mia prezentado aŭdiĝos ekstraktoj de tiuj ĉi komponaĵoj, kun kelkaj komentoj pri la konĉertoj kaj la violonistoj. La listo estas mallonga pro la tempolimo. Indus citi multajn aliajn komponistojn, kiuj komponis konĉerto(j)n, ekzemple Saint-Saëns, Glazunov, Prokofiev, Shostakovitch, Berg, Elgar, Nielsen, Bartok, Korngold, Goldmark.

Alia granda kategorio de komponaĵoj por la violono estas la sonatoj [6]. Mi citos nur ok komponistojn, kiuj komponis sonato(j)n por violono.

Wolfgang Amadeus Mozart (1757-1791) komponis 32 sonatojn por violono kaj piano. La duonon de ili li komponis, kiam li havis inter 8 kaj 10 jarojn.

Ludwig van Beethoven (1770-1827) komponis 10 sonatojn por violono kaj piano; la plej famaj estas la 5-a *La printempo* kaj la 9-a *Al Kreutzer* dediĉita al la franca violonisto Rodolphe Kreutzer (1766-1831).

César Franck (1820-1890), belgodevena komponisto, kiu vivis en Parizo ekde la aĝo de 13 jaroj, kreis sian sonaton por violono kaj piano en a-maĵora, ĉefverkon de la ĝenro. La sonaton, kiel ĝenerale la muzikon de Franck, karakterizas la kromatismo. Ĝin premieris Eugène Ysaÿe en 1886.

Johannes Brahms (1833-1897) komponis tri sonatojn por violono kaj piano.

Claude Debussy (1862-1918) komponis sian sonaton por violono kaj piano en g-minora. Per la harmonia unuiĝo de violono kaj piano Debussy sukcesis egali la miraklojn de Mozart kaj Brahms.

Maurice Ravel (1875-1937) komponis du sonatojn por violono kaj piano. En 1924 li komponis *Tzigane por violono* akompanata de piano aŭ orkestro; ĝi estas sinsekvo de ŝajne improvizitaj virtuozaĵoj.

Bela Bartok (1881-1945) estis hungara komponisto kiu fuĝis el Eŭropo en 1940 kaj instaliĝis en Nov Jorko, kie li vivis mizere. Menuhin mendis de li la sonaton por violono sola kaj premieris ĝin en 1944. La sonato estas ĉefverko de muziko por violono de la 20-a jarcento. En 1945 Bartok mortis pro leukemio.

Georges Enesco (1881-1955) estis rumandevena violonisto-komponisto, kies dua hejmlando estis Francio. Li komponis tri sonatojn por violono kaj piano. La tria, en a-min. Op. 25 estas “en rumana populara karaktero”.

Antaŭ ol fini la tekston pri komponistoj/komponaĵoj por violono, mi mencias nur unu modernan komponaĵon. La finna komponisto Uljas Pulkkis (1975-) gajnis en la komponad-

konkurso de la Reĝino Elizabeto en 1999. Du jarojn poste li gajnis en la komponadkonkurso de UNESKO per *Enchanted Garden* (La sorĉita ĝardeno), en kiu la violono kantas, dancas kaj ĝojas en dialogo kun l' orkestro. Pulkkis bonege majstras la flutsonojn kaj harmonojn de la violono.

Famaj violonistoj-pedagogoj

Pedagogoj ludis gravan rolon en la historio de la violono. Unue mi mencias ses reprezentantojn de la franca-belga skolo.

Rodolphe Kreutzer (1766-1831) estis violonisto, komponisto (19 konĉertoj, 40 operoj), pedagogo kaj orkestestro. Beethoven aŭdis lin kaj dediĉis al li sian 9-an sonaton.

Pierre Rode (1774-1830) estis virtuozo, pedagogo, koncertisto kaj komponisto. Li laboris en Parizo, Sankt-Peterburgo kaj Berlino. Rode premieris la 6-an sonaton de Beethoven dediĉitan al li.

Charles-Auguste de Bériot (1802-1870) estis belga koncertisto, pedagogo kaj komponisto.

Lambert Massart (1811-1892), belga violonisto, lernis ĉe Kreutzer private. Li instruis dum 47 jaroj en la pariza konservatorio. Inter liaj lernantoj estis Sarasate, Wieniawski, Kreisler kaj Marsick.

Martin Marsick (1847-1924) estis belga virtuozo kaj pedagogo en la pariza konservatorio.

Emile Sauret (1852-1920) lernis ĉe Bériot, Vieuxtemps kaj Wieniawski kaj instruis eksterlande. Sauret komponis faman kadenzon por la unua konĉerto de Paganini, en la stilo de Paganini.

Alia grava grupo de violonistoj-pedagogoj estas la sekva grupo de kvin.

Ferdinand David (1810-1873) estis virtuozo, komponisto, pedagogo kaj Konzertmeister de l' orkestro Gewandhaus en Lepsiko. Li konsilis Mendelssohn pri ties violonkonĉerto, kiun li premieris.

Joseph Joachim (1831-1907) estis mirinfano kaj debutis 7-jara. Li estis virtuozo, pedagogo kaj komponisto kaj konsilis Brahms kaj Dvořak pri iliaj konĉertoj.

Ankaŭ **August Wilhelmj** (1845-1908) estis mirinfano. Kiam li estis 7-jara oni diris ke li estos la Germana Paganini. Wilhelmj estis koncertisto kaj pedagogo.

Leopold von Auer (1850-1930) studis ĉe Joachim. Li estis koncertisto kaj pedagogo. Auer instruis en Germanio, Rusio (Mischa Elman, Jascha Heifetz kaj Nathan Milstein estis inter liaj lernantoj), Londono kaj Usono. Auer komponis kadenzojn por la konĉertoj de Beethoven kaj Brahms.

Carl Flesch (1873-1944) estis hungara judo, violonisto, verkisto kaj pedagogo. Li instruis en Berlino, Nederlando kaj Usono. Inter liaj lernantoj estis Ginette Neveu, Henry Szeryng kaj Ivry Gitlis.

Famaj violonistoj de la 20-a jarcento

La tuta listo de internacie konataj violonistoj estus longega [7]. Mi prezentas la sekvan mallongan liston kaj ne garantias, ke mi elektis nur la plej gravajn, eble miaj personaj gustoj pli pezis.

Ĉi sube mi faros kelkajn komentojn pri ok violonistoj de la listo.

Fritz Kreisler	(1875-1962)	Yehudi Menuhin	(1916-1999)
Jacques Thibaud	(1880-1953)	Ruggiero Ricci	(1918-2012)
Georges Enesco	(1881-1955)	Henryk Szeryng	(1918-1988)
Mischa Elman	(1891-1967)	Ginette Neveu	(1919-1949)
Joseph Szigeti	(1892-1973)	Isaac Stern	(1920-2001)
Jascha Heifetz	(1901-1987)	Arthur Grumiaux	(1921-1986)
Zino Francescatti	(1902-1991)	Josef Suk	(1929-2011)
Nathan Milstein	(1904-1992)	Christian Ferras	(1933-1982)
David Oistrakh	(1908-1974)	Michael Rabin	(1936-1972)

Fritz Kreisler estis mirinfano, kiu lernis ĉe sia patro kaj eniris la konservatorion de Vieno 7-jara. Fininte la konservatorion 10-jara, li studis en Parizo ĉe Massard, Delibes kaj Massenet dum 2 jaroj kaj ricevis 12-jara la plej altan diplomon de la pariza konservatorio, la unuan premion. 14-jara Kreisler faris sian unuan turneon en Usono. Li kompletigis sian edukadon studante artojn kaj medicinon en Vieno. Sed muziko restis lia ĉefa metio. En 1896 okazis turneo en Rusio. Li instaligis en Berlino en 1924 sed ne plu ludis en Germanio post 1933. Kreisler akiris la francan ŝtatanecan en 1938, poste li instaligis definitive en Usono. Kreisler posedis naturan ĉarmon kaj lia sono kaj kordotremo sorĉis la publikon. Dum pli ol 50 jaroj Kreisler ĝuis senegalan popularecon, oni nomis lin la reĝo de la violonistoj. Li estis la sola violonisto naskiĝinta en la 19-a jarcento, kies kariero ne estis ĝenata de la fenomeno Heifetz. Oni diris, ke Heifetz estas perfekta, sed oni pli ŝatis Kreisler. Li komponis kadenzojn por la koncertoj de Brahms, Beethoven kaj Mozart, kaj ĉ. 200 mallongajn komponaĵojn por violono kaj piano.

Jascha Heifetz estis eble la plej fama violonisto de la 20-a jarcento. Lia tekniko estis mirinda (iu violonisto diris, ke espereble Heifetz faros iun tagon almenaŭ unu malĝustan noton, por montri, ke li estas homo). Li elsorĉis kristalklaran sonon el sia violono kaj lia kordotremigo estis varmega. Oni kelkfoje diris, ke Heifetz ludas malvarme. Fakte, li neniam ridetis kaj lia vizaĝo ŝajnis marmora. Sed sufiĉis fermi la okulojn kaj aŭskulti lian ludon plenan de sentoj. Heifetz estis mirinfano, komencis lerni violonludon 3-jara kaj donis sian unuan koncerton 6-jara. 9-jara li komencis studi ĉe la fama profesoro Auer en Sankt-Peterburgo.



La familio enmigris en Usonon en 1917 kaj Heifetz debutis en Carnegie Hall la saman jaron. Li ekigis novan generacion de talentegaj violonistoj kiel Milstein, Oistrakh kaj Menuhin.

Nathan Milstein estis unu el la plej bonaj violonistoj de la 20-a jarcento. Li naskiĝis en Odessa. Kiam li estis 7-jara, liaj gepatroj ĉeestis koncerton de la 10-jara Heifetz kaj decidis, ke estus bone por Nathan iĝi violonisto. Li komencis do studi violonon 7-jara. Kiam li estis 11-jara la fama pedagogo Auer invitis lin al Sankt-Peterburgo. Milstein rakontas, ke ĉiuj knaboj, kiuj volis ludi pli bone ol la kamaradoj, deziras iri al Auer, kiu estis talentega homo kaj bona instruisto. Milstein estis amiko de la fama pianisto Vladimir Horowitz. En la 20-aj jaroj ili koncertis kune en la tuta Sovetunio kaj en 1925 ili faris turneon en okcidenta Europo. Poste Milstein akiris la usonan ŝtatanecon kaj havis loĝejojn en Novjorko, Londono kaj Parizo. Li brile koncertis ankoraŭ 82-jara en Stokholmo.

David Oistrakh naskiĝis en Odessa kiel Milstein. Kiam ili ludis kvarteton kun du kamaradoj, Milstein ludis violonĉelon. Oistrakh havis sian unuan violonon 5-jara kaj donis sian unuan koncerton 15-jara, sed li ne estis mirinfano kiel Heifetz aŭ Menuhin de la sama generacio. Li havis admirindan teknikon kaj ludis kun belega sono. Yehudi Menuhin laŭdis la purecon de liaj oktoj. Oistrakh gajnis la duan premion en la Wieniawski-konkurso de Varsovio en 1935, kiam venkis Ginette Neveu. Sed en 1937 Oistrakh gajnis en la prestiĝa konkurso de la Reĝino Elizabeto en Bruselo, kaj poste komenciĝis lia internacia kariero. Oistrakh estis instrumento de la soveta propagando. Li mortis 66-jara en Amsterdamo pro infarkto.

Yehudi Menuhin estis mirinfano, komencis ludi 5-jara kaj donis sian unuan koncerton kun orkestro 11-jara. En la 30-aj jaroj Menuhin estis unu el la plej famaj violonistoj en la mondo. Li absolute volis lerni ĉe Georges Enesco, kiun li tre admiris kaj venis do al Parizo. Oni rekonas lian stilon kaj agnoskas la profundecon de liaj interpretadoj. En 1947 Menuhin venis al Berlino por ludi la konĉerton de Beethoven kun Furtwängler, kiu havis malfacilaĵojn post la mondmilito, ĉar li daŭrigis sian agadon dum la nazia periodo, kvankam li mem ne estis nazio. Menuhin, judo, helpis lin. Ili amikiĝis kaj faris kune belajn registradojn de muziko.

Ginette Neveu estis mirinfano kaj donis sian unuan koncerton 7-jara kun la konĉerto de Bruch. Unue ŝin instruis ŝia patrino, poste ŝi studis en la pariza konservatorio, kiun ŝi finis 12-jara kiel la plej juna diplomito post Wieniawski. Ŝi kompletigis siajn studojn en Londono ĉe Carl Flesch. 15-jara ŝi gajnis en la Wieniawski-konkurso en Varsovio super 180 konkursantoj (Oistrakh ricevis la duan premion). Komenciĝis fulma kariero, kian neniu violonistino konis antaŭe. Ŝi sciis kapti la atenton de la publiko kaj oni admiris ŝian fajran temperamenton. Neveu mortis tragike en aviadila akcidento.

Isaac Stern estis usona violonisto. Liaj gepatroj enmigris en Usonon en 1921. La patrino unue instruis pianon al Isaac. Li aŭdis najbaran knabon ludi violonon, kiu iĝis lia instrumento. Stern komencis lerni en San Francisko 8-jara kaj donis sian unuan koncerton 16-jara. Li ankaŭ fondis la faman triopon Stern (kun Eugen Istomin kaj Leonard Rose), en kiu li registris ĉambromuzikon.

Christian Ferras komencis lerni ĉe sia patro, poste en la konservatorioj de Nice kaj Parizo. Li debutis profesie 13-jara. De Enesco li adoptis la brilan sonon kaj la arton ŝanĝi poziciojn. Li faris internacian karieron, koncertis kun famaj orkestrestroj, ekzemple kun Karajan li registris diskojn kiuj iĝis premiitaj. Kolegoj parolis pri muzika perfekteco kaj Karajan diris, ke Ferras havas intuician talenton transdoni sentojn per sia ludado al la aŭskultantoj. En la lastaj dek jaroj de sia vivo Ferras havis problemojn kun deprimado kaj alkoholo. Li suicidis en la aĝo de 49 jaroj.

La nuntempaj violonistoj

La sekva listo entenas la nomojn de violonistoj, kiujn mi elektis el inter centoj da taŭgaj violonistoj, kaj mi komentos pri kelkaj el ili.

Repin kaj Vengerov lernis violonon en Novosibirsk ĉe la fama profesoro Zakhar Bron. Mi aŭdis Repin kiam li gajnis en la konkurso de la Reĝino Elizabeto en Bruselo, li havis tiam malpli ol 20 jarojn.

Inter la generacio kiu nun havas pli ol 40 jarojn estas malmultaj virinoj (Mutter, Faust kaj kelkaj aliaj ne menciitaj). Sed la lastaj kvin, kiuj havas nun iom pli ol 30 jarojn, estas ĉiuj virinoj. Jansen estas nederlandanino, Mae venas el Singapuro kaj la tri aliaj estas usonaninoj.

Eble vi havos la ŝancon aŭdi iun tagon iun de tiuj violonistoj de la nova generacio.

Ivry Gitlis (1922-)	Frank P. Zimmermann (1965-)
Gérard Poulet (1938-)	Joshua Bell (1967-)
Salvatore Accardo (1941-)	Vadim Repin (1971-)
Gidon Kremer (1947-)	Gil Shaham (1971-)
Pinchas Zukerman (1948-)	Isabelle Faust (1972-)
Augustin Dumay (1949-)	Maxim Vengerov (1974-)
Shlomo Mintz (1957-)	Janine Jansen (1978-)
Thomas Zehetmair (1961-)	Leila Josefovicz (1978-)
Anne-Sophie Mutter (1963-)	Vanessa Mae (1978-)
Aleksander Markov (1963-)	Hilary Hahn (1979-)
Laurent Korcia (1964-)	Sarah Chang (1980-)


Tie ĉi finiĝas mia artikolo. Bedaŭrinde ne eblis enŝovi en tiun ĉi tekston ligilojn, kiuj permesus aŭskulti ekstraktojn de muziko. Ideale, ni devus havi aŭdvidan tekston, kaj tio eblas nur per DVD-disko, ne en presita libro. Tiuj, kiuj ĉeestos miajn prelegojn en Rejkjaviko ja ĝuos kompletan aŭdvidan PowerPoint-prezentadon kun sonkzemploj.

Referencoj

- [1] P.O. Apian-Bennewitz: Die Geige. Verlag Bernh. Friedr. Voigt, Leipzig 1920.
- [2] Claudia Fritz, Joseph Curtin, Jacques Poitevineau, Palmer Morrel-Samuels, Fau-Chia Tao: Player preferences among new and old violins. Publications of the National Academy of Sciences (Usono), Jan. 3, 2012.
- [3] Jean Sibelius: En Saga. Breitkopf Studienpartitur PB3876.
- [4] Yehudi Menuhin & William Primrose. Violon et alto. Hatier, 1978.
- [5] Guide de la Musique symphonique. Fayard, 1986.
- [6] Guide de la musique de chambre. Fayard 1989.
- [7] Jean-Michel Molkhov: Les grands violonistes du XXe siècle. Buchet Chastel, 2011.
- [8] Xavier Boutillon: Instruments à cordes frottées. Ĉapitro 11 de la libro de Antoine Chaigne & Jean Kergomard: Acoustique des instruments de musique. Belin 2008.

En Vikipedio troviĝas multaj informoj pri la temo. Sed la Esperantaj tekstoj ofte mankas aŭ estas tre mallongaj. Mi kutime komparis francan, germanan, anglan kaj italan tekstojn por havi fidindajn informojn.

Unu komuna lingvo, multaj malsamaj kulturoj: problemoj de interkultura komunikado en Esperanto



Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki)

Israela lingvisto, kiu naskiĝis en Japanio en 1963, poste enmigris en Israelon kaj naciĝis tie. Li esperantistiĝis en 1986. Li doktoriĝis pri hebrea lingvistiko ĉe la Hebrea Universitato de Jerusalemo. Li estas postenrajta supera docento pri hebrea lingvistiko ĉe la Universitato Bar-Ilan en Israelo. Li interesiĝas pri moderna hebrea lingvistiko, jida lingvistiko, esperantologio, leksikologio, leksikografio, onomastiko, kontaktlingvistiko, socilingvistiko kaj interkultura komunikado. Dum multaj jaroj li (tra)vivas interkulturan komunikadon kaj ĝiajn problemojn, (super)vivante japanan, israelan kaj tradician judan kulturojn en la japana, la hebrea, la jida, la angla kaj Esperanto, kaj sentante sin perfekte hejme en neniu el ili.

Resumo

Kiam Zamenhof iniciatis Esperanton kiel internacian komunikilon inter diversaj lingvanoj, li verŝajne pensis precipe pri homoj, kiuj havis pli-malpli la saman eŭropan kulturon, kaj fakte tiel statis la afero en la unuaj periodoj de la lingvo. Sed ju pli Esperanto disvastiĝis kaj tutmondiĝis, des pli heterogena ĝia komunumo fariĝis kulture. Ni esperantistoj uzas Esperanton kiel nian komunan lingvan komunikilon, sed tio ne signifas, ke ni havas ankaŭ la saman kulturon de komunikado. Fakte, ŝajnas, ke multaj el ni komunikas pli-malpli laŭ la normoj de niaj respektivaj denaskaj kulturoj de komunikado, t.e. multaj el ni havas nacikulturan “akĉenton” kiam ni komunikas en Esperanto.

Partopreninte en du Universalaj Kongresoj, mi alvenis al firma konkludo, ke komuna lingvo sola ne estas sufiĉa por signifoplena komunikado preter la nivelo de supraĵa konversacio. Ideale oni devus havi ankaŭ komunan kulturon de komunikado en Esperanto. Tamen tio ne ŝajnas facile atingebla, kaj ankaŭ ŝajnas malfacile koni ĉiujn ĉefajn kulturojn en la mondo; do oni devas almenaŭ konscii, ke problemoj povas okazi inter ni esperantistoj, kiuj havas unu komunan lingvon sed malsamajn kulturojn de komunikado.

Por ilustri tiujn problemojn, mi kontrolos kaj komparos la tipajn strategiojn, kiujn japanoj kaj israelanoj uzas, en diversaj kampoj de (lingva) komunikado, kaj montros iliajn eblajn reagojn al la strategioj de la alikulturanoj. Mi elektis la japanan kaj israelan kulturojn por tiu ĉi komparo, ne nur ĉar mi (super)vivas kaj konas ilin tre bone, sed ankaŭ ĉar ili verŝajne reprezentas du kulturajn antipodojn, inter kiuj troviĝas multaj aliaj kulturoj en la mondo.

Mi demandos ankaŭ, ĉu ni povos atingi ne porokazan sed pli-malpli stabilan interkulturon, aŭ komunan kulturon, de komunikado en Esperanto, kaj se jes, en kiuj kampoj ĝi eblas, kaj kia ĝi estos.

Mi konkludos, ke ni esperantistoj devas konscii pli, ke paroli en Esperanto ne garantias neeston de kultura miskompreno, kaj kiam ni komunikas kun esperantistoj de aliaj kulturoj de komunikado, ni povas havi problemojn, kiuj povas konduki al miskomprenoj.

One common language, many different cultures: problems of intercultural communication in Esperanto

Summary

When Zamenhof initiated Esperanto as an international means of communication between speakers of different languages he was probably thinking mainly of people who shared more or less the same European culture, and that was in fact the situation during the first period of the language. But the more Esperanto spread and became globalised, the more heterogeneous its community became culturally. We Esperantists use Esperanto as our common means of communication, but that does not mean that we have the same culture of communication. In fact, many of us communicate more or less according to the standards of our own native cultures of communication, that is, many of us have a national-cultural “accent” when we communicate in Esperanto.

After taking part in two World Esperanto Congresses I came to the firm conclusion that a common language is not on its own sufficient for meaningful and interesting communication beyond the level of superficial conversation. Ideally one should also have a common culture of communication. However, that seems difficult to achieve, and it is hardly possible to know all the cultures in the world, so one must at least be aware that problems can arise between speakers of Esperanto, who have one common language but different cultures of communication.

To illustrate these problems, I will examine and compare the typical strategies used by Japanese and Israelis in various areas of (linguistic) communication and show their possible reactions to the strategies of members of other cultures. I have chosen Japanese and Israeli cultures for this comparison not only because I live/survive in them and know them well but also because they probably represent two cultural antipodes, between which many other cultures of the world are located.

I will also ask whether we can achieve not an ad hoc but a more or less stable “interculture”, or common culture, of communication in Esperanto, and if so in what areas that can be done and what form it will take.

I will conclude that we Esperantists must be more aware that speaking in Esperanto does not guarantee there will be no cultural misunderstandings, and when we communicate with Esperantists from other cultures of communication we can experience problems that can lead to misunderstandings.

Une langue commune, beaucoup de cultures différentes: problèmes de la communication interculturelle en espéranto

Résumé

Quand Zamenhof a conçu l'espéranto comme outil de communication internationale entre personnes de langues différentes, sans doute pensait-il surtout à des personnes ayant plus ou moins la même culture européenne, et de fait c'est bien ce qu'il se passa dans les premiers temps de la langue. Mais plus l'espéranto se répandait à travers le monde, et plus sa communauté devenait culturellement hétérogène. Nous, les espérantistes, utilisons l'espéranto comme notre outil commun de communication linguistique, mais cela ne signifie pas que nous avons la même culture de communication. En fait, il semble que nombre d'entre nous communiquent plus ou moins selon les normes de nos cultures de communication natives respectives, autrement dit beaucoup d'entre nous ont un "accent" culturel national quand nous communiquons en espéranto.

Ayant participé à deux Congrès Universels, je suis parvenu à la ferme conclusion qu'une langue commune seule ne suffit pas à une communication pleine de sens au-delà du niveau d'une conversation superficielle. Dans l'idéal on devrait aussi avoir une culture commune de communication en espéranto. Cependant, cela ne semble pas facilement réalisable, et il semble également difficile de connaître toutes les principales cultures du monde, donc on doit au moins prendre conscience des problèmes qui peuvent survenir entre nous espérantistes, qui avons une langue commune mais des cultures de communication différentes.

Pour illustrer ces problèmes, j'observerai et comparerai les stratégies typiques qu'utilisent les Japonais et les Israéliens dans divers domaines de communication (linguistique), et je montrerai leurs possibles réactions aux stratégies des personnes de culture différente. J'ai choisi les cultures japonaise et israélienne pour cette comparaison, pas seulement parce que j'y (sur)vis et que je les connais très bien, mais aussi parce qu'elles représentent sans doute deux antipodes culturels, entre lesquels se situent beaucoup d'autres cultures dans le monde.

Je poserai aussi la question de savoir si l'on peut parvenir à une interculture, ou culture commune, de communication en espéranto qui soit non pas occasionnelle mais plus ou moins stable, et dans l'affirmative, dans quels domaines elle serait possible, et quelle forme elle aurait.

Je conclurai que nous autres espérantistes devons être plus conscients que le fait de parler en espéranto ne garantit pas l'absence d'incompréhension culturelle, et que lorsque nous communiquons avec des espérantistes ayant d'autres cultures de communication, nous risquons de rencontrer des problèmes qui peuvent engendrer des incompréhensions.

Eitt sameiginlegt tungumál, margir ólíkir menningarheimar: vandamál í menningarsamskiptum á esperanto

Útdráttur

Þegar Zamenhof kynnti esperanto sem alþjóðlegan samskiptamiðil fólks með ólíkar þjóðtungur hugsaði hann líklega einkum um fólk, sem hafði að meira eða minna leyti sameiginlega evrópska menningu, og í raun háttaði þannig til í árdaga tungumálsins. En því meira sem esperanto breiddist út og varð alheimsmál, þeim mun misleitara varð samfélag þess menningarlega. Við esperantistar notum esperanto sem sameiginlegan tungumálamiðil okkar, en það merkir ekki, að við höfum einnig sömu samskiptavenjur. Í raun virðist sem mörg okkar hafi samskipti að meira eða minna leyti samkvæmt eigin viðmiðum hverra um sig, samskiptavenjum sem við fæðumst inn í, þ.e.a.s. mörg okkar viðhafa þjóðmenningarlega “áherslu” þegar við tjáum okkur á esperanto.

Eftir að hafa tekið þátt í tveimur heimspingum komst ég að fastri niðurstöðu um að sameiginlegt tungumál eitt sér nægir ekki fyrir merkingarfull samskipti á hærra stigi en í yfirborðslegum samræðum. Helst ættu menn einnig að hafa sameiginlegar samskiptavenjur á esperanto. En því virðist ekki vera auðveldlega komið í kring, og einnig virðist vera erfitt að þekkja allar helstu samskiptavenjur í heiminum, þess vegna ber manni að minnsta kosti að átta sig á að vandamál geta komið upp meðal okkar esperantista sem höfum samskipti á einu sameiginlegu tungumáli en höfum ólíkar samskiptavenjur.

Til þess að varpa ljósi á þessi vandamál ætla ég að athuga og bera saman þær venjur sem japanir og ísraelar hafa á ýmsum sviðum mállegra samskipta og sýna hugsanleg viðbrögð þeirra við umgengnisháttum fólks með aðra menningu. Ég hef valið japanska og ísraelska menningarheima fyrir þennan samanburð, ekki aðeins af því að ég lifi þá af og þekki þá mjög vel, heldur einnig af því að þeir standa líklega fyrir tvö ólík menningarsvæði, og á milli þeirra finnast margir aðrir menningarheimar.

Ég spyr einnig hvort við munum geta öðlast meira eða minna traustar samskiptavenjur, eða sameiginlegar samskiptavenjur, á esperanto, og sé svo á hvaða sviðum þær séu mögulegar og hvernig þær eigi að vera.

Ég álykta að við esperantistar eigum að gera okkur betur ljóst, að það að tala á esperanto tryggir okkur ekki gegn menningartengdum misskilningi, og þegar við höfum samskipti við esperantista með aðrar samskiptavenjur geta komið upp vandamál sem geta leitt til misskilnings.

Unu komuna lingvo, multaj malsamaj kulturoj: problemoj de interkultura komunikado en Esperanto

1 Enkonduko

1.1 Radikoj de problemoj de interkultura komunikado en Esperanto

Ŝajnas, ke sufiĉe multaj esperantistoj ankoraŭ kredas naive kaj eĉ propagandadas al la ekstera mondo, ke Esperanto estas ideala interkultura lingva komunikilo, ĉar ĝi estas gramatike regula kaj simpla, leksike produktiva, kaj lingve kaj kulture neŭtrala. Sed mi jam travivis en du Universalaj Kongresoj, ke komuna lingvo sola, eĉ se ĝi estas neŭtrala, ne sufiĉas por senproblema interkultura komunikado. Lingvo estas pli ol gramatiko kaj leksiko, kaj komunikado estas pli ol lingvo.

Estas vere, ke lingvo estas unu el la plej gravaj komponantoj de komunikado, kaj oni povas lerni la gramatikon kaj leksikon de Esperanto multe pli facile kaj rapide ol tiujn de etnaj lingvoj. Kaj estas vere, ke ankaŭ kiam homoj de diversaj kulturaj fonoj komunikas en internaciaj etnaj lingvoj, ili povas havi problemojn de interkultura komunikado. Tamen kiam ili komunikas en Esperanto, la problemoj povas esti pli akraj ĝuste pro ĝia kultura neŭtraleco, kiu ne favoras unu komunan kulturon de internacia lingva komunikado.

Eble Zamenhof mem ne pensis pri problemoj de interkultura komunikado en Esperanto, ĉar verŝajne li estis tro okupita pri problemoj de la lingvo mem, kaj la unuaj esperantistoj havis pli-malpli la saman eŭropan kulturon. Sed ekde tiam Esperanto kaj ĝia komunumo disvastiĝis en multaj landoj tra la mondo. La Esperanto-komunumo tutmondiĝis kaj Esperanto fariĝis diaspora lingvo, tiel ke esperantistoj ne plu estas kulture homogenaj; eble nia unusola komuna lingva trajto estas, ke ni uzas tiun ĉi kulture neŭtralan lingvon.

Esperanto estas kulture neŭtrala en tio, ke ĝi ne devigas siajn uzantojn sekvi iun ajn kulturan normon de komunikado, simple ĉar tia normo aŭ ankoraŭ ne ekzistas aŭ ankoraŭ ne stabiliĝis, kvankam ĝi povas naskiĝi aŭ stabiliĝi kiel rezulto de interkonsento de la komunumo. Do intertempe multaj homoj uzas Esperanton laŭ la normoj de siaj respektivaj kulturoj, t.e. kun la “akĉento” de sia respektiva kulturo, ofte nekonscie, kaj eĉ kredante naive, ke ĉar ili uzas neŭtralan lingvon kiel interkulturan lingvan komunikilon, ĉio, kion ili esprimas, devas esti perfekte komprenata ankaŭ de homoj de aliaj kulturoj. Kaj tio kondukas al diversaj problemoj de interkultura komunikado en Esperanto, pri kiuj ne ĉiuj esperantistoj konscias.

1.2 Celoj de tiuj ĉi esploro

Tial tiu ĉi prova esploro celas antaŭ ĉio konsciigi esperantistojn (kiuj pensis alie ĝis nun), ke komuna lingvo sola ne garantias signifoplenan interkulturan komunikadon sen miskompreno se la komunikado estas pli ol supraĵa konversacio, ekzemple pri la vetero.

Por atingi tiun ĉi ĉefan celon, mi unue klarigos, kiuj kampoj de lingva kaj nelingva komunikado povas esti problemaj en interkultura komunikado ĝenerale, kaj kio karakterizas Esperanto-komunumon kaj interkulturan komunikadon en Esperanto. Poste mi kontrolos kaj komparos la tipajn strategiojn, kiujn japanoj kaj israelanoj uzas, en diversaj kampoj de komunikado, kaj montros iliajn eblajn reagojn al la strategioj de la alikulturanoj. En tiu ĉi esploro mi devas limigi min al lingva komunikado, lasante nelingvan komunikadon por alia fojo kaj/aŭ por pli kapablaj fakuloj ol mi.

Mi demandos ankaŭ, ĉu ni povos atingi ne porokazan sed pli-malpli stabilan interkulturon, aŭ komunan kulturon, de lingva komunikado en Esperanto, kaj se jes, en kiuj kampoj ĝi eblas, kaj kia ĝi estos.

Mi esperas, ke ne estas tabue diskuti publike pri ekzistantaj problemoj de interkultura komunikado en Esperanto, kaj pli kapablaj fakuloj ol mi povos priskribi kaj analizi ilin pli detale kaj pli profunde surbaze de empiriaj donitaĵoj. Fakte, ĉiu kampo de interkultura komunikado en Esperanto meritas apartan esploron.

1.3 Kiel ilustru problemojn de interkultura komunikado en Esperanto

Por ilustru problemojn de interkultura (lingva) komunikado en Esperanto, mi elektis la japanan kaj israelan kulturojn, ne nur ĉar mi (super)vivas kaj konas ilin tre bone, sed ankaŭ ĉar ili verŝajne reprezentas du kulturajn antipodojn, inter kiuj troviĝas multaj aliaj kulturoj en la mondo. Estas vere, ke en ĉiu kulturo ekzistas intrakulturaj variaĵoj, sed ili estas kvantaj diferencoj kaj ne kvalitaj diferencoj, kiuj karakterizas interkulturajn variaĵojn.

Por simpligi la komparon mi devis limigi min al vizaĝ'-al-vizaĝa buŝa komunikado inter unu japana kaj unu israela esperantistoj. Ideale, mi devus observi tian komunikadon, kiel ĝi okazas en aŭtentikaj situacioj. Sed pro teknikaj obstakloj kaj ankaŭ pro la simpla fakto, ke tia komunikado estas malofta, mi devis rezigni tiun ĉi metodon kolekti donitaĵojn. Mi devis rezigni ankaŭ pri la metodo peti japanajn kaj israelajn esperantistojn plenigi enketon, kiun mi preparis, simple ĉar mi ne povis trovi sufiĉe multajn homojn, kiuj estis pretaj partopreni en ĝi.

Kvankam mi plene konscias, ke estas metodologia problemoj, mi devis, sen alternativo, preni israelajn strategiojn de lingva komunikado, aŭ pli precipe, de paroladoj, pri kiuj mi klarigos poste, de Brosh & Weinbach (1986). La ceteraj aferoj, t.e. tipaj japanaj kaj israelaj strategioj en la aliaj kampoj de lingva komunikado kaj eblaj reagoj al la israelaj kaj japanaj strategioj, estas laŭ mia introspekto. Mi preferis ne inventi ekzemplojn de tiuj strategioj laŭ mia introspekto en la formo de plenaj dialogoj. Mi esperas, ke eĉ tia skeleta ilustrado sufiĉos por konvinki vin, ke kiam homoj de malsamaj kulturaj fonoj komunikas en Esperanto, ja estiĝas problemoj, kelkaj el kiuj estas severaj kaj ofte eĉ nesolveblaj.

2 Interkultura komunikado

2.1 Ĝeneralaj rimarkoj

Estas konate, ke kiam du homoj, kiuj havas du malsamajn lingvojn kaj kulturojn, komunikas en tria lingvo, ili ofte alproksimiĝas unu al la alia kulture, kaj kreiĝas porokaze la tiel nomata interkulturo¹ en kiu la du kulturoj de la du kunparolantoj konverĝas. La inversa ekstremo estas, ke ĉiu el la du homoj parolas laŭ sia kulturo. Inter tiuj ĉi du antipodoj estas diversaj gradoj de kulturaj kompromisoj. Unu povas paroli laŭ sia kulturo, dum la alia parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto aŭ kiel li komprenis ĝin senerare aŭ kiel li miskomprenis ĝin. Ĉiu el la du homoj povas paroli laŭ la kulturo de sia kunparolanto aŭ kiel li komprenis ĝin ĝuste aŭ kiel li miskomprenis ĝin. La jena tabelo montras tiujn kvar gradojn kaj iliajn subgradojn de interkultura konverĝo:

¹ Vidu, ekzemple, Kecskes (2012) pri la superrigardo de la koncepto.

Tipo	Parolanto 1	Parolanto 2
1	parolas laŭ sia kulturo	parolas laŭ sia kulturo
2.1.1	parolas laŭ sia kulturo	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto kiel li miskomprenis ĝin
2.1.2	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto kiel li miskomprenis ĝin	parolas laŭ sia kulturo
2.2.1	parolas laŭ sia kulturo	parolas laŭ kulturo de sia kunparolanto
2.2.2	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto	parolas laŭ sia kulturo
3.1	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto kiel li miskomprenis ĝin	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto kiel li miskomprenis ĝin
3.2.1	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto kiel li miskomprenis ĝin
3.2.2	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto kiel li miskomprenis ĝin	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto
3.3	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto	parolas laŭ la kulturo de sia kunparolanto
4	parolas laŭ iu interkulturo	parolas laŭ iu interkulturo

Problema estas la fakto, ke oni ne povas antaŭscii pri sia kunparolanto, en kiu grado de interkultura konverĝo tiu parolas. Kaj ankaŭ problema estas la fakto, ke kaj vi kaj via kunparolanto parolas en malsamaj gradoj de interkultura konverĝo, depende de kampoj de komunikado.

2.2 Problemaj kampoj de interkultura komunikado

Inter la ĉefaj problemaj kampoj de interkultura lingva komunikado estas:

- Parolagoj (*speech acts angle*)²; inter la gravaj parolagoj estas:
 - Pardonpetado
 - Petado
 - Rifuzado
 - Plendado
 - Esprimado de opinio
- Alparolformoj (*address forms angle*): kiel oni alparolas sian kunparolanton, ĉu per lia persona nomo, per lia familia nomo, per liaj titolo kaj familia nomo, per lia titolo ktp³
- Vico-alternado (*turn-taking angle*): kiam kaj kiel oni donas sian vicon de parolado al sia kunparolanto kaj/aŭ prenas ĝin de li⁴

² Vidu, ekzemple, Wierzwicka (2003) pri detalaj transkulturaj priskribo kaj analizo de parolagoj en diversaj kulturoj.

³ Vidu, ekzemple, Fasold (1990) pri translingva superrigardo de alparolformoj.

⁴ Vidu, ekzemple, Tannen (2012) pri ĝenerala pritrakto de vico-alternado en interkultura komunikado.

Problemaj kampoj de interkultura nelingva komunikado⁵, kiujn mi ne povas pritrakti en tiu ĉi prova esploro, estas la jenaj:

- Silentado: kiam oni silentas kiel respondo, kaj pri kio oni ne parolas ktp⁶
- Vizaĝesprimoj: kiel oni esprimas vizaĝe la sentojn de ĝojo, surprizo, kolero, malestimo, naŭzo, malĝojo, timo ktp
- Fiksrigardo: kiom ofte kaj kiom longe oni fiksrigardas la okulojn de sia kunparolanto
- Gesto: kiujn korpopartojn oni movas; kiel oni movas ilin; kion signifas la koncerna gesto
- Kapjeso: kiom ofte kaj kiom rapide oni kapjesas
- Tuŝo: kiujn korpopartojn de sia kunparolanto oni tuŝas; kiel oni tuŝas ilin
- Persona spaco: kiom da fizika distanco oni lasas inter si kaj sia kunparolanto.

3 Karakterizaĵoj de la Esperanto-komunumo kaj interkultura komunikado en Esperanto

Woods (1979) karakterizas la Esperanto-komunumon kiel libervolan, neetnan kaj neteritorian lingvokomunumon. Eble ĝi estas la unusola lingvokomunumo, kiu havas tiujn ĉi tri karakterizaĵojn. La lingvokomunumo plej proksima al la Esperanto-komunumo ŝajnas esti la nuna jida komunumo, kiu estas kaj (parte) libervola kaj (parte) neteritoria sed ne neetna. Eĉ la komunumoj de mondlingvoj, kiel ekzemple la angla, restas etnaj en siaj kernaj teritorioj; nur en siaj periferiaj teritorioj ili ĉesis esti pure etnaj, kaj ili kompreneble restas nelibervolaj kaj teritoriaj. Multaj aliaj lingvokomunumoj estas nelibervolaj, etnaj kaj teritoriaj, t.e. ili estas la inversoj de Esperanto-komunumo.

Se ni komparas la Esperanto-komunumon kun aliaj lingvokomunumoj, ŝajnas, ke ĝia plej grava karakterizaĵo kiel interkultura komunikilo estas ĝia neetneco, kiu kondukas al manko de unusola kulturo de komunikado. Do temas pri *interkultura* komunikado en *unu komuna* lingvo. Inverse, aŝkenazaj judoj, ekzemple, nun parolas diversajn lingvojn krom la jidan, inkluzive de la hebrea, la angla, la rusa, la germana, la franca, la hispana ktp, sed ili havas pli-malpli la saman kulturon de komunikado. Do temas pri *intrakultura* komunikado en *pluraj malsamaj* lingvoj. Travivinte kaj la interkulturan komunikadon de esperantistoj en unu komuna lingvo kaj la intrakulturan komunikadon de aŝkenazaj judoj en pluraj malsamaj lingvoj kaj komparante ilin, mi eĉ emas diri, ke la unua havas pli da problemoj de komunikado ol la dua. Fiedler (2002) estas inter la malmultaj esploroj, kiuj mencias eksplacite, ke ekzistas tiaj problemoj en la Esperanto-komunumo.

4 Kio povas okazi kiam japana kaj israela esperantistoj komunikas lingve

4.1 Ĝeneralaj rimarkoj

Ne estus facile trovi alian paron da kulturoj de komunikado tra la mondo kiel la japanan kaj israelan kulturojn de komunikado.⁷ Ili diferencigas unu de la alia, interalie, laŭ la jenaj tri parametroj: 1) rekteco; 2) dependeco de la aĝo kaj socia rango de la kunparolantoj;

⁵ Vidu, ekzemple, Matsumoto & Hwang (2012) pri ĝenerala pritrakto de nelingva komunikado en interkultura komunikado.

⁶ Vidu, ekzemple, Nakane (2012) pri ĝenerala pritrakto de silentado en interkultura komunikado.

⁷ Vidu, ekzemple, Takeuchi (1995) kaj Katriel (1986) pri ĝeneralaj karaterizaĵoj de japana kaj israela komunikado respektive.

3) dependeco de sociaj kuntekstoĵ. Ĝenerale, la japana kulturo de komunikado estas nerekte kaj dependas de la aĝo kaj socia rango de la kunparolantoj kaj sociaj kuntekstoĵ, dum israela kulturo de komunikado estas rekta (escepte kiam oni komunikas ironie) kaj ne tiel dependas de tiuj sociaj faktoroĵ.

Alia grava diferenco inter la du kulturoĵ de komunikado estas, ke multaj japanoĵ, inkluzive de esperantistoj, emas ŝanĝi siajn strategiojn kiam ili komunikas kun alikulturanoĵ (eble escepte de tiuj el Ĉinio kaj Koreio), dum malmultaj israelanoĵ emas ŝanĝi siajn strategiojn laŭ la sameco aŭ malsameco de la kulturo de sia kunparolanto. Tamen tiu ĉi ŝanĝo ĝenerale ne aplikiĝas al la supremenciita tria parametro; t.e. multaj japanoĵ ne povas senti sin komfortaj ĝis ili sukcesas diveni kaj trovi la proksimajn aĝon kaj socian rangon de sia kunparolanto.

En la jena ilustrado de kulturaj diferencoj kaj eblajn konfliktoĵ, japanaj kaj israelaj esperantistoj parolas en Esperanto, ne ŝanĝante siajn strategiojn de komunikado ankaŭ en Esperanto, kaj scias nenion pri la kulturo de komunikado unu de la alia. Tio estas por reliefigi la potencajn kulturajn problemojn kiam estas neniu interkultura konverĝo en komunikado. En ĉiu pritraktota kampo de komunikado mi montros unue tipajn israelajn kaj japanajn strategiojn, poste eblajn japanajn kaj israelajn reagojn al ili, kaj fine eblajn konfliktojn, kiuj povas okazi en vizaĝ-al-vizaĝa komunikado inter japano kaj israelano. Bedaŭrinde, mi devos pritrakti ĉiun probleman kampon de lingva komunikado tre mallonge kaj iom supraĝe, kaj mi ne povos montri ekzemplojn de la tipaj strategioĵ pro teknikaj kialoj.

4.2 Pardonpetado

Israelano tipe pardonpetas en unu el la jenaj manieroj: 1) pardonpeti sincere, kio ne ŝajnas tiel ofta; 2) pravigi sin; 3) nei sian respondecon; 4) kulpigi sian kunparolandon aŭ iun alian. Japano, aliflanke, tipe pardonpetas en unu el la jenaj manieroj: 1) pardonpeti sincere, kio ankaŭ ne ŝajnas tiel ofta; 2) pardonpeti formule; 3) kulpigi sin (eĉ kiam li mem ne estas respondeca), ofte atendente, ke lia kunparolando neos tion kaj kulpigos sin anstataŭe.

La japano povas pensi pri la dua, tria kaj kvara israelaj strategioĵ jene: Kial li entute ne pardonpetas? Li, mia israela kunparolanto, estas senrespondeca kaj nesincera pri tio, kion li diris aŭ faris. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la dua japana strategio jene: Kial li, mia japana kunparolanto, entute ne pardonpetas? Pri la tria strategio li povas pense jene: Kial li devas kulpigi sin kiam li mem ne estas respondeca?

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoĵ konfliktas en la jenaj du punktoj: kiel pardonpeti (formule aŭ ne); kiun kulpigi (sin aŭ iun alian).

4.3 Petado

Israelano tipe petas en unu el la jenaj manieroj: 1) peti rekte; 2) aludi; 3) sugesti; 4) peti retorike; 5) minaci. Japano, aliflanke, tipe petas en unu el la jenaj manieroj: 1) peti rekte, kio ne estas tiel ofta; 2) aludi, sed pli subtile ol israelano; 3) sugesti, sed denove pli subtile ol israelano.

La japano povas pensi pri la unua kaj kvina israelaj strategioĵ jene: Li estas tro rekta kaj agresema; li ne scias kiel peti. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la dua kaj tria japanaj strategioĵ jene (retrospektive): Mi ne sciis, ke li petis min fari ion.

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoĵ konfliktas jene: kaj la japano kaj la israelano malsukcesas kompreni tion, kion la alia petis, sed pro du kontraŭaj kialoj.

4.4 Rifuzado

Israelano tipe rifuzas en unu el la jenaj manieroj: 1) rifuzi rekte; 2) simple ignori, kio estas tre ofta; 3) inventi pretekston. Japano tipe rifuzas en unu el la jenaj manieroj: 1) rifuzi rekte, kio estas tre malofta; 2) rifuzi ĝentile sed insolente (!), kio estas tre ofta; 3) peti tempon por pripensi, kio estas tre ofta; 4) inventi pretekston.

La japano povas pensi pri la unua kaj dua israelaj strategioj jene: Li estas neĝentila kaj nesentema. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la dua japana strategio jene: Li estas hipokrita. Pri la tria strategio li povas pensi jene (retrospektive): Mi ne sciis, ke li rifuzis.

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoj konfliktas jene: Israelano eble povas komprenigi japanon, ke li rifuzas, sed povas impresi lin negative pri sia parolado; dum japano eble ne ĉiam povas komprenigi israelanon, ke li rifuzas, sed eĉ kiam li sukcesas, ankaŭ li povas impresi lin negative pri sia parolado.

4.5 Plendado

Israelano tipe plendas en unu el la jenaj manieroj: 1) plendi rekte, kio estas tre ofta; 2) plende nerekte tra iu influa homo. Japano, aliflanke, tipe grumblas en unu el la jenaj manieroj: 1) plendi rekte, sed nur al iu, kiu por li havas pli malaltan socian rangon; 2) plendi nerekte tra iu influa homo, kio estas preskaŭ tabua; 3) plendi pri la koncerna homo al aliuloj; 4) kalumni la koncernan homon anonime; 5) vundi la koncernan homon fizike aŭ surloke aŭ embuske, kio estas tre ekstrema sed ne malofta.

La japano povas pensi pri la unua israela strategio jene: Li plendas tro ofte kaj pri tro multaj aferoj. Pri la dua strategio li povas pensi: Li malobservis tabuon, do li ne estas pardonebla. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la unua japana strategio jene: Kial li ne povas plendi rekte al ĉiu egale? Pri la tria, kvara kaj kvina strategioj li povas pensi jene: Li estas mense malsana.

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoj konfliktas jene: Certaj israelaj kaj japanaj strategioj de plendado ŝajnas preskaŭ ekzkluzivi unu la alian, tiel ke eble estas neeble plendi, ne estante miskomprenita de la alia kaj/aŭ stimuli tre negativan reagon de la alia.

4.6 Esprimado de opinio

Israelano tipe esprimas opinion en unu el la jenaj manieroj: 1) esprimi opinion rekte, senkonsidere al tio, kiu estas lia kunparolanto, kio estas tre ofta. Japano, aliflanke, tipe esprimas sian opinion en unu el la jenaj manieroj: 1) esprimi opinion rekte, kio estas tre malofta, aparte kiam li parolas kun iu, kiu havas pli altan socian rangon ol li, kaj se li ne estas ebria; 2) prezenti sian personan opinion kvazaŭ ĝi estus komuna saĝo, kio estas tre ofta; 3) subpremi sian opinion kaj silenti, kio ankaŭ estas tre ofta.

La japano povas pensi pri la israela strategio jene: Kial li ne povas konsideri pli, kun kiu li parolas? Mi deziras, ke ankaŭ mi povus esprimi mian opinion tiel rekte al ĉiu. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la dua kaj tria japanaj strategioj jene: Ĉu li ne havas sian propran opinion? Pri kio li timas?

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoj konfliktas jene: Israelano esprimas opinion unudirekte kaj profitas de sia asertemo, dum japano suferas de sia memdevigata silentado.

4.7 Alparolformoj

Israelano tipe alparolas sian kunparolanton en unu el la jenaj manieroj: 1) per lia persona nomo (normo) eĉ kiam tiu havas pli altan socian rangon se la kunteksto estas neformala;

2) per liaj titolo kaj familia nomo, kiam li havas multe pli altan socian rangon kaj la kunteksto estas formala. Japano, aliflanke, tipe alparolas sian kunparolanton en unu el la jenaj manieroj: 1) per liaj titolo, inkluzive de “s-ro” aŭ “s-ino” kaj familia nomo (normo); 2) per lia persona nomo nur kiam li estas bona amiko (sed ne ĉiam); 3) nur per lia titolo kiam li havas pli altan socian rangon.

La japano povas senti sin nekomforta alparolante sian kunparolanton aŭ estante alparolata de li laŭ la norma israela strategio, ĉar ĝi ŝajnas tro intima. Ankaŭ la israelano povas senti sin nekomforta alparolante sian kunparolanton aŭ estante alparolata de li laŭ la norma japana strategio, sed pro la inversa kialo – ĝi ŝajnas tro formala.

En tiu ĉi kampo de interkultura lingva komunikado oni povas ofte observi diversajn gradojn de konverĝo aŭ kompromiso por eviti konflikton, kiu kaŭzas preskaŭ intuan nekomfortecon kaj al la japana kaj al la israelano. Sed ili ambaŭ povas misapliki la norman strategion de la alia kulturo: japano povas erare alparoli iun israelanon per lia persona nomo, kiun eĉ israelanoj ne aŭdacus alparoli tiel, kaj israelano povas erare alparoli iun japanon per liaj titolo kaj familia nomo, kiun eĉ japanoj ne aŭdacus alparoli tiel.

Ili ambaŭ povas konfuziĝi ankaŭ pro tute alia kialo: ili ne certas pri la konsisto de la nomo unua de sia kunparolanto, t.e. ili ne certas kiu estas lia persona nomo kaj kiu estas lia familia nomo. Do ĉiu el ili povas erare uzi la personan aŭ familian nomon de sia kunparolanto kiam li intencis alparoli lin per lia familia aŭ persona nomo respektive.

4.8 Vico-alternado

Kiam du israelanoj parolas, la paŭzo inter la fino de la parolo de unu kaj la komenco de la parolo de la alia estas sufiĉe mallonga, kaj ofte ĝi povas esti nula aŭ eĉ minusa, t.e. la dua komencas paroli antaŭ ol la unua finas sian parolon, speciale kiam ilia diskuto varmiĝas, kaj tia kruciĝo de du paroloj ne necese estas konsiderata kiel ofendo; por iuj ĝi povas esti komplimento, ke ilia parolo estas tiel interesa, ke la alia ne povas atendi ĝis ili finas paroli. Aliflanke, kiam du japanoj parolas, la interparola paŭzo estas multe pli longa. Komenci paroli antaŭ ol via kunparolanto finis sian parolon, estas konsiderata kiel ofendo al li.

Se israelano kaj japano parolas, paŭzante laŭ siaj respektivaj kutimoj, ili ambaŭ povas ofendiĝi, sed pro tute inversaj kialoj. La japano povas ofendiĝi ĉar la israelano komencis paroli, ne atendante la finon de lia parolo, kaj la israelano povas ofendiĝi ĉar la japano paŭzis tiel longe.

5 Al interkulturo de lingva komunikado en Esperanto

Eble eĉ tiu ĉi mallonga kaj iom supraĵa komparo de la japana kaj israela kulturoj de lingva komunikado sufiĉas por konvinki vin, ke unu komuna lingvo sola ne povas garantii senprobleman interkulturan komunikadon, ironie ĝuste kiam tiu komuna lingvo estas la kulture neŭtrala lingvo Esperanto.

Ĉar ni ne povas anticipi, ke ĉiu esperantisto konatiĝu kun ĉiuj ĉefaj kulturoj de komunikado en la mondo, komunume interkonsentita normigo de interkulturo de komunikado en Esperanto ŝajnas la unusola solvo. Sed ĉu tio eblas, aŭ ĉu la tiel nomata interkultura komunika kompetenteco⁸ povas esti dezirinda (aŭ eĉ nepra) trajto de ĉiu esperantisto, kiu komunikas kun alikultura samideano?

⁸ Vidu, ekzemple, Byram (2012) pri la koncepto.

Inter la sep kampoj de lingva komunikado, kiuj estis ilustritaj supre, nur la lastaj du, t.e. alparolformoj kaj vico-alternado, ŝajnas havi ŝancon de iu komunume interkonsentita normigo. Sed la aliaj kvin kampoj, t.e. parolagoj, estas tiel proksime ligataj kun la kulturoj de la parolantoj, ke eĉ la Esperanto-komunumo ne povus alveni eĉ al modesta normiga interkonsento. Bedaŭrinde, mi mem ne povas proponi solvon por tiuj problemoj de interkultura lingva komunikado en Esperanto, kiujn mi provis ilustrati, kaj mi dubas, ĉu iu alia povos solvi ilin. Oni ofte diras, ke ni esperantistoj jam havas komunan kulturon, tamen certe ne de lingva komunikado sed en iu alia senco de la vorto.

6 Konkludo

En tiu ĉi esploro mi provis montri, ke unu komuna lingvo sola ne sufiĉas por interkultura lingva komunikado sen problemoj, inkluzive de miskomprenoj kaj konfliktoj – ironie ĝuste kiam tiu komuna lingvo estas la kulture neŭtrala lingvo Esperanto, ĉar ĉiu povas uzi, aŭ konscie aŭ nekonscie, sian kulturon de komunikado kiam li parolas en Esperanto kun alikulturaj samideanoj.

Mi provis ilustrati, kvankam mallonge kaj iom supraĵe, malsamajn strategiojn, kiujn japanoj kaj israelanoj povas uzi ankaŭ kiam ili parolas kun alikulturanoj en Esperanto ekzakte kiel kiam ili parolas kun samkulturanoj en siaj respektivaj denaskaj lingvoj, kaj ankaŭ miskomprenojn kaj konfliktojn, kiujn tiuj malsamaj strategioj povas kaŭzi inter japana kaj israela esperantistoj.

Eble en la kampoj de alparolformoj kaj vico-alternado ni povos alveni al iu komunume interkonsentita interkulturo, sed en la kampo de diversaj parolagoj tia interkultura konverĝo ŝajnas neebla. Sed aliflanke ni ne povos konatiĝi kun ĉiuj ĉefaj kulturoj de lingva komunikado en la mondo.

Do kion ni povas fari intertempe ĝis naskiĝos aŭ stabiliĝos iu interkulturo de komunikado en la Esperanto-komunumo iam en la estonteco? Ne ŝajnas esti solvo por problemoj de interkultura komunikado en Esperanto, aparte ĉar nia Esperanto-komunimo disvastiĝis en tiel multaj lokoj, kiuj havas malsamajn kulturojn de komunikado. Eble unu el la malmultaj aferoj, kiujn ni povas fari kiam ni komunikas kun alikulturanoj en Esperanto, estas konscii pri eblaj problemoj kaj havi interkulturajn toleron kaj imunecon.

Bibliografio

- Brosh, S. & Weinbach, L. 1986. *Omanut hasiah: Tikšoret bejn-išit ufeulot dibur [Arto de la diskurso: Interpersona komunikado kaj parolaktoj]*. Tel Aviv: University Publishing Projects. [hebree]
- Byram, M. 2012. Conceptualizing Intercultural (Communicative) Competence and Intercultural Citizenship. Jackson, J. (ed.). 2012. *The Routledge Handbook of Language and Intercultural Communication*. London: Routledge. 85-97.
- Fasold, R. 1990. *Sociolinguistics of Language*. Cambridge: Blackwell. 1-38 (Address Forms).
- Fiedler, S. 2002. On the Main Characteristics of Esperanto Communication. Knapp, K. & Meierkord, C. (eds.). *Lingua Franca Communication*. Frankfurt: Lang. 53-86.
- Katriel, T. 1986. *Talking Straight: Dugri Speech in Israeli Sabra Culture*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Keckes, I. 2012. Interculturality and Intercultural Pragmatics. Jackson, J. (ed.). 2012. *The Routledge Handbook of Language and Intercultural Communication*. London: Routledge. 67-84.

- Matsumoto, D. & Hwang, H.-S. 2012. Nonverbal Communication: The Messages of Emotion, Action, Space, and Silence. Jackson, J. (ed.). 2012. *The Routledge Handbook of Language and Intercultural Communication*. London: Routledge. 130-163.
- Nakane, I. 2012. Silence. Bratt Paulston, C. et al. (eds.). 2012. *The Handbook of Intercultural Discourse and Communication*. Chichester: Blackwell. 158-178.
- Takeuchi, Y. 1995. *Nihonjin no kodo bumpo [Sociogramatiko de la japanoj]*. Tokyo: Toyo Keizai Shimbunsha. [japane]
- Tannen, D. 2012. Turn-Taking and Intercultural Discourse and Communication. Bratt Paulston, C. et al. (eds.). 2012. *The Handbook of Intercultural Discourse and Communication*. Chichester: Blackwell. 135-157.
- Wierzbicka, A. 2003². *Cross-Cultural Pragmatics: The Semantics of Human Interaction*. Berlin: Mouton de Gruyter.
- Woods, R. E. 1979. A Voluntary, Non-Ethnic and Non-Territorial Speech Community. Mackey, W. F. & Ornstein, J. (eds.). *Sociolinguistic Studies in Language Contact*. The Hague: Mouton. 433-450.

Krimo en malvarma klimato: la fenomeno de la skandinava krimromano



Jane Edwards

Jane Edwards, Dekano pri Internacia kaj Profesia Spertigo ĉe la Universitato Yale (Usono) de post 2006, antaŭe okupis similajn postenojn en la Universitatoj Harvard kaj Wesleyan. Ŝi magistriĝis ĉe la Kembriĝa Universitato (Britio) kaj posedas ankaŭ magistran kaj doktoran diplomojn (pri folkloro) de la Universitato de Pensilvanio. Ŝi estas membro de diversaj redaktaj kaj organizaj estraroj en Usono kaj aliloke en la kampo de internacia edukado, kaj tra sia kariero ŝi instruis pri literaturo kaj kultura antropologio. Ŝi estas iama ano de la komisiono pri IKU.

Resumo

La eksterordinara monda sukceso de la trilogio *Jarmilo* de la sveda verkisto Stieg Larsson novmaniere logis al Skandinavio la atenton de tiuj, kiuj legas kriman fikcion. Jam de post la 1960aj jaroj haveblas, kaj estas alte taksataj, tradukoj de kelkaj nordiaj krimfikciaj verkistoj; sed en la unua jardeko de la 21-a jarcento tradukiĝis signifa kvanto de verkoj, kiuj kaptis la atenton de tiuj legantoj, kiuj jam utiligas kriman fikcion kiel punkton por eniri la popularan kulturon de aliaj socioj. Utiligante la ĝenron por pridemandi sociajn instituciojn, la efikon de teknologio, kaj niajn antaŭsupozojn pri la lokiĝo de povo, la verkoj de Larsson montris fortan moviĝon en nova direkto por tiaj verkoj. Estas interese konsideri kiel aliaj nordiaj verkistoj adaptas la ĝenron laŭ similaj manieroj.

Inter tiuj verkistoj estas ankaŭ islandanoj, kiel ekzemple Arnaldur Indriðason kaj Yrsa Sigurðardóttir. Tiu ĉi prelego ekzamenos kelkajn manierojn laŭ kiuj verkistoj kaj legantoj utiligas la konvenciojn de krima fikcio por esplori sociajn demandojn kaj individuajn dilemojn. Ni esploros la rakontostilon, ĉefrolantojn kaj socian kuntekston en pluraj tiaj islandaj fikciaĵoj, farante komparojn kun aliaj skandinavaj verkoj por klopodi ekkompreni la karakterizaĵojn de nordia fikcio de tiu ĉi ĝenro. Ni poste demandos kiel la ĝenro influas la leganton kaj kial ĝi estas tiel efike adaptebla al plej diversaj celoj. Fine ni turnos nin al pli sunoplenaj klimatoj por mallonge rigardi romanojn kun pli bonhumoraj krimobatalantoj kaj malpli intensaj sociaj interesoj, tiel kompletigante nian komprenon de fikcia krimo en tutmonda epoko.

Crime in a cold climate: the phenomenon of the Scandinavian crime novel

Summary

The extraordinary global success of the Swedish writer Stieg Larsson's *Millennium* trilogy focused the attention of readers of crime fiction on Scandinavia in a new way. While since the 1960's translations of some Nordic crime fiction writers have been available and highly

regarded, in the first decade of the 21st century a significant body of work has been translated, and embraced by those readers who have long used crime fiction as a point of entry into the popular culture of other societies. Larsson's use of the genre to interrogate social institutions, the impact of technology, and our assumptions about the locus of power signaled a strong movement in a new direction for works of this kind, and it is of interest to consider how other writers are adapting the genre in similar ways.

Among these works are those of Icelandic writers such as Arnaldur Indridason and Yrsa Sigurdardottir. This presentation will examine some of the ways in which writers and readers use the conventions of crime fiction to explore social issues and individual dilemmas. We will explore plot, protagonist and social context in several works of Icelandic fiction of this kind, drawing comparisons with other Scandinavian works to build an understanding of what the characteristics of Nordic fiction of this genre may be. We will then take up the question of how this genre works for the reader, and why it can be adapted so effectively to very different uses. Turning to sunnier climates, we will briefly look at novels with more cheerful crime fighters and less intense social concerns, rounding out our understanding of fictional crime in the age of globalization.

Le crime qui venait du froid: le phénomène du roman policier scandinave

Résumé

L'extraordinaire succès mondial de la trilogie *Millennium*, de l'auteur suédois Stieg Larsson, a attiré de façon nouvelle sur la Scandinavie l'attention des amateurs de littérature policière. Déjà depuis les années 1960 on trouve des traductions de quelques auteurs de romans policiers nordiques, et elles sont hautement appréciées; mais dans la première décennie du 21^e siècle on a traduit une quantité significative d'ouvrages qui ont capté l'attention de ces lecteurs, qui utilisent déjà la littérature policière comme introduction à la culture populaire d'autres sociétés. L'utilisation que Larsson fait de ce genre littéraire pour questionner les institutions sociales, l'impact de la technologie et nos idées préconçues sur la situation du pouvoir, a initié un puissant mouvement dans une nouvelle direction pour de tels ouvrages. Il est intéressant de considérer comment d'autres écrivains nordiques adaptent le genre de façon similaire.

Parmi ces auteurs se trouvent également des Islandais, comme par exemple Arnaldur Indriðason et Yrsa Sigurðardóttir. Cette conférence examinera quelques exemples de la façon dont auteurs et lecteurs utilisent les conventions de la littérature policière pour étudier des questions sociales et des dilemmes individuels. Nous explorerons l'intrigue, les protagonistes et le contexte social dans plusieurs romans islandais de ce type, en faisant des comparaisons avec d'autres oeuvres scandinaves pour essayer de comprendre les caractéristiques de la littérature policière nordique. Nous nous demanderons ensuite comment ce genre influence le lecteur et pourquoi il est si efficacement adaptable aux finalités les plus diverses. Enfin nous nous tournerons vers des climats plus ensoleillés pour jeter un rapide regard sur des romans mettant en scène des défenseurs de l'ordre plus souriants et des enjeux sociaux moins intenses, complétant ainsi notre compréhension du crime de fiction à l'heure de la mondialisation.

Glæpur á norðurslóðum: skandinavísk glæpasaga

Útdráttur

Hinar einstöku vinsældir glæpasöguþrileiksins Þúsaldamót eftir sænska rithöfundinn Stieg Larson hefur beint athygli glæpasagnaáðdáenda að Skandinavíu. Um 1970 voru þegar fáanlegar vinsælar þýðingar á verkum nokkurra norrænna glæpasagnahöfunda. Á fyrsta tug 21. aldar birtust fjölmargar þýðingar verka sem fangað hafa athygli þeirra lesenda sem nýta sér glæpasögur til að kynnast alþýðumeningu annarra samfélaga. Stieg Larson fer í verkum sínum nýjar leiðir í þá átt að nota þessa bókmenntagrein til að rannsaka stofnanir þjóðfélagsins, áhrif tækninnar og væntingar okkar um stöðu valdsins. Það er forvitnilegt að velta fyrir sér hvernig aðrir norrænir rithöfundar halda sig á svipuðum slóðum í þessari bókmenntagrein.

Meðal þessara höfunda eru einnig Íslendingar, eins og til dæmis Arnaldur Indriðason og Yrsa Sigurðardóttir. Í þessum fyrirlestri verður fjallað um nokkrar þær aðferðir glæpasagna sem rithöfundar og lesendur eru sammála um að séu bestar til að spyrja spurninga um samfélagið og vandamál einstaklinganna. Gerð verður grein fyrir frásagnarstíl, aðalpersónum og félagslegum aðstæðum í mörgum íslensku sagnanna og þær bornar saman við önnur skandinavísk verk til að reyna að skilja betur einkenni þessarar bókmenntagreinar á norðurslóðum. Síðan verður spurt hvernig bókmenntagreinin hefur áhrif á lesandann og hvers vegna hún er svo áhrifarík á flestum sviðum. Að lokum verður stuttlega vikið í hlýrra loftslag og litið til skáldsagna, þar sem þjónar réttvísinnar eru léttari í skapi og þjóðfélagsmál eru síður í brennidepli, til þess að öðlast fyllri skilning á hinum tilbúna glæp í alþjóðlegu samhengi.

Krimo en malvarma klimato: la fenomeno de la skandinava krimromano

La fenomeno de tio kion oni ĝenerale nomas “Nordia Nigro” (*Nordic noir* en la angla) meritas nian atenton. Temas pri grupo de literaturaj kaj video-produktaĵoj el la nordiaj landoj, kiu nove eniras la ekzistantan tutmondan ekonomion de specifa ĝenro de populara kulturo. La termino “nordia” aludas al Danlando, Finnlando, Gronlando, Islando, Norvegio kaj Svedio. “Noir” estas termino unue uzata en Francio (*film noir*) en la 1940aj jaroj por priskribi filmojn, kiuj montras tri distingajn elementojn: unue, seniluziigon pri la valoroj kaj potencobataloj, kiuj produktis la Duan Mondmiliton; due, duran, cinikan masklan protagoniston, kaj, trie, estetikon de socia realismo. La karakterizoj de la nuntempaj verkoj populare identigitaj kiel “Nordia Nigro” same enhavas tian seniluziigon kaj socian realismon kian oni trovas en la “nigra” ĝenro de eŭropaj kaj usonaj filmoj de la 1940aj kaj fruaj 1950aj jaroj. Ili utiligas la konvenciajn normojn de krima fikcio por engaĝi la atenton de la leganto/spektanto al ekzamenado de la personaj kaj sociaj luktoj de la nuna tempo.

Oni povus multon diri pri la larĝa gamo de krima fikcio kaj krimaj filmoj el la nordiaj landoj, kiuj ekhaveblas komence de la dudekunua jarcento; sed tiu ĉi referaĵo rilatos nur al islandaj verkoj. La perspektivo estos tiu de konsumanto kiu partoprenas en la tutmonda kultura ekonomio de la nuna epoko: la konstatoj kaj demandoj estos tiuj de leganto sen aparta scio pri Islando. Ni celas esplori la demandon kial legantoj trovas tiujn ĉi verkojn allogaj. Ni tion faros per fokuso al du islandaj verkistoj, Arnaldur Indriðason kaj Yrsa Sigurðardóttir. Evidentiĝas, ke reaperas en la verkoj certaj dominaj motivoj: plimultiĝanta enmigrado, negocado kun la pasinteco de Islando, la efiko kaj sintrudo de novaj teknologioj, kaj, ĉefe, la gepatra vartado kaj la bonfarto de infanoj en epoko de rapida socia ŝanĝiĝo. Ni poste mallonge esploros kontrastojn kun la imagita Italio de la verkoj de la usona verkistino Donna Leon kaj la siciliano Andrea Camilleri. La ĝenro de policprocedura fikcio laŭpretende komenciĝis en Francio en la deknaŭa jarcento per la rememoroj de Vidocq en 1828 (Scaggs 17). Tamen, eĉ se ekzistas esceptoj, la merkaton dominis kaj dominas verkistoj en la angla lingvo, ĉu usona ĉu brita. La periodo inter la du mondmilitoj estas ofte nomata la ora epoko de la ĝenro, kun disvastiĝo de du subĝenroj. Unue la subĝenro “Kiu faris?” (angle “whodunit”), prezentas la enigmosolvan puzloaman trupon de individuistaj detektivoj, ekde la memfidaj, socie lertaj Hercule Poirot kaj Peter Wimsey, Ellery Queen kaj Nero Wolfe, ĝis la oldulina escepto, fraŭlino Marple.

La dua subĝenro estas konata kiel “dure boligita” (alude al ovoĵ): tiuj usonaj romanoj (de verkistoj kiel ekzemple Dashiell Hammett, Raymond Chandler kaj Mickey Spillane) same prezentas forte individuistajn solvantojn de murdaj enigmoj, sed ĉi tie temas pri seniluziigitaj, ofte socie marĝenaj privataj esploristoj, kiuj ofte sin turnas al vorta kaj fizika perforto. Ambaŭ subĝenroj montras nur minimuman respekton pri establitaj policaj servoj, kvankam kunlaboro inter individua detektivo kaj loka polico estas ofte necesa por montri reestablon de ordo post la profunde malordiga ago de murdo. En tiuj ĉi rakontoj la leganto akompanas la individuon pro intelekta engaĝiĝo en la procedo de krimsolvo.

Kontraste, la policprocedura verko, kiu ekaperas kiel ĝenro en la 1950aj jaroj, proponas al la leganto fikcian sperton en kiu identigo kun la celoj kaj metodologioj de la ŝtataj fortoj de la leĝaro kaj la publika ordo estas baza premiso. Eĉ kiam la protagonistoj de tiaj fikciaĵoj – John Rebus de la verkisto Ian Rankin, Joe Leaphorn de Tony Hillerman, Dave Robicheaux de James Lee Burke – estas malkontentaj aŭ alimaniere marĝenaj, tiuj fikciaĵoj antaŭsupozas

la neceson de la maŝinaro de la polico, kaj, ĉiam pli kaj pli, la teknologiojn, al kiuj nur tiaj institucioj havas aliron, por solvi la prezentitan murdoenigmon kaj por restarigi ekvilibron per rekono de la ecoj de krimula malordigo.

En la policprocedura fikcio troviĝas esenca elemento de teama kunlaboro. La komplikeco de la jurscienca mondo, fikcie dokumentata en kreskantaj nombroj de romanoj kaj televidaj serioj, kiuj prezentas la laboron de jursciencaj patologoj kaj psikologiaj “profilistoj”, postulas teaman aliron. La teamo proponas novajn rakontajn eblojn al la verkisto: multoblajn krimojn, esplorojn de variaj vidpunktoj de teamanoj, ĉu viraj ĉu virinaj, optimistaj aŭ senesperaj, feliĉaj aŭ malfeliĉaj. Ĉio ĉi ebligas prezenton de paraleloj kaj kontrastoj en metodoj, kaj la kunpuŝo de diversaj sociaj kaj geografiaj medioj. La abundo de alireblaj teknikoj por esplorado favoras tiun ĉi rakontan strategion.

Multaj legantoj de krimromanoj en la lastaj jaroj favore akceptis la vastan gamon de verkoj lokitaj en medioj iom ekzotikaj. Altas la merkata postulo por verkoj samtempe anglalingvaj sed lokitaj en aliaj landoj, ekzemple la serio de Colin Cotterill pri laosa mortenketo, la serio de Alastair McCall Smith pri la Dama Detektiva Agentejo Numero Unu, lokita en Botsvano, kaj la romanoj de Donna Leon, lokitaj en Venecio. Same postulataj estas verkoj kreitaj en aliaj lingvoj kaj nove furoraj en angla traduko, kiel ekzemple la ŝanhaja serio de Qiu Xiaolong pri Inspektoro Chen, la serio Montalbano de Andrea Camilleri, kaj la serio pri Detektivo Imanishi, de la japana verkisto Seicho Matsumoto. Multaj tiaj verkoj, kiel ekzemple ĉi-lastaj, nun reaperas, aŭ estas unuafoje tradukitaj. La multflanka retejo Amazon havas novan iniciaton: eldoni tradukojn de fremdlingvaj verkoj el la tuta mondo; tiu marko AmazonCrossing (AmazonTransiro) malfermas premiitajn kaj amase vendatajn librojn al multaj legantoj por la unua fojo.

Oni povus argumenti, ke tiu furoro rezultas parte el nova interesiĝo pri specifaj fizikaj lokoj, kio siavice rezultas el kombino de, unue, turismo nove direktita al vasta gamo de celoj kaj de, due, plia alireblo al informoj (kaj precipe bildoj) el landoj kiuj antaŭe troviĝis preter la alirkapablo de la plejparto de la legantoj. Legantoj pli volonte imagas vojaĝi kaj ili ankaŭ sekvas energian brakseĝan vojaĝadon, pere de la reto. Samtempe, ili serĉas alireblajn fikciaĵojn, kiuj donos al ili la senton, ke eblas enpaŝi alian kulturan medion, foran landon, nekonatan kvartalon de nekonata urbo.

Ne temas pri nova fenomeno; sed la nivelo sur kiu anglalingva leganto povas aliri detalajn informojn pri, ni diru, Rejkjaviko, altiĝis laŭ geometria vico en la pasinta jardeko. Serĉiloj povas konduki la esploranton al bildoj de pli-malpli ĉiu strato aŭ konstruaĵo. Guglomapoj ebligas elmapadon de la tuta geografio de intrigo, foje kun aldonita videomaterialo el foraj lokoj; kaj la leganto ankaŭ povas plani sian vojaĝadon sen interveno de profesia peranto. La venonta paŝo – utiligi fikcian rakontadon kiel enirejon al tiu ĉi medio kaj kiel elementon de esplorado – estas natura parto de la procedo de engaĝiĝo kun romanoj en tiu ĉi epoko de tutmondiĝo; kaj tiu fakto estas ĉiam pli konsciata de la produktantoj kaj vendantoj de libroj kaj videomaterialo. Verkistoj servas, per la specifeco de la lokoj kaj kulturaj karakterizoj de siaj verkoj, samtempe al loka legantaro deziranta vidi sian propran sperton redonatan kaj glosatan, kaj tutmonda legantaro, kiu serĉas enirvojon al specifa, loka realo, kiu malsimilas la propran. Ĉu ĉio ĉi konsistigas postkuron de ekzotiko aŭ serĉon de vojplanoj al tutmonda civitaneco – tio estu temo de aparta referaĵo, ne la nuna.

Interesiĝo pri tradukita krimea fikcio, aparte el nordiaj landoj, trairis eksplodon pro la eksterordinara sukceso de la *Jarmila Trilogio* de Stieg Larsson (el Svedio) ekde la jaro 2008. La granda sukceso de la libro kaj filmo de la dana verkisto Peter Høeg, *La Neĝosento de Smilla* (kiu aperis en la angla unue en 1993) jam signalis la ekziston de potenciale amase vendebla

literaturo el Skandinavio. Tradukoj de la policproceduraj romanoj de la sveda Henning Mankell (kiuj unue aperis en la sveda en 1973), kun ties sintortura policisto Wallender, renkontis kreskantan sekvantaron kiam ili aperis en la angla, unue en 1997 kaj rapide post 2001, kiel elementoj en la furoro de tradukoj, vendoj, entuziasma legado kaj adaptoj por televido kaj kinejo, kiu portas la nomon “Nordia Nigro”. En Britio, la eksterordinara sukceso de la dana serio *Forbrydelsen* (La mortigo) en 2011 malfermis novan interesiĝon. La entrepreno Arrow Films kreis novan subetiketon, Nordia Nigro, por vendado en Britio de “la plej bonaj verkoj de skandinava krima kaj politika dramo”.

Nuntempa nordia krima fikcio havas ĉiujn ingrediencojn por altiri legantojn, kiuj deziras kaj intrigon kaj etnografan detalecon. La verkoj ĉerpas vastgame el ĉiuj supremenciitaj ĝenroj, ofte kombinante elementojn de la intima enigmo, la dure boligita verko, kaj la policprocedura romano. Introspekta kaj talenta esploristo laboras ene de, en kunlaboro kun, aŭ tute ekster la normala teritorio de leĝapliko. Per tiaj verkoj la leganto engaĝiĝas kun ekzamenado de sociaj demandoj, kaj meditado pri la aktuala situacio en la loka medio. Spite la diversecon de strategioj, la koncepto de Nordia Nigro meritas sian ĝeneralan titolon. Ofte la protagonisto estas homo sintortura kaj socie baraktanta – kaj malofte temas pri ŝika eleganto laŭ la tradicio de la altklasaj britaj detektivoj de la speco de Adam Dalgliesh (ĉe P. D. James) aŭ Tommy Lynley (ĉe Elizabeth George). Temas pri senkompromisa kritika aliro al la nuna stato de la socio sur la loka kaj foje tutmonda nivelo; la estetiko estas tiu de socia realismo, sen multa optimismo aŭ laŭdado. Islandaj krimaj fikciaĵoj konformiĝas al tiu ĉi modelo, sed ili ankaŭ enhavas fadenojn de humuro, foje neatendatan, kio en kelkaj romanoj leĝerigas la ĝenerale mornan tonon.

Ĉiuj ĉefaj motivoj de la islanda krima skolo troviĝas en la verkoj de Arnaldur Indriðason. Lia ĉefa protagonisto estas Erlendur Sveinsson, mezaĝa polica inspektoro el senpretenda kampara familio de la orientaj fjordo. Erlendur nun loĝas en Rejkjaviko kie, en la tuta serio, li kontraŭbatalas la personajn demonojn de la propra infanaĝo, inkluzive la propran malsukceson kiel patro, kaj la nekapablon resti netuŝita de la krimoj, kiujn li vidas. Li laboras en nekutime senpasia rilato kun kolegoj Elinborg kaj Sigurður Óli, respektive virino profunde ligita al sia familio kaj ambicia kaj foje sensenta junulo: rilatoj inter la teamanoj konsistigas, kiel oni atendus en la policprocedura subĝenro, konstante revenantan kaj signifan elementon en la etoso kaj intrigo. *Jar City* (Urbo de potoj), eldonita en Islando en la jaro 2000 kaj aperinta en la angla en 2006, la plej konata verko en la serio, gajnis la premion Vitra Ŝlosilo (Glass Key) por la plej bona skandinava krima romano, kaj estis filmita de Baltasar Kormákur en 2006; anglalingva filmo estas nun produktata (en 2013). *Jar City* levas, aldone al la demandoj pri gepatrumo kaj la bonfarto de infanoj, signifajn demandojn pri aktualaj temoj frontataj sur la nacia nivelo: la malalta nombro de enloĝantoj en Islando – ĉirkaŭ 320 000 homoj – donas tujan signifon al multaj aferoj, kiuj ŝajnas abstraktaj en aliaj landoj.

Aldone al la demandoj pri gepatra zorgado kaj la bonfarto de infanoj, *Jar City* levas signifajn demandojn pri la nacia utiligo de medicinaj teknologioj. La murdo de izolita maljunulo montriĝas ligita al krimo, en kiu tiu maljunulo involviĝis jardekojn antaŭe – tiel enkondukante la ofte uzatan rimedon de esplorado de du diversaj krimoj en apartaj tempokadroj. Kiam Sigurður Óli aludas al timoj pri adulto per la vortoj “Patreco ... Ĉu entute ni povas certi pri ĝi en Islando?” Arnaldur priskribas “datenobazon, kiu enhavas sanecajn informojn pri la tuta nacio. Ĝi estis ligita al geneologia datenobazo en kiu la familio de absolute ĉiu islandano estas spurita ĝis en la mezepoko: oni nomis ĝin establo de la islanda genetika komunaĵo” (249). Tiu rimedo, uzata en kombino kun ne plu funkcia laboratorio plena je homaj organoj konservataj por esploroj, kondukas al solvo de tiuj ĉi kazoj.

La ekzisto de datenobazo, kiu permesas al ĉiu islandano eltrovi la genealogian veron pri si mem, levas amason da ebloj por problemaj publikigoj, se konsideri la komplikecon kaj gravecon de familiaj rilatoj en malgranda homogena socio. Arnaldur iam deklaris, ke en unu el siaj libroj li esploras “la *danĝerojn* (mia emfazo) de konservado de grandaj kvantoj de personaj informoj en granda datenobazo” (Forshaw 2012, 142). En *Jar City* montriĝas, ke, en la nuna tempo de la romano, genetike transdonita difekto respondecas pri la morto de infano (io, kion Erlendur neniam povas elteni), kaj ke tiu infano estas la nepo de la murdita homo, kiu transdonis la genon – kvankam antaŭe lia ligo al lia filo ne estis konata. La kontrasto, antaŭvidata de Erlendur, inter altteknologia esplorado kaj la fundamentoj de homa konduto estas substrekata ekde la komenca reago de la kolego de Erlendur, Sigurður Óli, al la trovo de la kadavro de la maljunulo:

“Ĉu ne temas pri tipa islanda murdo?” ...

“Kio?” diris Erlendur, enfermite en la propraj pensoj.

“Mizera, senmotiva, kaj farita sen iu ajn klopodo ĝin kaŝi, manipuli la atestojn aŭ kaŝi la pruvojn.”

“Jes,” diris Erlendur, “subnivela islanda murdo.” (Arnaldur 2006, 7)

La teknologioj, kiuj permesas tian jursciencan esploron estas ĉiam pli necesaj, potenciale trudaj, malfacile regeblaj, kaj malfermaj al misuzo ĉu de potencohavantoj ĉu de krimuloj. Arnaldur ne plusekvas tiun temon en *Jar City*, sed lia punkto estas klara. La *Miljara Trilogio* de Stieg Larsson prezentas la logikan finpunkton de tiu temo per la agoj de la ciberhaka Lisbeth Salander, kaj ambaŭ verkistoj rekonas, ke nuntempaj legantoj mem konstante dialogas (kiel ni ĉiuj) pri la avantaĝoj kaj kostoj de epoko en kiu la limoj inter privateco kaj publikeco malaperis pro evoluigo kaj ekuzo de novaj teknologioj. Erlendur eĉ havas poŝtelefonajn problemojn: lia kolego Elinborg elektis kiel sian sonorono la “Odon al ĝojo” kaj kompreneble ne havas ajnan ideon kiel ŝanĝi ĝin – kio surprizas lin en multaj netaŭgaj momentoj kaj trafas la leganton per amuza rekono.

La pli vasta, tutmonda, kunteksto de tiuj ĉi fikciaĵoj estas maltrankvilo pro la rapida alveno de teknologia ŝanĝiĝo, kiu havas efikon ĉe la esplora laboro en tre specifaj kaj ampleksaj manieroj. Sed, se temas pri la socia dinamiko de la nuntempa Islando, al kiu konstante aludas Arnaldur, kaj ankaŭ Yrsa Sigurðardóttir kaj Viktor Arnar Ingólfsson, la ĉefa demando estas la karakterizoj de bona – aŭ almenaŭ adekvata – gepatra zorgado en epoko de rapida socia transformiĝo. Erlendur estas patro de filino kaj de filo, kiujn li esence abandonis kiel gejunulojn kiam li divorcis de ilia patrino. Ambaŭ nun elserĉis lin. Dum la filo Sindri Snaer malofte aperas, la filino Eva Lind, kiu envagas kaj elvagas la serion, ĝin kolorigas per sia drogadikto, la gravediĝo kiu kaŭzas preskaŭ mortigan misnaskon, sia malfido pri la motivoj de Erlendur, kaj sia indigno pri lia ekskluziva sinokupa absorbiĝo en la profesia laboro. Tiuj okazaĵoj estas ofte kontrastigitaj kun la maltrankvilo de Erlendur pri la teruraj aferoj, kiuj okazas al la infanoj de aliaj homoj – kio donas al la intrigo korŝiran aspekton kaj aldonas nivelon de persona profundo. Kiam Eva Lind gravediĝis kaj petas loĝi ĉe Erlendur, la situacio estas drasta:

“Ne,” diris Eva Lind, “Ne faru ion ajn. Daŭrigu vian vivon kaj ĉesu spioni min. Ne pensu pri tio, kion mi faras. Se mi ne ĉeestas kiam vi revenas hejmen, ne gravas. Se mi revenas malfrue aŭ entute ne revenas al la apartamento, tamen ne intervenu...”

“Do, tio ne koncernas min.”

“Tio neniam koncernis vin,” diris Eva Lind (2006, 71-72)

Je iuj stadioj en la rakonto, ekzemple kiam Eva Lind estas en stato komata post la misnasko kaj Erlendur sidas apud ŝia lito (en *Silento de la tombo*) la fundamenta tristo de la vivo de Erlendur, ekde la perdo de la eta frato en neĝoŝtormo en la infaneco, tra lia senama edziĝo kaj perditaj okazoj por patrujo, superŝutas la rakontadon. Tamen, Arnaldur uzas la potencialojn de la teamo – kio estas norma policprocedura rakonta strategio – por kompari lian misan situacion kun tiu de la varma kaj patrinuma Elinborg, kiu estas memfida patrino ĉiam preta foriri de la laboro kaj enhejmiĝi kun sia ensorba kaj vasta parenkaro – precipe en *Voĉoj*, kiu okazas dum la kristnaska periodo:

Ŝi deziregis reiri hejmen kaj bedaŭris la demandon. Ŝi volis fini sian deĵorperiodon. Elinborg traktis Kristnaskon kun granda seriozo kaj sentis la mankon de sia familio. Ŝi dispendigis abiajn branĉojn kaj ornamaĵojn tra la tuta hejmo. Ŝi bakis bongustajn biskvitojn, kiujn ŝi konservis en siaj plastaj skatoloj, zorge etikeditaj laŭ la speco. Ŝia kristnaska rostaĵo estis legenda, eĉ ekster la parencaj rondoj. La ĉefa plado dum Kristnasko estis la svedstila porka gambo, kiun ŝi tenis ekstere sur la balkono por trempiĝi dum dek du tagoj, kaj ĝin vartis tiel tenere kvazaŭ temus pri vindita infano (25.)

Arnaldur evidente ironias, sed la ekvilibraj kaj ripetaj familiaj rilatoj estas konstanta kaj signifa korektilo al la nekapablo de Erlendur subteni iun ajn personan rilaton. La tria teamano, Sigurður Óli, estas ambicia kaj memokupa; kiam lia edzino Bergþora deziras adopti infanon, Erlendur ne povas imagi ion tian, kaj ne havas propran senton de sia rolo de gepatro. Frue en la serio, Arnaldur establas la dinamikon de personaj rilatoj ene de la teamo, tiel ke la leganto atendas sekvi la evoluon de la vivoj de ĉiuj tri ĉefaj roluloj, kiuj tenas la intrigan ekvilibron: Arnaldur maltrankvilas pri gepatrujo, pri infanoj – kaj tio restas kerna temo en la intrigo same kiel en la evoluigo de la roluloj. En *Jar City*, ekzemple, la motoro de la intrigo estas unuavice la morto de infano en la nuntempo kaj duavice la morto de infano en la pasinteco pro genetike transdonita malsano – kaj tio estas ankaŭ la motoro de Erlendur. En *Silento de la tombo*, plia verko kun duobla rakonto, unu pasinta kaj unu nuntempa, du etaj knaboj en la finaj tagoj de la Dua Mondmilito estas mistraktataj de sia patro; nur kompreno de tiu hejma perforto kaj ĝia postsekvo solvas la jam malvarman kazon kaj ĵetas fridan lumon al familiaj rilatoj, inkluzive la gravedon kaj misnaskon de Eva Lind en la nuntempo.

La plej frapa ekzemplo de la rakonto de Arnaldur pri gepatra maltrankvilo estas *Arkta Frosto*. La malferma ĉapitro komenciĝas jene: “Ili povis diveni lian aĝon, sed estis pli malfacile decidi pri la mondoparto, el kiu li venis. Ili supozis lin proksimume dekjara” (1). Tiu ĉi ĉapitro, prezentita en nesentimentala kaj afereca lingvaĵo, ŝokas la leganton. Ĉiuj tri teamanoj, laŭ sia propra maniero, estas konsternitaj ĝis malekvilibro de la sensenca ponardado de dekjara knabo – kun islanda patro, tajlanda patrino – kaj la libro insiste daŭrigas la komparadon de iliaj individuaj respondoj kun tiuj de la multaj apudstarantoj, parencoj kaj atestantoj tuŝitaj de la okazaĵo. Fine de la unua ĉapitro, Erlendur, fikse rigardante la herbejon kie kuŝis la knabo, memoras “eron el iama poemeto” –

Al la tero mi batiĝis,
Frosta kaj ne liberigebla...

Dume li sentas, ke la frostoj rampas laŭ la propra brako: persona turmentiĝo, la pasinteco de malvarma nacio kie – almenaŭ laŭ Erlendur – infanoj ĉiam mortis kiel mortis lia frato, la nuntempo en kiu la unua timo de la teamo estas, ke temos pri rasisma mortigo – ĉio ĉi kuniĝas en tiu malluma momento. La baraktoj de Erlendur en sia rolo kiel la patro de Eva Lind daŭras,

dum ŝi puŝas lin fronti la propran obsedon pri la morto de la frato. Jen vera nigro, kaj impona ekzemplo de la potenco de socirealista fikcio fronti la koncernajn demandojn – ĉi-kaze la novan streĉitecon en la homogena Islando pro la diverseco de enmigrintoj, kiun la verkinto kaj lia loka islanda legantaro frontas en la propra ĉiutaga vivo. Inter 1996 kaj 2008 la nombro de enmigrintoj draste altiĝis, de 5 357 al 25 265, do de 1,8 procentoj ĝis ok procentoj de la enloĝantoj (Statistics Iceland).

Eksterlandano kaj islandano legus la libron diversmaniere, sed la rakonto de Arnaldur pri murdoesploro, kiu dependigas sin de la neaŭskulto de Erlendur al vokanto al lia poŝtelefono kaj poste lia kompreno de tio, kion li aŭdis, liveras imponan kanalon por esplori kiel islandanoj unuope elnegocas sian rilaton al la signifa socia ŝanĝiĝo, kiun ili frontas. Komuna al multaj, eĉ la plimulto, de verkistoj kaj filmistoj kies verkoj troviĝas en la kategorio Nordia Nigro, estas tiu ĉi uzo de la ĝenro cele al socia kritiko kaj pridemandado de la politikaj kaj homaj dilemoj de nordianoj kies nuntempa realo igas ilin pridubi la ideologiojn de socia bonfarto, kiujn oni komencis serioze pridemandi post la falo de la berlina muro.

Yrsa Sigurðardóttir, kiu en sia unua kariero estis gvidanto de entrepreno kaj inĝeniero, aliĝas al la rangoj de la multaj verkistinoj kies virinaj protagonistoj fariĝas ĉiam pli popularaj inter la legantoj de tiu ĉi ĝenro (pli da virinoj ol viroj, laŭ la plimulto de studoj, legas krimromanojn). Þóra Guðmundsdóttir, kiu unue aperas en *Lastaj ritarioj* (2007), estas neprobabla detektivo. Divorcinta advokato kun vartorajto pri siaj du infanoj, fremdigita de sia memobseda kaj reedziĝinta edzo-kuracisto, Þóra estas petata (iom neverŝajne) esplori la morton de germana studento en la Universitato de Islando. Drinkemaj duonsatanistaj studentoj, spirite malfortaj kaj egoismaj profesoroj, kaj malbonhumoraj policianoj aliĝas al la apenaŭ kredebla kaj nekompetenta sekretariino de Þóra (kiu fariĝas pli kapabla en la daŭro de la serio) kaj la germana advokata amobjekto en tiu ĉi ĝenerale neprobabla sed atentokapta rakonto. Yrsa, same kiel Arnaldur, donas atenton al la problemoj de gepatrumo: la studentoj kaj la propraj infanoj estas rigardataj kiel produktoj de la decidoj kaj agoj de siaj gepatroj; evidentiĝas fundamenta maltrankvilo pri la vivo de infanoj en socio kie multaj infanoj estas edukitaj de solaj patrinoj, kaj kie la rilatoj de tiuj infanoj kun sia familio ne atingas la normojn kaj idealojn de la tradicia kampara islanda socio. Þóra plenas je duboj: "... ŝi havis la kulposenton, ke ŝi ne estas bona patrino. Ŝi ja sekvis la islandan tradicion: nasku vian bebon, restu for de la laboro dum ses monatoj, kaj poste reeniru la vetkuron. Neniu longe restas hejme post nasko..." (42). Þóra ne esprimas ŝokiĝon nek prijuĝon pri la troa drinkado kaj uzo de narkotaĵoj fare de la universitataj studentoj en *Lastaj ritarioj*, sed ŝia timo pri la propraj infanoj subfluas grandan parton de la rakonto.

La protagonisto de Yrsa estas erarema laŭ aliaj manieroj ol la izolita kaj turmentita Erlendur. Ŝi ja ne estas tre bona patrino. Pri ŝia kapablo elturniĝi (ŝi vomemas ĉe nekropsioj, timas stiri sur neĝo, kaj katastrofe kuiras) kaj ŝia kapablo fari decidojn ni havas fortajn dubojn. Ŝi vojaĝas kun germana advokato, sia kunlaboranto pri tiu ĉi kazo: li siavice ludas utilan rakontan rolon pro sia nescio pri diversaj aspektoj de la islanda vivo, kio ebligas al la verkisto komenti pri kutimoj, aktualaĵoj, kondutoj – laŭ manieroj, kiuj implicas, ke Yrsa jam de la komenco verkas por internacia legantaro. Dum la vojaĝo Þóra multe trotrinkas kaj dormas kun li.

Estis viro en ŝia lito. Ŝi rigardis la dorson de Mateo. Aŭ ĉu temis pri Óli, la baristo? Ŝi rememoris la antaŭan nokton kaj veis kviete ĉe la konstato, ke ŝi elektis almenaŭ la malpli malbonan el du malbonoj. (241)

Þóra estas bedaŭroplena pli ol memduba, kaj ŝi prezentiĝas kiel homo kiu laboras por prizorgi siajn infanojn kaj aranĝi sian vivon kiel virino de la nuna epoko.– eĉ se ŝia 16-jara filo lastatempe gravedigis sian 15-jaran amikino kaj Þóra, en siaj tridekaj jaroj, baldaŭ fariĝos avino. La verkoj de Yrsa estas fakte multe malpli nigraj ol tiuj de Arnaldur, kvankam la socia klimato de la Islando de Yrsa estas nepre tiu de la nova jarmilo, kaj cinikismo pri Rejkjaviko post la banka krizo sidas tuj sub la surfaco. Yrsa laŭdire amas la tradician kamparan vivon de Islando, sed ŝia interesiĝo ne ĝisatingas la malkaŝojn el la bankokrizo pri la manieroj, laŭ kiuj la politikistoj ekspluatas la popolon:

Korupto en Islando ofte havas la formon de nepotismo, kvankam lastatempaj okazintaĵoj malkaŝis al la lumo trompadon pri mono kaj sekretan komercumon per bankaj kaj registaraj bonhavo. Tamen, oni faras tiujn aferojn tiel mallerte kaj avide, ke tio ne kaptas mian imagon... (Forshaw 2012, 137).

Granda parto de la atentokapto de la intrigo de la verko *Lastaj ritarioj* de Yrsa fontas el esplorado ene de la rakonto pri la ĉasado de sorĉistinoj en Islando, kaj la historio de starpunktoj al la sorĉarto en nordiaj landoj en la deksesaj kaj deksepa jarcentoj. En la dua volumo en la serio, *Cindroj al polvo* (2007, eldonita en la angla en 2010), Yrsa starigas paralelan rakonton en elfosado de la loko de vulkana erupcio en 1973 kaj okazintaĵoj ĉirkaŭ la konflikto kun la britoj pri moruoj.

La ĉeesto de historia dimensio estas evidenta en la rakontaj elektoj de tiuj ĉi islandaj verkistoj – ŝajne laŭ maniero specifa al Islando: ankaŭ Viktor Arnar Ingólfsson starigas en siaj rakontoj signifan engaĝiĝon kun iu momento de la islanda historio. En *La enigmo Flatey* (2002, eldonita en la angla en 2012) la leganto estas informata pri la historio de la transdono de sagaoj, lernas pri la agado de islandaj studentaj frataroj en Danlando, kaj ricevas tre kompletan enkondukon al antaŭmodernaj agrikulturo kaj fiŝkaptado en la foraj okcidentaj insuloj. En *Domo de atestaĵoj* (eldonita en la islanda en 1998) granda parto de la rakonto havas formon de taglibro de fervoja inĝeniero dum la unua duono de la dudeka jarcento (Ingolfson estas inĝeniero kies kariero rilatis al administrado de vojoj) kaj la maldensa intrigo pri murdo kaj sinmortigo estas ĉefe perilo por meditado pri la klopodoj konstrui fervojon en Islando en la 1930aj kaj 1940aj jaroj, kaj ankaŭ pri la rilato inter Islando kaj Nazia Germanio. Islanda krima fikcio estas medio por prinegoci ne nur la sociajn demandojn de la nuntempo, sed ankaŭ tiujn de la antikva kaj lastatempa pasinteco.

Tiuj ĉi islandaj fikciaĵoj estas firme lokitaj ene de la tutmonda merkato, kaj atingas la pliparton de sia legantaro pere de anglalingvaj tradukoj. Eĉ ekzistas subkategorio de tiuj tutmondaj verkoj, kiun verkas eksterlandanoj, en la angla lingvo. La plej sukcesa eksterlanda krimverkisto, pritraktanta Islandon, estas la brito Quentin Bates, kies serio pri solpatrina policanino Gunnhildur Gísladóttir esploras politikon kaj politikistojn en la periodo de la banka krizo. Humuro kaj singarda optimismo karakterizas la tonon de tiuj ĉi libroj, spite ilian emfazon je la misagoj, korupto kaj nekompetento, kiuj ŝokis islandanojn kaj la tutan mondon en la jaro 2008. Ili tute evidente estas verkitaj por anglalingvaj legantoj, kvankam ili profitas el la ondo de Nordia Nigro kaj samtempe kontribuas al ĝi. Bates peras la islandajn morojn por la eksterlanda leganto, grandigante per la sendefia agado de engaĝiĝo kun tiu ĉi ĝenro la komprenon de la leganto pri la kulturo de profunde alispeca socio. Jen, finfine, la signifa parto de la plezuro de tia legado. La sento, ke oni sekvas spuron akompane al detektivo, ke oni moviĝas al solvo de enigmo, estas kerna elemento en la populareco de la ĝenro. Fikcio kiel etnografia ekskurso en alian landon, kiu lasas al la leganto senton de novaj scioj kaj

igas la novaĵojn tridimensiaj kaj personaj, estas unu el la novaj formoj de turismo en la nuna stadio de tutmondiĝo.

La klimato kaj pejzaĝo de la nordiaj landoj konsistigas signifan elementon de la verkoj, kun sia frosta kaj senfina punkto de vintro kaj la kontrastaj longaj tagoj kaj bonvena malŝarĝo de somero. Tio estas aparte evidenta en filmaj kaj televidaj adaptoj kiel ekzemple la filma versio de *Jar City* (2008), kiun faris Baltasar Kormákur. Utiligo de la motivo de tre specifaj enlokigoj estas unu el la plej uzataj kaj plej efikaj rimedoj por fari kriman fikcion tuj trafa al la leganto: oni akompanas la fikcian veroserĉanton tra la disvolvo de la intrigo ne nur intelekto sed ankaŭ geografie. La pejzaĝo de la Islando de Arnaldur kaj Yrsa, kaj ankaŭ de Viktor Arnar Ingólfsson, estas paŭsebla per Guglomapoj, kaj la moviĝo de la roluloj tra la urbo Rejkjaviko estas elemento en la verkoj, kiun la leganto baldaŭ kutimiĝas atendi. Oni povas aserti, ke la tutmonda leganto de krimfikcio estas malpli interesata de la intrigo, kaj prenos libron de librovendeja breto aŭ elŝutos ĝin al sia I-pad pro interesiĝo pri specifa loka kultura medio. La leganto volas pasigi iom da tempo en Rejkjaviko, aŭ en Edinburgo, aŭ Gaborone, aŭ Venecio. Tiu transformiĝo estas evidenta en la kresko de la populareco ne nur de la skandinava nigro sed de similaj fikciaĵoj en aliaj klimatoj.

Rapida rigardo al plene alia geografio – tiu de Italio – eble malkaŝos la tute specifajn konkretaĵojn, kiuj, kune kun la ĝenerala tono kaj utiligo de kuntekstaj politikaj, sociaj kaj historiaj detaloj, diferencigas la Nordian Nigran disde (ni diru) la Itala Konfuziteco. La leganto de tiu ĉi ĝenro estas logata de tute specifaj elementoj en sia elekto de legaĵoj. Ni jam notis la malcerton pri aspektoj de la aktuala vivo kaj la negocadon kun la pasinteco, kiuj karakterizas islandan fikcion. Stratoj kaj kampoj kaj strandoj kaj domoj ankras la leganton de islandaj fikciaj verkoj, kune kun dua konkreta elemento: manĝaĵoj. Oni povas samon diri pri la rakontoj de Andrea Camilleri, la sicilia kreinto de la Detektivo Montalbano, kaj pri Donna Leon, usonano, kies verkoj, kun ties protagonisto Komisararo Guido Brunetti, estas tiel firme lokitaj en la vera urbo Venecio, ke eĉ ekzistas gvidlibro por promenantoj, kiu gvidas legantojn laŭ liaj spuroj (Sepeda 2008). Montalbano, de Camilleri, en sia plej lasta fikcia apero, eĉ aludas al la ĉeesto de filmistaj teamoj en Sicilio por filmi la televidan version de la rakontoj. Montalbano (2013, 8): “Mi ja ne volus, dum ni promenas tie ĉi, stumbli kontraŭ filmoteamo filmanta epizodon de tiu televida serio... Kio okazus, se mi trovus min vizaĝalvizaĝe kun la aktoro, kiu ludas min?” Specifeco de loko estas potenca rakonta strategio por engaĝi la turiston-leganton.

Same pri manĝoj. Tiuj, kiuj sekvas Montalbanon tra la jaroj, scias precize kiuj fiŝaj aŭ pastaj pladoj logos lin en la *trattoria* de Enzo; kaj ili avidas scii ĉu lia domzorgantino Adelina lasis por li skombrojn aŭ artiŝokojn por la vespermanĝo. La leganto ĉiam ekscias kaj pritaksas kion Brunetti manĝis vespere, eĉ la kukon, kiun li manĝos kun sia matena kafo: “sciante, ke restas nur unu tia, li informis Bambola, ke li ŝatus ricevi tiun kun pomoj kaj *ricotta*” (2013, 111). En la islandaj verkoj, manĝaĵoj ludas tute alian rolon. Þóra liveras al la infanoj neallogan vespermanĝon el “mikroonda *lasagna*, kiun Þóra akiris ĉe la vendejo, kaj panpoŝoj, kiujn ŝi ekkaptis pensante, ke temas pri ajla pano” (2007, 166) kaj kiam ŝi invitas sian germanan amanton al vespermanĝo, ŝi prezentas “pizojn, terpomajn flokojn, rizon, kuskuson, supon, konfitaĵon, kaj tradiciajn islandajn platkukojn... ‘Mi forgesis pri la ĉefa plado,’ ŝi diris rezignacie” (254). Erlendur (de Arnaldur) manĝas tradiciajn islandajn manĝaĵojn kiel ekzemple ŝafokapo, la spiritaĵo *brennivín* kaj putra ŝarkaĵo, la tielnomata *thorramattar* festata en la vintrofina festivalo þorrablót (Wilson 2000).

La leganto sentas tiujn kontrastojn kiel reprezentajn pri la kontrastaj emociaj situacioj de la protagonistoj de tiuj ĉi verkoj. Camilleri kaj Leon uzas la fikcian spacon por trafa kaj

senespera kritikado de la itala ŝtato kaj engaĝas la problemojn de enmigrado, korupto, kaj gepatrumo. Sed la fundamenta maltrankvilo, kiu karakterizas la nordiajn tekstojn, forestas: la apartamento de Brunetti estas hejmo de du infanoj, kiuj estas bone traktataj de la gepatroj kaj optimismaj pri sia rolo en la mondo, kaj, kiel ni ekscias tra la serio, Brunetti mem estas forte kaj pozitive enradikiĝinta en la familiaj tradicioj de sia venecia patro kaj de sia patrino, kies familio devenas de la kamparo. Italio mem estas kompleta katastrofo en la rakontoj de Leon, sed la leganto envias al Brunetti lian moralan kompason, lian pendoladon tra la urbo, kaj lian dolĉan familion. Montalbano ja estas plia turmentata policano; sed ironio, la forta deziro justigi maljustaĵojn, kaj sindediĉo al la beleco de la propra medio kaj la ĉiutagaj fizikaj plezuroj de la vivo formas drastan kontraston kun la konfuzo de Þóra kaj la malespero de Erlendur.

La leganto-turisto havas grandan elekton de lokoj, kien vojaĝi. En la nuna jardeko, Islando fariĝis unu el tiuj lokoj kie alloga fikcia realo altiras legantojn, kiuj, dum ili alte taksas la belecon kaj senzorgecon de tiu Italio kiu fariĝas pli kaj pli nekomprenebla eĉ al la propraj civitanoj, rekonas la proprajn malkvietojn en la luktoj de Nordia Nigro.

Cititaj verkoj

- Arnaldur Indriðason (2005) *Jar City* (New York: Picador [2000]).
- Arnaldur Indriðason (2007) *Voices* (New York: Picador [2002]).
- Arnaldur Indriðason (2010) *Arctic Chill* (New York NY: Picador [2005]).
- Bates, Quentin (2011) *Frozen Assets* (London: Soho Crime).
- Camilleri, Andrea (2013) *The Dance of the Seagull* (New York: Penguin).
- Forshaw, Barry (2012) *Death in a Cold Climate* (London: Palgrave).
- Leon, Donna (2013) *The Golden Egg* (New York: Atlantic Monthly Press).
- Nestingen, Andrew kaj Paula Arvas (2011) *Scandinavian Crime Fiction* (Cardiff: University of Wales Press).
- Scaggs, John (2005) *Crime Fiction* (New York: Routledge).
- Sepeda, Toni (2008) *Brunetti's Venice: Walks through the City of Venice with the City's Best-loved Detective* (New York: Grove).
- Viktor Arnar Ingólfsson (2012) *House of Evidence* (Amazoncrossing [1998]).
- Viktor Arnar Ingólfsson (2012) *The Flatey Enigma* (Amazoncrossing [2002]).
- Wilson, Jason (2000) "Dining out in Iceland." *The North American Review* 285, 1, 4-13.
- Yrsa Sigurðardóttir (2007) *Last Rituals* (New York: Harper [2005]).
- Yrsa Sigurðardóttir (2012) *Ashes to Dust* (New York: Picador [2007]).

Ĉu lingvoj evoluas simile al biologiaj specioj?



Jouko Lindstedt

Jouko Lindstedt (nask. 1955) estas profesoro pri slava filologio en la Universitato de Helsinko ekde la jaro 1986 kaj membro de Akademio de Esperanto ekde 1998. Esploris precipe la lingvojn bulgaran, makedonan kaj slavonan. Verkis ankaŭ pri la deveno, disvolviĝo kaj denaskiĝo de Esperanto.

Resumo

La biologia kaj lingvistika konceptoj de *evoluo* multe influis unu la alian jam ekde Darvino, por kies revolucia teorio unu el la inspiroj estis la geneologia esplorado de lingvoj. Dum la 20a jarcento lingvistiko kaj biologio sekvis tamen malsamajn vojojn, precipe post la eltrovo, ke primitivaj lingvoj ne ekzistas kaj ĉiuj lingvoj estas baze egale kompleksaj. Laŭ la plej multaj lingvistoj, ĉiuj homaj lingvoj ja senĉese ŝanĝiĝas, sed ili ne evoluas en la biologia senco, ĉar ili ne disvolviĝas pro ia selekta procezo.

Lastatempe estas tamen observebla denova proksimiĝo inter lingvistiko kaj biologio. Unue aperis provoj apliki biologiajn evolumodelojn al la analizo de homaj kulturoj; oni proponis la malfacile difineblan nocion de *memeo* kiel kulturalan analogajon de la biologiaj genoj. En lingvistiko oni povas nun demandi, ĉu la evolubiologiaj nocioj de *genetika drivo* kaj *selektado* estas aplikeblaj al la ŝanĝiĝo de la lingvoj. Ĉu disdialektiĝo de lingvo similas al la ekesto de novaj specioj? Ĉu iuj ŝanĝiĝoj en lingvo estas adaptiĝoj al ties medio? Kial *drivo* signifas en biologio hazardan procezon, dum en lingvistiko ĝi estas procezo kun difinita direkto?

Tri alternativaj konkludoj eblas: (1) la ŝanĝiĝo de la homa lingvo sekvas aliajn leĝojn ol la biologia evoluo; (2) ili sekvas ĝenerale la samajn leĝojn, sed la reformulado de lingvistikaj esplorrezultoj per biologiaj terminoj estas bagatelo kaj ne kunportas novajn ideojn; (3) la apliko de la moderna evoluteorio al lingvoŝanĝiĝo helpas nin pli bone kompreni la esencon de la homa lingvo, kaj eventuale tiun de la kultura evoluo ĝenerale.

Do languages evolve in a similar way to biological species?

Summary

The biological and linguistic concepts of evolution have greatly influenced each other since the time of Darwin; one of the inspirations for his revolutionary theory was genealogical research into languages. However, in the 20th century linguistics and biology followed different paths, particularly after the discovery that primitive languages do not exist and all languages are basically of equal complexity. According to most linguists, all human languages are constantly changing, but they do not evolve in the biological sense, because they do

not develop through any process of selection. Recently, however, linguistics and biology have been seen to be drawing closer again. First there appeared attempts to apply biological models of evolution to the analysis of human cultures; the difficult-to-define notion of a meme was proposed as a cultural analogue of biological genes. In linguistics one can now ask if the notions of genetic drift and selection in evolutionary biology are applicable to change in languages. Is the splitting of a language into multiple dialects similar to the appearance of new species? Are some changes in language adaptations to the environment? Why in biology does drift mean a random process, while in linguistics it is a process with a particular direction?

There are three possible conclusions: (1) change in human language follows different laws from those of biological evolution; (2) in general they follow the same laws, but reformulating linguistics research results in biological terms is trivial and contributes no new ideas; (3) the application of modern evolutionary theory to language change helps us to understand better the essence of human language, and perhaps of cultural evolution in general.

Les langues évoluent-elles de la même façon que les espèces biologiques?

Résumé

Les concepts biologique et linguistique d'*évolution* ont eu beaucoup d'influence l'un sur l'autre depuis Darwin, dont la théorie révolutionnaire s'inspirait entre autres de l'étude généalogique des langues. Au cours du 20^e siècle, linguistique et biologie ont cependant suivi des voies différentes, surtout après la découverte du fait que les langues primitives n'existent pas et que toutes les langues sont également complexes à la base. Selon la plupart des linguistes, toutes les langues humaines subissent effectivement des changements incessants, mais elles n'évoluent pas au sens biologique du terme, car elles ne se développent pas par suite d'un quelconque processus de sélection.

Ces derniers temps, on peut pourtant observer un nouveau rapprochement entre linguistique et biologie. Sont d'abord apparues des tentatives d'appliquer des modèles de l'évolution biologique à l'analyse des cultures humaines; on a proposé la notion difficilement définissable de *mème* comme pendant culturel des gènes biologiques. En linguistique on peut maintenant se demander si les notions, qui appartiennent au domaine de l'évolution biologique, de *dérive génétique* et de *sélection* sont applicables au changement des langues. La dialectisation d'une langue peut-elle être assimilée à l'apparition de nouvelles espèces? Certains changements dans une langue sont-ils des adaptations à son environnement? Pourquoi *dérive* signifie-t-il en biologie processus aléatoire, alors qu'en linguistique il s'agit d'un processus orienté dans une certaine direction?

Trois conclusions alternatives sont possibles: (1) les changements de la langue humaine suivent d'autres lois que l'évolution biologique; (2) ils suivent généralement les mêmes lois, mais la reformulation des résultats d'études linguistiques au moyen de termes biologiques est sans grande importance et n'apporte pas de nouvelles idées; (3) l'application de la théorie moderne de l'évolution au changement des langues nous aide à mieux comprendre l'essence de la langue humaine, et éventuellement celle de l'évolution culturelle en général.

Þróast tungumál á líkan hátt og tegundir lífkerfa?

Útdráttur

Líffræðileg og málvísindaleg hugtök þróunar hafa haft mikil áhrif hvert á annað allt frá tíma Darwins, en meðal annars var rannsókn á skyldleika tungumála innblástur að byltingarkenndri kenningu hans. Á 20. öld fóru málvísindi og líffræði samt ólíkar leiðir, einkum eftir þá uppgötvun að frumstæð tungumál eru ekki til og öll tungumál eru að grunni til jafn margbrotin. Samkvæmt flestum málvísindamönnum eru öll tungumál manna í stöðugri breytingu, en þau þróast ekki í líffræðilegri merkingu, af því að þau þroskast ekki við neins konar úrval. Upp á síðkastið er samt greinanleg ný nálgun milli málvísinda og líffræði. Fyrst birtust prófanir á að beita líffræðilegum þróunarlíkönnum til greiningar á menningu fólks; lagt hefur verið til torskilgreinanlega hugtakið minnisvísir sem menningarleg hliðstæða við líffræðilega erfðavísa. Í málvísindum er núna hægt að spyrja, hvort heitin *erfðafræðilegur breytileiki* og úrval í þróunarlíffræði séu nothæf um breytingar á tungumálum. Líkist greining tungumáls í mállýskur tilurð nýrra tegunda? Verða einhverjar breytingar á tungumáli við aðlögun að umhverfi þess? Hvers vegna merkir *breytileiki* í líffræði tilviljunarkennt ferli, en í málvísindum er hann ferli með ákveðna stefnu?

Þrenns konar ályktanir eru hugsanlegar: (1) breyting á mannlegu tungumáli fylgir öðrum lögmálum en líffræðileg þróun; (2) þær fylgja almennt sömu lögmálum, en umorðun á niðurstöðum málvísindalegra rannsókna með íðorðum úr líffræði er smáatriði og ber ekki með sér nýjar hugmyndir; (3) beiting nútímalegrar þróunarkenningar á breytingu tungumáls er hjálpleg til að öðlast betri skilning á eðli mannlegs tungumáls, og hugsanlega á eðli menningarþróunar almennt.

Ĉu lingvoj evoluas simile al biologiaj specioj?

1. Lingvistoj kaj evolubiologoj – kune kaj dise

La geneologiaj rilatoj inter lingvoj kaj la geneologiaj rilatoj inter biologiaj specioj estas ofte prezentataj sammaniere – per geneologiaj arboj montrantaj, kiel la lingvoj aŭ specioj pli similaj inter si devenas de la sama, relative ĵusa praformo, dum tiuj pli malsimilaj inter si havas sian komunan praulon pli fore en la pasinteco. Nur la tempa dimensio estas tute malsama: en la biologio oni povas konjekti pri la komuna praulo de ĉiuj vivuloj, vivinta antaŭ miliardoj da jaroj, sed en la lingvistiko la rekonstruitaj pralingvoj, ekzemple la hind-eŭropa, aĝas malpli ol dek mil jarojn. Pri pli malproksima parenceco inter la lingvoj de la mondo nenio estas direbla sur scienca bazo, ĉar la konstanta ŝanĝiĝo de la lingvoj forviŝis ĉiujn postsignojn de pli malnovaj komunaj pralingvoj.

Male ol oni povus supozi, la lingvistoj tamen ne prunteprenis siajn geneologiajn arbojn de la biologoj, sed la historiaj lingvistoj kaj la evolubiologoj disvolvis siajn modelojn samtempe, influante sin reciproke, kaj iurilate la lingvistoj eĉ faris la unuajn paŝojn. La unua ĉefverko de Darvino, *La origino de specioj*, aperis en 1859, sed la ideo pri la parenceco de la hind-eŭropaj lingvoj estis prezentita jam en 1786 de William Jones, kaj la parenceco inter la lingvoj finnugraj estis eltrovita eĉ pli frue. Efektive, multaj lokoj en *La origino de specioj* montras, ke Darvino tre bone sciis, ke lingvoj povas iom post iom disdialektiĝi kaj dialektoj povas iom post iom fariĝi apartaj lingvoj, kaj tio estis unu el la inspiroj por lia propra revolucia teorio pri la biologia evoluo kaj pri la ekesto de novaj specioj.

La unuajn geneologiajn arbojn de lingvoj desegnis August Schleicher en la jaro 1853, do antaŭ la apero de la darvina ĉefverko. Krom Schleicher, la teorion de la natura selektado aplikis al lingvoj aliaj famaj lingvistoj de la 19a kaj la komenco de la 20a jarcento, ekzemple Max Müller kaj Hermann Paul – kaj same Otto Jespersen, kiun ni konas ankaŭ kiel planlingviston, kaj kiu opiniis, ke lingva strukturo simila al la angla, uzata ankaŭ en lia planlingvo Novialo, estas la supera rezulto de tia selektado.

La genio de Darvino montras, ke li kapablis kompetente prijuĝi ankaŭ lingvosciencajn teoriojn de sia tempo. Li konsente citis la konstaton de Max Müller, laŭ kiu en lingvoj konkuras diversaj vortoj kaj gramatikaj formoj kaj venkas la “pli bonaj, pli mallongaj, pli facilaj”; sed Darvino mem aldonis, ke oni devas al tiuj kaŭzoj tamen aldoni “la nurajn novecon kaj modon; ĉar en la menso de la homo ekzistas forta amo al etaj ŝanĝoj en ĉiuj aferoj”. Li do havis ideon pri socilingvistikaj faktoroj jam dum la lingvistoj ankoraŭ volis plene paraleligi la lingvan kaj biologian evoluojn.

Ĉar la homo ŝajnis esti la kulmino de la biologia evoluo, oni serĉis ankaŭ la plej perfektajn lingvojn, kaj ne surprize trovis ilin en Eŭropo kaj Proksim-Oriento. La hind-eŭropaj kaj ŝemidaj lingvoj kun interna fleksio, ekzemple kiel en la angla *begin – began – begun* ‘komencas – komencis – komencita’, estis rigardataj kiel la plej evoluintaj. Oni ankaŭ emis pensi, ke la plej evoluintaj lingvoj estas produktoj de la kulturoj plej evoluintaj kaj superaj.

Dum la 20a jarcento la ligo inter la biologia evoluteorio kaj la lingvistiko tamen rapide malfortiĝis kaj pli-malpli komplete malaperis. Oni komencis pli serioze esplori lingvojn ekstereŭropajn kaj rimarkis, ke la kulturoj konsiderataj primitivaj ne produktas simplajn lingvojn, sed tute male, la komplikiteco de la gramatika strukturo de multaj ekstereŭropaj lingvoj, kaj la nombro de la nuancoj esprimeblaj gramatike en ili, klare superas tiujn de la lingvoj hind-eŭropaj. Krome, en la lingvistiko ekregis la strukturismo, formita de tiaj grandaj lingvistoj kiel la sviso Ferdinand de Saussure, la polo Jan Baudouin de Courtenay kaj la

membroj de la Praga Skolo, same de la usonaj lingvistoj kiel ekzemple Edward Sapir kaj Leonard Bloomfield. La strukturismo turnis la sciencan atenton dum la 20a jarcento for de la historio de la lingvoj al la unika strukturo de ĉiu lingvo.

En posttempa perspektivo, la teoria konflikto inter la biologia evoluteorio kaj la lingvistiko estis nur ŝajna. Jam Darvino sciis, ke la tiel nomataj primitivaj popoloj parolas lingvojn malsimplajn kaj disvolvitajn. En sia dua ĉefverko, *La deveno de la homo* (1871), li skribis pri “la perfekte regula kaj mirinde komplikita konstruo de la lingvoj de multaj barbaraj nacioj”, kaj eĉ klarigis tute ĝuste, ke ĉar la gramatikaj morfemoj naskiĝas ĉie pere de similaj procezoj, tiuj procezoj jam havis sufiĉan tempon por efiki en ĉiuj homaj lingvoj. Krome, estas miskompreno, ke la evoluteorio estas teorio pri iom-post-ioma perfektigo, ĉu de specioj, ĉu de lingvoj. Ni rajtas rigardi la homon kiel la kulminon de la evoluo, ĉar kiel homoj ni ja rajtas mezuri kaj prijuĝi la aferojn el vidpunkto homa; sed la evoluteorio priskribas nur la adaptigon de ĉiu vivulo al ties medio. Se la cirkonstancoj sur la Tero ŝanĝiĝos tiel, ke la blato transvivos sed la homo kaj aliaj mamuloj ne, la blato ekde tiam estos la pli adaptita vivulo kaj tiusence la “kulmino” de la evoluo.

2. La evoluteorio revenas al la lingvistiko

Fine de la pasinta kaj komence de la nuna jarcento, la biologia evoluteorio komencis tamen denove influi la lingvosciencan. Post kiam estis eltrovitaj la portantoj de la biologia heredeco, la genoj, la teorio de Darvino ricevis pli precizan formon, kiun popularigis pluraj biologoj kaj filozofoj verkantaj por la ĝenerala publiko. La plej konata el ili estas Richard Dawkins, kies verko *La egoisma geno* (1976) faris la modernan evoluteorion vaste konata kaj diskutata. La kontraŭatako de la usonaj religiaj kreismanoj devigis Dawkins kaj aliajn biologojn trovi ĉiam pli klarajn kaj konvinkajn argumentojn por sia darvinismo. Montriĝis, ke la biologoj scias klarigi la ŝanĝigon de la vivuloj per multe pli preciza kaj eleganta modelo ol la modeloj, per kiuj la lingvistoj provas klarigi la ŝanĝigon de la lingvoj, kaj tio ne povis ne altiri la atenton de la lingvistoj.

La moderna evoluteorio estas teorio pri la varianta sukceso de la genoj reproduktiĝi – kopiiĝi de unu generacio al la sekva. Dawkins konjektis, ke tiaj memkopiantoj povas ekzisti ankaŭ ekster la biologio, kaj li lanĉis la nocion de *memeo*, memkopianta kulturero. Por li tiu nocio estis ĉefe mensa eksperimento, sed pluraj kultursciencistoj poste klopodis por priskribi la homan kulturon kiel aron de memoj, kiuj sin kopias de unu homa menso al alia sammaniere kiel virusoj de gripo disvastiĝas de unu homo al alia.

En si mem la ideo, ke la kultura evoluo, aŭ la evoluo de la simboloj, iusence daŭrigas la biologian evoluon, per aliaj rimedoj kaj pli rapide, estas neniel nova aŭ revolucia. Pluraj antropologoj kaj historiistoj prenis tion kiel la deiran punkton de sia pensado – lastatempe ekzemple William Hardy McNeill kaj John Robert McNeill en sia bonega mondhistoria superrigardo *La homa reto* (2003). Sed montriĝis esti malfacile decidi, kiaj kultureroj estas difineblaj kiel memoj, kiel atomoj de la tradicio. Ĉu tiaj estas ekzemple moroj, rakontoj, ŝercoj, melodioj, dioj, manĝoreceptoj, aŭ eble nur iliaj konsistigaj partoj? Sekve la terminon “memeo” oni jam uzas pli kaj pli malofte, krom en la tre malvastigita senco de “multe kopiata ŝerco en Interreto”. Montriĝis ankaŭ esti malfacile priskribi la selektadon de la memoj, do ties memkopian sukceson, alimaniere ol per tiu sukceso mem, do per cirkla rezonado: la sukcesaj memoj disvastiĝas ĉar ili estas sukcesaj. Tamen, en la homa lingvo oni jam tradicie distingas multe pli da apartaj unuoj ol en aliaj partoj de la homa kulturo – ekzemple sonojn, vortojn, finaĵojn, frazrolojn kaj aliajn – kaj tial estas strange, ke provoj apliki la evoluteorion revenis al la lingvoscienco pli malrapide ol al la kultura antropologio.

Verdire, la vortkombinon “la evoluo de la lingvo” oni povas vidi ĉiam pli ofte, sed indas atenti: ĝi povas signifi almenaŭ tri malsamajn aferojn. Unue, ĝi povas signifi la ekeston de la lingvo en nia fora pasinteco, eble antaŭ cent mil jaroj: temas pri biologia evoluo, kiu ebligis la ekeston de la homa lingvo. Due, ĝi povas signifi simple “la ŝanĝiĝon de la lingvo”. La vorto “evoluo” estas tiam uzata kiel sinonimo de “poioma ŝanĝiĝo”, sen la supozo, ke la darvina koncepto de selektado aplikeblas al ĝi. Sed trie, ĝi povas signifi ankaŭ “tian ŝanĝiĝon de lingvo, al kiu la darvina teorio estas aplikebla”. Iajn evoluteoriajn nociojn aplikis al lingvoŝanĝiĝo ekzemple Roger Lass, Rudi Keller, Östen Dahl kaj R. M. W. Dixon. Tutajn darvinecajn teoriojn pri lingvoŝanĝiĝo konstruis dum la unuaj jaroj de la nuna jarcento William Croft, Nikolaus Ritt kaj Salikoko Mufwene. Ritt eĉ nomis sian libron, inspirite de Dawkins, *La egoisma sono kaj la lingva evoluo* – do por li, almenaŭ la sonoj de la lingvo estas memeoj.

Estas interese, ke devas tamen ekzisti ligo inter la unua kaj tria signifoj de “la evoluo de la lingvo”. La cerbo kaj la nerva-muskola sistemo de la homo ja devis certamaniere evolui, antaŭ ol la homa lingvo povis ekesti. Sed ankaŭ la homa lingvo mem devis evolui certamaniere por adaptiĝi al sia biologia bazo. Se en la frua lingvo ekzistis trajtoj, kiuj estis malfacile lerneblaj por la sekvaj generacioj de parolantoj, precipe etaj infanoj, ili nature malaperis. Tion oni povas konsideri simila al darvina selektado: transvivis nur tiaj lingvaj trajtoj, kiuj sukcesis kopiiĝi al ĉiam novaj generacioj – same kiel transvivis nur tiaj virusoj, kiuj sukcesas infekti ĉiam novajn homojn. Sed tiun ekzamenon ĉiuj homaj lingvoj trapasis certe antaŭ tre longa tempo. Ĉu en la nuntempa lingvoŝanĝiĝo, okazanta antaŭ niaj okuloj, troviĝas trajtoj similaj al tiuj de biologia evoluo?

3. Variado, selektado, heredeco – kaj drivo

La ŝlosilaj nocioj de la biologia evoluteorio estas *variado*, *selektado* kaj *heredeco*. La variado signifas, ke en ĉiu populacio de samspeciaj vivuloj (ekzemple bestoj, plantoj, fungoj, bakterioj) la individuoj estas malsimilaj inter si – ĉu pro diversaj rekombinoj de genvariantoj dum reproduktiĝo, ĉu pro mutacioj, kiujn kaŭzis kopi-eraroj dum reproduktiĝo. La selektado signifas, ke malsimilaj individuoj havas malsamajn ŝancojn transvivi kaj, antaŭ ĉio, reproduktiĝi, do transdoni siajn genojn al la sekva generacio. Darvino kompreneble jam konis la *bredan* selektadon, per kiu la homo konscie kreis ekzemple la rasojn de la dombestoj aŭ la kultivformojn de plantoj; sed li komprenis, ke la vivmedio de vivulo povas same efiki, kaj tion li nomis *natura* selektado. Sed li eltrovis ankaŭ trian specon de selektado, la *seksan* selektadon: virpavo havas grandan voston ne pro tio, ke ĝi faciligas transvicon en la medio, sed danke al tio, ke la pavinoj preferas virpavojn grandvostajn. Temas do pri pure reproduktiĝa ŝanco, ne pri transviva ŝanco.

Fine, gravas heredeco: trajto favorata de la selektado devas herediĝi al la sekva generacio, alie ĝi ne plimultiĝas en la populacio. Sed por ke okazu evoluo, la heredeco devas esti erarhava – en ĝusta proporcio! Se ĉiuj trajtoj kopiiĝas de unu generacio al la sekva ĉiam senerare, ne aperus novaj variantoj de genoj, ne ekzistus variado, kaj la selektado ne havus ion, el kio selekti. Sed se eraroj okazus tro ofte, eĉ trajto favorata de la selektado estus tuj forviŝita pro ĉiam novaj kopi-eraroj, kaj la evoluo tuj abortus. Tiusence ankaŭ ni homoj ekzistas nur danke al ĝusta kvanto de kopi-eraroj.

Laŭ la nova PIV, natura selektado estas “procezo, kiu tendencas rezultigi, ke transvivis la vivuloj plej adaptiĝemaj al la kondiĉoj, sub kiuj ili vivas, dum malplej adaptiĝemaj formoj malaperas; laŭ Darvino la plej grava faktoro por la evoluo de la specioj”. Kvankam ne malĝusta, ĉi tiu difino estas iom kritikinda. Unue, gravas ne nur transvivado, sed ankaŭ sukcesa reproduktiĝo. Se individuo vivas senprobleme cent jarojn, sed neniam ricevas idojn,

ne okazas evoluo. Due, gravas ne ia abstrakta “adaptiĝemo” atribuebla al la organismoj – tendenco al mutacioj estas plej ofte malutila – sed la “adaptiteco” jam okazinta. Ekzemple, neniu besto iam celis evoluigi por si okulon, tamen la okulo aperis plurfoje dum la ekzisto de la besta regno. Iuj mutacioj, kiuj tute hazarde faris ĉelojn iom reagemaj al lumo, montriĝis utilaj kaj estis selektitaj por reproduktiĝo kaj plua evoluo. La evoluo en si mem ne havas celon, sed ĝi tamen produktas organojn kaj organismojn, kiuj estas adaptitaj al difinitaj vivmedioj.

La moderna evoluteorio inkluzivas krome la nocion de *drivo*, kiu signifas hazardan ŝanĝiĝon de la ofteco de la genvariantoj, sen natura selektado. Ĝi koncernas ĉefe malgrandajn populaciojn. Ekzemple, ni povas supozi ke en iu homa populacio la proporcio de la homoj bluokulaj kaj brunokulaj restas pli-malpli konstanta, ĉar nek la natura nek la seksa selektadoj ŝajnas favori unu okulokoloron super la alia. Sed se granda parto de la populacio mortas ekzemple pro iu katastrofo, hazarde povas okazi, ke transvivas ĉefe bluokululoj, kaj kiam la populacio denove kreskas, ilia relative nombro fariĝis konstante pli alta. Tiam rezulton de drivo oni nomas *botelkola efiko*. Aŭ se parto de la anoj de la origina populacio migras en alian lokon, kaj pro hazardo tiu grupo konsistas ĉefe el bluokululoj, la nova populacio en la nova loĝloko havas bluokulan majoritaton. Tion oni nomas *fondinto-efiko*.

Nu, kio el ĉio ĉi aplikeblas al la ŝanĝiĝo de la lingvoj? La *variado* ŝajnas unuavide la plej simpla parto de la modelo. Ankaŭ en la lingvo regas variado: du homoj neniam parolas ekzakte sammaniere, kaj la riĉa sortimento de lokaj kaj sociaj dialektoj kaj aliaj varioj en ĉiu vivanta lingvo ŝajnas doni konstantan materialon por selektado, tute kiel en biologio. Tamen, la lingva variado ne estas tiel blinde produktita kiel la biologa. Kiam iuj esperantistoj komencis uzi la vorton *evoluo* anstataŭ *evolucio*, aŭ *rezulto* anstataŭ la Fundamenta *rezultato*, la ekesto de tiuj konkurantaj formoj ne estis tute hazarda mutacio: ni rekonas en ĝi tendencon al formoj pli mallongaj. Tia tendenco ne bezonas esti aŭtomata kaj senescepta – ni ne scias, ĉu *spontanea* estos tute forpuŝita de *spontana* aŭ eĉ de *sponta* – sed ni ne povas supozi, ke la apero de, ni diru, **naciono* por konkuri kun *nacio* estus egale verŝajna kiel la ĉi-supraj ekzemploj. La ŝanĝiĝo de la lingvo ŝajnas do almenaŭ kelkfoje havi direkton jam kiam ĝi ekaperas kiel variado, antaŭ la selektado.

Kiel do funkcias la *selektado* en lingvoj? La *bredan* selektadon estas facile indiki: pri ĝi okupiĝas la vortaristoj kaj la lingvaj akademioj, aŭ la instruistoj de la gepatra lingvo en la lernejoj. Tamen, pli gravas ia *natura* selektado, sed estas malfacile difini, kiel fine mezuriĝas la adaptiĝo de iu lingvero al ties vivmedio. Ekzemple, se vortoj kaj formoj mallongiĝas, tio faciligas ilian uzon por la parolanto, sed malfaciligas ilian komprenadon fare de la aŭskultanto. La tiel nomataj *selektopremoj* povas do esti kontraŭdiraj (kio ne estas nekonata afero ankaŭ en biologio). Sed ofte iu lingvero disvastiĝas nur danke al tio, ke ĝi pro iu aŭ alia kaŭzo ricevis socian prestiĝon. Kelkfoje povas temi pri la bezono de ĉiam novaj kaj freŝaj esprimoj, kiel jam Darvino sugestis. Aliffoje povas temi pri la asociiĝo de iu lingvero kun prestiĝa socia klaso aŭ kun la lingvaĵo de la ĉefurbo. Se tio estas selektado, la plej proksima analogo en la sistemo de Darvino estus la *seksa* selektado: iu lingvero eble ne estas pli utila en la vivo ol la vosto de la virpavo, sed ni preferas ĝin ĉar ni lernis preferi ĝin.

Fine, la analogo de la *heredeco* estas evidente la transdono de la lingvo al novaj generacioj. Tamen, la homan lingvon koncernas ne nur *vertikala transdono*, de la gepatroj al la idoj, sed ankaŭ *horizontala transdono*, de iu ajn parolanto al alia, eventuale plenkreska. En Esperanto la horizontala transdono estas kompreneble tre grava, sed ankaŭ en niaj naciaj lingvoj ni ĉiuj posedas multegajn trajtojn, precipe vortojn, kiujn ni transprenis de aliaj parolantoj ol niaj gepatroj. Tiusence la lingvo similas al mikrobo, ĉar ankaŭ la virusoj kaj bakterioj scias interŝanĝi siajn genojn horizontale. Feliĉe la lingvo estas utila mikrobo, kiu vivas en simbiozo

kun la homo: la homo uzas la lingvon multmaniere por sia avantaĝo, kaj la lingvo sukcesas infekti pliajn homojn kaj reproduktiĝi. Se vi permesas al mi iom da malseriozo, jen ni ankaŭ solvis la demandon pri la celo de Esperanto: ĝi estas infekti kaj transvivi.

Sed ĉu en la homa lingvo okazas tiu hazarda ŝanĝiĝo, kiun la biologoj nomas genetica *drivo*, kiel klarigite ĉi-supre? Surprize ni trovas, ke en la lingvistiko “drivo”, difinita en la jaro 1921 de Edward Sapir, kutime signifas ŝanĝiĝon kun difinita tendenco kaj direkto, ekzemple la iom-post-ioman perdon de fleksioj en la historio de la angla. Kial la biologoj kaj la lingvistoj donis al la sama termino (origine la angla *drift*) tute kontraŭajn signifojn? Mi proponas provizoran klarigon surbaze de la historio de la scienco, kvankam la temo postulus pli da esplorado. Ŝajnas, ke en la 20aj jaroj de la pasinta jarcento, la biologoj esplorantaj la populacian genetikon, do la ŝanĝiĝon de la ofteco de genvariantoj en vivulaj populacioj, distingis inter “stabila drivo” kaj “hazarda drivo”. Ĉar “stabila drivo” egalas al la selektado (aŭ ties rezulto), la termino “drivo” baldaŭ restis por uzo nur pri la “hazarda drivo”. Ĉar la ligoj inter la biologio kaj la lingvistiko estis tiutempe malfortaj, la lingvistoj, kiuj jam ne uzis la nocion de selektado, elektis male kaj komencis uzi “drivo” en la senco de “stabila, tendenca drivo”.

Krome, en la lingvistiko la nocio de “hazarda drivo” verŝajne estas malmulte bezonata. Malgrandaj vivulaj populacioj estas influataj de hazarda drivo, ĉar la individuaj anoj de ili interŝanĝas genojn nur okaze de reproduktiĝo; sed la parolantoj de eĉ tre malgranda lingvo povas ĉiutage interŝanĝi lingverojn dum normala komunikado, kio ebligas variadon, selektadon kaj do ŝanĝiĝon kun direkto. Nur en tre malgrandaj lingvoj, baldaŭ mortontaj, lingveroj povas malaperi simple ĉar neniu plu uzas ilin.

4. Provizora konkludo

Tri alternativaj konkludoj eblas: (1) la ŝanĝiĝo de la homa lingvo sekvas aliajn leĝojn ol la biologia evoluo; (2) ili sekvas ĝenerale la samajn leĝojn, sed la reformulado de lingvistikaj esplorrezultoj per biologiaj terminoj estas bagatelo kaj ne kunportas novajn ideojn; (3) la apliko de la moderna evoluteorio al lingvoŝanĝiĝo helpas nin pli bone kompreni la esencon de la homa lingvo, kaj eventuale tiun de la kultura evoluo ĝenerale.

Al mi ŝajnas, ke ne eblas kategorie elekti inter ĉi tiuj tri konkludoj, ĉar ĉiu el ili enhavas iom da vero. La ekesto de la ŝanĝiĝoj en la lingvo ne estas tiom hazarda, kiel la ekesto de la biologiaj mutacioj, ĉar la homa menso favoras iujn tendencojn pli multe ol aliajn (sed indas rimarkigi, ke ankaŭ en la biologio ne ĉiuj mutacioj estas egale verŝajnaj, ĉar la kemia strukturo de la genoj ŝanĝiĝas en iuj direktoj pli facile ol en aliaj). Iuj esploristoj pri kulturoj uzas la terminon “gvidata variado” por emfazi la ne hazardan karakteron de la homaj ennovaĵoj. La lingvistoj kaj la biologoj tamen trovis ankaŭ similajn fenomenojn en siaj esplorobjektoj, kaj indas atentigi pri tiuj similecoj, same kiel pri la eventualaj terminologiaj diferencoj, kiuj povas kaŝi ilin. Fine, la provo apliki biologiajn metodojn por esplori la ŝanĝiĝadon de la homa lingvo povas inspiri novajn eltrovojn, kvankam ĝi ne revolucias nian koncepton pri la lingvo. Ekzemple, lastatempe plioftiĝis esplorrezultoj indikantaj, ke la socia medio povas funkcii kiel selekta medio por la gramatiko, kaj ke ne pro nura hazardo la lingvoj kun la plej malsimplaj gramatikoj ofte estas malgrandaj idiomoj, kiujn preskaŭ neniu parolas kiel sian duan lingvon.

Por prove apliki ĉi tiujn ideojn al Esperanto, oni povas kompreneble facile rimarki en ĝia strukturo la fondinto-efikon, kiun kaŭzis ununura fondinto. Multegaj trajtoj de Esperanto ankoraŭ ŝuldas sian ekziston al la siatempaj elektoj de Zamenhof, kaj tute ne ĉiuj estas klarigeblaj nur per liaj *konsciaj* decidoj. Precipe en la sintakso de la lingvo oni povas vidi

ankaŭ subkonsciajn influojn. Sed pli interesa demando estas, kiel la medioj, en kiuj Esperanto poste estis uzata, selektis iujn spontaneajn ŝanĝiĝojn en la lingvo, kiuj neniam estis konscie deciditaj de la Akademio aŭ alia simila instanco. Ekzemple, kial *ŝati*, kiu origine signifis ‘alte taksi’, ŝoviĝis al la direkto de *ami*, tiel ke *ami* ricevis pli malvastan signifon ol antaŭe (kaj ankaŭ *plaĉi* verŝajne fariĝis malpli uzata), kio siavice necesigis la kreadon de la neologismo *apreci* ~ *aprezi* por kovri parton de la malnova signifo de *ŝati*? Tiaj frazoj kiel *mi ŝatas glaciaĵon* aŭ *mi ŝatas biciklo* ne estintus eblaj en la frua Esperanto, sed ial-tial aperis bezono de tiaj esprimmanieroj. Ĉu la selektan medion de ĉi tiu signifo-ŝoviĝo konsistigis la internaj evolutendencoj de la parolantaro, aŭ ĉu pli influis kontaktoj de Esperanto kun tiaj lingvoj, kiuj dividas la semantikan terenon alimaniere ol la rusa kaj la franca kun siaj pli vastsignifaj *ami*-verboj? La kriterio de bona teorio estas, ke ĝi kapablu priskribi kaj klarigi ĉi tiajn konkretajn kazojn.

La du sortoj de la romia imperio



Geoffrey Greatrex

Profesoro pri antikvaj studoj en la Universitato de Otavo, kie li instruas jam dum 12 jaroj. Li edukiĝis en la universitato de Oksfordo, ĉe Exeter kolegio, kie li doktoriĝis (pri malfrua romia historio) en 1994. Li poste laboris en pluraj universitatoj, ekz. la Malferma Universitato (Anglio), Kardifo (Kimrio), Dalhousie (Halifakso, Nov-Skotio, Kanado) kaj Otavo. Li multe verkis pri la malfrua romia imperio, aparte pri la regno de la imperiestro Justiniano; en 2008 li prelegis pri la historiisto Prokopio de Cezareo en la IKU kadre de la roterdama UK. Li ricevis stipendion Humboldt por daŭrigi siajn esplorojn en Munkeno en 2006 kaj 2009 kaj estis gastfratulo ĉe Robinson kolegio, Kembriĝo, en 2009.

Resumo

La jena artikolo traktas la kontrastajn sortojn de la orienta kaj okcidenta partoj de la malfrua romia imperio en la kvina jarcento p.K. Ĝi ne proponas eventoplenan rakonton pri barbaraj hordoj, sed anstataŭe konsideras politikajn, strukturajn kaj ekonomiajn problemojn, kiujn devis alfronti la imperio, aparte la okcidenta. Oni ankaŭ diskutas la rolon de la imperiestro kaj la relativan povo-mankon de la okcidentaj regantoj; oni aldone konsideras la armeojn de la du flankoj de la imperio, same kiel la pli defendeblajn limojn de la orienta regno kaj la rolon de la eklezio en la socio. Tiamaniere oni klarigas la supervivon de la oriento kaj la falon de la okcidento.

The two destinies of the Roman Empire

Summary

This article deals with the contrasting destinies of the eastern and western parts of the later Roman Empire in the fifth century A.D. It does not offer a narrative history of barbarian invasions, but rather considers the political, structural and economic problems that the empire had to face, especially the western half. It also discusses the role of the emperor and the relative powerlessness of western emperors; in addition, consideration is given to the armies of the two *partes imperii*, as to the more defensible borders of the eastern empire and the role of the church in society. Thus it seeks to explain the survival of the East and the fall of the West.

Les deux destins de l'empire romain

Résumé

Cet article traite des destins contrastés des deux parties du Bas-Empire romain au Ve siècle après JC. Il ne propose pas une histoire événementielle des invasions barbares, mais s'intéresse plutôt aux problèmes politiques, structurels et économiques auxquels a été confronté l'empire, surtout l'Empire d'Occident. On discute aussi du rôle de l'empereur et de l'impuissance relative des souverains d'Occident; on s'intéresse en outre aux armées des deux *partes imperii*, ainsi qu'aux frontières plus faciles à défendre de l'Empire d'Orient et au rôle de l'Eglise dans la société. L'article vise ainsi à expliquer la survie de l'Empire d'Orient et la chute de l'Empire d'Occident.

Um Síðrómvverska keisaradæmið

Útdráttur

Þessi fyrirlestur fjallar um ólík örlög Austrómverska- og Vestrómverska ríkisins á fimmtu öld eftir Krist. Í honum er ekki boðið upp á ævintýralega sögu um rænandi hirðingja heldur hugað að pólitískum, skipulagslegum og efnahagslegum vandamálum sem heimsveldið stóð frammi fyrir, einkum þó það Vestrómverska. Einnig er fjallað um stöðu keisarans og tiltölulega lítil völd stjórnenda í vesturhlutanum. Þá verður rætt um stöðu herjanna í báðum hlutum heimsveldisins og um styrkari varnarlinur Austrómverska ríkisins og fjallað um hlutverk kirkjunnar í samfélaginu. Þannig verður leitast við að skýra hvers vegna austurhlutinn hélt velli en vesturhlutinn féll.

La du sortoj de la romia imperio

Enkonduko

Ĉi tiu artikolo fontas el esploroj faritaj por anglalingva artikolo aperonta en *The Cambridge Companion to the Age of Attila*, gvidlibro pri la kvina jarcento p.K.¹ Mia kontribuado al tiu libro traktas la imperiajn instancojn kaj tion, kiel ili administris siajn ŝrumpantajn teritoriojn. Ĉi tie mi intencas diskuti tiujn samajn aspektojn, sed en pli larĝa kadro. Mia celo estas proponi kelkajn kialojn por la daŭra vivo de la orienta romia imperio, kiun oni normale nomas ‘bizanca’, kaj por la malapero de la okcidenta. Substrekindas ke mi ne eniros detalojn pri sangaj bataloj inter romianoj kaj ‘barbaroj’ – ne tial, ke la temo min malinteresus, ĉar mi ja iom fakas pri milita historio – sed pro la fakto ke mankas spaco kaj, laŭ la plimulto de la modernaj historiistoj, troviĝas pli profundaj kialoj malantaŭ la falo de la imperio. Cetere, ne mankas lastatempaj ĝeneralaj libroj kiuj proponas eventoplenan historion de ĉi tiu periodo, inter kiuj mi menciuj tiujn de Peter Heather, Adrian Goldsworthy kaj Philippe Richardot. En nia pritrakto de la du sortoj, necesas memori la fakton ke kvankam unu ero de la imperio malaperis dum la jarcento, la alia sukcese ĝin travivis kaj daŭris plu mil jarojn: ne eblas do alskribi la falon nur al internaj faktoroj, ĉar la du eroj ja sufiĉe similis.² Taŭgas komenci per atentokapta citaĵo.

Dum Aetio prezentis la financojn kaj faris kalkulon pri la enspezoj de la mono kolektita, la imperiestro Valentiniano (la tria) subite eksaltis kaj deklaris ke li ne plu toleros insultigi per tiaj fifaroj. (Li diris) ke li (Aetio) volas forpreni la potencon de la okcidento de li, respondecigante lin pro la problemoj (tie), same kiel li faris pri la orienta imperio; li subdiris, ke nur pro li (Aetio) li ne iris (tien) por forpeli (la imperiestron) Markiano de lia trono. Dum Aetio miris pro la neatenditeco de la kolero kaj klopodis delogi lin de lia senracia sinteno, Valentiniano elglavingis sian glavon kaj, kune kun Heraklio, kiu portis fendilon sub sia mantelo (kaj kiu estris la imperian dormoĉambron), atakis lin. La du homoj daŭre frapadis lian kapon kaj mortigis lin, homon kiu multon faris kontraŭ malamikoj internaj kaj eksteraj. (Prisko de Paniono, fragmento 30.1.13-27 = Johano de Antioĥo, frg. 224.2)

Tiel dramoplene mortis en septembro 454 la generalo, kiu jam dum dudek jaroj dominis la okcidentan imperion, kiun la historiisto Prokopio nomas ‘la lastan romianon’, kaj kiu venkis la faman Atilon en Gaŭlio tri jarojn antaŭe. La citaĵo reliefigas plurajn aspektojn de nia temo. Unue, konstateblas kigrade la kortega politiko danĝeris.³ Due, ĝi priskribas kiel la *magister militum* (ĉefo de la soldatoj) kaj *patricius* (patricio) Aetio, la plej grava generalo en la okcidento ekde 433, diskutis pri financaj aferoj ĉe la imperia kortego en Romo kun la imperiestro. Kiel evidentiĝos, Valentiniano la tria (425-455) kaj liaj konsilantoj tre konsciis pri siaj ŝrumpantaj rimedoj kaj pri la urĝa bezono plialtigi enspezojn por defendi la imperion. Estas signifoplene

¹ Maas 2013. Ĉiuj datoj uzitaj rilatas la periodon p.K., do oni ne plu indikos p.K. ekde nun.

² Heather 2005, 2010, Goldsworthy 2009, Richardot 2005. Cameron 2012 (alia bona enkonduka libro), 85, prave atentigas pri la internaj faktoroj, komparu Ward-Perkins 2005, 47-8, 58-62.

³ Komparu Matthews 1975, 302 kaj la sorton (ekz.) de Felikso, la ĉefgeneralo antaŭ Aetio, mortigita probable de tiu lasta (vidu Marotta 1993, 595), aŭ tiun de la prefektoj Tatiano kaj lia filo Proklo (Proclus), mortigitaj en 392 pro la komplotoj de Rufino (Zos. 4.52 kun Liebeschuetz 1990, 89). Pli specife pri la kazo de Aetio oni konsultu Lee 2013, 87-9, Börm 2010, 167 kaj n.28.



Aetio

tial, ke militista komandanto profunde implikiĝis ankaŭ en ĉi tiu kampo. Oni supozas, ke Aetio tiom dominis la imperiajn instancojn, ke Valentiniano ne povis trovi inter siaj ministroj aliajn fidelulojn krom la eŭnuko, kiu lin plej proksimis.⁴ Notindas, ke en la orienta imperio, kiam la imperiestro Leono (457-474) volis sin liberigi de la influo de la influema barbara generalo Asparo, li trovis plurajn kunlaborantojn; la mortigon de la generalo kaj de liaj du filoj ankaŭ aprobis la enloĝantaro de Konstantinopolo.⁵ Trie, rimarkindas la konduto kaj la kolero de la imperiestro mem, kiu ne hezitis propramane mortfrapi sian ĉefan armeestron. La bopatro de Valentiniano, Teodozio la dua (408-450) aliflanke famis pro sia mildeco, kvankam li ne hezitis interveni vigle por kontraŭi uzurpantojn. La relative juna Valentiniano, nun 35-jaraĝa sed jam imperiestro dum preskaŭ tridek jaroj, sendube bone konis la sorton de sia antaŭulo, Valentiniano la dua, kiu en 392 mortis en suspektindaj cirkonstancoj post malsukcesa provo maldungi sian ĉefgeneralon Arbogaston.⁶ Laste, evidentiĝas la malbonaj rilatoj inter la du partoj de la imperio, kiuj nun ambaŭ posedas siajn proprajn korteganojn: Valentiniano, kiel la pli aĝa reganta imperiestro, devintus konsultiĝi pri la heredo de la orienta trono post la subita morto de Teodozio la dua en julio 450, sed la orienta kortego kontraŭkutime kaj senkonsulte surtronigis Markianon.⁷

⁴ Twyman 1970, 483-4, Stickler 2002, 70-5, 294-5, Heather 2005, 371-3. Vidu ankaŭ Barnish kaj aliajn 2000, 199-200, kiuj emfazas la neeviteblan enmiksadon de generaloj en financajn aferojn.

⁵ Cameron 2012, 37. Kitchen 2008, 163, rimarkigas kiel la ambicioj de Aspar similis tiujn de Aetio : ambaŭ deziris surtronigi sian filon. Vidu sube n.87 pri Leono.

⁶ Sokr. HE 7.22, komparu Joh. Ant. frg.219 pri la moroj de Teodozio, konsultu ankaŭ Diefenbach 1996, 58-9; Prisko, frg.16 (= Joh. Ant. frg.223) pri lia ĵaluzo rilate uzurpantojn. Matthews 1975, 238-9, pri la morto de Valentiniano la dua, ankaŭ Eŭnapio, frg.58.2. Halsall 2007, 477-8, proponas ke la pli rapida koleriĝo de imperiestroj en la malfrua imperio spegulas ian (konscian) barbariĝon de ilia konduto, kio ŝajnas dubinda.

⁷ Burgess 1993/4, 49, vidu ankaŭ De Ste Croix 2006, 272, Brodka 2012, 160.

Je la komenco de la kvina jarcento la romia imperio daŭre etendiĝis de Britio ĝis Eŭfrato. Ĝin regis du fratoj, Honorio (395-423) en la okcidento, kaj Arkadio (395-408) en la oriento, la du junaj filoj de la imperiestro Teodozio la unua (379-395), kiuj surtroniĝis post lia morto. Tia divido de la imperio ne estis senprecedenca: jam en la dua jarcento Marko Aŭrelio kunregis dum kelkaj jaroj kun Lukio Vero, Diokleciano (284-35) eĉ kreis sistemon laŭ kiu kunregis du aŭgustoj (ĉefimperiestroj) kaj du cezaroj (subaj imperiestroj), kaj en 337 tri filoj de Konstanteno la unua dividis inter si la imperion. Tamen en 395 la divido fariĝis definitiva, kvankam neniu povintus tion antaŭvidi.⁸ Iom post iom ĝi enradikiĝis. Ekde la komenco la kreskantaj eksteraj premoj sur la imperio, ĉefe la potenca armeo de la gota ĉefo Alariko en la Balkanoj, akriĝis rivalecojn inter la du kortegoj. La ĉefa ministro en la okcidento, la kompetenta duonvandala generalo Stiliĥo, volis interveni en la oriento, sed la ĉefaj korteganoj en la oriento, unue Rufino, poste la eŭnuko Eŭtropio, rifuzis kunlabori kaj eĉ konkludis traktatojn kun Alariko por kontraŭi la ambiciojn de sia rivalo.⁹ Kvankam, kiel Valentiniano en 450, Honorio volis persone interveni en la oriento post la morto de sia frato en 408, oni neniam denove rekunigis la du erojn de la imperio, kio do progresive konkretigis diferencojn inter ili. Malhelpis la fakto, ke abundis politikaj problemoj en la okcidento tuj post la divido; ne eblas eniri la detalojn ĉi tie, sed oni notu (ekzemple) la invadon de Italio de Alariko, kiu kaptis kaj disrabis la urbon Romo en 410; la transiron de Rejno fine de 406 de pluraj barbaraj popoloj, kiuj instaliĝis, kelkfoje kun imperia permeso, plurfoje sen permeso, en Gaŭlio kaj Hispanio; kaj la alvenon al norda Afriko, la grenejo de la okcidenta imperio, de la Vandaloj inter 427 kaj 429.¹⁰



Arkadio

⁸ Tiel prave Millar 2006, 3-5.

⁹ Heather 1991, 199-208, Mitchell 2007, 91-6, Cameron 2012, 25.

¹⁰ Martin 2001, 38-44, Heather 2005, ĉap.5-6, Halsall 2007, ĉap.7-8, Goldsworthy 2009, ĉap.15-17, Sarris 2011a, 33-40.

Malgraŭ la dumtempaj kvereloj inter la du imperieroj, en la unua duono de la kvina jarcento Teodozio la dua klopodis konstante stabiligi la situacion en la okcidento, ekz. per surtrono de la juna Valentiniano en 425, per la edzinigo de sia filino Eŭdoksio al sia okcidenta kolego en oktobro 437 aŭ per provoj rekonkeri nordan Afrikon de la vandaloj (en 425 kaj 439-40). La sendo de ekzemplero de la teodozia kodo (*Codex Theodosianus*) al Romo en 438 atestas simbole la fortajn ligojn inter la oriento kaj la okcidento.¹¹ Kiel la kodo indikas, oni daŭre leĝodonis laŭ la nomoj de ambaŭ imperiestroj, kaj eĉ post tiu jaro oni strebis, kvankam ne tute sukcese, komuniki inter la kortegoj kaj ĝisdatigi unu la alian pri novaj leĝoj.¹² Post la morto kaj de Teodozio la dua kaj de Valentiniano la tria en la jaroj 450, tamen, rompiĝis la dinastiaj ligoj; la okcidento tial devis provi sin defendi nur per siaj malgrandiĝantaj propraj rimedoj. La posteulo de Teodozio en la oriento, la imperiestro Markiano (450-457), kies elekto tiam ĝenis Valentinianon, draste modifis la ĝistiaman politikon: li ĉesis pagi grandegajn sumojn al Atilo (4000 funtojn da oro jare) kaj rezignis pri la rekonkerado de norda Afriko.¹³ Leono la unua (457-468) estis la lasta orienta imperiestro kiu celis savi la okcidenton, sed nek lia ambicia mararmea ekspedicio kontraŭ la vandaloj en 468, nek la kandidato, kiun li nomumis por la okcidenta trono, la nobela Antemio (467-472), kapablis revigligi ĝin.¹⁴



Leono

¹¹ Heather 2005, 285-6, 290-2, Matthews 2000, ĉap.1 pri la edzinigo, ĉap.3 pri la alveno de la kodo en Romo. Vidu ankaŭ Millar 2006, 51, Kaegi 1968, 16-29. La historio verkita de la orienta juristo Olimpiodoro (de Tebo en Egiptujo) finiĝis en 425; li vojaĝis mem tiujare okcidenten kaj ŝajne kredis je la reunuigo de la du partoj de la imperio. Vidu Potter 2010, 31-2.

¹² *Nov. Theod.* 2 (448), komparu Eŭnapion, frg.66.2; Whitby 2008, 86-7, Cameron 2012, 28.

¹³ Thompson 1950, 58-75, Hohlfelder 1984, 54-69. Pri la jaraj pagoj – tributo – de Teodozio, vidu Heather 2005, 306-12.

¹⁴ Kaegi 1968, 226, Heather 2005, 390-407, Halsall 2007, 272-7. Pli ĝenerale pri la nefirma unueco de la du imperieroj vidu la mallongajn rimarkojn utilajn de Humphries 2009, 99-100.

Je la fino de la jarcento, dominis okcidentan Eŭropon bunta aro da barbaraj regnoj el kiuj plurajn, aparte Italion sub la regado de la ostrogota reĝo Teodoriko, daŭre administris la samaj elitoj kiuj jam longe ĉefrolis. Pro tio, la dato 476, kiun oni ofte fingromontras kiel la finon de la (okcidenta) romia imperio, kiam pensiis la knaban imperiestron Romulo Aŭgusteto (Romulus Augustulus) la barbara generalo Odovakaro (Odoacer, 476-493), neniom valoras. Jam pasis periodoj en la okcidento sen ajna imperiestro kaj, pli grave, tiom malmulte ŝanĝiĝis la reĝetoso ke sub Teodoriko (493-526) unu epigrafo pretendas ke la reĝo estas ‘la disvastiganto de la romia nomo, la dresanto de (barbaraj) popoloj’, dum lia ministro Kasiodoro (Cassiodorus) eĉ referencis lian regnon kiel ‘la romian respublikon’.¹⁵

Ni celas en la sekvaj rubrikoj esplori kiel funkciis la imperia(j) instanco(j) – ĉar temas pri oriento kaj okcidento – kaj kiel ili administris siajn provincojn. Evidente, pli sukcesis la oriento ol la okcidento, kio klarigas la tre malsimilajn sortojn de la imperieroj: ni strebos lumigi ĝuste la diferencojn inter la du. Ni komencos nian analizon per konsidero de la imperiestro mem kaj de lia kunularo; poste ni traktos la imperian funkciularon (aŭ burokrataron) kaj la administran sistemon de la malfrua romia imperio. Tiam diskutendos la rolo de la aristokratio, kiu tradicie ludis spinan rolon en la imperio, poste sekvos sekcio pri la enloĝantaro de la provincoj kaj de la ĉefurbo. Ni dediĉos sekvan sekcion al la armeo, kaj finfine alian al la eklezio, antaŭ ol proponi kelkajn konkludojn.

La imperiestro kaj liaj konsilantoj

Se iuj enloĝantoj de la ostrogota Italio vere supozis ke ili loĝas en romia ŝtato, povas esti ke ili atingis tiun konkludon pro la mirinde romieca regostilo de Teodoriko: li patronis riparojn al konstruaĵoj en Romo, Raveno kaj aliloke, li triumfe eniris la urbon Romo en 500 por festi sian tridekan regnojaron, li prezidis cirkajn ludojn, kaj li distribuis donacojn al la popolo.¹⁶ La imperiestro tiamaniere ĉieis en la imperio de la kvina jarcento. Lian bildon oni trovis sur moneroj, en statuoj muntitaj tra la tuta imperio, en monumentoj, en arĝentaj ujoj. La diptiko de Monza (Italio), kiu ĉefbildigas la generalon Stiliĥon kaj lian edzinon Serenon (Serena) samtempe montras ankaŭ la du fratojn Honorio kaj Arkadio sur lia ŝildo. Severiano, episkopo de Gabalo en la frua kvina jarcento, priskribas tiel la fenomenon:

Konsideru kiom da guberniestroj ekzistas nun tra la tuta lando. Kaj ĉar la imperiestro ne ĉeestas al ĉiuj personoj, necesas prezenti la bildon de la imperiestro en la kortumoj, en la placoj, en kunvenoj, en teatroj. En ĉiu loko, en kiu agas guberniestro, necesas ke li (la imperiestro) ĉeestu, por ke la okazaĵoj validiĝu.¹⁷

Kiam ajn ariĝis la popolo por spekti ludojn aŭ por protesti, lian nomon – kaj tiujn de liaj ministroj – elparolis ĉiuj; la teodozia kodo eĉ enhavas leĝon, laŭ kiu respondeculoj devas noti kaj raportoj ĉiujn aklamojn de la popolo. Soldatoj devis ĵuri fidelecon al la imperiestro

¹⁵ *Corpus Inscriptionum Latinarum*, 10.6850, Kasiodoro, *Variae*, 1.20.1, 3.18.2, notitaj de Amory 1997, 53. Vidu ankaŭ McCormick 1986, 270-5, Sarris 2011, 106, pri Teodoriko; pli ĝenerale, Halsall 2007, 332-3, Kitchen 2008, ĉap.5.

¹⁶ Moorhead 1992, 42-3, 60-3, komparu McCormick 1986, 273.

¹⁷ Severiano de Gabalo (Sirio), *Homilio pri la kreo de la mondo*, en *Patrologia Graeca* 56, 489 (mia traduko), citita de Teja 1993, 630-1. Vidu ankaŭ Wiemer 2004, 51-2, pli ĝenerale, kiel ankaŭ lastatempe Lee 2013, 107-19. Ensslin 1954, 456, atentigas pri la dissendado de bildoj de nova imperiestro tra la imperio por ke oni honorigu lin, vidu ekzemple noton 96 sube. La oratoro Prokopio de Gazao deklamis laŭdon al la imperiestro en la urba teatro okaze de la alveno de tia bildo de Anastazio en 502: vidu Amato 2010: 13-20.

kaj ekkris lian nomon kiam ili ekatakis, kiel ekzemple kiam ili sturmis la ribelan fuorton ĉe Kherris en Isaŭrio en 488.¹⁸ La cirkaj ludoj meritas apartan mencion en ĉi tiu kunteksto, ĉar Michael Whitby prave atentigas pri la kreskantaj ligoj inter la partianoj (tiuj, kiuj subtenis unu el la kvar teamoj, kiuj konkursis en la hipodromo, nomitaj laŭ siaj koloroj, blua, verda, ruĝa kaj blanka) kaj la imperiestro, kiujn atestas (ekzemple) la raporto pri iliaj aklamoj al li. Tiaj grupoj da partianoj, kiuj troviĝis tra la tuta imperio, konsistigis gravan apogon al la imperiestro, ian kontraŭpezon rilate la potencon kaj influon de nobeloj kaj lokaj eminentuloj.¹⁹



Pulherio

Povas ŝajni paradokse ke tiagrade eminentis tiuj imperiestroj, ĉar tiom multe da ili tre junis en la periodo, kiu nin koncernas: Teodozio la dua fariĝis ‘Augustus’ (plenpova imperiestro) jam antaŭ sia unua datreveno en 402 kaj heredis la tronon de sia patro Arkadio ses jarojn poste. Valentiniano la tria instaliĝis kiel imperiestro kiam li havis nur ses jarojn. Tiujn du imperiestrojn, kaj aparte Teodozion la duan, oni ĝenerale taksas kiel marionetojn, ludilojn de ambiciaj politikistoj ĉe la kortego, kiel ekzemple la fratino de Teodozio, Pulherio (Pulcheria), aŭ la eŭnuko Krisafio (Chrysaphius).²⁰ Sed kvankam dum lia junaĝo kelkaj korteganoj, kiel la pretoria prefekto Antemio (Anthemius), sendube ludis grandan rolon, necesas substreki ke ĉiam ĉefrolis la imperiestro mem. Ekde la komenco de la imperiestra sistemo (en la unua jarcento a.K.) la potenco de la imperiestro tre ligiĝis al la persono mem; lin celis abunda fluo da petoj de ĉiu parto de la imperio.²¹ Malgraŭ la granda burokrata sistemo kiu estiĝis en la kvara jarcento, la decido-povo restis persona respondeco de la imperiestro. Liaj ĉefaj ministroj, kiel la *magister officiorum* (la estro de la oficoj, plurkampa respondeculo), la pretoria prefekto

¹⁸ Brown 1988, 149, Teja 1993, 629-33, Martin 1997, 59, Barnish kaj aliaj 2000, 182 (pri epigrafo, kiu raportas la aklamojn), Millar 2006, 164 (raportoj al la imperiestro de aklamoj en la oriento) kun *Cod. Theod.* 1.16.6 kaj Wiemer 2004, 38 (pri la urbo Edessa), 58-9; Joh. Ant. frg.237.10 pri Kherris. Pri aklamoj vidu ankaŭ McCormick 2000, 144, Mitchell 2007, 156-7, Millar 2006, 198-200.

¹⁹ Whitby 2006, 450-1, Whitby 2008, 78-9. Tia reto de partianoj simple ne ekzistis en la okcidento. Prokopio, *Anekdo.* 29.29-38, priskribas kiel subtenantoj de la blua teamo en Tarso, Kilikio, protestis kontraŭ la guberniestro kaj atentigis siajn samteamanojn en Konstantinopolo, kiuj atentigis pri la misfaroj de la estro. Mi danku mian studenton Rob Main, kiu pensigis min pri ĉi tiu kazo.

²⁰ Vidu jam Priskon, frg.3.1-2, Joh. Ant. frg.220, 222, Zos. 5.1, komparu Jones 1964, 173, McCormick 2000, 143. Kontraŭe, Schlinkert 2002, 285, Elton 2009, 134-7.

²¹ Kiel substrekas Millar 2004, 577. Millar 2006, 22-3 proponas interesan ekzemplon de imperiestra respondo al petskribo el la eta urbo Milaso en Kario de la jaro (proks.) 428, kiu konserviĝis nur epigrafe (ne en jura kodo), komparu Millar 2011, 401-2 (recenzo de la angla traduko de la libro, Traina 2009).

(financa estro, kiu ankaŭ respondecas pro la provizado de la armeo), la *quaestor sacri palati* (kvestoro de la sankta palaco, jura respondeculo) kaj la *praepositus sacri cubiculi* (estro de la sankta dormo-ĉambro, eŭnuka posteno, kiu kontrolis aliron al la imperiestraj ĉambroj), same kiel la *magistri militum* (soldatestroj) renkontiĝadis kun la imperiestro en kunveno nomita la *consistorium* (kunstarado), kiu portis tiun nomon pro la fakto ke ĉiuj, krom la imperiestro, devis staradi dume. En ĝuste tia kunsido oni mortigis Aetion.²² En la orienta imperio, tiuj kunvenoj okazis en la imperia palaco en Konstantinopolo. Nobeloj kaj episkopoj strebis influi la debatojn kaj la ministrojn; iuj ne hezitis proponi donacojn al ili, por certiĝi pri sia influo, taktiko kiun lerte ekspluatis la patriarĥo de Aleksandrio, Cirilo. Proponojn oni antaŭmetis kaj debatis, sed konklude la imperiestro findecidis. Fragmento de la *Historio* de Olimpiodoro klare bildigas ĉi tiun aspekton: la okcidenta imperiestro Prisko Atalo, kiun surtronigis la goto Alariko, post kiam li nomumis siajn ministrojn, inter kiuj evidente troviĝis Alariko kaj lia frato Ataŭlfo kiel generaloj, ŝajne rifuzis agnoski sian senpovecon. Kvankam li atingis la tronon nur pro la interveno de Alariko, li stultkuraĝe alparolis la senaton pri siaj grandiozaj projektoj kaj malakceptis la konsilojn kaj de sia *magister officiorum* Johano kaj de Alariko mem, kiuj urĝe proponis ke li sendu mararmeon por kapti nordan Afrikon. Nesurprizinde, baldaŭ fiaskis lia reĝimo kaj lin detronigis Alariko. Tamen, notendas ke, malgraŭ la malforta pozicio de Prisko, oni akceptis lian decidon, eĉ se ĝi evidente estis neracia.²³



Alariko

²² Pri la homoj kiuj konsistigas tiun konsilantaron kaj iliaj roloj, vidu Haldon 2005, 39-48 (kiu proponas utilajn diagramojn, bazitajn sur la libro de Delmaire 1995), Feissel 2006, 196-102, Mitchell 2007, 174-5, Schlinkert 2002, 286, Porena 2010, 547, 560-4. Vidu ankaŭ Noethlichs 1998, 31-3, Millar 2006, ĉap.6, aparte 206-7. Barnwell 1992, 58, insistas ke la pretoria prefekto ne aniĝis de la konsilantaro, estante anstataŭe provinca funkciulo (la plej grava), sed en la orienta imperio la prefekto pri la orienta prefektujo havis sian sidejon en Konstantinopolo kaj partoprenis kunvenojn de la konsilantaro, kiel notas Porena 2010, 564; komparu Martin 2001, 86-7, kiu ankaŭ interpretas mallarĝe la konsilantaron. Honoré 1998, 258-62, montras cetere kiagrade percepteblas la karaktero de Valentiniano la tria per lia leĝofarado. Oni ankaŭ kelkfoje konsultis la senaton, ekzemple kiam necesis intertrakti kun Alariko en la okcidento aŭ kun la gotoj apud Konstantinopolo (vidu Malĥon, frg.15). Vidu Matthews 1975, 268-9, Millar 2006, 201-7.

²³ Olimpiodoro, frg.10.1 (Soz. 9.8). Vidu ankaŭ Millar 2006, 224-8, Elton 2009, 142, Barnish kaj aliaj 2000, 200 (pri la povo de la imperiestro findecidi inter rivalaj fakoj de la funkciularo).

La imperian decidon sekvis ofte edikto, kiun oni enkadrigis en la teodozian kodon (aŭ, post ĝia eldoniĝo, publikigis kiel *Novella*, t.e. nova leĝo). Subitaj ŝanĝoj al ĝenerala politiko ne maloftis, ekz. kiam Teodozio abrupte ĉesis subteni la patriarĥon de Konstantinopolo, Nestorion, en 431, aŭ kiam li maldungis la tro popularan urban prefekton Ciro (Cyrus) en 441, aŭ kiam la uzurpanto Bazilisko en 476 revokis la enciklikon, kiun li publikigis nur kelkajn monatojn antaŭe. Tiaj rompoj senavertaj permesis al la imperiestro respondi al premoj de la popolo, ekzemple en tiu lasta kazo, sed ili ankaŭ donis al li la okazon liberigi sin de ministro kies influo riskis endanĝerigi aŭ enombrigi lian propran (kiel en la dua kazo).²⁴

Oni konstatas tiamaniere ke ĉefrolis la imperiestro ne nur simbole sed ankaŭ praktike en la kvina jarcento. Lian regadon oni taksis aprobita de dio; oni nomis lian domegon sankta (*sacer*), kaj en la orienta imperio lin benis (ekde 450), sed ne sanktoleis, la patriarĥo de Konstantinopolo.²⁵ Malkiel liaj militistaj antaŭuloj de pasintaj jarcentoj, li emis loĝi en la imperiestra urbo, ĉu Konstantinopolo, Raveno aŭ Romo, sed li tamen kapablis venki siajn malamikojn brakseĝe de sia palaco: oni ĝenerale kredis ke la preĝoj de Teodozio la dua venkigis super la persoj, ekzemple, en 421.²⁶ Venkoj do restis grava parto de la imperiestra regado, kaj ceremonia eniro en urbon (kiun oni nomis *adventus* aŭ ‘alveno’) permesis al la reganto alproprigi por si la sukcesojn gajnitajn de liaj generaloj. Eblis ankaŭ pli konkrete alproprigi venkojn: Teodozio la dua konstruigis granitan kolonon altan je 17 metroj post pluraj militaj sukcesoj en 421, kio klare indikas lian respondecon pri la venkoj.²⁷ Sed kompreneble la imperiaj armeoj ne ĉiam venkis siajn malamikojn, eĉ sufiĉe ofte ili malvenkis: ni traktas periodon, evidente, kiam draste malpligrandiĝis la romia imperio. Sekve imperiestroj komencis emfazi sian venkemon ĝeneralan, por ke ili ne tro dependu de individuaj bataloj. Per la helpo de dio, ili daŭre venkos – malgraŭ kelkaj malsukcesoj – ili anoncis tiel por konvinki eventualajn skeptikojn pri la reĝimo.²⁸

Ceremonioj ĝenerale fortigis la impreson de imperiestra potenco, ekzemple oficialaj aŭdiencoj en la palaco, aŭ procesioj en Konstantinopolo, ĉu por diservoj, ĉu por inspekto de grenejo, ĉu por festi militan venkon. En la hipodromo aŭ surstrate la imperiestron alfrontadis lojalaj aklamoj aŭ, kelkfoje, insultoj kaj tumultado.²⁹ Rimarkendas tamen ke la popolo ĝenerale lojalis al la imperiestro, kondiĉe almenaŭ ke lia reĝimo estu bone enradikiĝinta aŭ

²⁴ Chadwick 2003, 530-6, 593 (pri Nestorio); pri la sidejo de la kunveno, Noethlichs 1998, 25, Elton 2009, 134, 137-40, komparu Kelly 2004, ĉap.5, McCormick 2000, 156, Whitby 2008, 90-1, pri subitaj faloj. Vidu krome Schlinkert 1998, 138-43, Noethlichs 1998, 43. Eblis ankaŭ modifi respondecojn de la fakoj por pligrandigi aŭ malpligrandigi la influon de iu fako, kiu fariĝis tro potenca; tiel kreskis la rolo de la *magister officiorum* en la oriento en 443. Vidu Barnish kaj aliajn 2000, 200-1, Millar 2006, 43-6.

²⁵ Ensslin 1954, 462-3, MacCormack 1981, 240-56, Martin 1997, 55, 59, Marcone 1998, 352, McCormick 2000, 159-60, Martin 2001, 101, Kolb 2001, 97-102, Teja 1993, 624-9.

²⁶ Vidu Kaegi 1968, 199-203, 233, por pluraj ekzemploj de la venka potenco de la pieco kaj mildo de Teodozio. Pli ĝenerale, Lee 2007, 37-50, Lee 2013, 101-7.

²⁷ Holum 1982, 102-10, 121-2 (necesas iom rekonstrui la epigrafon), vidu ankaŭ (pli ĝenerale) McCormick 1986, 109-11, Diefenbach 1996, 56-7, McCormick 2000, 142-3, Millar 2006, 73-4, Kolb 2001, 123-4.

²⁸ Kolb 2001, 123, komparu Martin 1984, 128-9, Martin 2001, 101, Feissel 2006, 82-3, Mayer 2006, 152, Börm 2010, 174-5.

²⁹ Diefenbacher 1996, 49 kaj n.64, Noethlichs 1998, 40-2, McCormick 2000, 141-3, 156-60, Croke 2001, 116-24, Wiemer 2004, Whitby 2008, 76-7, Elton 2009, 135. Pri la hipodromo kiel scenejo por interŝanĝoj inter la popolo kaj la imperiestro vidu ankaŭ Greatrex 1997, 63, Feissel 2006, 85. Kiel lastatempe rimarkigis Wiemer 2004, 60-1, la cirkaj ludoj donis al la imperiestro la okazon komuniki senpere kun la popolo (sen devi dependi de siaj ministroj).

ke lia regorajto estu nedubenda. Tiel klarigeblas la fakto ke Honorio sukcesis pacigi gravan tumulton inter siaj soldatoj en Tiĉino (Ticinum) en 408, kiam pluraj eminentuloj jam murdiĝis: li montris sin al la armeanoj vestita per humilaj vestaĵoj anstataŭ siaj purpuraj imperiestraj roboj. Anastazio (491-518) simile, cent jarojn poste, regajnis la iniciaton en la stratoj de Konstantinopolo post kiam li aperis en la imperiestra loĝio sen sia krono.³⁰ Aliflanke, se la imperiestro ne firme enradikigis sian povon aŭ se eblis dubi pri lia aŭtoritato aŭ legitimo, kiel en la kazoj de Petronio Probo (455-456) aŭ de Bazilisko (475-476), la enloĝantaro de la ĉefurbo povis lin detronigi, eĉ mortigi, same kiel en pli fruaj jarcentoj ĝi sin turnis kontraŭ Vitelio (en 69).³¹

La ofico de imperiestro estis do super(r)ega sed samtempe danĝeroplena. Kiel evidentiĝos, multaj homoj multon atendis de li, kaj ofte ne eblis plenumi la atendojn de ĉiuj. Inter la dezirindaj trajtoj de imperiestro estis donemo, kiel agnoskis Teodozio la dua: ‘Estas preskaŭ kiel ni kredas ke ni ricevis komplezon, kiam ajn prezentiĝas al ni la okazo komplezi, kaj sendube ni supozas ke tago perdiĝis se ĝin ne lumigas la donemo de nia dieco.’³² Tia sinteno, kvankam populara, neeviteble endanĝerigis enspezojn gravegajn al la daŭra vivado de la imperio, kiel ni klarigos. Egale grave, malgraŭ la multnombraj problemoj, kiujn ili alfrontis, imperiestroj pli kaj pli formulis grandiozajn eldiraĵojn pri siaj celoj. Kiel denove Teodozio la dua deklaris, li opiniis, ke estas lia devo sin montri donema kaj ‘kompreni kiel la homa raso povos resti senleza kaj defendi ĝin kontraŭ ĉiu maljusteco, ĉar ni agnoskas ke ni elektiĝis (de Dio) pro tiu celo.’³³ Sed dum Teodozio kaj Valentiniano publikigis tiom grandanimajn proklamojn, iliajn klopodojn tro ofte subfosis iliaj propraj funkciuloj kaj la potenca nobelaro.³⁴ Necesas do nun okupiĝi pri tiuj du grupoj.

La imperia funkciularo (administrantaro)³⁵

Inter la plej notindaj trajtoj de la malfrua romia imperio estas ĝia ampleksa funkciularo; oni prave ofte aludas ĝian burokratecon. Ĉirkaŭ 30 000 funkciuloj enpostenis, ĉu en oficejoj en la ĉefurboj, ĉu en provincaj oficejoj. Servado inter la funkciularo, kiun oni nomis militservo ĉar ĝi fontis el armeaj oficoj, estis populara kariero, ne nur ĉar ĝi rajtigis al funkciulo gajni salajron kaj imunecon kontraŭ iuj devoj, sed ankaŭ pro la fakto ke ĝi aldonis la eblon riĉiĝi

³⁰ Zosimo 5.32.5, kvankam notindas ke la tumulto ŝajne ligiĝis pli al malkontento al la generalo Stiliĥo. Pri la tumulto kontraŭ Anastazio en 512, Demandt 1997, 161, Meier 2007, Haarer 2006, 157. Millar 2006, 95-6, rimarkigas epigrafojn, kiuj atestas lojalon en la oriento. Notu ankaŭ Sokr. HE 7.22.17: Teodozio la dua, vestita kiel humila civitano, kondukas preĝprocesion al la granda preĝejo en Konstantinopolo post tertremo, kp. Diefenbach 1996, 51.

³¹ Joh. Ant. frg.224.4 pri Petronio; ni diskutos sube pri Bazilisko. Laŭ Flaig 1997, 33, legitimo ne plu tiom gravis, sed la teodozia dinastio tamen sendube profitis de sia parenceco al Teodozio la unua.

³² *Nov. Theod.* 5.1 (438), komparu *Nov. Val.* 1.1 (440/1) kun la artikolo bonega de Cecconi 2005, 297; ankaŭ Whitby 2008, 88.

³³ *Nov. Theod.* 17.2.pr (444), komparu *Nov. Maj.* 1.1 (458), *Cod. Iust.* 1.48.1, 3 (479, notita, sed kun maljusta referenco, de Mitchell 2007, 178), kaj *Nov. Just.* 149.2, en kiu Justino la dua (565-578) en 569 pluiras laŭ tiuj principoj kaj insistas pri la graveco de justeco tra la imperio kaj pri tiu de la pago de impostoj. Feissel 2006, 80-1, analizas kaj tradukas tiun lastan leĝon (en la francan) kaj (prave) komparas ĝin kun moderna sociala ŝtato. Vidu ankaŭ *Nov. Marc.* 2.pr (450) kun la komentoj de Martin 2001, 99.

³⁴ Kiel argumentas elokvente Cecconi 2005, 303.

³⁵ Eventuale oni povus uzi la terminon ‘registro’, ĉar temas almenaŭ iagrade pri profesia stabanaro, kies ĉefoj, tamen, tre ofte havis nenian profesion sperton.

per pagigo de la publiko pro la farado de siaj taskoj.³⁶ Plie, funkciuloj rajtis sin vesti per apartaj uniformoj, kiuj atestis ilian gravecon.³⁷ Malgraŭ ilia emo koruptiĝi, la funkciularo restis grava imperia ilo, kiu celis certigi la regulan alfluon de impostoj al la imperiestro, por ke li kapablu pagi la salajron de la soldataro. Temis pri ilo, tamen, kiu riskis elgliti el la manoj de la imperiestro. Tra la jardekoj la diversaj fakoj (aŭ ministerioj, kiel oni hodiaŭ dirus) de la imperia administrantaro evoluigis siajn proprajn kutimojn kaj kulturojn; iom post iom, konstateblis ke ili kapablis daŭrigi siajn administrajn taskojn sen zorgi pri tiu, kiu tiam imperiestris. Promociojn oni ĝenerale decidis laŭ la longo de la servado, sed eblis en iuj cirkonstancoj ankaŭ aĉeti postenon – ĉu veran, ĉu nur honoran – kaj poste rehavigi al si la monon elspezitan per ekspluatado de la potenco tiel aĉetita. Kvankam la vendado de oficoj iagrade malfermis la rangojn de la funkciularo al eksteruloj, kion oni povas taksii avantaĝe, por la imperiestro troviĝis gravaj danĝeroj pro la kreskanta sendependeco de la funkciuloj kaj lia nepartopreno en la nomumado de ili. Imperiestroj reagis diversmaniere al ĉi tiuj problemoj. Iuj permesis la vendadon de postenoj (*suffragium*), dum aliaj strikte ĝin malpermesis (almenaŭ leĝe).³⁸

Necesis al la imperiestroj konstante batali por ne perdi sian regopovon: temis ja pri grava fasko da taskoj. Iliaj funkciuloj respondecis pri la financa bonfarto de la imperio, eĉ se laŭ la leĝoj de Valentiniano la tria ege evidentiĝas, ke ili nepre ne hezitis postuli pli da mono ol ili rajtis kaj konservis por si grandan proporcion; kelkfoje trompisto prezentis sin kiel veraj impostistoj kaj tiel enspezis grandajn sumojn kaj teruris la provincanojn. Pro tio la ŝtato ne nur perdis la enspezojn, kiujn ĝi urĝe bezonis por sin defendi, sed ankaŭ kolerigis, eĉ mallojaligis, sian propran popolon, kiu reage do fuĝis por sin defendi ĉe lokaj nobeloj aŭ barbaraj ĉefoj.³⁹ Aliflanke, kaj same danĝere, la vendo kaj aĉeto de oficoj iagrade privatigis la imperian administran sistemon: iu, kiu aĉetis sian postenon, kompreneble konsideris tiun oficon kiel sian propran havaĵon, kiun li rajtis plenumi laŭ sia bontrovo. Kaj tiaj sintenoj neeviteble stimulis plian koruptadon kaj la fordrenadon de eĉ pli da enspezoj, kiuj devus normale alflui al la ŝtato.⁴⁰

³⁶ Cecconi 2005, 297 n.93, pri la nombro da funkciuloj, komparu Heather 1998, 204-5, Halsall 2007, 76-7. Palme 2007, 251, proponas ciferon de 2 000 funkciuloj en Egiptio en tiu periodo. Feissel 2006, 96, kalkulas ke troviĝis 1 600 funkciuloj sub la pretoria prefekto en la oriento. Kompreneble la nombro da ili en la okcidento malpligrandiĝis dum la jarcento pro la ŝrumpo de la imperio, Matthews 1975, 347. Cecconi 2005, 289, pri la pagigado, vidu ankaŭ Porena 2010, 568-9; Cecconi 2005, 300, pri la avantaĝoj de servado, komparu la libron de Kelly 2004, aparte 64-8, ĉap.4, Porena 2010, 569-71.

³⁷ Kiel notas Kelly 1998, 168-9, Kelly 2004, 22-3, 232-4, kiu atentigas ankaŭ pri la provizoj, kiujn ricevis la funkciuloj; vidu ankaŭ Porena 2010, 558. Murbildo en Egiptio montras la bele vestitajn funkciulojn, vidu (malbonan) version de ĝi en Rees 2004, 182.

³⁸ Barnish kaj aliaj 2000, 187-8, Kelly 2004, 152-8, Cecconi 2005, 290-1, Garnsey 2010, 52-4, Porena 2010, 557, Cameron 2012, 94-5. Piganiol 1972, 120, substrekas kiagrade la funkciularo povis funkcii sen ajna ekstera interveno, ĉar precizaj reguloj ĉion decidis, kvankam li probable troigas.

³⁹ *Nov. Val.* 1.3 (450) proponas vivan priskribon de falsaj impostistoj, vidu ankaŭ *Nov. Maj.* 2.2 (458), Cecconi 2005, 293 kaj *Nov. Val.* 10, aparte ties prefacon. Salviano, *De Gub. Dei*, 5.24, pri la fuĝo de la enloĝantoj, Jones 1964, 774-80. Vidu ankaŭ Barnish kaj aliajn 2000, 185-6, kiuj citas *Cod. Theod.* 11.28.10 (415), leĝon, kiu montras ke eĉ nuligoj de impostoj ne ĉiam profitigis ĉiujn impostpagantojn; ankaŭ Ward-Perkins 2005, 45. Demandt 1997, 157, atentigas ke triono de la leĝoj en la *Cod. Theod.* traktas misuzon de povo kaj falsadon de juraj dokumentoj.

⁴⁰ Kiel rezonas prave Cecconi, 289; komparu Salvianon, *De Gub. Dei*, 5.17, Eŭnapion, frg.72, Malĥon, frg.16.1-2, Barnish kaj aliajn 2000, 170-1, Martin 2001, 89-90.

Ĉu oni aprobas tian sistemon aŭ ne – ja povas esti anakronisme juĝi administrajn sistemojn laŭ modernaj kriterioj⁴¹ - ĝi sendube prezentis plurajn danĝerojn por la stabilo de la imperio. La *Novellae* (novaj leĝoj) de Valentiniano la tria atestas ne nur la konscion de la imperiestro kaj de liaj ministroj pri ĉi tiu problemo, sed ankaŭ la malfacilon enkonduki ajnan ŝanĝon. Kiel Giovanni Cecconi persvade argumentis, la imperio de la kvina jarcento, almenaŭ la okcidenta, troviĝis en malvirta ciklo el kiu ne eblis eskapi. La imperiestro ja povis leĝodoni por limigi la potencon de unu fako aŭ alia, sed baldaŭ li devis renversi sian decidon: li devis cedi al la forta premo de siaj superaj funkciuloj, ĉar ne eblis administri la imperion sen ilia kunlaboro.⁴² Eĉ pli grave, pro la multnombraj enradikiĝantaj intereso de diversaj grupoj, aparte de la funkciuloj mem, sed ankaŭ de la nobelaro kaj la soldataro, evidentiĝis ke maleblis nuligi la multiĝintajn impostimunecojn kaj privilegiojn, kiujn malavare fordonis antaŭaj imperiestroj. Sekve la impostŝarĝon devis pli kaj pli surŝultrigi tiuj, kiuj plej malkapablis ĝin pagi, kio malamikigis la provincojn.⁴³ La prefaco de leĝo de Valentiniano de 441 klare identigas la problemon:

Konvenas ke justeco konserviĝu publike kaj private en ĉiuj aferoj kaj negocoj, kaj ĝi aparte subtenendas en la aferoj, kiuj apogas la tendencojn de la impostoj, ĉar ĉi tiuj aferoj helpas la ŝrumpintajn rimedojn de niaj lojalaj (imperianoj) per utila egaleco. Tion multaj elkraĉas, tiuj, kiuj sekvas nur siajn proprajn profitojn kaj forlasas la komunan bonon; (tamen) en tiu (bono) troviĝas vera kaj solida utilo, kiu klare pli bone atingas individuojn, kiam ĝi profitigas ĉiujn, aparte kiam plej bezoniĝas tiuj tributoj, sen kiuj eblas nenion atingi en paco aŭ milito. Oni ne povos daŭrigi tiujn (impostojn) se la ŝarĝo falas nur sur kelkajn elĉerpitajn homojn – la ŝarĝo, kiun evitas la plipotenculo, kiun rifuzas la riĉulo, tiel ke, post la rifuzo de la pli forta (homo), nur la malforta ĝin akceptas.⁴⁴

La administra sistemo kiun kreis Diokleciano je la fino de la tria jarcento, sendube helpis refortigi la tiaman imperion, sed post tiom da tempo ĝiaj enradikiĝintaj povoj minacis superi tiujn de la imperiestro mem, almenaŭ en la okcidento, kie ne ekzistis kontraŭaj influoj.

La senata nobelaro (aristokrataro)

Tian kontraŭpezon povintus konsistigi (inter aliaj) la bienula nobelaro, kiu certe pretis kritiki la kreskantan funkciularon. En la okcidenta imperio, tamen, limigita grupo da riĉegaj nobelaj familioj sukcesis ludi dominan rolon, ofte per integriĝado en la administran sistemon mem, kaj aparte per akaparado de fakoj, kiuj respondecis pri impostoj. Ĝuste pro ilia premado la imperiestro Valentiniano la tria devis rezigni pri siaj klopodoj forigi la tro malavarajn privilegiojn kaj imunecojn donitajn de liaj antaŭuloj.⁴⁵ En la oriento, aliflanke, estiĝis

⁴¹ Tiel argumentas Kelly 2004, tro pozitive; vidu Cecconi 2005 kaj MacMullen 2006, 478-81.

⁴² *Nov. Val.* 7.1-2 (440, 442) ekzemplas tian renversion. Vidu Cecconi 2005, 299, ankaŭ Barnwell 1992, 28-9.

⁴³ Cecconi 2005, 292-3, 300-3, Whittaker kaj Garnsey 1998, 281, 287-311, Sarris 2011b, 377, Salviano, *De Gub. Dei* 5.17-23, 28-35. Vidu ankaŭ (ĝenerale) Jones 1964, 205-6, komparu Lepelley 2001, 365-7, kiu referencas leterojn de Aŭgustino, kiuj atestas la samajn problemojn en norda Afriko en la 420aj jaroj; Faulkner 2000, 148-9, pri Britio. Morris 1965, 45-51, diskutas interesan verkon de brito loĝanta en Sicilio en la 410aj jaroj, kiu akre kritikis la riĉulojn, komparu Sarris 2011, 47-8.

⁴⁴ *Nov. Val.* 10 (441), mia traduko. Vidu Sarris 2011a, 37-8.

⁴⁵ *Nov. Val.* 4 (440), 10 (441), vidu Cecconi 2005, 293, 299-300, kiel ankaŭ Matthews 1975, 387-8, Twyman 1970, 481-2, Stickler 2002, 276-7, Cameron 2012, 92. Wormald 1976, 221, substrekas (surbaze de la libro de Matthews 1975) la interrilatojn inter la funkciularo kaj la nobelaro.

‘servanta funkciularo’, kiu konsistis el anoj de la nova Senato fondita en Konstantinopolo. Ĉi tiu grupo intime ligiĝis al la administrantoj de la imperio, sed ne disponis pri la forte enradikiĝintaj povo kaj influo de la nobelaj familioj en la okcidento. Kiel evidentiĝos, cetere, troviĝis aliaj grupoj en la oriento, kiel ekzemple la urba enloĝantaro de Konstantinopolo kaj la eklezio, kiuj kapablis praktiki influon sur la imperiestro por kontraŭpezi tiun de la administrataj ĉeffunkciuloj.⁴⁶

Oni rajtas prave aserti ke la nobelaro de la malfrua romia imperio grandskale kontribuis al la disiĝo de la imperia povo. Komprenblas en tia cirkonstanco la emociaj petoj de Valentiniano al romia patriotismo por persvadi ĝiajn anojn obei la leĝojn kaj transdoni al funkciuloj la rekrutojn, kiujn oni ŝuldis (kaj kiujn la nobeloj preferis gardi por si mem, por ke ili laboru en iliaj bienoj). Sed eĉ en la oriento la imperiestroj devis lukti kontraŭ enradikiĝanta nobelaro: en la sesa jarcento Justiniano apenaŭ kapablis bridi sian koleron kiam li informiĝis pri la konduto de nobeloj en Kapadocio.⁴⁷ Kiel okazis pri la funkciularo, imperiestroj antaŭaj sin montris tro malavaraĵ, kaj ne plu eblis renversi kaj reakiri la rajtojn fordonitajn de ili: plej klare bildigas tiu manko de povo imperiestra la *Novella* 10 de Valentiniano, en kiu li eksplicite kritikis la donemon de siaj antaŭuloj.⁴⁸ La bienulaj nobeloj estis ricevintaj permeson kolekti impostojn de tiuj, kiuj laboris por la bienulo en lia bieno, aŭ de tiuj, kiuj luis terpecon de li, anstataŭ la imperiaj funkciuloj. Tia evoluo, kvankam facila tuja paŝo por la instancoj – kunlabori kun la nobelaro anstataŭ lukti kontraŭ ĝi – en la longa daŭro riskis endanĝerigi la administradon de tiuj bienoj kaj enspezoj entute; ne surprizinde, en la oriento, imperiestroj strebis poste en la kvina jarcento renversi tiun tendencon.⁴⁹



Justiniano

⁴⁶ Heather 1998, 184-97, Marcone 1998, 351, Sarris 2006, 181-3, Cameron 2012, 93. Börm 2010, 165-72, prave atentigas tamen, ke eĉ en la oriento la imperiestro ne aŭdacus ekzekuti aristokraton senpretekste: la kuna influo de la nobeloj gravis kaj limigis la agadkapablon de la imperiestro, same kiel en Persio kaj aliloke. Vidu ankaŭ la sekvan alineon.

⁴⁷ *Nov. Val.* 6.2.2 (443), *Nov. Theod.* 7.3.1 (440); Sarris 2006, 2-3, Sarris 2011a, 130. Eŭnukoj kaj aliaj nenobeloj tial konsistigis gravan kontraŭpezon al la aristokrataro: vidu (ekzemple) Börm 2010, 177-8.

⁴⁸ *Nov. Val.* 10 (441), aparte 10.3; vidu Cecconi 2005, 193.

⁴⁹ Kelly 1998, 181, Martin 2001, 81-2, 90, Sarris 2004, 296-7, Sarris 2011b, 377-8, Cameron 2012, 95-6. Pri la rajto kolekti impostojn, vidu Sarris 2006, 103-14, 151-2 (kiun eblis cedi ankaŭ al vilaĝoj), komparu Barnish kaj aliajn 2000, 187.

Je pli alta nivelo, la antaŭa divido inter la administrantoj de provinco kaj la elito de tiu provinco iom post iom malaperis. En la kvina jarcento estis nun eble por provincano fariĝi ties guberniestro; en la sesa, tia situacio iĝis normala.⁵⁰ La kuniĝo de ŝtataj funkciuloj kaj provincaj nobeloj kompreneble fortigis regionajn sintenojn kaj interesojn; samtempe kreskis la potenco de la koncernaj nobeloj. Iuj eĉ dungis soldatojn en siaj bienoj, malgraŭ kontraŭaj leĝoj, kiuj povis fariĝi personaj gardistoj,⁵¹ dum aliaj pretis protekti kamparanojn, kiuj fuĝis pro la postuloj de la impostistoj: atinginte bienon por kiu nobelo jam akiris la rajton kolekti impostojn por la ŝtato, kiun oni nomas *autopragia*, la kamparanoj konsideris sin pli sekuraj. Tia ĝenerala fuĝado de imposteblaj terenoj neeviteble serioze endanĝerigis imperiajn enspezojn; kaj ĉi tiu patroniĝo de potencaj nobeloj simile erodis la regadon de la imperiestro.⁵² Kvankam iuj esploristoj taksas tiajn evoluojn kiel iaspecan kunlaborigon de la nobelaro fare de la imperiestroj, tiel ke oni povus nomi iliajn bienojn ‘duonŝtataj’ aŭ ‘duonpublikaj’, pli konvinka interpreto estas ke la ŝtato devis akre batali por protekti siajn proprajn interesojn kaj cedis nur tiom, kiom necesis.⁵³

En la okcidento, evidente, la ŝtato perdis la batalon. En Italio, ekzemple, dum Alariko ĉirkaŭis Romon kaj minacis sieĝi la urbon, la nobelaj senatanoj daŭre insistis (sukcese) pri siaj impostimunecoj kaj pri imoŝtrabatoj, kaj eĉ rifuzis kontribui al la defendo de la duoninsulo. Kiam cetere oni prezentis la novan teodozian kodon al la romia Senato en 438 la kunveno okazis ne en publika senatejo, sed male en la domo de riĉega senatano, Anicius Acilius Glabrio Faustus: tiel mezureblas la relativa graveco de individuoj kaj la ŝtato.⁵⁴ En Gaŭlio, lokaj gravuloj, kiuj jam plurflanke spertis relativan aŭtonomion, ne hezitis rezigni pri sia lojalo al la imperiestro se tio ne plu oportunis al ili: la pretorian prefekton de Gaŭlio, Arvandon, oni kondamnis ĝuste ĉar li helpkonsilis la visigotan reĝon Eŭrikon en 469.⁵⁵ En la oriento, Peter Sarris lerte priskribas la penojn de sinsekvaj imperiestroj bridi la potencon

⁵⁰ Laniado 2002, ĉap. 10 dokumentas la lokajn originojn de provincaj guberniestroj, komparu (pli ĝenerale) Jones 1964, 389, Garnsey kaj Whittaker 1998, 310, Potter 2010, 25-7, Porena 2010, 574. Pri la okcidento vidu ankaŭ Matthews 1975, 331-4, 359-61, Heather 1998, 201-3, Stickler 2002, 283-5, 289-90. Pri Egiptio, vidu Banaji 2001, ĉap.6, Sarris 2006, ĉap.9-10, Palme 2007, 250-5 (kiu lasta substrekas ke la integriĝo de administrantoj kaj lokaj elitoj okazis ne nur je la pinta nivelo – tiu de la guberniestroj, ekzemple – sed ankaŭ je la nivelo de la ĉiutagaj imperiaj funkciuloj).

⁵¹ Vidu Pottier 2009, 166-7; la leĝo de Leono, *Cod. Just.* 9.12.10 (468) atestas la gravecon de la problemo kaj kiagrade volis malpermesi tion la imperiestro. Vidu ankaŭ Whittaker 1994, 263-5, Sarris 2006, 161-71, Sarris 2011a, 56-7, 62.

⁵² Pri la patrona rolo de la nobeloj, vidu Martin 1984, 125-6, Garnsey kaj Whittaker 1998, 289-93, 307-11, Marcone 1998, 361-3. Ili sukcesis transpreni iom post iom la respondecojn de la urbaj konsilioj, situacio, kiun fine devis akcepti la imperiestroj de la sesa jarcento: vidu Sarris 2006, 157-9, komparu Heather 2008, 112-13.

⁵³ Sarris 2004, 294-5, Sarris 2006, 137-48, 161-76, 183-93, Sarris 2011a, 55-68, 129-31 (pli larĝa perspektivo, komparu Roda 1993, 671-3, Demandt 1997, 158-9) proponas la pli persvadan interpreton (kontraŭ ekzemple Garnsey kaj Humfress 2001, 48, Bang 2009, 802 aŭ Pottier 2009, 167-8). Vidu ankaŭ Brown 2000, 335, pri la ŝrumpo de la ŝtato (en utila ĝenerala artikolo).

⁵⁴ Matthews 1975, 276-8, 284-81, 331-4, 356-61, Mann 1979, 183, Barnish 1988, 142; pri la prezento de la kodo, Matthews 1975, 357, komparu Olimpioron, frg.41, pri la vasta riĉeco de iuj senatanoj kun la rimarkoj de Sarris 2004, 305-6, Porena 2010, 579-80, Sarris 2011a, 74. *Cod. Theod.* 6.3.4 (397) indikas ke duono de la senatanoj eĉ en la oriento ankoraŭ ne akurate pagis siajn impostojn. Halsall 2007, 79, aludante faman parolon de la usona prezidento Kennedy, proponas, ke la nobelaro de ĉi tiu epoko interesiĝis pli pri tio, kion povus fari por ĝi la imperio, ol pri tio, kion ili povus fari por ĝi.

⁵⁵ Barnwell 1992, 60-2, 126-7, komparu Wormald 1976, 221-2, Mathisen 1992, 232-3, 238; la nobeloj eventuale opiniis, ke ili konservas ian romiecon per tia transigo de sia lojalo. Pri Arvando, MacGeorge 2002, 225-7, Halsall 2007, 273-7, Kitchen 2008, 107-12.

de bienulaj nobeloj, kiel ekzemple la familio de Apiono en Egiptio. En tiuj klopodoj helpis la koncentriĝo de povoj en Konstantinopolo, dum en la okcidento kontraste kreskis la disigaj fortoj. La supervivon de la oriento oni rajtas alskribi tiel al tia volemo de la imperiestroj haltigi kaj malpermesi tiajn tendencojn; ĝi profitis de pli civila funkciularo, en kiu ĉefrolis kompetentaj pretoriaj prefektoj (ekz. Antemio je la komenco de la jarcento) pli ol generaloj (kiel en la okcidento). Tiamaniere la orienta imperiestro kapablis postuli ke oni pagu siajn impostojn, dum Valentiniano la tria en la okcidento ŝajne nur povis vane insisti.⁵⁶ Sammaniere oni rimarkas ke Teodozio daŭre klopodis enmanigi la impostajn rimedojn kaj limigi la disdonon (post persona peto) de privilegioj al unuopuloj, dum denove en la okcidento Valentiniano ne kapablis efektiviĝi ion tian.⁵⁷

Necesas aludi gravan punkton pri ĉiu fenomeno diskutita. Niaj ĉefaj skribaj fontoj pri ĉi tiu jarcento, kiel por aliaj, apartenas – aŭ pli precize, sin identigas – al ĉi tiu alta sociala tavolo. Historiistoj kiel Prisko aŭ Olimpiodoro aŭ Sokrato (historiisto de la eklezio), kvankam ne mem senatanoj nek nobeloj, enoficiĝis kiel stabanoj de generaloj aŭ kiel juristoj (aŭ ambaŭ) kaj dediĉis siajn verkojn al patronoj, kiuj membris en la nobelaro. Iliaj verkoj tial spegulas la interesojn de la plej riĉaj homoj de la imperio. Pro tio, la imperiestro Markiano, ekzemple, profitis de rimarkinde bela reputacio inter la sekvaj generacioj (escepte inter tiuj, kiuj kontraŭis la gravajn decidojn faritajn pri la naturo de Kristo ĉe la koncilio de Kalcedono), kvankam lia antaŭulo, Teodozio, ne disponis pri tiom da populareco. La unua, kies legitimon disputis pro bonaj kialoj Valentiniano la tria, enradikigis sian povon per malavaraj impostaj cedoĵoj al la nobeloj, ĝuste tiuj, kiujn devigis Teodozio kontribui multe al la tributo, kiun postuladis Atilo.⁵⁸ La imperiestro Anastazio simile favoris la riĉulojn: li malgrandigis iliajn impostojn kaj eĉ malkreis komercan imposton, kiu celis komercadon aparte en la urboj kaj kiu nomiĝis *chrysargyron*. En tiu lasta kazo, li devis trompi la funkciulojn, kiuj laboris en la fako de la *comes sacrarum largitionum* (la grafo de la sakraj elspezoj) por certigi ke oni vere detruis ĉiujn arĥivojn, kiujn oni uzis por kolekti la imposton.⁵⁹ Tiel atesteblas la malfacilo por imperiestro vere efektiviĝi tion, kion li volis.

La popolo ĉefurba kaj provinca

Kiel ni jam konstatis, la imperiestroj de la kvina jarcento klare komprenis ke oni atendas de ili, ke ili okupiĝu pri la bonfarto de siaj imperianoj kaj aparte pri la aplikado de la leĝoj laŭ justa maniero. El diversaj fontoj tamen evidentiĝas ke iliaj klopodoj ofte malsukcesis: la dialogo, kiun raportas Prisko inter si kaj romia komercisto, kiu pretendis ke la vivo preferindis ĉe la kortego de Atilo ol en la romia imperio, estas la plej konata ekzemplo de tiu malkontento pri la maljusta aplikado de leĝoj, sed en la okcidento la poeto Salviano aludas similajn

⁵⁶ Vidu Jones 1964, 206-7, 467, pri la pli efika administrado en la oriento, komparu Sarris 2004, 297, Porena 2010, 588-90.

⁵⁷ Millar 2006, 211-14, pri la leĝo de Teodozio de 444 (*Nov. Theod.* 26), komparu Cecconi 2005, 296 kaj n.82, MacMullen 2006, 480, pri la problemo de falsitaj donoj de privilegioj. Whitby 2008, 91, rimarkigas ke Honorio jam en 397 ne kapablis trudi aranĝojn pri rekrutado al la nobeloj, kiel atestas la serio de leĝoj, *Cod. Theod.* 7.13.12-14.

⁵⁸ Thompson 1950, 72-5, Thompson 1996, 210-18, Heather 2005, 312, Prisko frg.9.3 (pri la kontribuoj de la senatanoj). Mitchell 2007, 105, alte taksas la eksteran politikon de Teodozio.

⁵⁹ Evagrio, *HE* 3.39, vidu ankaŭ Joh. Ant. frg.239.1-2, 243, Barnish kaj aliajn 2000, 193-4, Haarer 2006, 194-9, Sarris 2006, 200-1, Sarris 2011a, 134.

problemojn.⁶⁰ La nekapablo certigi la justan aplikadon de la leĝaro rilatas al la grandiĝo de la funkciularo, la homoj, kiuj distancigis la imperiestron de liaj imperianoj. Novaĵoj pri la vera funkciado de la sistemo kaj la konduto de funkciuloj atingis liajn orelojn nur malrapide, kaj li ĝenerale dependis de la informoj donitaj de konsilantoj kaj funkciuloj.⁶¹ Konkrete, la imperiestro ankaŭ pli foris de la imperianoj ol liaj antaŭuloj: loĝante en la imperia palaco dum la plejparto de la jaro, li nur malofte eliris por ceremonioj aŭ por formale viziti najbaran urbon.⁶² Malmultaj imperiestroj aŭdacis komandi armeon: Markiano kaj Majoriano ja tion entreprenis, sed Valentiniano la tria murdiĝis kiam li volis ekpreni la estradon de la soldataro post la mortigo de Aetio, kaj Zenono devis rezigni pri planita kampanjo pro la nefidindeco de la arigitaj soldatoj.⁶³

Pli konkrete, la velkado de romia povo mallarĝigis la eblojn pri kiuj disponis la imperiestro, kio iom brutaligis lian alirmanieron al la imperianoj. Por certigi la pagadon de impostoj, aŭ por repreni posedon de regiono, kiu dumtempe sendependiĝis aŭ falis en la manojn de aliuloj, oni ofte uzis aliancajn armeojn, kiujn oni nomis federaj kaj kiujn konsistigis ‘barbaroj’.⁶⁴ La tumultojn de la t.n. bagaŭdoj en Gaŭlio dum la kvina jarcento oni konvinke interpretas kiel klopodojn de la provincaj por eviti ke ili resubmetiĝu al la imperio kaj (pli grave) pagu impostojn post ioma periodo ekster la kadro de la imperio.⁶⁵ Eĉ pli malbonvene por provincaj, oni kelkfoje provizis tiajn aliancinojn per terenoj en provinco, kiel ekzemple en la kazo de la alanoj – tribo, kies hejmlando troviĝis norde de Kaŭkazo – al kiuj Aetio asignis terenojn en Gaŭlio, probable apud Orleano, kaj kiuj ne hezitis forpeli lokajn bienulojn kaj timigi aliajn enloĝantojn. La saman fenomenon konis ankaŭ la oriento: en 479 la enloĝantoj de Tesaloniko, kredante ke Zenono intencas transdoni ilian urbon al Teodoriko la ostrogoto, kiu tiam apudis, komencis detruigi la statuojn de la imperiestro kaj ataki la pretorian prefekton de *Illyricum*, t.e. la iliria prefekta regiono. Nur per la interveno de la sacerdotaro eblis stabiligi la situacion.⁶⁶ Simile, en 447 Teodozio la dua insistis ke la garnizono de Asemo, proksime

⁶⁰ Prisko, frg.11.2, vidu pri la dialogo Maas 1995, 149-54, Mitchell 2007, 201-2; Salviano, *De Gub. Dei*, 5.25, Marcone 1998, 357, 366, Barnish kaj aliaj 2000, 181, Sarris 2006, 230-4.

⁶¹ Kiel prave klarigas Kelly 2004, ĉap.5, aparte 224-5, komparu Kelly 1998, 161, Porena 2010, 557-8.

⁶² Diefenbach 1996, 51-2, Mitchell 2007, 102, Garnsey kaj Humfress 2001, 35, Whitby 2008, 81-2, Potter 2010, 32, komparu Stroheker 1970; la problemo pli gravis en la okcidento. La izoleco de la imperiestro grandigis la influon de la eŭnukoj, kiu fontis el ilia proksimeco de la estro kaj la kapablo kontroli aliron al li, vidu Schlinkert 1996, 237-84, Marcone 1998, 350-1, McCormick 2000, 151-3.

⁶³ Heather 2005, 341 (Markiano, vidu ankaŭ Hohlfelder 1984, 61, por pli da precizo), 398-9 (Majoriano), 373-4 (Valentiniano, komparu Stickler 2002, 79-83, Marotta 1993, 601), Malĥo, frg.18.3 (Zenono). Oni emas tro emfazi la nevolemon de la imperiestroj okupiĝi pri militaj kampanjoj persone, sed notindas ke eĉ Teodozio la dua ŝajne antaŭvidis estri armeon – tiun, kiun oni sendis okcidenten en 425 por instali Valentinianon sur la tronon. Pro malsano li devis rezigni pri la projekto, sed, kiam en Konstantinopolo li aŭdis pri la sukceso de la kampanjo, li tuj ekkondukis procesion de la hipodromo al la preĝejo. Vidu Sokr. *HE* 7.24, Millar 2006, 54-5.

⁶⁴ La latina vorto *foedus*, de kie venas federado, federacio, signifas ‘traktato’. *Foederati* tiel aludas homojn, kiuj ligiĝis al la imperio per traktato.

⁶⁵ Drinkwater 1992, 216-17, vidu ankaŭ Rubin 1995, 150-6; Salviano, *De Gub. Dei*, 5.24-6. Malĥo, frg.18.4.10-11, emfazas la indiferentecon de Zenono kaj lia edzino fronte al la suferado de la enloĝantoj de la balkanaj provincoj.

⁶⁶ Matthews 1975, 330-1, 337-8 (Gaŭlio), komparu Halsall 2007, 226-8 (pri Hispanio), Malĥo, frg.20 (Tesaloniko), komparu Whitby 2008, 93. Pli ĝenerale pri la perfido de imperiestroj rilate provincajn vidu Ward-Perkins 2005, 54-7.

al Danubo, redonu al Atilo la romiajn kaptitojn, kiujn ĝi liberigis de lia administrado.⁶⁷ Paradokse, tamen, la granda krizo, en kiu baraktis la okcidenta imperio, samtempe devigis la imperiestron permesi al liaj regatoj sin ekipi per armiloj, ekzemple por ke la italoj povu sin defendi kontraŭ la vandaloj post ilia konkero de norda Afriko.⁶⁸ La ofta kunlaboro inter la imperiaj instancoj kaj eksteraj popoloj kontraŭ la interesoj de la imperianoj kompreneble provokis lokan kontraŭstaradon kaj eĉ semis konfuzon pri tio, kiel decidi kiamaniere oni restu lojala al Romo: ĉefon kiel Egidio en Gaŭlio, ekzemple, oni nomas kaj romia generalo kaj reĝo de la romianoj (*rex Romanorum*), kaj kvankam tiu iam fidele servis la imperiestron Majoriano, li kontraŭis lian posteulon Libio Severo, kies ĉeffunkciulo en Gaŭlio Agripino ŝajne kunlaboris kun la visigotoj.⁶⁹ Kiam la fora imperiestro ŝajnis ne atenti la bezonojn lokajn, oni ne surpriziĝas ke la provincaj elitoj (en Gaŭlio) trovis alian vojon por konservi sian ĉefan rolon kaj ian romiecon, eventuale aŭ per surtronigo de uzurpanto (ekz. Jovino aŭ Konstanteno (la tria)) aŭ per kunlaboro kun neromia reĝo.⁷⁰ Resume, malgraŭ la insistado de Valentiniano pri la graveco de la bonfarto de liaj imperianoj, estas evidente ke imperiestroj konkludis ke pli gravas iliaj militaj aliancanoj kaj financaj aspektoj ol la interesoj de la regatoj.

La enloĝantaro de la imperiaj ĉefurboj, aliflanke, kapablis pli konsiderinde influi la imperiestron, kaj povis endanĝerigi lian daŭran enpostenadon, eĉ lian vivon. Tian situacion oni pli facile povas observi en la oriento, kie la popolo konstantinopola ne hezitis perforte agi por defendi siajn interesojn, ekzemple kiam ĝi atakis la gotajn soldatojn de Gaino (Gainas) en 399 aŭ kiam ĝi bruligis la sidejojn de la urba prefekto dum panomanko en 412.⁷¹ Ankaŭ la romia popolo konatis pro sia tumultemo: kiam la posteulo de Valentiniano la tria, Petronio Maksimo (Petronius Maximus), sin montris nekapabla defendi la urbon kontraŭ la vandaloj, lin fuĝantan mortigis la enloĝantaro.⁷² Aliflanke, en 472 la romianoj plene subtenis la imperiestron Antemio kontraŭ lia ĉefgeneralo Rikimero, kiu do blokadis la urbon kaj finfine ĝin kaptis.⁷³ La urbo Romo restis la povo-centro en Italio, malgraŭ dumtempaj forestoj de la imperiestra kortego en Milano kaj Raveno, kaj notindas ke, post la morto de Valentiniano (en Romo), liaj posteuloj elektis loĝi tie konstante, inter la potenca nobelaro kaj la urba enloĝantaro.⁷⁴ En la orienta imperio, konstante pli graviĝis alia elemento en la rilatoj inter la

⁶⁷ Prisko, frg.9.3, Thompson 1996, 210. Komparu Eŭnapion, frg.47, pri la enloĝantoj de Nikopolo, kiuj kuraĝe kaj propriniciate rezistis la barbarojn sub la regado de Teodozio la unua, rezignante jam pri imperia helpo.

⁶⁸ *Nov. Val.* 9 (440), Prisko, frg.39.1 (vandalaj rabekskursoj kontraŭ Italio), vidu ankaŭ Marotta 1993, 597, Ward-Perkins 2005, 48. Eŭnapio, frg.42.71-2, priskribante emocie la rabadon de la gotoj en Trakio, substrekas la senarmilecon de la enloĝantaro, komparu *Cod. Just.* 8.10.10 (420), leĝon, kiu celas fortikigi privatajn bienojn (en la oriento), kun Millar 2006, 72 kaj Greatrex kaj Lieu 2002, 36-7 (por angla traduko de la leĝo).

⁶⁹ Barnwell 1992, 14, MacGeorge 2002, ĉap.6, 298-300 (kie ŝi notas alian reĝon de la romianoj, kiun atestas epigrafo en Afriko ĉirkaŭ la jaro 508), Kitchen 2008, 133-7. Joh. Ant. frg.237.5 utiligas la helenan vorton *basileus* (imperiestro) kaj por Zenono, kaj por lia rivalo (do uzurpanto) Illuso.

⁷⁰ Kiel argumentis jam Wormald 1976, 221-2, vidu ankaŭ Barnwell 1992, 60-2. Wormald prave atentigas pri ĉi tiu fenomeno en la longa daŭro; oni povas citi la uzurpojn en Gaŭlio jam en la kvara jarcento, kiel tiuj de Silvano aŭ de Magnentio, eventuale eĉ la gaŭlan imperion en la tria. Komparu ankaŭ Brown 2012, 392-4, 405-6: lokaj nobeloj povis profiti de la estiĝo de loka kortego (de barbara reĝo).

⁷¹ Liebeschuetz 1990, ĉap.10, *Chronicon Paschale*, 571. Pri la eblo por imperiestro sin turni por subteno al la popolo vidu ankaŭ Börm 2010, 178-9.

⁷² Joh. Ant. frg.224.4, vidu Heather 2005, 378-9.

⁷³ Joh. Ant. frg.232, vidu Halsall 2007, 277-8.

⁷⁴ Pri la loĝado de la kortego, vidu Gillett 2001, aparte 162-5.

imperiestro kaj la ĉefurba enloĝantaro, tiu de doktrina ortodoksio kaj pieco. La imperiestro Markiano, ekzemple, eĉ je la fino de sia vivo insistis partopreni religiajn procesiojn piede (anstataŭ kaleŝe), kio devigis la patriarĥon sekvi lian precedencon. Tiaj publikaj elmontraj de pieco ludis gravan rolon por ligi la popolon (de la ĉefurbo, sed ankaŭ de la imperio pli vaste) al la imperiestro.⁷⁵ Necesas tamen ke li certigu ke la imperio ja estu ortodoksa kaj pia. Se okazis malsatoj, tertremoj aŭ aliaj katastrofoj, oni konkludis (laŭ komprenebla pensmaniero) ke li iel malsukcesas, ĉar evidente Dio malkontentas. Tial ofte sekvis tiajn eventojn persekutoj de herezuloj aŭ nekristanoj.⁷⁶

Sed kvankam ĉi tiu doktrina fadeno povis fortigi la imperiestran aŭtoritaton, ekzemple per la fakto ke ĝi malebligis al la arianaj barbaraj ĉefoj, kiel Asparo aŭ liaj filoj, surtroniĝi en 470, ĝi ankaŭ limigis la agadkampon de la imperiestro, se li volus solvi la doktrinajn disputojn, kiuj furoris en la orienta imperio. La uzurpanto Bazilisko efektive fiaskis en 476 pro la premo de la patriarĥo Akakio, la sanktulo Danielo la surkolona kaj la enloĝantaro de Konstantinopolo. La kontraŭ-kalcedonaj politikoj de Anastazio simile alfrontis pligrandiĝantan rezistadon en la frua sesa jarcento.⁷⁷ Ni revenos al ĉi tiu temo kiam ni diskutos la rolon de la eklezio. Sed unue necesas konsideri la militan flankon de la afero.

La soldataro

Kiel jam dirite, ne eblas ĉi tie priskribi la eventoplenan historion de la t.n. ‘barbaraj invadoj’. Substrekindas ĉiaokaze ke la kronologio de tiuj invadoj kaj bataloj iom ŝvebas: niaj fontoj malmultas kaj ilia precizeco dubindas. Sed necesas iomete diskuti ĉi tiun flankon de la malsamaj sortoj de la du imperieroj.

En la okcidento kaj en la oriento abundis neromiaj soldatoj kaj neromiaj ĉefoj en la kvina jarcento. Inter la plej konataj estas Atilo mem, evidente, Alariko la goto, la longviva orienta generalo Asparo, kiel ankaŭ la du gotaj estroj, kiuj ambaŭ nomiĝas Teodoriko, kiuj militis en la balkana regiono ĝis Teodoriko la ostrogoto kondukis sian armeon al Italio. Sed aliaj, ne tiom konataj, kiuj estris eble nur centojn da homoj, ankaŭ multe vagis tra la imperio kaj ludis gravan rolon: bela ekzemplo estas Saro (Sarus), gota ĉefo, malamiko de Alariko, kiu ĝenerale apogis la imperiestron Honorio, sed en 412 forlasis lin por subteni alian kandidaton al la trono. Historiistoj de la epoko multe laŭdas liajn kuraĝon kaj efikecon.⁷⁸ Ĉiuj tiuj generaloj almenaŭ dum ioma tempo okupis romian oficon, normale generalecon, sed samtempe ili restis la estroj de sia propra grupo (cetere pli varia ol oni iam supozis: ne temas pri klare difinitaj grupoj de gotoj, vandaloj k.s.). Oni povas konkludi, ke eĉ ĉi tiuj ‘malamikoj’ de la imperio ne vere ĝin kontraŭis; male, ili volis membriĝi en ĝi, same kiel la homoj, kiuj ilin sekvis dum ilia vagado tra Eŭropo. Memorigendas, ke Alariko disrabis la urbon Romo en 410

⁷⁵ Pri Markiano, Teofano, *Kroniko*, 109 (A.M. 5949), Whitby 2008, 76, komparu Teodozion la duan en 447 (notitan en n.30 supre) kaj vidu Wiemer 2004, 47, 51. Pri la pieco de la imperiestro vidu ankaŭ Diefenbach 1996, 53-60.

⁷⁶ Tendenco eĉ pli klara sub la regado de Justiniano en la sesa jarcento (vidu Martin 1984, 120, Greatrex 2008, 62 kaj n.25, Leppin 2011, 286-8, 341). Pri la kvina, vidu Millar 2006, 224-5, kiu citas *Nov. Theod.* 3 (438).

⁷⁷ Vidu ĝenerale Martin 1997, 54, 60-1, Martin 2001, 102-4, Elton 2009, 139-40, Millar 2006, 155-6. Pri Asparo kaj liaj filoj, Snee 1998, 183-6, Greatrex 2001, 75-6; pri Bazilisko, Pseŭdo-Zahario 5.1a kun Redies 1997, 217-18, Blaudeau 2006, 184-5. Pri Anastazio, Meier 2007, Dijkstra kaj Greatrex 2009. Diefenbach 1996, 60-2, reliefigas la apartan ortodoksan identecon de Konstantinopolo.

⁷⁸ *PLRE* 2, Sarus por lia biografio, ankaŭ Olimpodoro, frg.11, pri lia kompetento kaj liaj kelkcentaj soldatoj. Mitchell 2007, 168, prave substrekas la gravecon de la ĉesto de tiaj armitaj grupoj en la okcidento.

nur pro la malsukceso de intertraktado kun Honorio (kiu tiam loĝis en Raveno): li preferintus konkludi traktaton kun la imperiestro, por ke oni cedu al li kaj lia popolo terenon por ekokupi kaj kulturi.⁷⁹ Nur ok jarojn poste, la okcidenta imperio konkludis ĝuste tian traktaton, kaj tiel permesis al la visigotoj sin instali en okcidenta Gaŭlio; pri la precizaj aranĝoj, ekz. pri la demando ĉu la gotoj ricevis sian propran bienon aŭ nur la enspezojn de bieno, oni daŭre akre debatas.⁸⁰ Tiel komenciĝis tendenco, kiu pli ĝeneraliĝis en la sekvaj jaroj, kaj tiel la imperiestro perdis la direktadon de grandiganta proporcio de la okcidenta imperio. Ofta rimedo, kiel oni notis supre, estis dungado de iuj barbaroj por forigi aliajn, sed en la longa daŭro, ne surprizinde, tia solvo montriĝis neefika.⁸¹ La vivo de la sanktulo Severino, verkita de Eŭgipio, vive priskribas la konfuzan situacion en la provinco *Noricum* (moderna Bavario-Aŭstrio) en la jaroj 467-482, kiam la romiaj soldatoj, ne ricevinte sian salajron, decidis forlasi la limon kaj foriri al Italio; la provincoj faris sian eblon por defendi sin per dungado de aliaj soldatoj.⁸²

Oni rimarkas ke la divido inter romianoj kaj neromianoj ja estas malklara dum ĉi tiu periodo. Altrangaj neromianoj povis rekrutiĝi en la romian armeon, tiel profitante de salajro romia kaj de la provizoj liverigataj de la instancoj (kaj por la ĉefo kaj por liaj soldatoj). Iuj preferis plene integriĝi en la imperion, ekz. Fravitaso je la komenco de la kvina jarcento, aŭ, pli poste, Rikimero kaj Asparo; iuj tre fidele servis la imperion, sed persistis konstanta dubo inter iuj romianoj pri la fidindeco de ĉiuj, kiuj ne plene romianis, kio (ekzemple) perdigis Stiliĥon en 408.⁸³ Grava distingo inter la du imperieroj observeblas tamen. En la okcidento, tiaj altrangaj generaloj akaparis pli kaj pli da povo, kio kulminis en la kariero de Rikimero, kiu surtronigis kaj detronigis imperiestrojn laŭ sia bonvolo. Lia posteulo, Gundobado – ankaŭ la ĉefgeneralo en la okcidento – finfine rezignis pri sia posteno en 474 por fariĝi reĝo de la burgundianoj: evidente, li konkludis ke tia rolo pli gravas ol ĉefgeneraleco en la romia imperio.⁸⁴ En la oriento, aliflanke, la civila parto de la funkciularo ne cedis al la milita: dum en la okcidento la rolo de ĉefgeneralo eklipsis aliajn postenojn, en la oriento la civilaj ministroj okupis la ĉefajn rangojn. La imperiestro Leono la unua eĉ deklaris ke la jura profesio tiom gravas al la imperio kiom la armeo.⁸⁵ La evoluo de la krona ceremonio spegulis tian civiliĝon de la imperio: Leono estis la lasta imperiestro, kiun oni kronis ĉeeste de la armeo

⁷⁹ Heather 1991, 214-16, Halsall 2007, 216-17.

⁸⁰ Vidu la iom akran debaton en la artikoloj de Goffart 2010 kaj Halsall 2010; resumon oni trovas en Cameron 2012, 51-2, komparu Sarris 2011a, 39.

⁸¹ Vidu Halsall 2007, ĉap. 8 (kun utilaj mapoj), Cameron 2012, 53-4. Pri dungo kaj maldungo de barbaraj soldatoj, vidu ankaŭ Joh. Ant. frg.225-6 (pri gotoj sub Honorio). Finfine estis malfacile distingi dungitajn soldatojn disde invadantoj: vidu Whittaker 1994, 251.

⁸² Eŭgipio (Eugippius), *Vivo de Severino*, komparu Thompson 1982, ĉap.7, Whittaker 1994, 253, Kitchen 2008, 187-91.

⁸³ Vidu Elton 1996, Amory 1997, 278-91, elstara studo, kiu montras kiom similis ‘romianoj’ kaj ‘barbaroj’, el kiuj multaj originis en la balkana regiono. Pri antaŭjuĝoj kontraŭ Stiliĥo, O’Flynn 1983, 56-9.

⁸⁴ *PLRE* 2, Gundobad, Jones 1964, 175-6, O’Flynn 1983, 129-31, Barnwell 1992, 82-3, MacGeorge 2002, 269-75. Pri la akaparo de la povo fare de la generaloj, Flaig 1997, 21-2, kiu notas kiel ĝi subfosis tiun de la imperiestro, komparu MacGeorge, 300-1, kiu prave notas kigrade la granda povo de Rikimero anticipas la reĝan rolon de Odovakar kaj Teodoriko, Porena 2010, 576-7; ankaŭ, pli ĝenerale, O’Flynn 1983.

⁸⁵ Martin 2001, 88-9, prave emfazas tiun punkton, komparu Jones 1964, 342-3, Cameron 2012, 57. La deklaro de Leono, *Cod. Just.* 2.7.14 (469), kiun notas Barnish kaj aliaj 2000, 178. En la okcidento, malgraŭ ĉiuj politikaj problemoj, Valentiniano la tria strebis flegi la juran profesion kaj kuraĝigi tiujn, kiuj intencis eniri ĝin, Honoré 1998, 263-4.

ekster la urbo Konstantinopolo. Lian nepon kaj Zenonon kaj ĉiujn postajn imperiestrojn oni surtronigis en la hipodromo.⁸⁶ Egale grave, orientaj imperiestroj sukcesis sin liberigi de la influo de neromianoj: Asparo ja aranĝis la imperiestriĝon kaj de Markiano kaj de Leono, sed tiu lasta mortigis lin kaj liajn du filojn. La historiisto Malĥo klare priskribas kiel Leono tiom sukcesis: ‘Inter ĉiuj antaŭaj imperiestroj li ŝajnis esti la plej bonŝanca (sukcesa) kaj timiga al ĉiuj, kiuj loĝis en lia imperio kaj inter tiuj de la barbaroj, kiuj aŭdis pri li.’ Samtempe li raportas ke lia kromnomo estis ‘la buĉisto’.⁸⁷ Pro la diversaj faktoroj, kiujn ni supre kaj sube diskutas, orientaj imperiestroj pli potencis ol okcidentaj. Ne mankis uzurpantoj, nek en la okcidento, nek en la oriento, aparte en la tria kvarono de la jarcento (450-475), sed la orientaj imperiestroj, kiel Leono kaj Zenono, lerte kaj subtile ekspluatis la diferencojn inter la diversaj grupoj, kiuj volis domini, kaj oponigis unu al la alia. Zenono, ekzemple, strebis dividi la du Teodorikojn, por ke ili detruu unu la alian, kaj finfine sukcesis konvinki la ostrogoton, post la morto de lia rivalo, foriri al Italio; Leono kaj Zenono uzis la forton de la isaŭra popolo (kiu devenas de sudorienta hodiaŭa Turkio, kaj de kiu Zenono estis ano) por certigi ke la gotoj ne tro dominu la imperian politikon, dum Anastazio, la posteulo de Zenono, ĉesigis la grandan influon de la isaŭroj en la imperio per plurjara milito.⁸⁸

La ĉeesto de barbaroj ene de la imperio(j) ne nepre do kaŭzis ĝian falon, ĉar, kiel estas jam klare, la orienta parto sukcese travivis ĉi tiun periodon.⁸⁹ Pli gravis la grandiganta rolo de generaloj en la okcidento kaj la perfortaj luktoj por monopoligi la rolon de ĉefgeneralato – ofico, kiu finfine plene eklipsis ĉiujn aliajn. Ĉirkaŭ la jaro 400 okazis tiaj sangaj luktoj en Konstantinopolo: Rufino ne hezitis ekzekutigi siajn rivalojn kaj finfine suferis la saman sorton.⁹⁰ Certe, kiel ni ĵus rimarkigis, orientaj imperiestroj ne skrupulis pri la mortigo de rivaloj; la kazo de Leono bele bildigas tion. Sed dum en la oriento la imperiestroj ordonis mem la ekzekutojn, en la okcidento ili limiĝis preskaŭ al la rolo de spektantoj; oni cetere memoros, ke Valentiniano devis propramane mortigi Aetion, ĉar mankis al li la povo aŭ influo jure efektiviĝi la ekzekuton. La historiisto Olimpiodoro vive priskribas la situacion:

(La uzurpa imperiestro) Atalo (Attalus) riproĉis al Joviano lian proponon (ke oni forigu unu membron de la imperiestro Honorio), ĉar neniel estis kutime stumpigi imperiestron, kiu libervole demisiis de sia imperiestreco.... La potenco en Raveno iris al la *praepositus* (estro de la sankta dormo-ĉambro) Eŭzebio. Tamen, post sufiĉa tempo, pro la malico de Alobiĥo (Allobikhos) li mortis perbastone antaŭ la okuloj de la imperiestro laŭ publika dekreto. (frg.14.9-16)

⁸⁶ McCormick 2000, 158, Kolb 2001, 100-2, Lee 2013, 106-7.

⁸⁷ Malĥo, frg.3.1-4. Cameron 2012, 37, substrekas la kritikojn de tiutempanoj, sed la verdikto de Malĥo ne estas tute negativa. Barnish kaj aliaj 2000, 200-1, notas la neceson por la imperiestroj forigi tiujn, kies potenco tro grandis. Evidente, Asparo estis romiano plursence, ĉar li eĉ konsulis en 434 kaj ĉefrolis en la orienta imperio dum jardekoj, sed lia neromieco ja estis klara (oni nomas lin alano aŭ goto) al ĉiuj observantoj, kion konfirmis lia aria fido. Vidu supre, n.46, pri la malfacileco por imperiestro flankenigi aŭ mortigi eminentulojn. Pri la kazo de Leono, vidu ankaŭ Lee 2013, 98-9.

⁸⁸ Vidu (ekzemple) Heather 1991, ĉap.8-9.

⁸⁹ Kiel prave rimarkigas Cameron 2012, 85. Vidu ankaŭ mian diskuteton pri ĉi tiu temo (en Esperanto) en Greatrex 2008, 58-9.

⁹⁰ Zosimo 4.52 pri la mortigo de du altranguloj per la komplotado de Rufino; Liebeschuetz 1991, ĉap.6-10, Flaig 1997, 24, Mitchell 2007, 95-6, Cameron 2012, 22-3, 25-6 pri la luktoj en Konstantinopolo tiutempaj.

La vivo ĉe la okcidenta kortego oble pli danĝeris ol en la oriento: Stiliĥo plej probable respondecis pri la mortigo de la afrika ĉefo Maskezelo, kvankam tiu venkis sian propran fraton Gildon kaj tiel rekaptis la regionon por la imperiestro Honorio. Aetio mortigis sian rivalon Felikson por fariĝi ĉefgeneralo; poste li atakis Bonifacon kaj lin eliminis. En Gaŭlio multaj uzurpoj kaj internaj luktoj; same en Hispanio kaj Britio.⁹¹ Konklude, en la okcidento oni povus diri ke la konfliktoj por domini la restantajn teritoriojn akriĝis malgraŭ ilia ŝrumpado; ĉiu pretendanto deziris sole ĉion regi, de Stiliĥo ĝis Rikimero.⁹² Intertempe la barbaroj enmiksiĝis, surtronigis siajn proprajn kandidatojn kaj edziĝe strebis integriĝi en la romian imperiestran dinastion: Ataŭlfo edziĝis al Galo Plakidio (Galla Placidia) en 414, la reĝo Huneriko la vandalo, la filo de Gejseriko, edzinigis Eŭdokion (Eudocia) iam post 455. Malgraŭ tio, kion oni povus unue pensi, ĉiuj tiuj grupoj ŝajne ne celis la malaperigon de la romia imperio: male, ili deziris eniri ĝin, ekokupi sian parton kaj eĉ transpreni la regadon. Sed kiel infanoj, kiuj ĉiuj deziras posedi belan tukon, ili finfine nur deŝiris ĝin, tiel ke nenio – aŭ preskaŭ nenio – restis.⁹³ En la oriento, aliflanke, malofte unu persono sukcesis akapari la povon: ĝenerale temis pri grupo da gravaj korteganoj, eĉ kiam regis la juna Teodozio la dua.

Aliaj faktoroj ludis rolon, ekzemple la geografio: la muroj de Konstantinopolo protektis la pli grandan parton de la orienta imperio de invadantoj en orienta Eŭropo. Sed por fini ĉi tiun sekcion, necesas lumigi unu alian aferon, kiu (laŭ iuj) klarigas la tiom malsamajn sortojn de la du imperioj. Ĉu la oriento fakte kontribuis al la kolapso de ĝia partnero? La bone konata franca milita historiisto Yann Le Bohec proponas tian teorion, kaj asertas ke ‘la estroj de la oriento puŝis ilin (la gotojn post ilia venko je Adrianopolo en 378) okcidenten, al regiono kiun ili supozis por ĉiam perdita’. Li aludas ĉefe la armeon de Alariko, kiun li diskutas alikoke, kiu ja forlasis la balkanan regionon ĉirkaŭ 399 kaj strebis invadi Italion.⁹⁴ Tia interpreto, tamen, ne nur ne konvinkas, sed eĉ kontraŭas la indikojn de la fontoj. Kiel ni jam vidis, kaj Teodozio la dua kaj Leono plurfoje sendis armeojn okcidenten, ĝuste por apogi la okcidentan imperion – aŭ almenaŭ por antaŭenigi siajn proprajn interesojn per helpo al la okcidento. Alariko forlasis la orienton pro pluraj kialoj, kaj ĉiaokaze revenis al la balkanoj post kelkaj jaroj; rivalecoj inter la kortegoj de Honorio kaj Arkadio certe ludis rolon en liaj decidoj, sed ne eblas paroli pri konsekvenca imperia politiko.⁹⁵ Same memorendas la evidenta ĝojo de Teodozio, kiam li aŭdis pri la venko de la uzurpanto Johano en 425, kaj la kontento de Leono,

⁹¹ Halsall 2007, ĉap.8, Cameron 2012, 43. Zosimo 5.11.5 pri la mortigo de Maskezelo.

⁹² La temo de la laŭdinda libro de O’Flynn 1983; vidu ankaŭ tiun de MacGeorge 2002 kaj ŝian konkludon, 304.

⁹³ Pri Huneriko kaj Eŭdokio (Eudocia), Heather 2005, 395-6, Kitchen 2008, 140: Gejseriko poste subtenis la imperiestriĝon de Olibrio, kies edzino estis Plakidio (Placidia), la fratino de Eŭdokio. Vandala reĝo do estus bofrato de romia imperiestro. Pri Ataŭlfo kaj Galo Plakidio, Heather 2005, 239-40, Halsall 2007, 224-6, Cameron 2012, 51; anekdoto de la eklezia historiisto Orosio (7.43.4-6) pretendas, ke Ataŭlfo volis subteni la romian imperion per sia forto (ĉar la necivilizaj gotoj bezonis juran kadron). Ĝenerale, Barnwell 1992, 14-15, Kitchen 2008, 71, 139-41, 284-5, kies trafan konkludon mi spegulas.

⁹⁴ Le Bohec 2006, 161, 205, 218 (listo de la kaŭzoj de la falo de la okcidento), kun miaj komentoj en Greatrex 2007, 380, 382. Ĵordano, *Getica*, 146, aludas la ĉesigon de la subvencio pagita de *ambaŭ* imperioj al Alariko kiel motivon pro lia decido iri okcidenten. Vidu ankaŭ Mitchell 2007, 89-92. Pri la muroj de Konstantinopolo, vidu Greatrex 2008, 58-9, Luttwak 2009, 67-77.

⁹⁵ Kitchen 2008, 153-62, reliefigas la ŝanĝiĝemon de la politiko de la oriento rilate la okcidenton, sendube ligita al ŝanĝiĝanta takso de ĝiaj propraj interesoj. Pri la moviĝado de Alariko kaj liaj soldatoj, vidu (ekzemple) Heather 1991, 206-18, Cameron 2012, 51: kiel Heather substrekas, li ĉefe celis la instalon de siaj soldataj sur iu tereno en la imperio laŭ traktato kun la instancoj.

kiam lin atingis la bildoj de la okcidenta imperiestro Antemio, kaj kiujn li tuj cirkuligis tra la oriento.⁹⁶

Estas vere, ke Atilo ankaŭ ĉesis elpremi tributon el la orienta imperio je la fino de la 440aj jaroj kaj preferis ataki la okcidenton, sed pri tiu decido respondecis nek Teodozio la dua nek Markiano; la tiutempaj fontoj proponas kelkajn eblecojn, kiel ekzemple inviton de la fratino de Valentiniano la tria, Justa Grata Honoria, ke la huna reĝo ŝin edzinigu, sed pli verŝajne Atilo jam konsideris plurajn eblojn en tiu periodo kaj trovis plurajn pretekstojn por invadi Gaŭlion. La decido de Markiano ĉesi pagi la tributon al Atilo okazis jam post lia decido iri okcidenten; kaj la kampanjo de Markiano kontraŭ la huna imperio en 452 probable helpis la okcidentan imperion, ĉar ĝi sendube devis delogi la atenton de Atilo de liaj okcidentaj projektoj.⁹⁷ Necesas konkludi, ke, kvankam la politiko de orientaj imperiestroj variis, ĝenerale la orienta imperio preferis subteni sian pli malfortan ĝemelon; kaj nur post la malapero de imperiestroj en la okcidento Zenono forsendis Teodorikon al Italio.

La eklezio kaj la ŝtato

Ne eblas troigi la gravecon de ekleziaj aferoj kaj de la multnombraj funkciuloj de la eklezio tra la imperio. En la kortego oni samtempe diskutis ŝtatajn kaj ekleziajn aferojn: ne ekzistis evidenta divido inter la du, kvankam ni hodiaŭ tiom al kutimiĝis al ilia malsameco. Altrangaj generaloj kaj korteganoj korespondis kun episkopoj kaj pri doktrinoj, kaj pri impostoj. Dum la kvina jarcento episkopoj pligrandigis sian influon kaj povis esperi ricevi de la imperiestro konkretajn avantaĝojn por sia episkopujo. Teodoreto de Ciruso (Cyrillus), ekzemple, petis malplialtigon de la impostoj de sia episkopujo, dum Sinesio (Synesius), kiam li episkopiĝis en Ptolemaiso en 410, strebis atentigi la instancojn pri la neceso protekti sian gregon. La patriarĥo Nestorio eĉ arogante promesis al Teodozio la dua venkon kontraŭ la persoj se oni permesus al li okupiĝi pri la ortodoksigo de la imperio. En la okcidento, Germano de Aŭkcero (Auxerre) vojaĝis al Raveno por peti ke oni defendu la armorikanojn de la atakoj de la alanoj, al kiuj Aetio estis asignita terenon.⁹⁸ Sammaniere kiel la ekleziuloj ekaktivis en politikaj sferoj, generaloj kaj korteganoj komencis enmiksiĝi en ekleziajn: la grafo de la *domestici* (speco de soldato, *comes domesticorum*) Kandidiano (Candidianus) prezidis la koncilion de Efezo en 431, dum lia kolego, la grafo de la sanktaj elspezoj (*comes sacrarum largitionum*) Johano helpis efikigi ĝiajn decidojn. Soldatojn oni ja bezonis por realigi decidojn faritajn je koncilioj: Markiano devis forsendi taĉmentojn al Aleksandrio post la koncilio de Kalcedono

⁹⁶ Vidu n.49 pri la ĝojo de Teodozio. Pri tiu de Leono (en 467), Konstantino Porfirogenito, *De Cerimoniis*, 1.395-6, citita kaj tradukita (en la anglan) de Kaegi 1968, 37. Anekdoto pri afrika sklavino Maria, kiun liberigis kelkaj soldatoj en la oriento por ke ŝi reiru al la okcidento, kie ŝia patro guberniestris, atestas pri solidareco iaspeca, eĉ se iuj en la oriento profitis de la malstabiligo de la okcidento. Vidu Kaegi 1968, 248-50.

⁹⁷ Heather 2005, 333-7, pri la motivoj de Atilo. Hidatio, *Kroniko*, red. Burgess, 146 (p.102-3), pri kampanjo kontraŭ la Hunoj en 452, sed komparu *PLRE* 2, Aetius – la generalo Aetio probable ne estas la famekonata Aetio. Sed la notico en Hidatio estas problemlena, ĉar ĝi ŝajnas (al mi) indiki du kampanjojn samtempajn, el kiuj la unuan estris Aetio en la okcidento, dum duan estris Markiano en la Balkanoj.

⁹⁸ Pri Teodoreto, Millar 2006, 29, 146-7, Schor 2011, ĉap. 6-7; pri Sinesio, Millar 2006, 59-61, 215-16; pri Germano, Konstantio, *Vita Germani*, ĉap.28-40, Matthews 1975, 337, Mathisen 1993, 97-102. Pri Nestorio, Sokr. *HE* 7.29.5 kun Millar 2006, 39, Greatrex kaj Lieu 2002, 259. Notindas ankaŭ la kazo de la episkopo Apiono de Sieno (Syene) en suda Egiptio, kies petskribo al Teodozio la dua konserviĝis: li alskribis la imperiestron por peti ke oni protektu liajn preĝejojn kontraŭ barbaraj atakoj. Vidu Millar 2004, 575, Millar 2006, 22-3, Wipszycka 2007, 339-40. Pli ĝenerale, vidu Feissel 2006, 89, aparte pri la ebla kontestado de la imperiestro pro supozitaj hereziaj kredoj; ankaŭ Hunt 1998, 269-70, McCormick 2000, 155.

kiam la urbanoj perforte kontraŭstaris la patriarĥon Proterion, kiu akceptis ĝiajn decidojn.⁹⁹ En tia kunteksto indas substreki la konsiderindajn rimedojn pri kiuj disponis la patriarĥo Cirilo de Aleksandrio. Ilin klare atestas listo da donacoj senditaj al korteganoj en Konstantinopolo, sed li povis ankaŭ profiti de la subteno da pluraj centoj da *parabalani*, t.e. brankardistoj aŭ banujaj servistoj, kiuj efektive rolis kiel gardistoj, kaj kiuj ĉiam pretis kontraŭstari eĉ imperiajn soldatojn. La eklezio en Konstantinopolo disponis je 1500 funkciuloj varispecaj. Ni informiĝas pri tiaj grandaj ciferoj pro imperiaj leĝoj, kiuj celis limigi la nombron da tiaj uloj, sed kiuj ŝajne nur malfacile aplikiĝis.¹⁰⁰ La imperiestro devis konstante batali, por ke li ne perdu tro da povo, ĉu ekonomia, ĉu politika, al la eklezio, ĉar fruaj kristanaj imperiestroj kiel Konstanteno sin montris tre donacemaj tiurilate; pro tio ĝi profitis de gravaj impostimunecoj, kio (ekzemple) stimulis fortan interesiĝon de riĉuloj pri pastraj, eventuale episkopaj, karieroj. En la kvina jarcento, necesis do bremsi la patronan forton de la eklezio, same kiel tiun de la nobeloj.¹⁰¹

La enradikiĝo de la kristana fido inter la enloĝantaro de la imperio tiel ne nepre estis senproblema beno por la imperiaj instancoj. Unuflanke, kristanismo, kaj pli specife ortodoksa (tiel kiel oni aprobis ĝin je la koncilio de Niceo en 325) kristanismo, povis roli kiel ilo por certigi la lojalon de imperianoj kaj aliaj homoj. Je la orienta limo de la imperio, oni ekspluatis ĝin por allogi arabajn aliancinojn, ekzemple; en la okcidento, ĝi solidarigis tiujn, kiuj rezistis la arianajn Vandalojn post ilia konkero de norda Afriko.¹⁰² Aliflanke, la malsimpleco kaj dusenceco de ĝiaj doktrinoj, same kiel ĝiaj ĉionregaj tendencoj, ekigis akrajn disputojn kaj poste persekutojn. Plie, en la okcidento la eklezio kreske elglitis la regokapablon de la imperiestro. Kvindek jarojn post kiam Ambrozo devigis al Teodozio la unua pentofari pro la masakro, kiun li ordonis en Tesaloniko, Valentiniano la tria cedis al la episkopo de Romo (la papo) la rajton leĝodoni. Antaŭ la fino de la jarcento, la papo Gelazio la unua (492-496) insistis pri la prioritato de la eklezio antaŭ la ŝtato, doktrino kun eventoplena estonteco.¹⁰³

Konkludo

La romia ŝtato daŭre restis potenca estaĵo en la kvina jarcento – aŭ eble oni devus diri la romiaj ŝtatoj, ĉar kvankam la orientaj kaj okcidentaj imperioj ja emfazis sian unuecon, ekzemple per la prezentado de la teodozia kodo en la okcidento kaj per la daŭra leĝofarado laŭ la nomo de ĉiuj regantaj imperiestroj, ne mankis kvereloj. La romia administra sistemo probable estis pli vasta kaj komplika ol iam ajn antaŭe, kio malfaciligis la vivon de imperiestroj, kiuj deziris ŝanĝi kaj plibonigi ĝin. La orienta imperiestro daŭre kapablis mobilizi sufiĉajn soldatojn por defendi sian teritorion, kaj ankaŭ eĉ por interveni plurfoje en la okcidento. Se iu kampanjo

⁹⁹ De Ste Croix 2006, 261, 285-90 (pri laikuloj je la koncilio de Kalcedonio), Elton 2009, 144, Chadwick 2001, 535-6; Prisko, frg.28, Evagrio, *HE* 2.5 (pri Proterio), Chadwick 2001, 588. Pli ĝenerale, pri la enplektiĝo de laikuloj en la eklezion, vidu Millar 2006, 160. Vidu ankaŭ MacMullen 2003, 480-1, pri la oftaj soldataj intervenoj en ekleziajn aferojn.

¹⁰⁰ Jones 1964, 220-1, 346, Brown 1992, 102, 116, Hunt 1998, 263, Millar 2006, 141, Elton 2009, 140. Pri la perforta temo, vidu Whitby 2006, 452-3, MacMullen 2003, 482-3, MacMullen 2006, 480-1.

¹⁰¹ Hunt 1998, 260, 275, pri la privilegioj de la eklezio, komparu Cameron 2012, 96.

¹⁰² Malĥo, frg.1, Millar 2006, 67, Fisher 2011, 34-9, pri la araboj; Cameron 2000, 555, Sarris 2011a, 91-3, pri norda Afriko.

¹⁰³ *Nov. Val.* 17 (445), Flaig 1997, 26, Martin 1997, 50, Chadwick 2001, 603-4. Vidu ankaŭ Millar 2011, 403-4, pri la graviĝanta rolo de la papoj en la kvina jarcento. Pri la problemoj, kiujn spertis orientaj imperiestroj en siaj rilatoj kun la eklezio, vidu supre n.77 kaj komparu Whitby 2008, 84-5.

kontraŭ la vandaloj estus sukcesinta, estas tute legitime supozi ke oni povintus haltigi la ŝrumpadon de la okcidenta imperio kaj eviti ĝian falon.¹⁰⁴

Tamen ambaŭ imperioj alfrontis gravajn strukturajn malfacilaĵojn. Kiel lerte argumentas Ceconi, la imperiaj instancoj (en la okcidento) ne kapablis efektivi la politikojn bezonatajn por refortigi la imperion ĉar ili certe tiel forigus la ĝeneralan konsenton, kiu necesis por sukcese regi, t.e. la kunlaboron de funkciuloj kaj nobeloj. Sed tiuj grupoj ĉiaokaze malkontentiĝis, dum aliaj, ekzemple la imperianoj ĝenerale, sin trovis pli kaj pli premitaj de la impostistoj, eĉ transdonitaj al eksteraj popoloj.¹⁰⁵ Iom post iom malaperis la armeo en la okcidento, ĉar la imperiestroj kaj la ĉefgeneraloj (kiel Stiliĥono kaj Aetio) sin turnis pli kaj pli al eksteruloj por administri imperiajn provincojn. Temas pri iaspeca freneza subkontraktado, oni rajtus diri. Sed tiaj ‘barbaraj’ armeoj relative pli fidindis ol la bienula nobelaro, kiu konstante strebis defendi siajn proprajn interesojn, fajfante pri la petoj de Valentiniano. Plie, en kunteksto en kiu neromianoj povis surtronigi siajn proprajn imperiestrojn, kiel faris Alariko kaj Ataŭlfo en la kazo de Prisko Atalo (Priscus Attalus), aŭ Rikimero en la kazo de pluraj regantoj en Italio, tiutempanoj apenaŭ povis distingi inter imperiestroj, uzurpantoj kaj reĝoj – jam antaŭ la pensiiĝo de la lasta ‘imperiestro’.¹⁰⁶ Regionaj retoj de nobeloj kaj de patroneco, ĉu laika, ĉu eklezia, anstataŭis la imperiajn retojn: la senato kaj la episkopoj povis travivi sen imperiestro. En la oriento, aliflanke, la pluraj ŝtatrenversoj, kiuj ŝancelis la imperion dum la regado de Zenono, paradokse atestas la daŭran gravecon de la imperiestreco – ne ‘krizon pri aŭtoritato je la kerno de la imperiestra ofico’.¹⁰⁷ Male, tiom interplektiĝis la ŝtato kaj la eklezio ke ne plu imageblis ke povis regi la orientan imperion alia persono ol pia, ortodoksa imperiestro – kaj en tiu punkto troviĝas la fonto de ĝia supervivo.¹⁰⁸

Bibliografio

Mallongigoj

CAH, Cambridge Ancient History, volumo 13, *The Late Empire, A.D. 337-425*, red. Averil Cameron, P. Garnsey (Kembriĝo, 1998), volumo 14, *Late Antiquity: Empire and Successors, A.D. 425-600*, red. Averil Cameron, B. Ward-Perkins, M. Whitby (Kembriĝo, 2000).

FCH, The Fragmentary Classicising Historians of the Later Roman Empire, red. kun angla traduko, R.C. Blockley (Leeds, 1981-3).

PLRE 2, Prosopography of the Later Roman Empire, red. J. Martindale, volumo 2 (Kembriĝo, 1981).

Antikvaj verkoj

Chronicon Paschale (Paska kroniko), red. L. Dindorf, CSHB (Bonn, 1832); angla tr. de M. kaj M. Whitby, *Chronicon Paschale 284-628 AD* (Liverpolo, 1989).

Cod. Iust. Codex Justinianus, red. P. Krueger, 11^a eld. (Berlino, 1954).

¹⁰⁴ Kiel elokvente proponas Heather 2005, 396-7.

¹⁰⁵ Ceconi 2005, 300-4. Oni konstatas ke Valentiniano kaj Salviano priplendas la saman fenomenon – la fakton, ke la riĉuloj sukcesas deturni la impostojn al la malpli riĉaj. Komparu *Nov. Val.* 15.1 (440/1), 10.2-3 (441) kaj Salvianon, *De Gub. Dei* 5.28-31, kiuj ĉiuj insistas ke la riĉuloj devas pli kontribui al la ŝtato.

¹⁰⁶ Matthews 1975, 396-7 (rimarkoj de 1990), Mann 1979, 183, Ceconi 2005, 300-4, Kitchen 2008, 284-9, Sarris 2011a, 55.

¹⁰⁷ Citaĵo de Sarris 2011a, 128.

¹⁰⁸ Mi kore dankas Simon Davies pro lia kontrolado kaj engaĝigo de la teksto. Pri restantaj eraroj kulpas mi.

- Cod. Theod. Codex Theodosianus*, red. T. Mommsen, 3^a eld. (Berlino, 1962), angla tr. C. Pharr. (Princeton, 1952).
- Corpus Inscriptionum Latinarum*, red. T. Mommsen kaj aliaj. (Berlino, 1863-).
- Eŭgipio (Eugippius), *Vita Sancti Severini*, red. kun germana tr. T. Nesselin (Stutgarto, 1986).
- Eŭnapio (de Sardo), fragmentoj, *FCH*, vol.2, 6-127.
- Joh. Ant. Johano de Antioĥo, fragmentoj, red. kun angla traduko S. Mariev (Berlino-Novjorko, 2008).
- Kasiodoro, *Variae*, red. Th. Mommsen, *MGH AA*, vol. 12 (Berlino, 1894), kun nekompleta angla tr. S. Barnish (Liverpolo, 1992)
- Konstantino Porfirogenito, *De Cerimoniis*, red. J.J. Reiske, CSHB (Bonn, 1829), represita kun angla traduko de A. Moffatt kaj M. Tall (Kanbero, 2012).
- Konstantio (Constantius), *Vita Germani*, red. R. Borius, *Vie de saint Germain d'Auxerre*, SC 112 (Parizo, 1965).
- Malĥo (de Filadelfio), fragmentoj, *FCH*, vol.2, 404-55.
- Nov. Maj. Leges Novellae Divi Maiorani*, en *Leges Novellae ad Theodosianum pertinentes*, red. P. Meyer, 3^a eld. (Berlino, 1962), 156-78, tr. Pharr (kiel sub *Cod. Theod.*).
- Nov. Marc. Leges Novellae Divi Marciani*, en *Leges Novellae ad Theodosianum pertinentes*, red. P. Meyer, 3^a eld. (Berlino, 1962), 181-202, tr. Pharr (kiel sub *Cod. Theod.*).
- Nov. Just. Justiniano, Novellae* en *Corpus Juris Civilis* vol.3, red. R. Schoell kaj W. Kroll, 6^a eld. (Berlino, 1954).
- Nov. Theod. Leges Novellae Divi Theodosii*, en *Leges Novellae ad Theodosianum pertinentes*, red. P. Meyer, 3^a eld. (Berlino, 1962), 3-68, tr. Pharr (kiel sub *Cod. Theod.*).
- Nov. Val. Leges Novellae Divi Valentiniani* en *Leges Novellae ad Theodosianum pertinentes*, red. P. Meyer, 3^a eld. (Berlino, 1962), 73-154, tr. Pharr (kiel sub *Cod. Theod.*).
- Olimpiodoro (de Tebo, Egiptio), fragmentoj, *FCH*, vol.2, 152-208.
- Prisko (de Paniono), fragmentoj, *FCH*, vol.2, 222-376.
- Pseŭdo-Zaĥario de Mitileno, *Kroniko*, red. kun latina traduko E.W. Brooks *Historia ecclesiastica Zachariae Rhetori vulgo adscripta*, 4 volumoj, CSCO Scr. Syr. 38-9, 41-2 (Parizo, 1919-24), angla tr. de R. Phenix kaj C. Horn, red. G. Greatrex, *The Chronicle of Pseudo-Zachariah Rhetor* (Liverpolo, 2011).
- Salviano, *De Gub. Dei. De Gubernatione Dei* ('Pri la regado de Dio'), red. kun franca traduko G. Lagarrigue (Parizo, 1975).
- Severiano (de Gabalo), *Homilio pri la kreo de la mondo*, PG 56: 429-99.
- Sokrato, *Historia Ecclesiastica*. Socrates, *Kirchengeschichte*, red. G.C. Hansen, GCS (Berlino, 1995). Franca tr. P. Périchon kaj P. Maraval, SC 477, 493, 505-6, 4 volumoj (Parizo, 2004-7).
- Teofano, *Kroniko*. Theophanes, *Chronographia*, red. C. de Boor (Leipzig, 1883), angla tr. C. Mango kaj R. Scott, *The Chronicle of Theophanes Confessor* (Oxford, 1997).
- Zosimo, *Historia Nova*, red. kaj tr. F. Paschoud, 6 volumoj (Parizo, 1979 (II, 1-2), 1986 (III, 1), 1989 (III, 2), 2000 (I, 2^a eld.)).

Modernaj studoj

- Amato, E. (red.). 2010. *Rose di Gaza. Gli scritti retorico-sofistici e la Epistole di Procopio di Gaza*. Alessandria.
- Amory, P. 1997. *People and Identity in Ostrogothic Italy, 489-554*. Kembriĝo.
- Bagnall, R., red. 2007. *Egypt in the Byzantine World, 300-700*. Kembriĝo.
- Banaji, J. 2001. *Agrarian Change in Late Antiquity*. Oksfordo.
- Bang, P. 2009. Recenzo de Sarris 2006 en *JRA* 22: 800-2.
- Barnish, S. 1988. 'Transformation and Survival in the Western Senatorial Aristocracy, c. A.D. 400-700', *PBSR* 56: 120-55.

- Barnish, S., Lee, A.D., Whitby, M. 2000. 'Government and administration', *CAH XIV*: 165-206.
- Barnwell, P. 1992. *Emperors, Prefects and Kings*. Londono.
- Blaudeau, P. 2006. *Alexandrie et Constantinople (451-491). De l'histoire à la géo-ecclésiologie*. Romo.
- Börm, H. 2010. 'Herrscher und Eliten in der Spätantike' en H. Börm kaj J. Wiesehöfer (red.), *Commutatio et Contentio. Studies in the Late Roman, Sasanian, and Early Islamic Near East*. Duseldorf: 159-98.
- Brodka, D. 2012. 'Priskos von Panion und Kaiser Marcian. Eine Quellenuntersuchung zu Procop. 3,4,1-11, Evagr. HE 2,1, Theoph. AM 5943 und Nik. Kall. HE 15,1', *Millennium* 9: 145-62.
- Brown, P. 1988. *Power and Persuasion in Late Antiquity*. Madison, Viskonsino.
- Brown, P. 2000. 'The Study of Elites in Late Antiquity', *Arethusa* 33: 321-46.
- Brown, P. 2012. *The Eye of a Needle. Wealth, the Fall of Rome, and the Making of Christianity in the West, 350-550 AD*. Princeton.
- Burgess, R.W. 1993/4. 'The Accession of Marcian in the Light of Chalcedonian Apologetic and Monophysite Polemic', *BZ* 86-7: 47-68.
- Cameron, Averil. 2012. *The Mediterranean World in Late Antiquity, AD 395-700*. Abingdon.
- Carandini, A., kaj aliaj (red.). 1993. *Storia di Roma*, vol.3.1, *L'età tardoantica*. Torino.
- Cecconi, G., 2005. 'Conscience de la crise, groupements de pression, idéologie du *beneficium*: l'état impérial tardif pouvait-il se réformer?' *AnTard* 13: 281-304.
- Chadwick, H. 2003. *The Church in Ancient Society. From Galilee to Gregory the Great*. Oksfordo.
- Croke, B. 2001. *Count Marcellinus and his chronicle*. Oksfordo.
- De Ste Croix, G.E.M. 2006. *Christian Persecution, Martyrdom and Orthodoxy*. Oksfordo.
- Delmaire, R. 1995. *Les institutions du bas-empire romain de Constantin à Justinien. Les institutions civiles palatines*. Parizo.
- Demandt, A. 1997. 'Grenzen spätrömischer Staatsgewalt', en Paschoud kaj Szidat (red.): 155-63.
- Diefenbach, S. 1996. 'Frömmigkeit und Kaiserakzeptanz im frühen Byzanz', *Saeculum* 47: 35-66.
- Dijkstra, J.H.F. kaj Greatrex, G. 2009. 'Patriarchs and politics in Constantinople in the reign of Anastasius (with a Reedition of *O. Mon. Epiph.* 59)', *Millennium* 6: 223-64.
- Drinkwater, J.F. 1992. 'Bacaudae of fifth-century Gaul', en Drinkwater kaj Elton (red.): 208-17.
- Drinkwater, J.F. kaj Elton, H., red. 1992. *Fifth-Century Gaul. A Crisis of Identity?* Kembriĝo.
- Elton, H. 2009. 'Imperial Politics at the Court of Theodosius II', en Cain, A. kaj Lenski, N. (red.), *The Power of Religion in Late Antiquity*. Aldershot: 133-42.
- Faulkner, N. 2000. *The Decline and Fall of Roman Britain*. Londono.
- Feissel, D. 2006. 'L'empereur et l'administration impériale' en Morisson, C. (red.), *Le Monde byzantin*. Parizo: 79-110.
- Flaig, E. 1997. 'Für eine Konzeptionalisierung der Usurpation im spätrömischen Reich' en Paschoud kaj Szidat (red.): 15-34.
- Garnsey, P. 2010. 'Roman Patronage' en Sogno, McGill kaj Watts, red.: 33-54.
- Garnsey, P. kaj Humfress, C. 2001. *The Evolution of the Late Antique World*. Kembriĝo.
- Gillett, A. 2001. 'Rome, Ravenna and the last Roman Emperors', *PBSR* 69: 131-67.
- Goffart, W. 2010. 'The Technique of Barbarian Settlement in the Fifth Century: A Personal, Streamlined Account with Ten Additional Comments', *Journal of Late Antiquity* 3: 65-98.
- Goldsworthy, A. 2009. *The Fall of the West*. Londono.
- Greatrex, G. 1997. 'The Nika riot: a reappraisal', *JHS* 117: 60-86.
- Greatrex, G. 2001. 'Justin I and the Arians', *Studia Patristica* 34: 72-81.
- Greatrex, G. 2008. 'Prokopio de Cezareo, enigma historiisto de la epoko de Justiniano' en Vergara, J.A. (red.), *Aktoj de la IKU, 61a sesio*. Roterdamo: 58-72.
- Greatrex, G. 2013. 'Government and Mechanisms of Control' in M. Maas (red.): aperonta.

- Greatrex, G. kaj Lieu, S.N.C. 2002. *The Roman Eastern Frontier and the Persian Wars, A.D. 363-630*. Londono.
- Gwynn, D., red. 2008. *A.H.M. Jones and the Later Roman Empire*. Lejdeno.
- Haarer, F. 2006. *Anastasius I. Politics and Empire in the Late Roman World*. Kembriĝo.
- Halsall, G. 2007. *Barbarian Migrations and the Roman West, 376-568*. Kembriĝo.
- Halsall, G. 2010. 'The Technique of Barbarian Settlement in the Fifth Century: A Reply to Walter Goffart', *Journal of Late Antiquity* 3: 99-112.
- Heather, P. 1998. 'Senators and Senates', *CAH XIII*: 184-210.
- Heather, P. 2005. *The Fall of the Roman Empire. A New History*. Oksfordo.
- Heather, P. 2008. 'Running the Empire: Bureaucrats, Curials, and Senators' en Gwynn (red.): 97-119.
- Hohlfelder, R. 1984. 'Marcian's Gamble: A Reassessment of Eastern Imperial Policy toward Attila', *AJAH* 9: 54-69.
- Holum, K. 1982. *Theodosian Emperresses. Women and Imperial Dominion in Late Antiquity*. Berkeley.
- Honoré, T. 1998. *Law in the Crisis of Empire, 379-455 AD*. Oksfordo.
- Humphries, M. 2009. 'The Shapes and Shaping of the Late Antique World: Global and Local Perspectives' en P. Rousseau (red.), *A Companion to Late Antiquity*. Oksfordo: 97-109.
- Kaegi, W.E. 1968. *Byzantium and the Decline of Rome*. Princeton.
- Kelly, C. 1998. 'Emperors, government and bureaucracy', *CAH XIII*: 138-83.
- Kelly, C. 2004. *Ruling the Later Roman Empire*. Kembriĝo, Masaĉuseco.
- Kitchen, T.E. 2008. *Contemporary perceptions of the Roman Empire in the later fifth and sixth centuries*. Doktora disertacio, Kembriĝo.
- Kolb, F. 2001. *Herrscherideologie in der Spätantike*. Berlino.
- Laniado, A. 2002. *Recherches sur les notables municipaux dans l'empire protobyzantin*. Parizo.
- Lee, A.D. 2007. *War in Late Antiquity*. Oksfordo.
- Lee, A.D. 2013. *From Rome to Byzantium, A.D. 363 to 565. The Transformation of Ancient Rome*. Edinburgo.
- Leppin, H. 2011. *Justinian. Das christliche Experiment*. Stutgarto.
- Liebeschuetz, J.H.W.G. 1990. *Barbarians and Bishops*. Oksfordo.
- Luttwak, E. 2009. *The Grand Strategy of the Byzantine Empire*. Kembriĝo, Masaĉuseco.
- Maas, M. 1995. 'Fugitives and Ethnography in Priscus of Panium', *BMGS* 19: 146-60.
- Maas, M., red. 2013. *The Cambridge Companion to the Age of Attila*. Kembriĝo.
- MacCormack, S. 1981. *Art and Ceremony in Late Antiquity*. Berkeley.
- MacGeorge, P. 2002. *Late Roman Warlords*. Oksfordo.
- MacMullen, R. 2003. 'Cultural and Political Changes in the fourth and fifth centuries', *Historia* 52: 465-94.
- MacMullen, R. 2006. 'The Power of the Roman Empire', *Historia* 55: 471-81.
- Mann, J. 1979. 'Power, Force and the Frontiers of the Empire', *JRS* 69: 175-83.
- Marcone, A.. 1998. 'Late Roman Social Relations', *CAH XIII*: 338-70.
- Marotta, V. 1993. 'Il potere imperial della morte di Giuliano al crollo dell' Impero d'Occidente' en Carandini kaj aliaj (red.): 551-661.
- Martin, J. 1984. "Zum Selbstverständnis zur Repräsentation und Macht des Kaisers in der Spätantike", *Saeculum* 35: 115-31.
- Martin, J. 1997. 'Das Kaisertum in der Spätantike', in Paschoud kaj Szidat (red.): 47-62.
- Martin, J. 2001. *Spätantike und Völkerwanderung*. Munkeno.
- Mathisen, R. 1992. 'Fifth-century visitors to Italy: business or pleasure' en Drinkwater kaj Elton (red.): 228-38.

- Matthews, J.F. 1975 (1990). *Western Aristocracies and Imperial Court, AD 364-425*. Oksfordo.
- Matthews, J.F. 2000. *Laying down the Law*. Novhaveno (New Haven).
- McCormick, M. 1986. *Eternal Victory*. Kembriĝo.
- McCormick, M. 2000. 'Emperor and Court' *CAH XIV*: 135-63.
- Meier, M. 2007. 'Σταυρωθεὶς δι' ἡμᾶς – Der Aufstand gegen Anastasius im Jahr 512', *Millennium 4*: 157-237
- Merrills, A., Miles, R. 2010. *The Vandals*. Oksfordo.
- Millar, F. 2004. 'De la frontière au centre. La monarchie centralisée de Théodose II (408-450 ap. J.-C.)' en Moatti, C. (red.), *La mobilité des personnes en Méditerranée de l'Antiquité à l'époque moderne. Procédures de contrôle et documents d'identification*. Romo: 567-89.
- Millar, F. 2006. *A Greek Roman Empire: Power and Belief under Theodosius II (408-450)*. Berkeley.
- Millar, F. 2011. Recenzo de Traïna, G., *428 AD: An ordinary year at the end of the Roman empire* (Princeton, 2009), *Ancient East and West* 10: 398-404.
- Mitchell, S. 2007. *A History of the Later Roman Empire*. Oksfordo.
- Moorhead, J. 1992. *Theoderic in Italy*. Oksfordo.
- Morris, J. 1965. 'Pelagian Literature', *JTS* 16: 26-60.
- Noethlichs, K.L. 1998. 'Strukturen und Funktionen des spätantiken Kaiserhofs' en Winterling (red.): 13-49.
- Palme, B. 2007. 'The imperial presence: Government and army', en Bagnall (red.): 244-70.
- Paschoud, F. kaj Szidat, J. red. 1997. *Usurpationen in der Spätantike*. Stutgarto.
- Piganiol, A. 1972. *L'empire chrétien*, dua eldono. Parizo.
- Porena, P. 2010. 'L'amministrazione tardoantica' in Traïna, G., red., *Storia d'Europa e del Mediterraneo. I. Il Mondo antico*, sekcio 3, volumo 7. Romo: 525-600.
- Potter, D.S. 2010. 'The Unity of the Roman Empire,' en Sogno, McGill kaj Watts (red.): 13-32.
- Pottier, B. 2009. 'États, élites et ordre public: les *occultatores* de hors-la-loi dans le *Code Théodosien*' en Crogiez-Pétrequin, S. kaj Jaillette, P. (red.), *Le Code Théodosien. Diversité des approches et nouvelles perspectives*. Parizo:143-69.
- Rees, R. 2004. *Diocletian and the Tetrarchy*. Edinburgo.
- Richardot, P. 2005. *La fin de l'armée romaine: 284-476*, 3^a eldono. Parizo.
- Roda, S. 1993. 'Nobiltà burocratica, aristocrazia senatoria, nobiltà provinciali' en Carandini kaj aliaj (red.): 643-74.
- Sarris, P. 2004. 'The Origins of the Manorial Economy – New Insights from Late Antiquity', *EHR* 109: 279-311.
- Sarris, P. 2006. *Economy and Society in the Reign of Justinian*. Kembriĝo.
- Sarris, P. 2011a. *Empires of Faith. The Fall of Rome to the Rise of Islam, 500-700*. Oksfordo.
- Sarris, P. 2011b. 'Aristocrats, Peasants, and the State in the Later Roman Empire' en Eich, P., Schmidt-Hofner, S., Wieland, C. (red.), *Der wiederkehrende Leviathan. Staatlichkeit und Staatswerdung in Spätantike und Früher Neuzeit*. Heidelberg: 375-92.
- Schlinkert, D. 1996. *Ordo senatorius und nobilitas: die Konstitution des Senatsadels in der Spätantike*. Stutgarto.
- Schlinkert, D. 1998. 'Dem Kaiser folgen. Kaiser, Senatsadel und höfische Funktionselite (comites consistoriani) von der „Tetrarchie“ bis zum Ende der constantinischen Dynastie' in Winterling (red.): 133-60.
- Schlinkert, D. 2002. 'Between emperor, court, and senatorial order: the codification of the *Codex Theodosianus*', *Ancient Society* 32: 283-94.
- Schor, A. 2011. *Theodoret's People: social networks and religious conflict in late Roman Syria*. Berkeley.

- Snee, R. 1998. 'Gregory Nazianzen's Anastasia Church: Arianism, the Goths, and Hagiography', *DOP* 52: 157-86.
- Sogno, C., McGill, S., Watts, E., red. 2010. *From the Tetrachs to the Theodosians. Later Roman History and Culture, 284-450 CE*, Yale Classical Studies 34. Kembriĝo.
- Stickler, T. 2002. *Aëtius*. Munkeno.
- Stroheker, K.F. 1970. 'Princeps Clausus. Zu einigen Berührungen der Literatur der fünften Jahrhunderts mit der H.A.' en *Bonner Historia-Augusta-Colloquium 1968/1969*. Bonn: 273-83.
- Teja, R. 1993. 'Il cerimoniale imperiale,' en Carandini kaj aliaj (red.): 613-42.
- Thompson, E.A. 1950. 'The Foreign Policies of Theodosius II and Marcian', *Hermathena* 76: 58-75.
- Thompson, E.A. 1982. *Romans and Barbarians*. Madison, Viskonsino.
- Thompson, E.A., rev. Heather, P. 1996. *The Huns*. Oksfordo.
- Traina, G. 2009. *428 A.D.* Princeton (traduko de la origine itala libro *428 dopo Christo*, 2007).
- Twyman, B.L. 1970. 'Aetius and the Aristocracy,' *Historia* 19: 480-53.
- Whitby, M. 2008. 'The Role of the Emperor' en Gwynn (red.): 65-96.
- Whittaker, C.R. 1994. *Frontiers of the Roman Empire*. Baltimoro.
- Whittaker, C.R., kaj Garnsey, P. 1998. 'Rural life in the later Roman empire', *CAH* XIII: 277-311.
- Wiemer, H.-U. 2004. 'Akklamationen im spätrömischen Reich. Zur Typologie und Funktion enies Kommunikationsriuals', *Archiv für Kulturgeschichte* 86: 27-73.
- Winterling, A., red. 1998. *Comitatus. Beiträge zur Erforschung des spätantiken Kaiserhofs*. Berlino.
- Wipszycka, E. 2007. 'The institutional church', en Bagnall (red.): 331-49.
- Wormald, P. 1976. 'The Decline of the Western Empire and the Survival of its Aristocracy', *JRS* 66: 217-26.

Aŭroro – la nordia lumo



Amri Wandel

Profesoro pri astrofiziko kaj astrobiologio en la Hebrea Universitato de Jerusalemo kaj gastprofesoro ĉe la Universitato de Kalifornio en Losanĝeleso (UCLA). Specialisto pri aktivaj galaksioj, nigraj truoj kaj astrobiologio. Membro de la Internacia Astronomia Unio. Kreis kaj instruas (ekde 1998) la kurson “Astrofiziko kaj vivo en la Universo” ĉe sia universitato en Jerusalemo (kie li estis elektita elstara profesoro en la lastaj kvar jaroj sinsekve) kaj ĉe UCLA. Publikigis pli ol cent sciencajn artikolojn. Esperanto: akademiano (1992-), estrarano de UEA, prezidanto de ELI kaj redaktoro de ĝia bulteno (2009-). Fondinto kaj rektoro de Internacia Vintra Universitato. Ofte (13-foje) prelegis ĉe IKU. Kunverkinto de NPIV (astrofiziko). Kunverkinto de la libro *La Universo kaj Ni* kaj redaktinto de kvin IKU-libroj. Pliaj detaloj: http://eo.wikipedia.org/wiki/Amri_Wandel.

Resumo

PIV difinas ĝin kiel diverskoloran lumigon de la nokta ĉielo en polusproksimaj regionoj, kaŭzitan de elektre ŝargitaj partikloj de la suna vento, interaganta kun la tera magneta kampo en la alta atmosfero. En la prelego ni provos klarigi la signifon de tiuj terminoj – aparte kio estas la suna vento kaj la tera magnetosfero, kaj kiel ilia interago produktas la belan fenomenon kiun ni konas kiel “aŭroro”.

Aurora – the northern lights

Summary

A dictionary defines it as multicoloured illumination of the night sky in polar regions caused by electrically charged particles in the solar wind interacting with the Earth’s magnetic field in the upper atmosphere. In the lecture we will try to explain the meaning of those terms – in particular, what the solar wind and the Earth’s magnetosphere are, and how their interaction produces the beautiful phenomenon we know as the “aurora borealis”.

L’aurore boréale – la lumière nordique

Résumé

Le PIV la définit comme une illumination multicolore du ciel nocturne dans les régions proches des pôles, causée par des particules de vent solaire chargées électriquement qui interagissent avec le champ magnétique terrestre dans la haute atmosphère. Au cours de cette conférence nous tâcherons d’expliquer la signification de ces termes – en particulier ce que sont le vent solaire et la magnétosphère terrestre, et comment leur interaction produit ce beau phénomène que nous connaissons sous le nom d’aurore boréale.

Norðurljós

Útdráttur


Esperanto-orðabókin (PIV) skilgreinir norðurljós sem litríkt ljós á næturhimninum nálægt heimskautunum, vegna rafhlaðinna agna úr sólvindi, og samspils þeirra við segulsvið jarðar í háloftunum. Í fyrirlestrinum verður leitast við að útskýra þessi hugtök – sér í lagi sólvind og segulhvolf jarðar, og hvernig samspil þeirra framkallar fyrirbærið sem við þekkjum undir nafninu “norðurljós”.

Aŭroro – la nordia lumo

Enkonduko

La fenomeno de aŭroro estas natura lumo, kvazaŭ ekrano en la ĉielo, aparte videbla en la apud-polusaj regionoj (Arkto kaj Antarktio). Aŭroro estas kaŭzita pro kolizio de energiaj ŝargitaj partikloj kun atomoj en la altaj tavoloj de la atmosfero (termosfero). La ŝargitaj partikloj devenas de la suna vento kiu kolizias kun la tera magnetosfero kaj estas direktitaj de la tera magneta kampo suben en la atmosferon. Plej ofte aŭroroj okazas en regiono konata kiel la aŭrora zono [1] [2], kiu tipe etendiĝas 3° ĝis 6° en latitudo kaj 10° ĝis 20° de la magneta poluso difinita de la tera magneta dupoluso. Dum geomagnetaj ŝtormoj, la aŭrora zono povas migri al pli malaltaj latitudoj.

Estas du specoj de aŭroroj: difuza (etendiĝinta) aŭ diskreta (lokita). La difuza aŭroro estas senforma brilo sur la ĉielo, kiu povas esti nevidebla por la homa okulo, eĉ en malluma nokto. Diskretaj aŭroroj havas akre difinitajn trajtojn kiuj varias en maniero apenaŭ videbla por la homa okulo, sed ĝia brilo sufiĉas por legi ĵurnalon en la nokto. Diskretajn aŭrorojn kutime eblas vidi nur en la nokta ĉielo, ĉar ili ne estas tiel brilaj kiel la sunluma ĉielo. Aŭroroj foje okazas en la polus-direktaj partoj de la aŭroraj zonoj kiel difuzaj makuloj [3] aŭ arkoj [4]), ĝenerale nevideblaj al la nuda okulo.



Bildoj de aŭroroj australis (sudhemisfera) kaj borealis (nordhemisfera), iuj kun pli maloftaj bluaj kaj ruĝaj lumoj

En nordaj latitudoj, la fenomeno estas konata kiel la aŭroro boreala (aŭ la nordaj lumoj). Tiu nomo kiu konsistas el la nomo de la romia diino de mateniĝo, Aŭroro, kaj la greka


nomo por la norda vento, Boreas, estis kreita de Pierre Gassendi en 1621 [5]. Aŭroroj viditaj proksime de la magneta poluso povas aperi alte superkape, sed de pli fore, ili lumigas la nordan horizonton kiel verdeta ardo aŭ foje iomete ruĝa, kreante impreson de matena aŭroro, kvazaŭ la Suno leviĝas el nekutima direkto. Diskretaj aŭroroj ofte havas strukturojn similajn al kurento aŭ fluoj (laŭ la direkto de la tera magneta kampo). Ĝi povas ŝanĝiĝi en kelkaj sekundoj aŭ ardi senŝanĝe dum horoj, plej ofte en fluoreska verda koloro. La aŭroro boreala plej ofte okazas proksime de la ekvinoksoj.

La norda aŭroro havis kelkajn nomojn en la historio. La krio-indianoj nomis ĝin “**Danco de la spiritoj**”. En mezepoka Eŭropo, oni ofte kredis ke la aŭroroj estas signo de Dio.

Ĝia suda ekvivalento, la *sudaŭroro* (aŭ la **sudaj lumoj**), havas ecojn preskaŭ identajn al la norda kaj sekvas la ŝanĝojn en la norda aŭrora zono [7]. Ĝi estas videbla en foraj sudaj latitudoj en Antarktio, Sudameriko, Nov-Zelando, kaj Aŭstralio. Aŭroroj okazas ankaŭ sur aliaj planedoj. Similaj al la aŭroro de la Tero, aŭroraj briloj estas videblaj proksime al la magnetaj polusoj de planedo kun forta magneta kampo, kiel Jupitero. Modern-stilaj gvidlibroj rekomendas ke la nomoj de meteorologiaj fenomenoj, kiel ekzemple *aŭroro* aŭ *poluslumo*, estu skribitaj minuskle [8].

1. Aŭrora meĥanismo

Aŭroroj estas la rezulto de emisio de lumo en la supraj tavoloj de la tera atmosfero, super 80 km. Nitrogen- kaj oksigen-atomoj estas jonigitaj aŭ ekscititaj pro kolizio kun ŝargitaj partikloj de la suna vento, direktitaj suben de la tera magneta kampo.



Bildo de aŭroro australis (sudhemisfera) fotita de la skipo de la Ekspedicio 28 sur la Internacia Spaco-Stacio


La ekscito-energio transformiĝas al emisio de fotono (lum-partiklo). La oksigena emisio estas verda aŭ bruneca-ruĝa, depende de la kvanto de energio sorbita.

La nitrogena emisio estas blua aŭ ruĝa; blua se la atomo reakiras elektronon post kiam ĝi estis jonigita, ruĝa se ekscitita elektrono revenas al la baza stato.

Oksigeno estas nekutima en sia reveno al baza stato: ĝi povas daŭri 0,75 sekundo (por emisio de verda lumo) ĝis du minutojn por emisio de ruĝa lumo. Kolizioj kun aliaj atomoj (kiel Argono) aŭ molekuloj (kiel CO₂) povas sorbi la ekscito-energion kaj malhelpi emision de fotonoj. Ĉar la plejsupro de la atmosfero havas pli altan procentaĵon de oksigeno kompare kun la pli pezaj atomoj aŭ molekuloj, tiaj kolizioj estas malpli oftaj kaj la ekscititaj oksigeno-atomoj havas sufiĉe da tempo por emisii ruĝan fotonon. Pli malalte en la atmosfero tiaj kolizioj fariĝis pli oftaj tiel ke la ruĝa emisio ne havas sufiĉe da tempo. Pli malalte eĉ la verda emisio estas malhelpita.

Tio estas la kialo por la aŭrora koloro-diferenco laŭ alteco; je alta altitudo regas oksigeno ruĝa, tiam oksigeno kaj nitrogeno verdaj, bluaj kaj ruĝaj, kaj plej sube nitrogeno blua / ruĝa. Pli malalte kolizioj fariĝas sufiĉe oftaj por tute bremsi la emision. Pro tio la verdkolora aŭroro estas la plej ofta. Sekve abundas la rozkolora, miksaĵo verda kaj ruĝa, sekvata de pura ruĝa, flava (miksaĵo de ruĝa kaj verda) kaj, laste, pura bluo.

Aŭroroj estas asociataj kun la suna vento, fluo de jonoj senĉese fluanta eksteren el la Suno. La tera magnetosfero, t.e. magneta kampo, kaptas la ŝargitajn partiklojn de la suna vento, kiuj kutime migradas laŭlonge de la linioj de la magneta kampo al la magnetaj polusoj de la Tero, kie ili estas akcelataj suben en la teran atmosferon. Kolizioj inter tiuj jonoj kaj atmosferaj atomoj kaj molekuloj kaŭzas energio-liberigon en la formo de aŭroroj aperantaj en grandaj ringoj ĉirkaŭ la magnetaj polusoj. Aŭroroj estas pli oftaj kaj pli brilaj dum la intensa fazo de la suna ciklo, kiam koronaj maso-erupcioj pliiĝas la intenson de la suna vento. [10]



Ruĝa aŭroro aŭstralis

2. Aŭroro-specoj kaj la rilato al magnetismo

Tipe la aŭroro aperas ĉu kiel difuza ardo aŭ kiel “kurtenoj” kiuj etendiĝas proksimume en la direkto oriento-okcidento. Foje ili formas “starantajn arkojn”, aliffoje ili evoluas kaj ŝanĝiĝas senĉese (“aktiva aŭroro”). La “kurtenoj” konsistas el multaj paralelaj radioj, ĉiu vicigita kun la loka direkto de la linioj de magneta kampo, sugestante ke la aŭroroj havas la formon de la tera magneta kampo. Efektive, satelitaj fotoj montras, ke la ŝargitaj partikloj estas gvidataj turniĝante ĉirkaŭ la linioj en la tera magneta kampo, dum sia moviĝo al la Tero.

La simileco al kurtenoj estas ofte plifortigita per faldoj nomataj “striiĝoj” (angle “striations”). Kiam la kampo-linio gvidanta brilan aŭroron kondukas rekte al punkto super la observanto, la aŭroro povas aspekti kiel “krono” de disvastiĝantaj radioj, efiko de perspektivo. La rilato inter aŭroroj kaj magneta influo estis unue menciita de la antikva greka esploristo kaj geografo Pytheas. La esploristoj Hiorter kaj Celsius estis la unuaj en la moderna epoko kiuj priskribis (en 1741) observojn kiuj rilatigas aŭroron al magneta influo, nome, ke grandaj magnetaj ŝanĝiĝoj okazas kiam aperas aŭroro en la ĉielo. Tio indikas (kiel oni komprenis multajn jarojn poste) ke grandaj elektraj kurentoj estas ligitaj al la aŭroroj, kaj fluas en regionoj kie estiĝas aŭroroj. Kristian Birkeland (1908) [11] deduktis ke la kurentoj fluas en la orienta-okcidenta direkto laŭlonge de la aŭroraj arkoj, kaj ke la kurentoj fluas el la taga flanko al (proksimume) la nokta flanko. Tiuj fluoj estis poste nomitaj aŭroraj elektro-fluoj (angle “auroral electrojets”) (ankaŭ nomataj “Birkeland-fluoj”).



Nordaj lumoj super Kalgario


Pliaj pruvoj por la magneta rilato de aŭroroj venis de la statistiko de aŭroraj observoj. Elias Loomis (1860) kaj sekve detale Hermann Fritz (1881) [12] kaj S. Tromholt (1882) [13] malkovris ke la aŭroro aperas ĉefe en la “aŭrora zono”, ringo-forma regiono kun radiuso de proksimume 2500 km ĉirkaŭ tera magneta poluso. Aŭroroj preskaŭ neniam estas videblaj proksime de la geografiaj polusoj, kiuj estas ĉirkaŭ 2000 km for de la magnetaj polusoj. La centro de la distribuo de aŭroroj en specifa momento (“aŭrora ovalo” [1] [2]) estas centrita ĉirkaŭ 3-5 gradojn for de la magneta poluso en la direkto de la nokta flanko. Pro tio aŭroraj arkoj atingas plej malproksimen en la ekvatora direkto proksimume unu horon antaŭ noktomezo. La aŭroro povas esti vidata plej bone en ĉi tiu horo, nomata “magneta noktomezo”, kiu okazas kiam la observanto, la magneta poluso kaj la Suno troviaĝs en rekta linio.

Fine de la 20a jarcento, la astrofizikistino Joan Feynman deduktis ke aŭroroj estas produkto de la interago inter la tera magnetosfero kaj la magneta kampo de la suna vento. Ŝia laboro rezultis de datumoj kolektitaj de la spacmisio “Explorer 33” [14].

La 26-an de februaro 2008, la Themis-spacmisio povis determini, por la unua fojo, kiu evento kaŭzas la magnetosferajn ŝtormetojn kiuj kreas la aŭroron [15]. Du el la kvin satelitoj de la misio, lokitaj proksimume trionon de la distanco inter Tero kaj Luno, mezuris eventojn sugestantajn magnetan rekonekton (kunfandiĝo de magnetaj kampo-linioj) okazintan 96 sekundojn antaŭ aŭrora intensigo [16]. Asertis d-ro Vassilis Angelopoulos de la Universitato de Kalifornio, Los-Anĝeleso, la ĉefa esploranto de la Themis-misio: “Niaj datumoj montras klare kaj por la unua fojo ke magneta rekonekto kaŭzas la aŭroron.”[17]

3. La Suna Vento kaj la Tera Magnetosfero

Tero estas daŭre ĉirkaŭita de la suna vento, maldensega fluo de varma plasmu (gasu konsistanta el liberaj elektronoj kaj pozitivaj jonoj) elfluanta de la Suno en ĉiuj direktoj. Temas pri la daŭrigo de la la korono, du-milion-grada varmega ekstera tavolo de la Suno. La suna vento kutime atingas Teron kun rapideco de proksimume 400 km/s, denseco ĉirkaŭ 5 jonoj/cm³ kaj magnet-kampa intenso ĉirkaŭ 2-5 NT (nanotesla; unu dek-mil-ono de la intenso de la tera magneta kampo sur la tera surfaco, kiu estas tipe 30 000-50 000 NT). Tiuj datumoj estas averaĝaj. Dum magnetaj ŝtormoj la suna vento povas esti plurfoje pli rapida, kaj la intenso de la inter-planeda magneta kampo (IPMK) povas esti multe pli forta.




Skema bildo de la tera magnetosfero

La IPMK estiĝas sur la Suno kaj rilatas al la kampo de sunaj makuloj, kies kampo-linioj (linioj de forto) estas trenitaj el la suna interno. Ŝajne la direkto de la suna magneta kampo devus esti radiala de la suno, sed la rotacio de la Suno oblikvigas la IPMK-liniojn. Ĉe la Tero la angulo atingas ĉirkaŭ 45 gradojn, tiel ke kampo-linioj kiuj pasas ĉe Tero povas vere origini proksimume de la “okcidenta” ekstremo (“surfaco”) de la suno, kiel vidita de Tero [18].


La tera magnetosfero estas rezulto de la kolizio de la suna vento kun la tera magneta kampo, kiu kreas obstaklon en la suna vento kaj defleksas ĝin en averaĝa distanco de ĉirkaŭ 70 000 km de Tero (11 Tero-radiusoj aŭ R_T) [19]. Tio kreas arkforman ŝokon en distanco de 12 000-15 000 km (1,9-2,4 R_T) pli for, tiel ke la larĝeco de la tera magnetosfero estas tipe 190 000 km (30 R_T). En la nokta flanko de Tero (for de la suno) troviĝas longa “magneta vosto” de tiritaj kampo-linioj, etendiĝanta ĝis granda distanco ($> 200 R_T$).

La magnetosfero konsistas el kaptita plasmato de la suna vento. La fluo de plasmato en la magnetosfero estas ligita al la denseco kaj rapideco de la suna vento kaj kun la IPMK kaj turbuladado en la fluo de la suna vento [20]. La fluo-direkto de plasmato en la magnetosfero estas de la magneto-vosto al la ĉirkaŭ Tero, kaj reen en la sunan venton tra la magneto-paŭzo, en la taga flanko. Aldone al la moviĝo de plasmato vertikale de la tera magneta kampo, parto vojaĝas malsupren (teren) laŭlonge de la linioj de la tera magneta kampo, perdante energion en la supera atmosfero, en la aŭroraj zonoj. Magnetosferaj elektronoj akcelitaj malsupren de elektraj kampoj laŭlonge de la magnetaj kampo-linioj kaŭzas la diskretajn aŭrorojn. La neakcelitaj elektronoj kaj jonoj kaŭzas la disigitan lumon de la difuza aŭroro.

4. Geografia kaj tempa distribuo de aŭroroj



Norda Ameriko



Eŭrazio


La ĉi-supraj mapoj montras la sudan limon de la aŭroro en la norda hemisfero por diversaj niveloj de geomagneta aktiveco; de 3 (malalta) ĝis 9 (plej altaj) niveloj.

Aŭroroj estas foje videblaj en pli sudaj latitudoj, kiam magnetaj ŝtormoj provizore pligrandigas la aŭroran ovalon. Grandaj magnetaj ŝtormoj estas pli oftaj dum la pinto de la dekunujara suna ciklo, aŭ dum la tri jaroj post tiu pinto [21] [22]. Ene de la aŭrora zono la verŝajneco de aŭroroj dependas plejparte de la deklivo de IPMK-linioj.


Geomagnetaj ŝtormoj kiuj instigas aŭrorojn efektive okazas pli ofte dum la monatoj ĉirkaŭ la ekvinoksoj. Ne estas bone komprenate kial geomagnetaj ŝtormoj estas ligitaj al la teraj sezonoj, dum polusa aktiveco ne estas. Fakte dum printempo kaj aŭtuno la IPMK ĉe la Tero fariĝas proksimume paralelaj. Ĉe la magnetopaŭzo, la tera magnetaj kampo estas direktita norden. Kiam la IPMK kliniĝas suden, ĝi povas parte nuligi la teran magnetan kampon en la punkto de kontakto, tralasante la energion de la suna vento atingi la teran internan magnetosferon. Tiu fenomeno atingas maksimumon dum oktobro kaj aprilo, kiam la tera magnetaj kampo estas samdirekta kun la IPMK pro sia spirala formo. Ankaŭ la rapideco de la suna vento atingas maksimumon en la printempo kaj aŭtuno.

Estas aldonaj faktoroj kiuj influas la geomagnetan aktivecon. La akso de la suna rotacio estas klinita 8 gradojn rilate al la ebena de la tera orbito ĉirkaŭ la suno. La suna vento blovas malpli rapide de la suna ekvatoro ol de ĝiaj polusoj. Pro tio la averaĝa rapido de la suna vento varias kun ciklo de ses monatoj. La rapideco de la suna vento estas plej granda – averaĝe ĉirkaŭ 50 km/s – ĉirkaŭ la 5a de septembro kaj la 5-a de marto, kiam Tero atingas la plej altan latitudon rilate al la suna ekvatoro.

Tamen, nek la IPMK nek la suna vento povas komplete klarigi la sezonan konduton de geomagnetaj ŝtormoj. Tiuj faktoroj kune kontribuas nur proksimume unu trionon de la observita duonjara ciklo de la aŭroroj.



Aŭroro australis (11 septembro 2005) kiel kaptita de NASA BILDO-satelito



Difuza aŭroro observita de satelito DE-1 de malalta tera orbito



Ruĝa kaj verda aŭroroj, Norvegio

Referencoj

1. Feldstein, Y. I. (1963). "Some problems concerning the morphology of auroras and magnetic disturbances at high latitudes". *Geomagnetism and Aeronomy* **3**: 183–192.
2. Feldstein, Y. I. (1986). "A Quarter Century with the Auroral Oval". *EOS* **67** (40): 761. Bibcode:1986EOSTr..67..761F. doi:10.1029/EO067i040p00761-02.
3. E. J. Weber et al. (1984). "F layer ionization patches in the polar cap". *J. Geophys. Res.* **89** (A3): 1683–94. Bibcode:1984JGR....89.1683W. doi:10.1029/JA089iA03p01683.
4. Frank, L. A. et al. (1986). "The theta aurora". *J. Geophys. Res.* **91** (A3): 3177–3224. Bibcode:1986JGR....91.3177F. doi:10.1029/JA091iA03p03177.
5. Paul Fleury Mottelay Bibliographical History of Electricity and Magnetism. Read Books, 2007, ISBN 1-4067-5476-5. p 114.
6. Wilfried Schröder, Das Phänomen des Polarlichts, Darmstadt 1984
7. N. Østgaard, S. B. Mende, H. U. Frey, J. B. Sigwarth, A. Asnes, J. M. Weygand (2007). "Auroral conjugacy studies based on global imaging". *J. Of Atmos. And Solar-Terres. Phys.* **69** (3): 249–55. Bibcode:2007JASTP..69..249O. doi:10.1016/j.jastp.2006.05.026.
8. "University of Minnesota Style Manual". .umn.edu. 18 July 2007. Archived from the original on 22 July 2010. Retrieved 5 August 2010.
9. "Ultraviolet Waves".
10. "NASA – NASA and World Book". Nasa.gov. 2011-02-07. Archived from the original on 29 June 2011. Retrieved 2011-07-26.^[dead link]
11. Birkeland, Kristian (1908 (section 1), 1913 (section 2)). The Norwegian Aurora Polaris Expedition 1902–1903. New York: Christiania (Oslo): H. Aschehoug & Co. p. 720. out-of-print, full text online.
12. Fritz, Hermann (1881). "Das Polarlicht."
13. S. Tromholt, Om nordlysets perioder/Sur les périodes de l'aurore boréale, l'annuaire 1880, Inst. Météorol. Danois, Copenhagen, 1882.
14. Hirshberg, Charles (2002-04-18). "My Mother, the Scientist". Popular Science. Bonnier Corporation.
15. "NASA – THEMIS Satellites Discover What Triggers Eruptions of the Northern Lights". Nasa.gov. Archived from the original on 29 June 2011. Retrieved 2011-07-26.
16. Angelopoulos, V.; McFadden, J. P.; Larson, D.; Carlson, C. W.; Mende, S. B.; Frey, H.; Phan, T.; Sibeck, D. G. et al. (2008). "Tail Reconnection Triggering Substorm Onset". *Science* **321** (5891): 931–5. Bibcode:2008Sci...321..931A. doi:10.1126/science.1160495. PMID 18653845.
17. "Secret of Colorful Auroras Revealed". Space.com. 2008-07-24. Archived from the original on 28 June 2011. Retrieved 2011-07-26.
18. Alaska.edu, Solar wind forecast from a University of Alaska website.
19. Shue, J.-H.; J. K. Chao, H. C. Fu, C. T. Russell, P. Song, K. K. Khurana, and H. J. Singer (May 1997). "A new functional form to study the solar wind control of the magnetopause size and shape". *J. Geophys. Res.* **102** (A5): 9497–9511. Bibcode:1997JGR...102.9497S. doi:10.1029/97JA00196.
20. Lyons, L. R.; H.-J. Kim, X. Xing, S. Zou, D.-Y. Lee, C. Heinselman, M. J. Nicolls, V. Angelopoulos, D. Larson, J. McFadden, A. Runov, and K.-H. Fornacon (2009). "Evidence that solar wind fluctuations substantially affect global convection and substorm occurrence". *J. Geophys. Res.* **114** (A11306): 1–14. Bibcode:2009JGRA..11411306L. doi:10.1029/2009JA014281.
21. Stamper, J.; M. Lockwood and M. N. Wild (December 1999). "Solar causes of the long-term increase in geomagnetic activity". *J. Geophys. Res.* **104** (A12): 28,325–28,342. Bibcode:1999JGR...10428325S. doi:10.1029/1999JA900311.
22. Papitashvili, V. O.; N. E. Papitashva and J. H. King (September 2000). "Solar cycle effects in planetary geomagnetic activity: Analysis of 36-year long OMNI dataset". *Geophys. Res. Lett.* **27** (17): 2797–2800. Bibcode:2000GeoRL..27.2797P. doi:10.1029/2000GL000064.

La insula edeno de Darwin: la Galapagoj kaj la historio de evolu-biologio



José Antonio Vergara

Ĉiliano (1962). Li instruas historion de medicino kaj scienco, antropologion de sano kaj epidemiologion en la Universidad San Sebastian (Puerto Montt, Ĉilio). Nuna prezidanto de Internacia Sciencia Asocio Esperanta (ISAE), li prelegis jam kvarfoje en IKU, pri epidemiologio de la aperantaj infektaj malsanoj (1998), malegalecoj je sano kaj ties sociaj determinantoj (2007), medicinaj sistemoj en interkultura dialogo (2010), kaj HIV-aidosa epidemio ĉe la tutmonda junularo (2011). Li ankaŭ prelegis i.a. en la centjariĝa ISAE-festkonferenco (2006) pri la ŝanĝiĝanta interrilato scienco-socio kaj en Simpozio pri nur-angla scienco en multlingva mondo, organizita de Esperantic Studies Foundation kadre de la AAAS-jarkonferenco (Boston, 2008).

Resumo

Kiel efiko de vizito al la vulkana insularo Galapagoj (1835) dum sia ĉirkaŭmonda vojaĝo de 1831-1836, la juna Charles Darwin komencis elpensi siajn revoluciajn ideojn pri la fakta ŝanĝiĝo de la vivantaj formoj tra la geologiaj epokoj. Ekde tiam, tiu Pacifikoceana arkipelago proksima al Ekvadoro ludis gravan rolon en la historio de la scienco. Dum la lastaj du jarcentoj, la esploroj pri la Darwinaj fringoj kaj aliaj tieaj specioj, kaj ĝenerale pri la apartaj biogeografio kaj ekologio de la Galapagoj, havigis rimarkindajn elementojn por la establiĝo de la teorio pri evoluo, eĉ kun nuntempa kontraŭstaro flanke de la pseŭdoscienco kreismo. Tial, la studo de tiuj ŝanĝiĝantaj ideoj permesas havi bildon pri la procezo konstrui sciencan aliron al la fenomeno vivo.

Darwin's island Eden: the Galápagos Islands and the history of evolutionary biology

Summary

As a result of a visit to the volcanic archipelago of the Galápagos islands in 1835 during his circumnavigation of the world, the young Charles Darwin began to formulate his revolutionary ideas on the changes in living forms over geological eras. Since then, this archipelago in the Pacific Ocean near Ecuador has played an important role in the history of science. Over the last two centuries, research into Darwin's finches and other local species, and generally into the specific biogeography and ecology of the Galápagos, has provided remarkable elements for establishing the theory of evolution, even with today's opposition from the pseudoscience of creationism. The study of these changing ideas thus allows us to gain a picture of the process of building a scientific approach to the phenomenon of life.

L'Eden insulaire de Darwin: les Galápagos et l'histoire de l'évolution biologique

Résumé

Conséquence de la visite qu'il effectua, au cours de son voyage autour du monde, à l'archipel volcanique des Galápagos (1835), le jeune Charles Darwin commença à élaborer ses idées révolutionnaires sur le changement effectif des formes du vivant à travers les époques géologiques. Depuis lors, cet archipel de l'océan Pacifique proche de l'Equateur a joué un rôle important dans l'histoire des sciences. Au cours des deux derniers siècles, les recherches sur les pinsons de Darwin et autres espèces similaires, et plus généralement sur les spécificités biogéographiques et écologiques des Galápagos, ont fourni de remarquables éléments pour l'établissement de la théorie de l'évolution, malgré l'opposition actuelle de la part des tenants de cette pseudo-science qu'est le créationnisme. Ainsi, l'étude de ces idées en constante évolution permet d'avoir une image du processus de construction d'une approche scientifique du phénomène de la vie.

Eyjaparadís Darwins: Galapagos-eyjar og saga þróunarfræðinnar

Útdráttur

Heimsókn hins unga Darwins til Galapagos-eyja á hnattferð hans (1835) leiddi til hinna byltingarkenndu hugmynda hans um hvernig lífverur breyttust í gegnum jarðsöguna. Allar götur síðan hefur þessi Kyrrahafseyjaklasi við Ekvador verið mikilvægur í sögu vísindanna. Á síðustu tveimur öldum hafa rannsóknir á “finkum Darwins” og öðrum tegundum þar, sem og aðrar rannsóknir á hinni sérstæðu líflandafræði og vistfræði Galapagos-eyja, lagt umtalsvert til þess að festa þróunarkenninguna í sessi, ekki síst nú gegn mótspyrnu gervivísindagreinarnar sköpunarhyggju. Þess vegna gera rannsóknir á þessum breytilegu hugmyndum kleift að sjá fyrir sér ferlið til þess að byggja upp vísindalega aðkomu að því fyrirbæri sem lífið er.

La insula edeno de Darwin: la Galapagoj kaj la historio de evolu-biologio

Rivelaj similecoj

Kiam la juna diplomiginto Charles Darwin surŝipiĝis al la HMS Beagle por komenci tion kio iĝus la plej grava sperto de sia vivo, nome 5-jardaŭran (1831-1836) ĉirkaŭmondan esplorvojaĝon kiel naturhistoria kolektanto kaj akompananto de kapitano Robert FitzRoy, li ankoraŭ restis proksima al la kutimaj religiaj konvinkoj tipaj el la socia kaj kultura medio en kiu li kreskis.


Samkiel la ceteraj fakuloj pri naturhistorio de tiu tempo, Darwin neniel dubis ke Dio kreis la universon, ĝiajn stelojn kaj planedojn, kaj unuope la vivantajn estaĵojn distribuitajn en la diversaj regionoj de la mondo. La Dia saĝeco montriĝis en ĉiu aspekto de la mirindaj strukturoj kaj adaptaj trajtoj kun kiuj la bestoj kaj plantoj estis kreitaj kaj dezajnitaj, laŭ la perfekteco kiun emfazis la teleologia argumentaro kiun detale prezentis la angla filozofo William Paley en sia verko *Natura Teologio*, aŭ *Signoj de la ekzisto kaj atributoj de la Dieco*, lanĉita en 1802.

Sed ju pli Darwin konatiĝis kun diversaj regionoj tra la mondo, kolektante specimenojn de la plantaro (flaŭro) kaj bestaro (faŭno) el plej diversaj lokoj vizitaj per la ŝipo *Beagle*, des pli li sentis malkomforton koncerne la naturteologian klarigon pri la distribuado de la vivo sur la mondo. Li komencis bildigi al si la ekziston de rekoneblaj modeloj en la distribuado de la vivantaj formoj, ne klarigeblaj per la nocio pri sendependa, unuopa kreado flanke de Dio. Darwin fakte tiel fariĝis frua biogeografiisto.

Darwin estis aparte frapita kiam, je la aĝo de 24 jaroj, li vizitis la izolitan insularon Galapagoj dum kvin semajnoj, en septembro kaj oktobro 1835. Ĝia naturo, aparte ĝiaj bestoj (testudoj, igvanoj, birdoj), profunde impresis lin, ne nur pro la bizareco de kelkaj el la specioj, sed ĉefe pro ties distribuado kaj varieco, kun rimarkeblaj signoj kaj de origina proksimeco kaj de adapteco al specifaj vivotipoj. La tamena simileco de la galapagaj vivoformoj al tiuj de la kontinenta Sudameriko instigis ĉe li la komencajn ideojn kiuj poste iĝos la plej grava scienca revolucio en la historio de la homaro. Kiel li mem skribis en sia plej fama verko, publikigita multajn jarojn poste:

La plej okulfrapa kaj grava fakto koncerne la loĝantojn de insuloj estas ilia simileco al tiuj de la plej proksima ĉeftero, [...] Mi povus prezenti multajn ekzemplojn de ĉi tiu fakto; mi prezentos nur unu, tiun de la Galapaga Insularo, kiu troviĝas sude de la ekvatoro, inter 500 kaj 600 mejlojn [~800-966 km] de la marbordo de Suda Ameriko. Tie, preskaŭ ĉiuj produktaĵoj de la tero kaj akvo montras nedubeblan rilaton al tiuj de la Amerika kontinento. [...] Natursciencisto, rigardante la loĝantojn de ĉi tiuj vulkanaj insuloj en Pacifiko, plurajn centojn da mejloj for de la kontinento, tamen sentas ke li staras sur Amerika tero. Kial estas tiel? Kial la specioj kiuj supozeble estis kreitaj ĉe la Galapaga Insularo, kaj nenie aliloke, montras tre klaran similecon al tiuj kreitaj en Ameriko? Estas nenio en la vivkondiĉoj, la geologia karaktero de la insuloj, iliaj altecoj aŭ klimato, aŭ en la proporcioj je kiuj la pluraj klasoj interrilatas, kio proksime similas al la kondiĉoj de la Sud-Amerika marbordo: fakte, estas konsiderinda malsimileco je ĉiuj ĉi tiuj punktoj. Aliflanke, estas tre multe da simileco en la vulkana karaktero de la grundo, en la klimato, alteco, kaj grandeco de la insuloj, inter la Galapaga Insularo kaj la Insularo de Verda Kabo: sed la loĝantoj estas tute kaj absolute malsamaj!

La loĝantoj de la Verd-Kabaj Insuloj estas similaj al tiuj de Afriko, kiel tiuj de la Galapagoj estas al Ameriko. Mi kredas ke ĉi tiu granda fakto ne klarigeblas per la ordinara teorio pri aparta kreo; sed laŭ la teorio subtenita ĉi tie, estas evidente ke la Galapagaj Insuloj probable ricevas koloniantojn, ĉu per hazardaj rimedoj de transporto aŭ per kontinua tero en pasinteco, de Ameriko; kaj la Verd-Kabaj Insuloj, de Afriko. Tiaj koloniantoj emus modifiĝi, sed la principo de heredo ankoraŭ malkaŝus iliajn originalajn naskolokojn. (Darwin, *La origino de specioj* [1859], Antverpeno: FEL, 2009 : 339-340)



La Galapagoj

La Galapagoj estas insularo (arkipelago) de vulkaninsuloj ĉe ambaŭ flankoj de la Ekvadoro, en la Pacifika Oceano, situanta je 926 Km okcidente de la sudamerika marbordo. La lando Ekvadoro aneksis la insularon en 1832, kiu nuntempe konsistigas ĝian ĉefan naciajn parkon (ekde la jaro 1959). La grupo konsistas el 18 ĉefinsuloj.

Ili estis hazarde eltrovitaj en 1535, kiam la ŝipo de la hispana episkopo de Panamo dravis survoje al Peruo pro tempesto. Ilian unuan aperon sur iu mapo faris Gerardus Mercator kaj Abraham Ortelius, proksimume en 1570, kun la nomo "Insulae de los Galopegos" (t.e., Insuloj de la Testudoj). Dum la 16-a, 17-a kaj 18-a jarcentoj, la insuloj foje estis utiligitaj kiel kaŝloko flanke de anglaj piratoj kiuj i.a. okupiĝis pri ŝtelatakado al hispanaj galionoj. En 1793, la brita mararmea oficiro kaj felkomercisto James Colnett priskribis la bestaron kaj plantaron de la Galapagoj, kaj proponis ke tie baziĝu la agado de la balenĉasistoj en la Pacifika Oceano. Lia laboro kaŭzis la evoluon de balenĉasado proksime de la Galapagaj Insuloj.


Post la nun fama vizito de Darwin, la Galapagoj kaj ties apartaj vivoformoj kaj ekosistemoj iĝis unu el la ĉefaj celoj kaj debatotemoj en la sciencoj pri la vivo. Louis Agassiz, profesoro pri zoologio en la Universitato de Harvard kaj la plej influa naturhistoriisto de la 19-a jarcento, vizitis la insulojn en 1872 en ekspedicio kiu intencis postsekvi la vojaĝon de Darwin sed el la opozicia vidpunkto de la kontraŭevolua konvinkoj de Agassiz, kiu estis la lasta akademia defendanto de la kreismo. Li tamen publikigis nenion pri sia vizito, sed apenaŭ en kelkaj leteroj li esprimis la geologie malĝustan ideon ke la insuloj estas junaj, kaj ke do nur en geologie iom ĵusa epoko la bonfara Kreinto plenigis ilin je bestoj kaj plantoj...

Diversaj naturhistoriaj muzeoj sendis esplorajn ekspediciojn al la insularo fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcento. Fakte okazis vera invado de sep sciencaj vizitoj el Kalifornio inter la jaroj 1897 kaj 1906. Dum la lasta oni kaptis 75 000 pecojn, inkluzive de 264 testudoj el 10 diversaj insuloj. La nuntempa turisma industrio starigas seriozan minacon al la ekosistemo de la insuloj.



De fringoj al nova teorio

Unu el la plej karakterizaj bestogrupoj el la Galapagaj Insuloj estas tiu kiun la brita kirurgo kaj ornitologo Percy Lowe eknomis la Darwinaj fringoj, per sia studo *The finches of the Galapagos in relation to Darwin's conception of species* (1936). La nomo de tiu grupo de paserbirdoj estis poste amase disvastigita per la tre detala esploro kiun pri ili faris en la Galapagoj mem la brita evolu-biologiisto David Lack, publikigita libroforme en 1947 (*Darwin's Finches*).



Fakte, dum sia vizito, Darwin mem kolektis nur parton el la specioj de galapagaj fringoj. Lia kolekto estis poste (en 1837) detale esplorata de la ornitologo John Gould en Britio. Estis li kiu sugestis ke la fringoj estas nova grupo limigita al la Galapagoj, al kiu ĉiuj el la 12 kolektitaj specioj apartenas. Tiu ĉi konkludo plifortigis la naskiĝantan konvinkon ĉe Darwin pri la transformiĝo de la specioj.

La Darwinaj fringoj estas unu el la plej konataj “emblemoj” de la evoluo kiel vivfenomeno. La varieco de la formo kaj grandeco de iliaj bekoj kiel efiko de adaptoprocezoj al malsamaj fontoj de nutrado, estas unu el la plej rimarkindaj ekzemploj de adapta radiado.

Interese, dum la lastaj 30 jaroj la ornitologiistoj Peter kaj Rosemary Grant faris sistemajn esplorojn pri la fringoj en kelkaj el la malgrandaj insuloj. Ili eĉ konkludis ke la evoluo per natura selektado povas okazi multe pli rapide ol antaŭe agnoskita.

Insulo Thule vera kaj fikcia



Věra Barandovská-Frank

Naskiĝis 1952, ĉeĥino, klasika filologo, profesorino de AIS San Marino, specialiĝis pri latinidaj planlingvoj, instruis universitate en Ĉeĥio, Slovakio, Rumanio, Germanio kaj Pollando. Engaĝiĝas en latinlingva movado (Latinitatis Vivae Provehendae Associatio), redaktas plurlingvan revuon *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, verkis centon da publikaĵoj.

Resumo

Islando estas, laŭ pluraj asertoj, identa kun la antikva insulo Thule. “...an deus immensi venias maris, ...tibi serviat ultima Thule” – se vi venos kiel dio de grandega maro, servu al vi eĉ la plej fora Thule, deziris Vergilio en la jaro 29 a.K. al sia mecenato. “Ultima Thule” estas tradicia antikva frazeologiaĵo por indiki la plej foran limon de la konata mondo. Poemoj de J.W. Goethe, de E.A. Poe, de H.W. Longfellow kaj aliaj prikantis ankaŭ post jarcentoj tiun ĉi misteran landon, pri ĝia mitologio interesiĝas mistikuloj kaj okultistoj, ĝiajn baladojn hodiaŭ prezentas en la latina kaj en la islanda la grupo “Voces Thules”, kies repertuaro (ekz. Krummavísur) famiĝis en la tuta Eŭropo, la nomon de Thule transprenas kelkaj skandinaviaj muzikgrupoj, diversaj kulturaj organizaĵoj, kaj ĝis 2012 ekzistis eĉ “Academia Thules” pri antikva kaj moderna latinlingva literaturo.

Ni komence konatiĝu kun la plej malnovaj priskriboj kaj mencioj pri Thule ĉe antikvaj aŭtoroj – geografoj, historiografoj, verkistoj kaj poetoj, kiel ekzemple Polybios, Strabo, Plinius Secundus, Prokopios, Tacitus, Boethius kaj poste kun iliaj konfrontoj en modernaj literaturo, scienco kaj kulturo.

The island of Thule in fact and fiction

Summary

Iceland, some claim, is identical to the ancient island of Thule: “...an deus immensi venias maris, ... tibi serviat ultima Thule” – if you come as god of a vast sea ... may even farthest Thule serve you – Virgil wrote of his patron in AD 29. “Ultima Thule” is an ancient and traditional set phrase to indicate the farthest edge of the known world. Centuries later, poems by Goethe, Poe, Longfellow and others sung of this mysterious land, mystics and occultists take an interest in its mythology, its ballads are presented today in Latin and Icelandic by the group Voces Thules, whose repertoire (e.g. Krummavísur) has become famous throughout Europe, the name of Thule has been adopted by several Scandinavian music groups and various cultural organisations, and until 2012 there was even an “Academia Thules” of ancient and modern Latin literature.

We start by looking at the oldest descriptions and mentions of Thule in the writings of ancient authors – geographers, historians, writers and poets such as Polybius, Strabo, Pliny the Elder, Procopius, Tacitus, Boethius and others – and then at the echo in modern literature, science and culture.

L’île de Thulé, vérité et fiction

Résumé

Selon plusieurs théories, l’Islande peut être identifiée à l’antique île de Thulé. “...an deus immensi venias maris, ...tibi serviat ultima Thule” – si tu viens en tant que dieu de l’immense mer, que te soit soumise même la lointaine Thulé, souhaitait Virgile à son mécène en l’an 29 avant JC. “Ultima Thule” est l’expression antique traditionnelle pour désigner la limite la plus lointaine du monde connu. Des poèmes de J.W. Goethe, d’E.A. Poe, de H.W. Longfellow et autres ont chanté, encore après des siècles, cette terre mystérieuse; à sa mythologie s’intéressent mystiques et occultistes; ses balades sont aujourd’hui interprétées en latin et en islandais par le groupe “Voces Thules”, dont le répertoire (p. ex. Krummavísur) est célèbre dans l’Europe entière, le nom de Thulé a été adopté par quelques groupes de musique scandinaves, diverses organisations culturelles, et jusqu’en 2012 il existait même une “Academia Thules” concernant la littérature de langue latine ancienne et moderne.

Nous ferons d’abord connaissance avec les plus anciennes descriptions et mentions de Thulé chez les auteurs de l’Antiquité – géographes, historiens, écrivains et poètes comme, entre autres, Polybe, Strabon, Pline le Jeune, Procope, Tacite, Boèce, et nous les confronterons ensuite à celles des littérature, science et culture modernes.

Eyjan Thule sönn og uppdiktuð

Útdráttur

Ísland svarar til hinnar fornu eyjar Thule að því er margir fullyrða “...an deus immensi venias maris, ... tibi serviat ultima Thule” – komir þú eins og guð hins víðfeðma hafs, skal jafnvel Thule lengst í fjarska þjóna þér, óskar Virgill velgerðamanni sínum árið 29 fyrir Krist. Til forna nefna menn gjarnan “Ultima Thule” til þess að tákna endimörk hins þekkta heims. Í ljóðum J.W. Goethe, E.A. Poe, H.W. Longfellow og fleiri ómar einnig öldum síðar söngurinn um þetta leyndardómsfulla land. Goðheimar þess hafa hrifið ýmiss konar dulspekinga. Þjóðkvæði þaðan eru nú kynnt á latínu og íslensku af hljómsveitinni “Voces Thules”, en söngvaskrá hennar (t.d. Krummavísur) hefur hlotið frægð um alla Evrópu. Nokkrar skandinavískar hljómsveitir hafa tekið sér nafnið Thule, svo og ýmis félagasamtök og fram til 2012 var meira að segja til “Academia Thules” um fornar og nýjar bókmenntir á latínu.

Fyrst verða kynntar elstu ritheimildir þar sem Thule er nefnt og um það fjallað hjá fornum höfundum – landfræðingum, sagnfræðingum, rithöfundum og skáldum, eins og til dæmis Polybios, Strabo, Plinius Secundus (Plinius eldri), Prokopios, Tacitus, Boethius og fleiri og síðan greint frá því hvernig um það er fjallað í nútíma bókmenntum, vísindum og menningu.

Insulo Thule vera kaj fikcia

1. Geografiaĵoj

Certas, ke Thule (ankaŭ Θουλη, Θυλη, Thula, Thyle, Thile, Thila, Tile, Tila, Tilla, Tyle, Tyli) estas insulo (aŭ lando) kuŝanta en fora (eŭropa) nordo, verŝajne la plej fora (= ultima), kie loĝas homoj. Etimologie povas temi pri prahindeŭropa vorto **telu* (komp. lat. *tellus*), do en la kelta kaj ĝermana mitologio “la lasta lando”, kiu estis supozata en Atlantiko.

Ĝia unua konata priskribo aperis en la vojaĝraporto de **Pytheas** (Πυθέας Μασσαλιώτης, proks. 380-310 a.K.) “Faktoj pri la Oceano”, t. e. pri Atlantiko (Τὰ¹ περὶ τοῦ Ὠκεανοῦ), (foje menciata nur kiel “Pri la Oceano”), kiu ne konserviĝis ĝis nunaj tempoj, sed kies partoj estas konataj el citaĵoj, dissemitaj tra verkoj de pli postaj antikvaj aŭtoroj.

Pytheas devenis el prosperanta greka kolonio Massalia (nun Marseille en Francio), fama ne nur pro sia riĉeco kaj komerco kun eksterlando, sed ankaŭ pro florantaj kulturo, scienco kaj filozofia lernejo. Pytheas interesiĝis ĉefe pri geografio kaj astronomio, interalie li faris kalkulojn pri la klino de la tergloba akso al la ekliptiko kaj mem konstruis kaj plibonigis instrumentojn por distancomezurado, ekz. gnomonon kaj poloson², li elkalkulis la gradon de geografia latitudo de Massalia kaj la pozicion de la norda ĉiel-poluso.

Lia vojaĝo norden tra Atlantiko, farita ĉirkaŭ la jaro 325 a.K. kaj priskribita en la menciita vojaĝraporto, estis evidente lia plej fama, pri alia aŭ aliaj vojaĝraportoj ekzistas nur svagaj informoj. Pytheas estis ankaŭ la unua konata greko, kiu priskribis polusan lumon kaj glaĉerojn. Pri la preciza trajektorio de lia vojaĝo ekzistas diversaj opinioj. Laŭ unu el ili (vd. Herde 2006, bildo 1) li navigis de Massalia tra la kolonoj de Heraklo (Ĝibraltaro) norden laŭ la bordoj de Ophiussa (Ibera duoninsulo) kaj Keltike (okcidenta Eŭropo), vizitis la insulon Albion ĉe Prettanike (Britio), atingis Berrike (eble la ĉefinsulo de Ŝetlandoj) kaj de tie la plej nordan punkton de sia vojaĝo, la insulon Thule. La revenvojo iris probable tra la Norda maro suden al insuloj en la hodiaŭa Balta maro kaj al Massalia eble tra la riveroj Rhenos kaj Rhodanos (Rejno kaj Rodano). Tiom grandan vojaĝon opiniis kelkaj antikvaj verkistoj fantazia, tial legiĝas eĉ centon da jaroj poste ekz. en *Historioj* de **Polybios**³, libro XXXIV, 5, 7-10: “... estas pli bone kredi al la messenano Euhemeros⁴ ol al Pytheas, ĉar Euhemeros diras, ke li navigis nur al unu lando, Panchaia, sed Pytheas diras, ke li estas persone vizitinta la tutan nordan bordon de Eŭropo ĝis la fino de la mondo: la afero, kiun ni ne kredus eĉ se [la dio] Hermeso mem dirus ĝin al ni.”

Kie troviĝis la plej fora celo de tiu vojaĝo? Laŭ la peritaj priskriboj de Pytheas, proksimume 10 500 stadiojn (t. e. ĉ. 1650 kilometrojn) norden de la enmariĝo de la rivero Borysthenes⁵. La navigado per boato de Berrike norden al Thule daŭris ses tagojn. Estas malprobable, ke la tuta navigado okazis per unu ŝipo el Mediteraneo ĝis Atlantiko, pli verŝajne Pytheas simple kunvojaĝis sur komercaj aŭ privataj ŝipoj en la celata direkto. (Tiun ĉi signifon

¹ τὰ, pluralo de la artikolo τό (“ĝi”) signifas proksimume: la aferoj, la aĵoj, la faktoj.

² γνόμων, “indikilo”, ankaŭ orta montrilo de sunhorloĝo, uziĝis en antikveco i.a. por mezurado de geografia larĝeco, πόλος estis i.a. angulomezurilo ebliganta mezuri la distancon de la ĉiela poluso al la horizonto.

³ Πολύβιος Μεγαλοπόλιτης (203-120 a.K.) greka historiisto.

⁴ Εὐήμερος ὁ Μεσσηνίος (340-260 a.K.) greka filozofo, aŭtoro de Ἱερῆ Ἀναγραφῆ», mitologiaj rakontoj i.a. pri utopia lando Παγχαία (Panchaia).

⁵ Βορυσθένης: Dnjebro.

Alia objekto, kiun antikvaj aŭtoroj entute ne kapablis interpreti aŭ eĉ kredi, estis priskribita de Pytheas kiel ŝvebantaj pecoj de πλεῦμονι θαλαπτιῶ (latine: pulmonis marini), t.e. de animalo konata en Mediteraneo kiel meduzo, do iu spongeca substanco. Ĉe Polybios, libro XXXIV, 5, 2-6 staras, ke “... Pytheas kondukis multajn homojn en eraron, dirante ke li tramigris la tutan Brition ... kaj parolante ankaŭ pri Thule, pri regionoj en kiuj ne plu estis lando nek maro nek aero, sed iu miksaĵo de tiuj tri en konsisto de meduzo ... en kiu oni povas nek paŝi nek navigi ... Li diras, ke li mem vidis tiun meduzecan substancon.” Laŭ Burton (1875) povis temi pri pumiko, kiu elŝprucis post erupcio de iu vulkano. En 1783 okazis io simila dum navigado de brita ŝipo proksime de la kabo de Reykjanes, kie la pumiko tiom kovris la marsurfacon, ke apenaŭ eblis pluveturi. Tial, diras Burton, se la antikva verkisto Herodotos priskribis la al li nekonatan neĝon kiel plumaron, Pytheas analogie uzis por priskribo de pumiko la nomon de laal li konata meduzo.

La plej ampleksaj citaĵoj de la verko de Pytheas troviĝas, kun komentoj, ĉe **Strabon** (Στράβων, 63 a.K.–24 p.K.). Strabon devenis el Amaseia (nun Turkio), tiam apartenanta al la romia provinco Bythinia et Pontos. Liaj familianoj estis altrangaj oficistoj de la pontosa reĝo Mithridates VI. Strabon studis ĉe pluraj eminentaj instruistoj, i. a. ĉe la retoro Aristodemos, specialiĝinta pri interpretado de la Homeraj epeoj. Ekde la jaro 44 a.K. Strabon vivis en Romo kaj estis instruata de peripatetikaj filozofoj Xenarchos kaj Tyrannion, sed li mem inklinis al stoikismo, vivante akorde kun la naturo. Tyrannion krome estis fakulo pri geografio. Geografio, t.e. priskribo de la terglobo, estis unu el la konataj inventaĵoj de antikvaj grekoj kaj multaj ŝatis praktiki ĝin. Ili tre bone konis sian Mediteraneon, priskribitan jam de fenicoj, do eble tial ili pli volonte praktikis “oikuméné”, priskribon de fremdaj landoj, pri kiuj ekzistis diversaj mitoj kaj rakontoj, kaj kies reala ekkono estis aventura, ne malofte eĉ danĝera.

La plej fama verko de Strabon estas la 17-volumaj “geografiaĵoj”, *Geographika*. En ĝi konserviĝis citaĵoj kaj informoj de nun perditaj verkoj de antaŭaj geografoj, kiujn Strabon kompilis kaj komentis. Lia ĉefa merito estas la apliko de vidpunktoj fizikaj, historiaj, politikaj kaj kulturaj, pro kiuj la verko elstaras. La unuaj du libroj estas diskursa enkonduko, apogata ĉefe sur Homero. Same kiel Heinrich Schliemann en la 19-a jc., Strabon opinias la geografiajn indikojn ĉe Homero precizaj kaj fidindaj, dum li dubas pri postaj verkistoj. Li eĉ pravas, ke ekz. Eratosthenes, du jarcentojn antaŭ li, misinterpretis geografiajn indikojn le Homero. La ceteraj libroj de *Geographika* priskribas Eŭropon (3-10), Azion (11-16) kaj Afrikon (17). Krom geografumado Strabon filozofumas pri la greka civilizo, ĝiaj dependo kaj influo de la mediteranea ĉirkaŭaĵo al evoluo de artoj, sciencoj kaj kulturo. Strabon persone vizitis multajn landojn, ĉefe Malgrandan Azion, Egiption, Etiopion kaj sudan Eŭropon, kaj liaj priskriboj de naturo kaj popoloj en *Geographika* intencis ankaŭ esti iu praktika manlibro por vojaĝantoj.

Kiel menciite, Strabon ne fidis al aliaj geografoj. Li estis skeptika ankaŭ pri la verko de Pytheas, ofte dubis pri liaj eldiroj kaj nomis ĝin eĉ mensogulo – la grekoj vivantaj ĉe Mediteraneo ja apenaŭ povis al si imagi glaĉerojn, nokton du horojn longan aŭ polusan lumon.

En la libro I, §4, parto 2-3 Strabon parolas pri la geografia mezurado de Pytheas: “*Fine li diras, ĉe la determino de la latitudo de la enloĝata mondo, ke el Meroe⁶ estas, laŭ la meridiano tirata tra tiu ĉi urbo, ĝis Aleksandrio dek mil, de tie al Helesponto⁷ ĉ. ok mil tricent, poste al Borysthenes kvin mil, poste al polarcirklo tra Thule – kiu kuŝas, laŭ Pytheas, ses tagvojaĝojn norden de Britio kaj en proksimeco de frostiĝinta maro – ankoraŭ ĉ. dek unu mil kvincent; se ni do aldonas ankoraŭ tri mil kvincent super Meroe, ... rezultus tridek ok mil*

⁶ Μερόη (Medewi): inter 400-300 a.K. la ĉefurbo de Kuŝ, nun en Sudano.

⁷ Ἑλλήσποντος: Dardaneloj, markolo inter Azio kaj Eŭropo.

stadioj. Pri la ceteraj distancoj oni konsentu kun li, ĉar pri ili regas sufiĉa samopinio. Sed tiu de Borysthenes al la poluscirklo tra Thule: kiu racia homo povus aprobi tion? Tie, unue, montriĝis Pytheas, la homo kiu raportas pri Thule, kiel trompegulo, kaj [due], tiuj, kiuj vidis Brition kaj Ierne⁸, diras nenion pri Thule, dum ili parolas pri aliaj, malgrandaj insuloj apud Britio. Kaj krome, Britio mem havas proksimume la saman longecon kiel Keltike, apud kiu ĝi etendiĝas...”

En la libro II, §8 oni legas simile: “Nun cetere asertas la massaliano Pytheas, ke la ĉirkaŭaĵo de Thule, la plej norda el la britaj insuloj, estas la lasta, kie la cirklo de somera solstico estas identa kun la poluscirklo. Sed ĉe aliaj [geografoj] mi ne trovas ion ajn pri tio, nek ke ekzistas insulo Thule, nek ĉu eblas loĝi en tiu regiono ĝis la loko, kie la cirklo de somera solstico iĝas la poluscirklo. Kaj mi kredas, ke la norda limo de la enloĝata mondo troviĝas pli sude ol tiu ĉi: se do la nunaj raportantoj povas diri nenion pri io troviĝanta pli malproksime ol Ierne, [dirante] ke Britio ne etendiĝas tro al nordo kaj ke ĝi estas enloĝata de tute sovaĝaj homoj, kiuj vivas malbone pro malvarmo, tial mi opinias, ke tie estas starigenda la limo.”

La aserto pri la sovaĝeco de loĝantoj de Britio kaj Ierne ripetiĝas ankoraŭ en la libro IV, §4, kaj la sekvanta §5 diras: “La raporto pri Thule estas eĉ pli malcerta, pro ties ekstereco - se tio tamen estas la insulo, kiun oni opinias la plej norda el ĉiuj antaŭe nomataj. Kaj ke tio, kion raportas Pytheas pri ĝi kaj pri aliaj lokoj en tiu ĉi regiono, estas elpenaĵoj, klaras pro la lokoj, kiuj estas al ni konataj: se eĉ pri tiuj li rakontis grandparte mensogaĵojn, kiel ni jam menciis pli frue, tiam klaras, ke pri foraj regionoj li mensogis eĉ pli.”

La aliron de Strabon kritikas kelkaj komentistoj de lia verko, i. a. Isaac Casaubon (1559-1614), humanisma filologo kaj historiisto, kiu eldonis *Geographica* kun latina traduko de Wilhelm Xylander: “Thule non esse aliam quae Islandia hodie dicitur, facile doctis viris assentior” (*Mi facile konsentas kun kleruloj, ke Thule estas nenio alia ol tio, kio hodiaŭ nomatas Islando.*)

Pluan mencion pri Pytheas ni trovas ĉe la unua antikva enciklopediisto **Gaius Plinius Secundus Maior** (23-79). Li estis romia nobelo, sperta advokato, armea altrangulo kaj administranto de kelkaj provincoj. Interalie li akompanis la imperiestrojn Vespazianon kaj Titon dum iliaj militkampanjoj tra la provinco Germania. El liaj verkoj elstaris kaj konserviĝis *Naturalis historia* (Naturhistorio), 37-voluma verko, fakte la unua konata enciklopedio, kiu resumis la natursciencajn sciojn de sia epoko. Ĝi enhavas artikolojn pri fizika geografio, kosmologio, geologio, geografio, antropologio, zoologio, botaniko, medicino, mineralogio kaj metalurgio. La geografiaj indikoj apogiĝas sur geografiistoj de Aleksandro la Granda, sur Eratosthenes⁹ k.a. Jam en la dua libro, sub la titolo “gnomoniko kaj tagodaŭro” staras, ke en la nordo ekzistas regionoj kun ses monatojn longa tago kaj male kun ses monatojn longa nokto, kio, laŭ indiko de Pytheas el Massalia, estas ankaŭ la kazo de Thule. Poste ripetiĝas la informo troviĝanta ĉe Strabon, ke Thule laŭ Pytheas troviĝas ses tagojn de navigado norden de Britio (“... lucis ambitu subiecta terrae continuos dies habere senis mensibus noctesque e diverso ad brumam remoto, quod fieri in insula Thyle Pytheas Massiliensis scribit, sex dierum navigatione in septentrionem a Britannia distante ...” Lib. II, ĉap. 75, § 187).


Similaj faktoj estas troveblaj ankaŭ en la libroj III ĝis VI, kiuj estas detale dediĉitaj al geografio, ekz. Lib. IV, ĉap. 30, §104: “La plej malproksima el ĉiuj rememortaj [insuloj] estas Thule, sur kiu, kiel dirite, ne estas nokto dum somera solstico, kiam la suno pasas tra

⁸ Ἰέρπη: Irlando.

⁹ Ἐρατοσθένης Κυρηναῖος (273-174 a.K.) multflanka sciencisto, estro de la fama biblioteko en Aleksandrio.

la signo de Kankro, male dum vintra solstico ne estas tago.” (Utima omnium quae memorantur Tyle, in qua solstitio nullas esse noctes indicavimus, cancri signum sole transeunte, nullosque contra per brumam dies). De Britio oni kutimas navigi ankaŭ al aliaj insuloj, ekzemple Ictis, kiun mencias la historiisto Timaeus, kaj “... kelkaj aliaj mencias [insulojn?] Scandiae, Dumna, Bergae kaj la plej grandan Berrike, el kiuj oni [laŭdire] navigas al Thule. Unu tagon da navigado de Thule estas la frostinta maro, kiun kelkaj nomas Gronium¹⁰.” (Sunt qui et alias prodant, Scandias, Dumnam, Bergos maximamque omnium Berricen, ex qua Tylen navigetur, a Tyle unius diei navigatione mare concretum a nonnullis Gronium appellatur.) Ankoraŭ foje ripetigās en Libro VI, ĉap. 39, § 219, dum klarigoj pri ekvatoro, cirkloj kaj paraleloj “ ... la lasta estas Skita [paralelo] de Ripea montkresto ĝis Thule, sur kiu, kiel ni diris, kontinue sinsekvas tagoj kaj noktoj” (... postremum Skythicum a Ripaeis iugis in Tylen, in quo dies continuarentur, ut diximus, noctesque per vices.)

Pomponius Mela (†45), romia kosmografo kaj geografo, estas aŭtoro de *Chorographia* poste nomata ankaŭ *Cosmographia* aŭ *De situ orbis*, la plej malnova konata latinlingva geografia verko. Ĝi baziĝas sur ĉefe grekaj fontoj, inklude de Homeros kaj Eratosthenes, kaj konsistas el tri libroj: la unua priskribas la regionon ĉirkaŭ Mediteraneo, la dua la regionon ĉirkaŭ la Nigra Maro kaj la tria “la reston de la (konata) mondo”. Tiu ĉi libro (ĉap. III, § 6) pritraktas ankaŭ Brition, Irlandon (Iverna), Orkadojn, Ŝetlandojn (Haemodae) kaj, probable, Skandinavion. Thule estas priskribata kiel insulo jam konata al grekoj, kie la suno somere eliras kaj baldaŭ subiras sen aperi supre, la noktoj estas mallongaj, en la vintro tute obskuraj kaj somere lumaj, la suno supreniras dum tiu sezono kaj kvankam ne plene videbla, ĝi lumigas per sia beleco la ĉirkaŭaĵon. La geografia pozicio estas krome videbla sur aldonita mapo de la konata mondo, kies originala projekcio estas por ni nekutima. Normale la mapoj estis orientitaj, do en propra senco direktitaj orienten. Sur la loko, kie estas supozata Skandinavio, troviĝas golfo “Codanus sinus” kun aro da insuloj, el kiuj la plej granda estas nomata Codanovia. Thule estas bildigita kiel ovalforma insulo, kuŝanta oriente de la enmariĝo de Vistulo, kontraŭ la bordoj enloĝataj de (popolo) Belcae.



Bildo 2. La mapo de Pomponius Mela

¹⁰ aliaj legaĵoj: Cronium, Scronium.

En la jaro 85 alproksimiĝis al Thule la unuan fojon romia ekspedicio, gvidata de **Gnaeus Iulius Agricola** (40-93), nobelo, senatoro kaj militisto, kiu subigis al Romo grandan parton de Britio. Kiel raportas lia biografiisto Tacitus, (*Agricola*, ĉap. 10, §4) la ekspedicio navigis ĉirkaŭ la Britaj insuloj kaj konfirmis ties insulecon, kontinuigis al Orkadoj – insuloj ĝis tiam nekonataj, kaj poste vidis Thule, sed ne iris pli foren, ĉar oni ordonis navigi nur ĝis tie, kaj krome alproksimiĝis vintro kaj la maro estis frostinta (“pigra kaj peza”), tiel ke remado ne eblis: “Hanc oram novissimi maris tunc primum Romana classis circumvecta insulam esse Britanniam adfirmavit, ac simul incognitas ad id tempus insulas, quas Orcadas vocant, invenit domuitque. Dispecta est et Thule, quia hactenus iussum, et hiems adpetebat. Sed mare pigrum et grave remigantibus perhibent ...” El tio kompreneblas, ke laŭ romianoj Thule troviĝis “malantaŭ” (norde de) Orkadoj. Similaj indikoj troviĝas ĉe Ptolemaios.

Klaudios Ptolemaios (Κλαύδιος Πτολεμαῖος, ĉ. 100-180), fama multflanka sciencisto, farinta gravajn inventaĵojn i.a. en matematiko, optiko kaj astronomio, estas aŭtoro de *Universala geografio* (Γεωγραφικὴ Ὑφήγησις – Geographia Universalis), la unua antikva atlaso de la mondo kun sistemo de koordinatoj. Ptolemaios menciis Thule naŭ fojojn ĉe la indikado de norda latitudo kaj longitudo, asertante, ke ĝi estas insulo, kiu atingas 3°17' de la polusa cirklo (t. e. 66°32') kaj kuŝas norde de Orkadoj.

Ammianus Marcellinus (330-395), greko el Antiochio, estis aŭtoro de *Res Gestae* (Okazaĵoj), la lasta grava historia verko de antikvo. Ĝi estis verkita latine, celante kontinui la *Historiojn* de Tacitus. Ammianus estis klera oficiro kaj persona akompananto de “magister militum” Ursicinus dum ties misioj en Persio, poste li mem vojaĝis tra Grekio, Trakio kaj Egiptio. Lia verko *Res Gestae* kovris la tempointervalon inter la jaroj 96-378. La originalo enhavis 31 librojn (laŭ kelkaj teorioj 36, dividitajn en ses sesopoj), el kiuj perdiĝis la unuaj 13. La libroj 14-19 pritraktas militajn operaciojn de la generaloj Ursicinus kaj Marcellus en okcidenta Eŭropo, sub la imperiestro Julianus (proklamita “cezaro” de Galio). Legeblas, ke dum tio Ursicinus troviĝis apud Thule, sen indiko de la preciza pozicio: (*Res Gestae* XVIII,6,31): “Etiamsi apud Thulen moraretur Ursicinus”.

Mencion pri la pozicio de Thule oni trovas ĉe **Gaius Julius Solinus** (verŝ. 3-a–4-a jc.), romia historiisto-kompilisto, kies ĉefverko *De mirabilibus mundi* (Pri la miraĵoj de la mondo, en mezepoko pli konata sub la titolo *Polyhistor*, kiu estis ankaŭ pseŭdonomo de la aŭtoro) estas kolekto de kuriozaĵoj. Solinus tie vaste kompiladis kaj kombinis sciigojn de antaŭaj aŭtoroj, ĉefe de Plinius, Suetonius kaj Pomponius Mela. Li evidente mem ne vidis la priskribatajn landojn kaj kuriozaĵojn kiel brulantan neĝon kaj saltantajn homojn denature unupiedajn, sed mezepokaj legantoj ŝatis tiajn “raportojn” kaj ofte referencis pri la verko. Pri Thule oni legas: “Ab Orcadibus Thylen usque quinque dierum ac noctium navigatio est, sed Thyle larga et diutina Pomona copiosa est” (De Orkadoj ĝis Thule oni navigas kvin tagojn kaj noktojn, sed Thule abundas per abundaj kaj daŭraj rikoltoj) – la indiko pri riĉaj rikoltoj do iom dubigas, ĉu fakte temis pri Islando.

Simile oni povas dubi pri tio, leginte la aserton de la bizanca historiisto **Prokopios** (Προκόπιος ὁ Καισαρεύς, ĉ. 500-565), laŭ kiu Thule estas dekfoje pli granda ol Britio. Prokopios devenis el la riĉa palestina urbo Kaisareia, studis retorikon kaj juron, krom la gepatra greka li posedis la lingvojn latinan, persan kaj gotan. En la jaro 526 li estis milita konsilisto en la armeo de la imperiestro Justiniano. La historia verko de Prokopios Ὑπὲρ τῶν πολέμων λόγοι ([vortoj = tekstoj, historio] pri militoj, latine *De bellis* aŭ *Historiae*) konsistis originale el sep libroj, priskribantaj militojn kontraŭ persoj (libro I kaj II), kontraŭ vandaloj (libroj III kaj IV) kaj kontraŭ gotoj, kiuj tiam okupis la iama okcidentromian imperion (libroj V-VIII). La tri partoj estas konceptitaj kiel memstaraj, komenciĝante per antaŭhistorio de la

militoj kaj sekve kronologie raportante pri la okazaĵoj ĝis la jaro 550. En 552-553 aldoniĝis la kvara libro pri la milito kontraŭ gotoj (τῶν Γότθων Βιβλία Ζ', latine: De bello Gothico IV), kiu tamen estas kroniko de okazaĵoj en la tuta bizanca imperio ĝis la detruo de la Ostrogota Imperio. En tiu ĉi libro (ĉapitro VI, §6) estas menciataj ankaŭ aliaj eŭropaj popoloj. Ni povas legi pri Heruloj, kiuj, postkiam ili estis venkitaj de Langobardoj, parte migris norden kaj "fondis setlejojn ĉe la lasta limo de la konata mondo", transirante interalie la regionojn de slavo kaj danoj (ĉiuj nomataj "sovaĝaj popoloj"), kaj "atinginte oceanon, ili enŝipiĝis kaj navigis al Thule, kie ili restis. Thule estas tre granda insulo, pli ol dekfoje pli granda ol Britio; ĝi troviĝas de tie pli fore al la nordo."

Kristanaj kronikistoj Beda Venerabilis (672-735, en sia verko *Historia ecclesiastica gentis Anglorum*, ĉ. la jaro 730) kaj Adam el Bremen indikas kiel Thule klare Islandon.

Adamus Bremensis (germane Adam von Bremen, ĉ. 1040-1085) estis geografo kaj historiisto, ekde 1066 ĉefinstruisto (scholasticus) ĉe la kapitulo en Bremen. Al la hamburga-bremena diecezo tiam apartenis la balta marbordo, Skandinavio, Orkadoj, Ŝetlandoj, Islando, Gronlando kaj eĉ Vinlando (de vikingoj sub Leifur Eiríksson en la 10-a jc. atingita Nordameriko, kies faktan grandecon oni tiam ankoraŭ ne konis). Adam verkis, laŭ ordono de sia episkopo Adalbert, *Kronikon de la hamburga-bremena ĉefepiskopa eklezi[e]jo* (*Gesta Hammaburgensis Ecclesiae Pontificum*). Ties unua kaj dua libroj priskribas, kiel taskite, la eklezian historion kaj historiajn okazaĵojn en Skandinavio ekde la 8-a jc., la tria libro estas biografio de la ĉefepiskopo mem kaj la tuta kvara libro estas speciale dediĉita al la priskribo de nordaj insuloj en Atlantiko (ĝia titolo estas *Descriptio insularum aquilonis*). Same kiel iam Pytheas, Adam nomas Atlantikon simple "Oceano", opiniante, ke ĝi kovras la tutan (konatan) mondon: "Post Nortmanniam, quae est ultima aquilonis provintia, nichil invenies habitacionis humanae nisi terribilem visu et infinitum oceanum, qui totum mundum amplectitur" (*Malantaŭ Nortmanio*¹¹, kiu estas la lasta norda lando, vi trovas neniun homan loĝejon, nur teruran kaj senfinan oceanon, kiu ampleksas tuton) (*Gesta H.*, IV, 34). Ankaŭ Adam tendencas priskribi la nordajn landojn, kiel insulojn aŭ "preskaŭ-insulojn" = "fere insulae"), inkluzive de Gronlando kaj Vinlando (= Nordameriko), pri kies insuleco oni en la 11-a jc. ankoraŭ tute nenion povis scii. Multon li transprenas de aliaj aŭtoroj, do ege malprobable li estis vizitinta la landojn kiel Svedio (Suenia, Suetia), pri kiu li referencas al Solinus, ke tie vivas Amazonoj, Kiklopoj kun unu okulo sur la frunto, unupieduloj kaj manĝantoj de homa karno. ("Ibi sunt Amazones, ... ibi Cyclopes qui unum in fronte habent oculum. Ibi sunt ... Yamantopodes, una pede salientes, et illi qui humanis carnibus delectantur pro cibo ...", *Gesta H.*, IV, 25)

Al Thule estas dediĉita la ĉapitro 35: Thule troviĝas meze de la Oceano, en granda distanco de aliaj landoj. Kaj romiaj, kaj barbaraj verkistoj jam estis raportintaj pri ĝi. Thule estas la lasta el ĉiuj regionoj ("ultima omnium Thyle"), kie dum somera solstico, kiam la suno transiras la signon de Kankro, estas neniun nokto, kaj dum vintra solstico preskaŭ neniun tago. Tion, kiel diras la komentisto de Adam, asertis jam Solinus, kaj Beda Venerabilis raportis simile pri Britio, ke tie somere estas longegaj tagoj kaj vintre preskaŭ neniun suno. Laŭ Adam skribis Pytheas, ke post ses navigadtagoj norden de Britio atingeblas Thule kaj de tie post unutaga navigado oni trovas la maron glaciiginta, ĉar la suno ne varmigas ĝin. Pri Thule mem diras Adam, ke tiu nun nomatas Islando (do Glacilando), pro glacio, ĉar tiu premas, (densigas) la oceanon: "Thyle nunc Island appellatur a glacie, quia oceanum astringit." Plue legiĝas, ke tie ekzistas "glacio" tiom malnova kaj sekiĝinta, ke ĝi estas nigra kaj bruligebla (karbo?).

¹¹ Ĉu Norvegio?

La insulo mem estas grandega, kaj “interne” vivas multaj homoj, kiuj vestiĝas per lano/peltoj kaj vivtenas sin per brutbredado; ĉar tie ne estas (ter)fruktoj kaj nur malmulte da ligno, oni vivas en subteraj kavernoj kune kun sia brutaro. (“Est autem insula permaxima, ita ut populos infra se multos contineat, qui solo pecorum fetu vivunt eorumque vellere legentur; nullae ibi fruges, minima lignorum copia, propterea in subterraneis habitant speluncis, communi tecto ut strato gaudentes cum pecoribus suis”.) Tiel ili en sankta simpleco pasas sian vivon en akordo kun la naturo. Tio estas popolo feliĉa, ĉar neniu envias ties malriĉecon, kaj, ĉar nun ĉiuj ankaŭ estas kristanoj, ili estas feliĉegaj, diras Adam. Ili ne havas reĝon, nur leĝon, kaj ili obeas sian episkopon. La hamburga-bremena ĉefepiskopo sendis al ili sanktulon (“quendam sanctissimum virum”) nomatan Isleph, alskribante la islandan kaj gronlandan popolon (“transmisit suos apices populo Islandorum et Gronlandorum”) kaj promesis iam mem viziti ilin, sed – rimarkas Adam – kvankam tia intenco laŭdindas, la vojaĝo al “ultima Thyle” ŝajnas malprobabla. El tio oni povas konkludi, ke ankaŭ Adam ne vizitis Thule, se tion ne faris lia superulo.

Adam plu apogiĝas sur aliaj aŭtoroj: “Post quam insulam, ait, terra non invenitur habitabilis in illo oceano, sed omnia, quae ultra sunt, glacie intolerabili ac caligine immensa sunt. Cuius rei Martianus ita meminit: Ultra Thylen, inquiens, navigatione unius die mare concretum est.” : *Malantaŭ tiu insulo, onidire, ne ekzistas enloĝata tero en tiu oceano, sed ĉio, kio estas poste, estas en neeltenebla glacio kaj senfina nebulo. Pri tio memorigis Martianus jene: unu tagon de navigado malantaŭ Thule, li diras, estas la maro firma.*” (*Gesta H.*, IV, 37).

La resumon de geografiaj kaj kulturaj scioj pri Thule ĝis la dua duono de la 19-a jarcento ni povas legi sur la unuaj 39 paĝoj de la libro *Ultima Thule or A Summer in Iceland* de la fama brita vojaĝanto **Sir Richard Francis Burton** (1821-1890). Li estis brita konsulo, esploristo, tradukisto, kaj fakulo precipe pri orientalistiko. Li regis multajn lingvojn kaj tradukis en la anglan plurajn famajn verkojn, kiel *La Mil kaj unu noktoj* kaj la *Kamasutro*. Kiel esploristo li laboris interalie pri astrokartografio. Li oftege vojaĝis. Fama estis lia sekreta vojaĝo al Mekao, kiun li faris alivestita kiel pilgrimanto. Kun John Hanning Speke li estis en 1857-58 en Afriko kaj malkovris la lagon Tanganjika, opiniatan la fonto de la Nilo. En 1861 li kaj la germana botanikisto Gustav Mann atingis kiel unuaj la pinton de la monto Kameruno. Burton laboris kiel brita konsulo en Trieste, en Damaskus, en Fernando Poo kaj en Santos en Brazilo – tie li vojaĝis tra la internlando laŭ la rivero São Francisco (vd. Trojanov 2007). Islandon li vizitis en la somero de 1872 kaj tri jarojn poste li aperigis la menciitan libron.

En la prefaco li skribas, ke li estas vizitinta Islandon kaj konstatas, ke oni estas ankoraŭ malmulte informitaj pri ĝi, oni eble aŭdis pri Hekla kaj pri gejseroj kaj faris al si iun duonfantoman imagon. La unuajn raportojn pri sia vojaĝo estis Burton verkinta por *Morning Standard* en oktobro kaj novembro 1872 kaj li decidis skribi iun pli ampleksan informverkon. “Sed ĉu Islando estas Ultima Thule?” sonas la unua frazo de la teksto. La frazeologiismo mem estas bone konata kaj ofte metafore uzata, la efemera insulo je la fino de la mondo estis akceptata kiel abstrakta, sensubstanca diraĵo. La ekzisto de la insulo norde de Britio estis pli aŭ malpli certe asertata ĉe antikvaj geografoj kaj vojaĝantoj; ekde la kristanigo de Britio ĝis la novepoka “remalkovro” ĝi estis preskaŭ daŭre identigata kun Islando. Cetere, la nomo de Islando en la skot-gaela lingvo estas “Innis Thyle”, do “insulo Thule”.

Sekve Burton listigas la konatajn citaĵojn el Pytheas kaj aliajn menciojn ĉe antikvaj aŭtoroj, unue en literaturaj verkoj, kie Ultima Thule aperas kiel frazeologiismo, kaj poste ĉe aliaj aŭtoroj, precipe geografoj. Li kolektas kaj vaste citas argumentojn de antikvaj kaj fidindaj novepokaj verkistoj (ekzemple Sir G. C. Lewis kaj Sir John Lubbock) pri tio, ke Thule povis esti nomataj tri lokoj: unue, parto de Britio, due, parto de Skandinavio, kaj, trie,

Islando. Laŭ la literaturaj kaj geografiaj indikoj li poste identigas Thule senhezite kun Islando kaj dediĉas la sekvan parton de la libro al la detala priskribo de la insulo. Male al kelkaj antikvaj verkistoj, li fidis al la indikoj de Pytheas, opiniante malprobabla, ke tiu ĉerpis nur el rakontoj de aliaj popoloj, sed pensas, ke li mem spertis la priskribitajn aĵojn.

La eble lastan provon identigi Thule faris la germana Instiuto por geodezio de la Teknika Universitato en Berlino, esplorante la geografian verkon de Ptolemaios. Tiu ĉi uzadis por geografia bildigo de norda Eŭropo iom torditan spacan mezursistemon, kiu estis malpli preciza ol la indikoj de Pytheas pri la geografia norda latitudo (66°). Post rekorekto montriĝis probabla, ke la geografia pozicio de Thule respondas al tiu de la insulo Smøla antaŭ la golfo de Trondheim, kaj verŝajne eĉ la golfa regiono mem, kiun oni, venante per la ŝipo, ne tuj povas identigi kiel firman teron, sed pli verŝajne kiel insulon (vd. Kleineberg et al. 2010, p. 105-111).

En la nova epoko de geologoj estas indikata kiel *Ultima Thule* la plej norda landopunkto de la tero. Temas pri malgranda insulo, kiu kuŝas sur la kontinenta soklo de la nordgronlanda marbordo. Ĉar tra tiu ĉi mara regiono ĉiam ŝoviĝas glacimasoj, daŭre elakviĝas novaj insuletoj, kiuj estas kunnomataj per la jarnumero. La laste aperinta estas *Ultima Thule 2008*, registrita tiam de usona ekspedicio. La nomon “*Ultima Thule*” krome simbole ricevis lima loko ene de la Mamuta kaverno (Mammoth Cave), la plej longa kaverno de la mondo, troviĝanta en suda centra Kentucky, Usono. *Thule* nomiĝas la dana provinco Norda Gronlando, portanta inuitan nomon Avanaa, kaj laŭ ĝi nomatas Thule Air Base, usona aviadila bazo ĉe Qaanaaq. *Suda Thule* estas la nomo de tri neenloĝataj insuloj el la Sudaj Sandviĉaj insuloj.

2. Thule en poezio

En la senco de “La plej fora lando de la mondo” la esprimo “ultima Thule” estis uzata jam en antikvaj tempoj. Ĝi aperas i. a. ĉe fama romia poeto **Publius Vergilius Maro** (70-19 a.K.), kiu verkis sian didaktikan poemaron *Georgica* (t. e. verko pri terkulturado) en la jaro 29 a.K. pro instigo de Maecenas, subtenanto de arto kaj literaturo kaj konsilisto de la imperiestro Aŭgusto. *Georgica* estas, sobre dirite, kompendio de la scioj pri terkulturado de sia epoko, ĝi tamen estas skribita en teknike kaj estetike belega poezia formo. La enkonduko enhavas dediĉon de la tuta verko al Maecenas, kiu inspiris ĝin, kaj al la imperiestro Aŭgusto, kies zorgema regado ebligas la priskribatajn laborojn kaj bonfarton de la popolo. Vergilius deziras al li, ke li estu bonvena ĉie, kien ajn li venas, sur tero kaj maro. La versoj 29-30 de la unua libro de *Georgica* sonas: “... *an deus immensi venias maris ac tua nautae numina sola colant, tibi serviat ultima Thule...*”, kies senco estas: ... (aŭ) se vi venos (kvazaŭ) kiel dio de grandega maro, kaj maristoj adoras nur viajn diaĵojn, servu al vi eĉ la plej fora marlimo. Tiu ĉi uzo de “ultima Thule” en didaktika verko do klare montras, ke tiuj du vortoj estis en sia epoko ĝenerale konata kaj uzata frazeologiismo. Maurus Servius Honoratius (4-a jc.), eldonisto kaj komentisto de la verko de Vergilius, resumas la tiam konatajn faktojn, ke Thule estas insulo inter regionoj norda kaj okcidenta, malantaŭ Britio, Irlando kaj Orkadoj: “Thyle insula est oceani inter septentrionalem & occidentalem plagam, ultra Britanniam, Hiberniam, Orcadas” (vd. ekz. Thilo & Hagen 1986) kaj plu diras, ke sur tiu insulo, kiam la Suno staras en la zodiaksigno de Kankro, la tagoj longas sennokte.

En la sama senco kiel ĉe Vergilius “Ultima Thule” estas uzata en la tragedio *Medea* de **Lucius Annaeus Seneca** (1-65), romia politikisto, filozofo kaj aŭtoro de la ununuraj konserviĝintaj latinlingvaj tragedioj laŭ tradicia greka maniero. En tiu dramo la agado mem estas interrompata (eventuale enkondukata) per recitado de koruso, kiu komentas la okazaĵojn, donas klarigojn, rememorigas la pasintecon aŭ profetas la estontajn okazaĵojn.

Tiel estas ankaŭ en la mitologia dramo pri Medea, antaŭ ol okazis la tragedia krimo (Medea murdis siajn infanojn). Kvazaŭ parolante pri la estonteco, la koruso recitas (Medea, 375-379): “Venient annis saecula aeris / quibus Oceanus vincula rerum / laxet, et ingens patet tellus / Tethysque novos detegat orbes / nec sit terris ultima Thule” (*Post jarcentoj venos epoko, en kiu la Oceano malligos katenojn de aĵoj, kaj grandega tero malfermiĝos. Tethys¹² malkovros novajn mondojn kaj la lasta [limo] de la tero ne plu estos Thule.*)

Claudius Claudianus (370-408), greko el Aleksandrio, verkis poemojn en la senco de mitologiaj tradicioj. En la jaro 394 li komencis sian karieron en Romo kiel latinlingva kortega poeto de la imperiestro Honorius. Tiam ekestis enkomioj¹³ pri kantantaj la politikon de la imperiestro kaj de la generalo Stilicho, kaj iliajn militajn sukcesojn precipe kontraŭ Gotoj en okcidenta Eŭropo. Tie legiĝas, ke pro la nekutima milita tumulto tremis eĉ Thule, troviĝanta proksime de la norda poluso, do subkomprenite la tuta konata mondo (*De bello Getico*, 208): “*Et nostro procul axe remotam insolito belli tremefecit murmure Thulen*”. Claudius krome verkis ankaŭ invektivojn, t.e. primokajn poemojn, unu el ili kontraŭ Flavius Rufinus, (pretoriana prefekto inter 392-395), kie aperas la nomo Thule kiel sinonimo de la plej malproksima lando, (damnita troviĝi) sub la norda stelo: (*In Rufinum* II, 240): “*Te vel Hyperborea damnatam sidere Thulen, Te vel ad incensus Lybiae comitatur arenas*”. La plej malagrablaj ekstremaj punktoj de la konata mondo estas tie poezie esprimitaj kiel la plej norda (malvarmega) Thule unuflanke kaj la varmega dezerto de Libio aliflanke.

Anicius Manlius Severinus Boëthius (480-526) estis filozofo kaj teologo, oficisto en la kortego de la orientgota reĝo Theoderich. Boëthius famiĝis pro sia eduka programo surbaze de la greka filozofio. Pro suspekto de kunlaboro kun kontraŭuloj de la imperiestro li estis enkarcerigita kaj poste ekzekutita. En la malliberejo li skribis sian filozofian verkon *De consolatione philosophiae* (Pri konsolo de la filozofio), por firmigi kaj konsoli sian menson. La esprimo “ultima Thule” aperas tie kiel kutima simbolo de la lasta (nord)limo de la konata mondo:

Qui se uolet esse potentem,
animos domet ille feroces
nec uicta libidine colla
foedis summittat habenis;
etenim licet Indica longe
tellus tua iura tremescat
et seruiat *ultima Thyle*,
tamen atras pellere curas
miserasque fugare querelas
non posse potentia non est.

Kiu deziras potencon,
Senbridajn pasiojn regu,
Ne sub avido malinda
Venkite metu la kolon.
Se sub via regno tremus
La fora lando Hindujo
Kaj norda Tule vin servus,
Dum nigraj zorgoj vin premus
Kaj vin plendigus malĝojo,
Vi estus tute senpova.¹⁴

Tiun ĉi preskaŭ kliŝan antikvan frazeologiismon transprenis ankaŭ kleruloj, kiuj konis antikvan literaturon. Tipa ekzemplo estas la mencioj pri Thule en la ampoemoj de **Francesco Petrarca** (1304-1374), fama itala verkisto kaj eldonisto, apartenanta, kune kun siaj samlandanoj Dante Alighieri kaj Giovanni Boccaccio, al la fondintoj de humanismo kaj renesanco. Interesa tamen estas, ke Petrarca ankaŭ konkrete interesiĝis pri la realaĵo de Thule.

¹² Τηθύς, laŭ greka mitologio edzino de dio Oceano (‘Οκεανός) kaj patrino de riveroj.

¹³ ‘εγκώμιον estis laŭda poemo pri herooj kaj aliaj mitologiaj personoj.

¹⁴ Traduko de Albert Goodheir.

Petrarca studis unue juron kaj teologion kaj poste sin speciale dediĉis al studado de antikva literaturo¹⁵. Li vivis kiel junulo dum certa tempo en Avignon, la tiama rezidejo de la papoj, kaj estis en precipe bonaj rilatoj kun la nobela familio Colonna. Post la morto de sia patro en 1326, Petrarca reiris al Avignon, kie li ricevis pastran ordinaron. Li loĝis kiel gasto en la palaco de la kardinalo Giovanni Colonna kaj havis okazon renkontadi eminentajn politikistojn kaj ekleziulojn, inklude de eksterlandanoj, kiuj vizitadis la papan kortegon. En la servoj de la familio Colonna agis Petrarca ankaŭ kiel diplomato. En la jaro 1331 venis al Avignon, kiel sendito de la reĝo Edward III, angla klerulo Richard de Bury. Petrarca plurfoje renkontis lin, esperante ricevi valorajn informojn precipe pri historio kaj geografio. Interesis lin interalie la preciza pozicio de la insulo Thule, pri kiu li estis informita el antikvaj fontoj, sed pri kiu ankoraŭ ĉiam regis necerteco. De Bury, kiu probable ne volis montri sian nescion pri la temo, promesis al Petrarca detale okupiĝi pri tio post sia reveno en Anglion. En la kolekto de leteroj de Petrarca konserviĝis kelkaj, en kiuj li refoje petis de de Bury promesitajn klarigojn rilate al Thule, sed ne estas konata ajna koncerna respondo aŭ reago de la adresito (komp. ekz. Antognini, 2008).

Ekde 1333 Petrarca vojaĝis tra Francio, Belgio kaj Germanio. Grandan impreson faris al li la grimpadado sur la monton Ventoux (1336), pri kiu li verkis al sia amiko Francesco Dionigi leteron, entuziasme priskribantan naturbelecojn de la montaro. Kelkaj biografistoj opinias, ke Petrarca estis la unua eŭropa alpinisto – almenaŭ la unua konata, kiu montgrimpis por amuzo. La ideon pri Thule li ne forlasis, kiel klaras el alia lia letero, skribita la 16-an de aŭgusto 1337 el Britio al Tomasso da Messina¹⁶, kun titolo “Pri la loko, kie estintus la insulo Thule”: “*Kiu vagas tra la regionoj de la antikva mondo, kiu estas tiom malfacile explorebla kaj kies esplorado estas tiom plaĉa, tiu ofte trovas superendajn obstaklojn*”, komenciĝas la letero. Jam antaŭ longa tempo, skribas Petrarca, li kaj lia amiko Tomasso da Messina interesiĝis pri la demando, kie povus troviĝi la insulo Thule, sed ne venis al kontentiga rezulto. Petrarca en sia letero ne promesas trovi ĝin, sed esplori la aferon plej eble precize surloke. Li ja nun troviĝas sur la marbordo de Britio, “onidire proksime de la insulo, kiun ni serĉas”. Li ripetas la konatajn faktojn: “*Thule estis certe la plej malproksima el la landoj; Vergilio, Seneko kaj post ili Boecio kaj tuta aro de verkistoj asertas tion; kaj multaj konsente diras, ke ĝi troviĝas en okcidento, ege malproksime de oriento kaj sudo. Kaj ĉar ni vivas en okcidento, la proksimeco kreskigas la scivolemon.*” Eĉ se Thule estas supozata en oceano norde de Britio, Irlando kaj Orkadoj, la vojaĝantoj, kiuj konas tiujn regionojn, ne povas atesti tion. La simpla popolo eĉ neniam aŭdis la nomon Thule; ĉiuj kleruloj konas la nomon, sed ne la pozicion. Nun Petrarca detale rakontas pri siaj kontaktoj kun Richard de Bury kaj plendas, ke “el la amikeco de tiu anglo fruktis neniu ekscio pri Thule”. Poste Petrarca legis libron pri Irlando, skribitan de iu certa Geraldo, kortegano de la angla reĝo Henry II, trovis tie mencion pri Thule kaj trastudis la libron avida, vidante, ke la aŭtoro havas la saman intereson kiel li mem, sed, bedaŭrinde, ankaŭ tiu nur ripetis la malnovajn sciigojn de Solinus, Claudianus kaj pluaj aliaj, inkluzive de informoj pri solstico kaj glacio, eĉ citante kelkajn versojn. Al Petrarca estis konataj ankaŭ libroj de Plinius Secundus, raportoj de Pytheas kaj ceteraj – li cetere dubas, ke tiuj homoj fakte estis surloke; eble ili devintus korekti indikon, ke tiu mistera insulo kuŝas norde de Britio kaj Orkadoj. Li mencias ankaŭ eldirojn de Orosius kaj Pomponius Mela,

¹⁵ Ege aprezata estas lia eldono de la verkoj de Titus Livius kaj malkovro de la leteroj de Cicero. Sian propran latinlingvan epopeon *Africa* aprezis Petrarca pli ol siajn itallingvaj poemojn, pro kiuj li poste famiĝis.

¹⁶ Petrarca mem aranĝis la kolekton de siaj leteroj, entute 350, dividitaj en 24 librojn, sub titolo *Delle cose familiari* (pri ĝeneralajoj). La koncerna letero estas la unua en la libro III.

laŭ kiuj Thule troviĝas kontraŭ la bordoj de “Belcae”, kio ja ne respondas al la pli fruaj indikoj. Certas, ke tiu insulo estas kaŝita, kaj tio altigas ĝian allogemon, konkludis Petrarca, plu esperante malkovri la veron, sed evidente li neniam vizitis Islandon. Poste li daŭre loĝis en Italio kaj famiĝis kiel kronumita poeto.

En la poemoj de Petrarca aperas Thule en sia frazeologiisma signifo. Same kiel ĉe antikvaj aŭtoroj, la esprimo “ekde la maro de Hindujo ĝis tiu de Thule” signifas, ke “ene de la limpunktoj de la (konata) mondo” triumfas la amo (en la poemo “Poscia che mia fortuna in forza altrui” n-ro IV de *Trionfo d’ amore*):

<p>Et anco è di valor sì nuda e magra, tanto ritien del suo primo esser vile, che par dolce a’ cattivi et a’ buoni agra. Or quivi triunfò il signor gentile di noi e degli altri tutti ch’ ad un laccio presi avea <i>dal mar d’India a quel di Tyle</i>: pensieri in grembo e vanitadi in braccio, diletti fuggitivi e ferma noia.</p>	<p>Kaj eĉ nun ĝi estas tiel sen valoro, tenas ankoraŭ tiom de sia unua paganeco, ke al la malbonaj ĝi estas dolĉa, acida al la bonaj. Ĉi tien do al triumfo venis la potenca sinjoro de ni kaj ĉiuj, kiujn per la sama kaptilo li estis kaptinta <i>de Thule al la hinda maro</i>: pensoj en nia brusto, malpleneco por ekpreni, efemeraj plezuroj, kaj konstanta laceco.¹⁷</p>
---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

“Thule” kiel simbolo de malproksima, nekutima, nekonata, rara kaj fama geografiaĵo, same kiel la persa urbo Baktrio aŭ foraj riveroj Dono kaj Nilo aperas ankaŭ en la soneto CXIV de la fama kolekto de 366 poemoj *Canzoniere*, dediĉita al la poezia amatino Laura. La poeto tie diras: “se miaj rimaĵoj estus komprenataj ege malproksime, mi plenigus per via nomo Thule-n, Baktrion, Donon kaj Nilon, Atlason, Olimpon kaj Gibraltaron”:

<p>O d’ardente vertute ornata et calda alma gentil chui tante carte vergo; o sol già d’onestate intero albergo, torre in alto valor fondata et salda; o fiamma, o rose sparse in dolce falda di viva neve, in ch’io mi specchio e tergo; o piacer onde l’ali al bel viso ergo, che luce sovra quanti il sol ne scalda: <i>del vostro nome, se mie rime intese fossin sí lunge, avrei pien Tyle et Battro, la Tana e ‘l Nilo, Athlante, Olimpo et Calpe.</i></p>	<p>Ho nobla animo ornamita per brulanta virto, por kiu mi plenigas tiom da paĝoj: ho sola domo ankoraŭ tuta en sia ĉasteco, fortika turo fondita en la plej alta valoro; Ho flamo, ho rozoj disĵetitaj sur dolĉaj tavoloj de vivanta neĝo, en kiu mi estas spegulita: ho ĝojo kies flugiloj levas al bela vizaĝo, kies lumo brilas pli hele ol la suno: <i>se mia poezio kompreniĝus tiel malproksime mi plenigus plej forajn Thule kaj Battro, la Monton Atlaso kaj Ĝibraltaron per via nomo.</i></p>
<p>Poi che portar nol posso in tutte et quattro parti del mondo, udrallo il bel paese ch’Appennin parte, e ‘l mar circonda et l’Alpe.</p>	<p>Ĉar ĝi ne povas porti tien al la kvar anguloj de la mondo, aŭdos ĝin tiu bela lando kiun Apeninoj dividas, kaj Alpoj kaj maro ĉirkaŭas.¹⁸</p>

Ankoraŭ en unu letero de Petrarca aperas la nomo Thule, nome la 14-an de marto 1351 li skribis al la doĝo de Venecio, klopodante averti lin pri danĝero pro la pakto kun la aragona reĝo kontraŭ Ĝenovo. Petrarca faras al si zorgojn pri la paco en Italio, li esprimas esperon, ke ne okazos milita konflikto, dezirante, ke oni forĵetu la armilojn kaj en paco “estu al ambaŭ regantoj malfermita la tuta Oceano kaj iliaj ŝipoj alvenu sekure eĉ ĝis Thule”.

¹⁷ Traduko de Roy McCoy.

¹⁸ Traduko de Roy McCoy.

Unu el la tre famaj poeziaj tekstoj de la nova epoko kun rilato al tiu enigma insulo estas la balado pri la reĝo en Thule, kantata de tenera ŝpinanta junulino Gretchen en la unua parto de la dramo *Faust* de **Johann Wolfgang Goethe** (1749-1832). Ankaŭ Goethe interesiĝis pri antikva literaturo kaj apartenis, kune kun sia amiko Friedrich Schiller, al la ĉefaj reprezentantoj de la klasikismo. Precipe impresis lin liaj vojaĝoj tra Italio. Kvankam Goethe serioze okupiĝis ankaŭ pri pentroarto, natursciencoj, filozofio, juro kaj politiko, li tamen pleje dediĉis sin al poezio, sub influo de studado de anktikvaj kaj renesancaj aŭtoroj, uzante eĉ klasikan heksamentron kaj aliajn antikvajn poeziajn skemojn. Baladoj estis unu el liaj specialaĵoj, same kiel de Friedrich Schiller. Kuraĝigite de li, Goethe verkis sian dramon *Faust*, pri kiu li okupiĝis jam ekde 1774 kaj kiun li re prilaboris post la morto de Schiller. La unua parto de la dramo estis preta en la jaro 1806. Krom la tragika ĉefpersono, filozofo interesiĝanta pri okultismo, mistikismo kaj nigra magio, rolas tie naiva junulino, Gretchen, kiu, delogita kaj forlasita de Faŭsto, en malespero mortigas sian novnaskitan bebon. Tiu temo okupis Goethe-n jam dum liaj studoj de la juro, kaj li speciale dediĉis unu el siaj latinlingvaj traktaĵoj *positiones juris* en la jaro 1771 al la problemo, ĉu la murdintinoj de beboj estu mortpunataj. La “Tragedio de Gretchen” poste integriĝis en la dramon pri Faŭsto. La sceno, kie naiva kaj sincera enamiĝinta junulino sidas ĉe sia ŝpinrado, okupiĝante pri kutima, simpla kaj honesta virina laboro, estas substrekata per la kantado de malnova balado, intence elektita por montri la tradiciemon kaj trankvilon de la vivo de la protagonistino. La ĉefa motivo de la balado, fidela amo ĝis la morto, poste akre kontrastas kun la tragika sorto de Gretchen. La kvazaŭ aŭtenta popola balado ankaŭ elvokas la inklinon al mitologio, kiu poste aplikiĝis pli forte, ĉefe en la dua parto de la dramo.

La situo de la balado al Thule estis elektita sub la influo de la romantika poeto Johann Gottfried Herder. Sub la nocio Thule estis vidata ne plu (eble) reale ekzistanta insulo ĉe la fino de la mondo, kiel kutime komprenis ĝin antikvaj kaj humanismaj verkistoj, sed ĝi alprenis mitologian dimension, simile kiel Avalon (ankaŭ insulo vage situigita proksime de Britio), mistera hejmo de antaŭkristanaj dioj kaj prapatrujo de ĝermanoj. La enhavo de la balado mem estas simpla: la reĝo en Thule, iam ricevinta de sia mortanta amantino oran kalikon, ne proponis ĝin antaŭ sia propra morto al siaj heredontoj, sed ĵetis ĝin maren. La kialojn la aŭskultanto de la balado povas mem diveni. En lernolibroj oni detale klarigas la klasike-romantikan simbolaron de la balado: la centra motivo de ĝismorta fideleco staras jam en la dua linio, kaliko estas la simbolo de amo kaj vivo, oro estas la simbolo de valoro kaj daŭro, daŭra trinkado el la sama ujo denove validigas fidelecon kaj respekton de kutimoj. Rezigno pri la riĉeco favore al heredontoj montras la senvalorecon de surtera havaĵo, la lasta regalo kun la kavaliroj similas al la lasta verspermanĝo de Kristo, la salono kun la portretoj de la antaŭuloj memorigas la mortontan reĝon, ke li baldaŭ apartenos al ilia vico. La maro simbolas eternan kaj vanan fluon de la homa sorto, la ĵetita kaliko falas kvazaŭ en tombon, antaŭirante la mortantan reĝon (komp. Bechthold-Stäubi, 2000).

Es war ein König in Thule,
 Gar treu bis an das Grab,
 Dem sterbend seine Buhle
 Einen goldnen Becher gab.
 Es ging ihm nichts darüber,
 Er leert' ihn jeden Schmaus;
 Die Augen gingen ihm über,
 So oft er trank daraus.

Reĝ' en Tuleo tronis
 Fidela ĝis la fin'.
 Mortante al li donis
 Orvazon l' amatin'.
 Nenion li pli ŝatis
 Kaj trinkis nur el ĝi.
 Dum trinkis li, fluadis
 La larmoj de emoci'.

Und als er kam zu sterben,
 Zählt' er seine Städt' im Reich,
 Gönn't' alles seinen Erben,
 Den Becher nicht zugleich.
 Er saß bei'm Königsmahle,
 Die Ritter um ihn her,
 Auf hohem Vätersaale,
 Dort auf dem Schloß am Meer.
 Dort stand der alte Zecher,
 Trank letzte Lebensgluth,
 Und warf den heiligen Becher
 Hinunter in die Fluth.
 Er sah ihn stürzen, trinken
 Und sinken tief ins Meer,
 Die Augen thäten ihm sinken,
 Trank nie einen Tropfen mehr.

Kiam la morto venis,
 Riĉaĵojn nombris li.
 El ĉio li retenis
 La vazon nur por si.
 Ĉirkaŭis dum festeno
 Lin kavalira ar',
 En hal'sub baldakeno,
 En la kastel' ĉe l' mar.
 La olda reĝ' jam pretis
 Por lasta trinka far'.
 La sanktan vazon ĵetis
 Li poste al ondar'.
 Li vidis, ke ĝi trinkis,
 sinkis en mara flu',
 Okuloj liaj sinkis,
 Ne trinkis ion plu.¹⁹

La imago de nebula, fora kaj malvarma insulo kaj ŝaumanta malhela maro tre bone harmonias kun scenejoj de misteraj pejzaĝoj, prikantataj en lirikaj poemoj de romantikaj poetoj kiel **Henry Wadsworth Longfellow** (1807-1882). Longfellow unue laboris kiel bibliotekisto en Bowdoin College en Bruswick, kie li estis studinta. Post siaj vojaĝoj en Eŭropo inter 1826 kaj 1829 li iĝis la unua profesoro de modernaj lingvoj, en 1835 li profesoriĝis en Harvard. Post 1845, kiam li forlasis sian postenon, li plene dediĉis sin al literaturo kaj verkado de poezio, kiu famigis lin. Li estas la unua usona poeto, kiu havas sian buston en "Poet's Corner" en Londono. Precipe aprezata kaj en multajn lingvojn tradukata estas lia longa epika poemo "The Song of Hiawatha", prikantanta la vivon de indiana tribestro, kiu en la 16-a jarcento unuigis kvin irokezajn tribojn en politikan pacunuigon. Tipe por romantikismo, kiu admiris kaj priskribis belecojn de la naturo, Longfellow onidire inspiriĝis por verki tiun ĉi poemon, vidante bildon de la akvofaloj Minnehaha (komp. ekz. Calhoun 2004).

La nomon *Utima Thule* portas la kolekto de lirikaj poemoj. Ili ĉiuj estas mallongaj, verkitaj en serioza, solena stilo, melankoliaj, plenaj de romantikaj elementoj kaj aludoj al antikva kulturo. Ofte ripetiĝas la imago de la maro, simbolo de flueco, eterneco, forgeso k.s. En la enkonduka kanto estas menciataj du mitologiaj regionoj: la suna lando de la Hesperidoj, kie kreskas oraj pomoj, kaj la perdita kontinento Atlantido. Tiuj lokoj, kiuj estis supozataj en la sudo de Eŭropo aŭ ĉe norda Afriko, estas asociataj kun varmo, suno, agrableco kaj juneco. La mildaj ventoj tamen fortiĝas, la ficcia vojo de la vivo poste direktiĝas de sudo al nordo, preter tempestoj ĉe Orkadoj, kie kriaĉas mevoj kaj bruas ondegoj, ĝis atingo de la lasta (norda) punkto, Thule, kie la naviginto, laca pro sia longa vojaĝo, volas nun ripozi – la leganto mem divenu, ĉu post tiu ripozo sekvos plua vojaĝo aŭ la morto. Same li povas pripensi, ĉu Thule estas insulo reale ekzistanta, kiel la menciitaj Orkadoj, aŭ same mitologia kiel Atlantido.

With favoring winds, o'er sunlit seas,
 We sailed for the Hesperides,
 The land where golden apples grow;
 But that, ah! that was long ago.

Kun favoraj ventoj, super sunlumaj maroj,
 Ni ekvelis por la Hesperidinoj,
 La lando kie oraj pomoj kreskas;
 Sed tio, ho! tio estis antaŭ longa tempo.

¹⁹ Traduko de Karl Schulze.

How far, since then, the ocean streams
Have swept us from that land of dreams,
That land of fiction and of truth,
The lost Atlantis of our youth!

Whither, ah, whither? Are not these
The tempest-haunted Orcades,
Where sea-gulls scream, and breakers roar,
And wreck and sea-weed line the shore?

Ultima Thule! Utmost Isle!

Here in thy harbors for a while
We lower our sails; a while we rest
From the unending, endless quest.

Kiel for, de tiam, la oceanaj fluoj
Estas balaintaj nin de tiu lando de sonĝoj,
Tiu lando de fikcio kaj de vero,
La perdita Atlantido de nia juneco!

Kien, ah, kien? Ĉu tiuj ĉi ne estas
La ventego-sorĉataj Orkadoj,
Kie mevoj krias, kaj ondoj muĝas,
Kaj rompiĝo kaj marherbo randas la marbordon?

Fina Thule! Plej ekstrema Insulo!

Ĉi tie en viaj havenoj por ioma tempo
Ni subigas niajn velojn; momenton ni ripozas
De la neniam finiĝanta, senfina serĉado.²⁰

Tiu ĉi poemo estas dediĉita al la historiisto George Washington Greene (1811-1880), longjara amiko de Longfellow el Bowdoin College, kiu poste instruis modernajn lingvojn en Brown University. La ceteraj poemoj de la kolekto havas diversajn temojn, plej ofte tristajn kaj patetikajn: “Bayard Taylor” estas priploro de la morto de verkisto; “Elegiac” pri ŝipoj sur malhela maro enhavas ankaŭ mitologiajn geografiaĵojn (“Unto Hesperian isles, unto Ausonian shores”); en “From my Arm-Chair” maljunulo en sia brakseĝo rememoras pri sia vivo, kun motivo de maro kaj reĝo, eble aludo al *Hamleto* (“The Danish king could not in all his pride / Repel the ocean tide”); “Jugurtha” estas funebra kanto por tiu ĉi afrika reĝo, detronigita, enkarcerigita kaj murdita de romianoj; “My Cathedral” estas poezia komparo de majesta arbaro kun katedralo; “Night” – malhela nokto estas simbolo de pere, sed ankaŭ de eterno (“book of our lives like a palimpsest”); “Old St. David’s at Radnor” estas gotika preĝejo kun tombejo; sekva poemo priantas la poeton Robert Burns; en “The poet and his songs”, laŭdo de poeta agado, revenas la motivo de maro (“as come the white sails of ships over the ocean’s verge”), kiu revenas en “The Tide Rises, the Tide Falls” kun obskuro (“twilight darkness”); “The Iron Pen” esprimas dankon de la poeto al belulino, de kiu li ricevis la plumon; “The Sifting of Peter” havas kiel temon la perfidon, al kiu ŝajne ĉiuj inklina, same kiel Petro perfidis Kriston; fine “The Windmill” (proksime de kiu loĝis Greene) estas interesa pro tio, ke la muelilo en la unua persono rakontas pri sia laboro.

Tiu ĉi temaro estas ege tipa por romantismo. La aludoj al mitologiaj lokoj kaj personoj iĝis eĉ pli fortaj kaj pli misteraj ĉe aŭtoroj, kiujn Longfellow influis kaj kiuj admiris lin. La plej fama el ili estis *Edgar Allan Poe* (1809-1849), usona verkisto, eseisto kaj romantika poeto, kies obskuraj baladoj inspiris la tutan poezian skolon, precipe la generacion de t. n. “kondamnitaj poetoj” en Francio. Poe studis literaturon kaj speciale okupiĝis pri kosmogonio²¹, spiritismo²², okultismo²³ kaj kriptografio. Persone li suferis pro alkoholo kaj drogoj. Poe estis unu el la reprezentantoj de la gotika literaturo, kies karakterizaj trajtoj estas mistero, fantomoj, nokto, morto, frenezeco k.s. (vidu ekz. Cousin, 1910, Silverman 1991). Kiel “gotikaj” aŭ “nigraj” estas aprezataj precipe liaj krimrakontoj kaj poemoj, inter ili la famega morna “Korako²⁴” el 1845 pri mistera birdo, ĝenanta la teruritan viron dum sendorma nokto.

²⁰ Traduko de Roy McCoy.

²¹ Doktrino pri la origino de la universo.

²² Interrilatado pere de mediumoj kun spiritoj de nevidebla mondo.

²³ Doktrina kaj praktika esplorado de misteraj fenomenoj kiel magio, komunikado kun mortintoj k.s.

²⁴ En kelkaj tradukoj “Korvo”, en Esperanton tradukita trifoje.

“Ultima Thule” kiel simbolo de mistera kaj fantoma loko trovis sian esprimon en la poemo “Dream Land” (Reva lando) el 1844. Tiu lirika poemo, la ununura de Poe publikigita en la jaro 1844, havas kvin strofojn, el kiuj la unua kaj la lasta estas preskaŭ identaj. La protagonisto atingas misteran revan landon, kie montoj estas senpinte altaj kaj maroj senborde larĝaj, ĝi estas senfine trankvila kaj valora, la vojaĝanto troviĝas tie kvazaŭ inter vivo kaj morto kaj fine decidis resti tie. Por atingi tiun idealan lokon, li tamen devis superi terurajn obstaklojn kaj veni, kiel diras la unua kaj la lasta strofoj, “per tenebra kaj soleca vojo, timigata de malbonaj anĝeloj, kie fantomo nomata Nokto rigide regas sur nigra trono”: la nokto staras tuj komence simbole por danĝero kaj morto. En la ĵus menciita poemo de Longfellow, la protagonisto(j) haltas en Thule por ripozi. Oni povas imagi, ke tiu vojaĝo kontinuas al alia mistera loko: ĉi tie ĉe Poe, Thule aperas kiel elirpunkto de malfacila vojo, kiun oni devas trapasi por atingi la celon: “mi atingis tiujn ĉi [agrablajn] landojn nur antaŭ nelonge, el la lasta obskura Thule, el sovaĝa bizara regiono, kiu kuŝas majeste ekster la tempo kaj ekster la spaco”. Same kiel la pozicio ekster spaco kaj tempo, Thule mem estas komprenata kiel io nekonkreta kaj simbola. Tion ankoraŭ substrekas la lasta strofo, kiu similas al la unua, sed kies du lastaj versoj diras: “mi antaŭ nelonge venis hejmen el tiu lasta, obskura Thule”:

La unua strofo sonas:

By a route obscure and lonely,
 Haunted by ill angels only,
 Where an Eidolon, named Night,
 On a black throne reigns upright,
 I have reached these lands but newly
 From *an ultimate dim Thule* –
 From a wild weird clime, that lieth, sublime,
 Out of Space – out of Time.

La lasta strofo sonas:

By a route obscure and lonely,
 Haunted by ill angels only,
 Where an Eidolon, named Night,
 On a black throne reigns upright,
 I have wandered home but newly
 From *this ultimate dim Thule*.

3. Ultima Thule kiel simbola nomo

Thule en la paso de jarcentoj iompostioe transformiĝis el konkreta geografia objekto al objekto pli kaj pli nebuleca, proverba, poezia, simbola kaj fikcia. Tiel okazas, ke la nomon “Ultima Thule” portas libroj, poemkolektoj, kantoj, societoj, muzikgrupoj ktp., kiuj ne okupiĝas pri Thule mem, sed nur simbole uzas ties nomon, kiel ekz. romano de Henry Handel Richardson el la jaro 1929, kies okazadloko estas Aŭstralio. Davis McCombs, laboranta en la nacia parko ĉe la menciita Mamuta kaverno en Usono, donis la nomon “Ultima Thule” al sia poezia kolekto (publ. en la jaro 2000), en kiu temas pri usonanoj, sklavoĵoj kaj indianoj. En la fikcia filmserio “Star Wars”, unu el la planedoj nomiĝas Thule.

La neklareco de informoj pri la preciza loko de la insulo, maleblo ĝin senerare identigi kaj uzado de ĝia nomo kiel sinonimo por la fino de la mondo kaŭzis, ke ĝi komencis esti komprenata ankaŭ kiel transcenda²⁵ ekzistaĵo, do kvazaŭ interna bildigo de neatingebla spirita realeco. Tial pri Thule interesiĝas ankaŭ diversaj movadoj kaj organizaĵoj kun rilatoj al religio, psikologio, mistiko, esoterismo²⁶ k.s. En 1911 estis fondita en Munkeno okultisma-esoterisma “Societo Thule, studgrupo por ĝermana antikveco” (Thule-Gesellschaft, Studiengruppe für

²⁵ t.e. transiranta la limojn de la racio, superreala.

²⁶ Esoterismo = sekreta instruo por spirita evoluo de individuo, supozanta la ekziston de supernaturaj fortoj. La instruo okazas en fermitaj ordenoj.

germanisches Altertum), en kiu Thule estis komprenata kiel norda ekvivalento de la malaperinta civilizo de Atlantido. Laŭ tradiciaj fabeloj vivis en la mitologia Thule superhomoj, ligitaj per magiaj povoj kun la universo. De ili devenas nova speco de potencaj homoj, kapabla regi kaj savi la tutan homaron, uzante sciencajn atingaĵojn de la nunaj jarcentoj. Tiu ĉi mito estis bedaŭrinde eĉ misuzata en postaj jaroj, precipe de la germanaj nazioj (vidu ekz. http://en.wikipedia.org/wiki/Thule_Society).

“Ultima Thule” simbole nomiĝas rokmuŝika grupo el sveda Nyköping (Niklas Adolfsson, Thomas Krohn, Ulf Hansen, Jan Thörnblom, detalojn vidu ekz. sub [http://sv.wikipedia.org/wiki/Ultima_Thule_\(musikgrupp\)](http://sv.wikipedia.org/wiki/Ultima_Thule_(musikgrupp))), fondita en 1983. Ĝi estas unu el la plej malnovaj kaj plej konataj reprezentantoj de la tiel nomata “vikinga roko” (Vikingarock), kies repertuaro ampleksas kantojn kaj baladojn kun patriotaj temoj (“Sverige, Sverige fosterland”, “Du gamla, du fria”) sed ankaŭ plej modernan rok-muzikon. Iliaj albumoj ofte lokiĝis inter la unuaj dek plej populaj en Svedio, ili havis tri orajn kaj unu platinan kolekto-diskojn. Ili muziko estas ŝatata precipe ĉe rokemuloj kaj punkemuloj. Krom tiu ĉi, aliaj similaj eŭropaj muzikgrupoj (ekzemple nigre vestitaj “gotikuloj”, “mezepokuloj” kaj ŝatantoj de “pagana metalo”), kies kanttekstoj ĉerpas el nordeŭropa mitologio kaj sagaoj, reliefigante patriotismon kaj naciajn tradiciojn, estas foje suspektataj pri dekstra politika ekstremismo, eĉ se ili eksplicite proklamas sian distancigon de ĝi.

La saman nomon, Ultima Thule, portas estona rokgrupo (Riho Sibul, Raul Vaigla, Tõnis Mägi, Slavka Kobrin, Aare Põder, Jaak Ahelik, <http://www.myspace.com/uthule>), fondita en 1986. Ĝia gvidanto estas la gitaristo kaj kantisto Riho Sibul. Ĝia stilo estas bazita sur blus-roko kun influoj de estona popola muziko (blues-rock, folk-rock). Ankaŭ la unua el la 8 albumoj de la grupo nomiĝas *Ultima Thule*, la dua estas patriota *Eesti asi* (por Estonio). La grupo apartenis en la naŭdekaj jaroj al la plej popularaj en Estonio, kelkaj kantoj estas oftege aŭdataj en interreto (ĉ. 10 000 elvokoj). Du grupanoj (Tõnis Mägi, Peeter Jõgioja) startis ĉirkaŭ la jaro 2000 sian solo-karieron, Jõgioja partoprenis en 2004 en la internacia muzikkonkurso “Eurovision”.

Ankaŭ du aliaj eŭropaj muzikbandoj elektis simbole la titolon “Ultima Thule” por siaj albumoj:

1. La pola *Armia*²⁷ (Tomasz Budzyński, Jakub Bartoszewski, Daniel Karpiński, Paweł Piotrowski, Rafał Giec, www.armia.kdm.pl), fondita en Varsovio 1984, kiu ludas punk-rokon kun filozofiaj, religiaj kaj literaturaj tekstoj, inspiritaj i.a. de Martin Heidegger, Samuel Beckett kaj J.R.R. Tolkien, sed ankaŭ de la Biblio kaj la *Dia komedio* de Dante. “Ultima Thule” nomiĝis en la jaroj 2003-2006 la interreta forumo de favoruloj de la grupo, kiu en 2005 elektis tiun nomon kiel titolon por sia dekunua albumo de roko kun influoj de romantisma muziko. La nomo Thule devas ĉi tie stari kiel simbolo de la homa pilgrimado tra la tuta vivo ĝis la fino. Sur la kovrilo de la KD troviĝis bildoj de Girogio de Chirico, por reliefigi solecon kaj melankoliecon esprimatajn en la tekstoj. Tiuj inspiriĝis de psikologia prozo de la rusa klasikulo Fjodor Miĥajloviĉ Dostojevskij (1821-1881). La grupo estas eksterordinara ankaŭ pro la uzo de orkestraj muzikinstrumentoj kiel violono, violonĉelo, fluto, saksofono, korno. Alia raraĵo estis, dum unu periodo, la virtuoza drumistino Beata Polak, unu el la malmultaj virinoj ludantaj perkutajn instrumentojn. Armia audiĝas, krom sur festivaloj kaj en varsoviaj kluboj, ankaŭ en la pola radio kaj en turneoj, ekz. en Usono.

²⁷ t.e. “Armeo”: la grupo opinias sin kvazaŭ spirita armeo por plibonigo de la socio, kontraŭ violento kaj milito; por eviti miskomprenon oni alterne uzas la nomon “Anti-Armia”.

2. Franca grupo el Mondeville *Blut aus Nord* (“sango el nordo²⁸”, membroj Vindsval, W.D. Feld, GhÖst, http://fr.wikipedia.org/wiki/Blut_aus_Nord), ekestinta en 1994, ludanta nigran metalon kun avangardaj elementoj; ĝi intence okupiĝas pri “metafizikaj subjektoj”, ligitaj kun la norda mitologio. Male al la supre nomitaj grupoj, la kantisto Vindsval kantas nur en la angla kaj ne rajtigas publikigi la tekstojn. *Ultima Thulé* estis lia unua albumo, sonregistrata en 1995, praktike ankoraŭ en la projekta epoko de la grupo. La recenzisto Brett Buckle (<http://www.metalcrypt.com/pages/review.php?revid=4702>) diras, ke la albumo konfirmas la enigmecon kaj esceptecon de la grupo jam per la enkonduka “The Son of Hoarfrost”, sekve dum la melankolia “The Plain of Ida” oni havas impreson troviĝi en frostiĝinta dezerta pejzaĝo, dum eliras la suno, sed la ĉielo nigriĝas, oni aŭdas tondron kaj timiĝas pro teruriĝaj krioj. En la kanto “From Hlijdskjalf” audiĝas de fono kantado de monaĥoj, sed la aŭskultanto mem sentas sin perdita kaj sola kun vento kaj neĝo. “My Prayer Beyond Ginnungagap” estas kolorigata per gregoriana koruso, kiu penetras tra frosta aero kaj iompostioe igas la aŭskultanton paciĝi kaj akcepti la sorton. La migradon tra la vivo ĝis la lasta punkto esprimas la kanto “Till I Perceive Bifrost”, sugestanta, ke la pilgrimanto havas ankoraŭ tre longan vojon antaŭ si. Similajn tendencojn reprezentas du albumoj kun la titolo *Memoria Vetusta I + II* (t. e. antikva memoro), kun fabelaj motivoj (“Towards Dwarf Hill”, “Fathers of the Icy Age”, “Dialogue with the Stars”) kaj la albumo kun filozofio-religiaj motivoj *The Work Which Transforms God* (“Choir of the Dead”, “The Howling of God” k.s.) La temoj de la dek albumoj estas pli kaj pli ligitaj kun superrealaĵo, la lasta (2012) nomiĝas *Cosmosophy*.

Voces Thules (Voĉoj de Thule, <http://vocesthules.is/>) estas voĉoj de kvin islandanoj (Eggert Pálsson, Einar Jóhannesson, Eiríkur Hreinn Helgason, Guðlaugur Viktorsson kaj Sigurður Halldórsson). Ili studis muzikon en Rejkjaviko, Londono kaj Vieno, kaj en 1992 formis viran kantgrupon, kiu prezentas, krom mezepokaj kaj renesancaj kantoj, ankaŭ novajn originalajn verkojn de islandaj aŭtoroj. Multe da materialo troviĝanta en malnovaj manuskriptoj aŭ kolektoj ne estis uzata dum lastaj jarcentoj. La grupo revivigis ĝin kaj specialiĝis pri islanda kantmuziko ekde mezepoko ĝis moderna, inklude de latinlingvaj kantoj. La grupanoj laboras ankaŭ profesie kiel kantistoj kaj instrument-muzikistoj. Voces Thules estas konataj kaj ŝatataj en tuta Eŭropo kaj gastigas sur internaciaj muzikaj festivaloj, ekzemple ĉe la Festivalo de malnova muziko en Utrecht en 2001, dum Internacia librofoiro en Frankfurto aŭ dum la kvindeka jubilea Internacia arta festivalo en Bergeno en 2002, kie ili prezentis du koncertojn de mezepoka muziko el islandaj manuskriptoj. Granda sukceso estis la turneo tra Japanio en 2005, kie estis 30 000 aŭskultantoj. Hejme ili ofte koncertas i.a. dum Arta festivalo en Rejkjaviko, dum someraj koncertoj de Skláholt, dum festivalo de norda muziko IsNord en la kaverno de Stefánshellir, dum festivalo de kristana muziko Ormsteiti en la monaĥeja ruino de Skriðuklaustur kaj en la preĝejo de Thingvellir. En 2006 la grupo sonregistris²⁹ kompletan kantaroon el la manuskripto de la islanda sanktulo-episkopo Þorlák Þorhallson, verkita ĉirkaŭ la jaro 1400 (Þorlákstíðir). Ne malpli populara estas la moderna repertuaro, al kiu apartenas interalie la fama balado pri malsata korako (“Krummavísur”³⁰), kiun transprenis aliaj eŭropaj muzikgrupoj, ekz. la germana “In extremo”. Voces Thules krome audiĝas en la teatroj de Rejkjaviko, en la islanda naciaj radio kaj televido (programo “Kastljós”), ili ricevis plurajn premiojn, estis akceptitaj ĉe la prezidento de la respubliko kaj en 2008 estis nomumitaj por la granda muzikpremio de la norda muziko (Nordic Council Music Prize), precipe pro du

²⁸ La esprimo sugestas iun primitivan ĝermanan lingvon, en la norma germana estus “Blut aus dem Norden”.

²⁹ DVD, libro, 3 KD, VT.

³⁰ de Jón Thoroddsen (1818-1868), <http://www.youtube.com/watch?v=tq4seuBFxIM>.

grandaj projektoj: serio de koncertoj resumantaj la historion de la islanda eklezia muziko, kiuj realiĝis en grandaj katedraloj de skandinavaj landoj, kaj prilaboro-realigo de poemoj el la *Sturlunga Sagao* (verkita ĉ. la jaro 1300) inklude de sonregistrigo. Inter la lastaj projektoj de Voces Thules estas, krom plua revivigo de muziko el mezepokaj kaj renesancaj manuskriptoj, ankaŭ islanda opera muziko.

Per la mencio pri la klasika *Academia Thules* (ekzistinta inter la jaroj 2001 kaj 2012, <http://www.academiathules.org>), kiu revivigis tiun antikvan toponimon, ni povas fermi nian prelegon. La plena nomo de tiu ĉi institucio estis “Academia Thule ad Studia Romana Antiqua et Nova”, ĝia adreso estis Kasöörinkatu 3B 28, FI-00520 Helsinki, kie ĝi estis registrita kiel neprofito organizaĵo. La rektoro estis Mikko Sillanpää, la direktoraro konsistis el Christer Edling, Rodrigo Alvarez, Simone Lattes, Emilia Finnlud, Jonas Nilsson kaj John Reali. La akademio ampleksis fakultatojn: Philosophiae & Historiae, Litterarum, Rei Militaris, Theologiae, Novae Romae, ĉiuj specialiĝintaj al esploro kaj instruo pri lingvoj kaj kulturoj de la Romana Imperio kaj Mediteraneo, inklude de ties moderna heredaĵo. Tiu specialiĝo celis prezenti pli ampleksan kaj pli detalan studeblon ol kutimaj universitataj studoj de la klasika filologio kaj kulturo, precipe al “novaj Romanaj entuziasmoj”, kiuj pretis - sen ajna materia profito - studi tie, spite ke la studoj kaj atingitaj titoloj ne estis ĝenerale agnoskataj de aliaj universitatoj. Specifan valoron oni vidis, krom en propra kleriĝo kaj spirita pliriĉiĝo, en la akademia vivo, do en regulaj kontaktoj de homoj kun komunaj interesoj.³¹ La Akademio proklamis sian neŭtralecon rilate politikon kaj religion (kvankam ĝi kompreneble proponis kursojn pri antikvaj religioj). La instruado kaj studado, kiuj okazis pere de interreto, estis senpaga, kaj ĉiu akademiano rajtis proponi aŭ oferti kursojn. Krom regulaj instruantoj, kiuj estis plene kvalifikitaj specialistoj, ekzistis kategorio de administrantoj kaj aliaj helpantoj, t. n. Scribae, kiuj organizis eĉ propran vikion. La instruado kaj la tuta akademia vivo estis vaste pridiskutataj sur pluraj latinlingvaj retforumoj. Tre popularaj estis i.a. la kursoj de la latina konversacio, inspiritaj per la metodo Assimil. La akademio funkciis dum dek unu jaroj. Ĝi ne kolapsis pro manko de intereso, sed pro ruiniĝo de sia plej grava interreta servilo kun instruprogramoj kaj studentaj datoj: malaperis la esenca parto de la studmaterialo, kies restarigo estintus enorme laboriga. Sur la oficiala retpaĝo tiam aperis lakona sciigo, ke la Akademio ĉesigas sian ekziston la 1-an de majo 2012. Multaj el ĝiaj eksmembroj daŭre havas kontaktojn al la virtuala novlatina organizaĵo Nova Roma (<http://www.novaroma.org>). La Akademio troviĝis en ties “Provincia Thule” al kiu apartenas Islando, Finnlando, Danlando, Norvegio kaj Svedio.

Eĉ se hodiaŭ ne plu ekzistas la materia insulo Thule, konata el antikvaj tempoj, ĝia nomo simbole vivas kiel heredaĵo de antikva kulturo kaj pliriĉigas nian vivon, restante insulo de niaj revoj.

Literaturo

Adamus Bremensis: *Gesta Hammaburgensis Ecclesiae Pontificum*. Ed. G. Waitz, Berolinae 1876. Enretigita de Vicifontes, <http://hbar.phys.msu.su/gorm/chrons/bremen.htm>.

Cousin, John William: Poe, Edgar Allan. In: *A Short Biographical Dictionary of English Literature*. J. M. Dent & Sons, London 1910.

Ammiani Marcellini: *Rerum gestarum libri qui svpersvnt*. Ed. Wolfgang Seyfarth. Bibliotheca scriptorum Graecorum et Romanorum Teubneriana, Leipzig 1978.

³¹ Tio estas frapantaj paraleloj al AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) San Marino kun instrulingvo Esperanto, fondita en 1985.

- Antognini, Roberta:** *Il progetto autobiografico delle Familiars di Petrarca*. LED Milano, 2008.
- Bechthold – Stäubi, Hanns:** *Handwörterbuch des deutschen Aberglaubens*. Walter De Gruyter, Berlin - New York 2000.
- Boethius, Anicius Manlius Severinus:** *De Consolative Philosophiae*. Eld. G. Weinberger (Vienna, 1935, vol. 67 en la serio *Corpus Scriptorum Ecclesiasticorum Latinorum*), ed. James J. O'Donnell, en: Julia Haig Gaisser kaj James J. O'Donnell, Series Editors, Bryn Ma, p. wr Latin Commentaries Vol. 1-2, Bryn Mawr College PA 19010-2899, enretigo: http://www9.georgetown.edu/faculty/jod/boethius/jkok/3m5_t.htm.
- Boecio:** *Konsolo de la filozofio*. Ellatinigis D-ro Albert Goodheir. Eldonejo Kardo, Glasgow 1984, p. 70.
- Budzyński, Tomasz:** *Soul Side Story*. In Rock, Poznań 2011.
- Burton, Richard Francis:** *Ultima Thule or a Summer in Iceland*. W. P. Nimmo, London & Edinburgh 1875.
- Calhoun, Charles C.:** *Longfellow: A Rediscovered Life*. Beacon Press, Boston 2004.
- Claudii Claudiani:** *Carmina*. En: Theodor Birt (Hrsg.): *Auctorum antiquissimorum tomus X, Monumenta Germaniae Historica*. Berolini apud Weidmannos MDCCCXCII. Enretigita de la Bavara Ŝtata Biblioteko: http://www.dmgh.de/de/fs1/object/display/bsb00000799_meta:titlePage.html?sortIndex.
- Engel-Braunschmidt, Annelore et al.:** *Ultima Thule. Bilder des Nordens von der Antike bis zur Gegenwart*. Peter Lang, Frankfurt a. M. etc., 2001.
- von Goethe, Johann Wolfgang:** *Faŭsto I+II*. El la germana tradukis Karl Schulze. Dua eldono. Mondial, Novjorko 2004.
- Herde, Oliver H.:** *Auf den Spuren des Pytheas von Massalia. Ein Großer antiker Entdecker*. Magisterarbeit. Grin Verlag, Nordenstedt 2006.
- Kleineberg, Andreas et. al.:** *Germania und die Insel Thule. Die Entschlüsselung von Ptolemaios' "Atlas der Oikumene"*. Wissenschaftliche Buchgesellschaft, Darmstadt 2010.
- Longfellow, Henry Wadsworth:** *Ultima Thule*. Houghton Publishers, Mifflin 1881, represigis Harvard University Press 2009. Enretigita: <http://www.poemhunter.com/henry-wadsworth-longfellow/poems/?search=Ultima+Thule>.
- Mommsen, Theodor:** *C. Iulii Solini collectanea rerum memorabilium*, Berlin 1895. Eld. Weidmann, Zürich & Hildesheim 1999 (4-a eldono).
- Petrarca, Francesco:** *Canzoniere*. Edizione commentata a cura di Marco Santagata, Mondadori, Milano 1996.
- Petrarca, Francesco:** *Delle cose familiari libri XXIV. Volume primo*. Felice le Monier, Firenze 1863. Enretigita: http://archive.org/stream/letteredellecos00petrgoog/letteredellecos00petrgoog_djvu.txt.
- C. Plinii Secundi:** *Naturalis Historiae Libri XXXVII*. Post Ludovici Iani obitum recognovit et scripturae discrepantia adiecta edidit Carolus Mayhoff. Editio stereotypa ed. prioris MCMVI, Stutgardiae in aedibus B.G. Teubneri MCMLXVII..
- Silverman, Kenneth:** *Edgar A. Poe: Mournful and Never-Ending Remembrance*. Harper Perennial, New York 1991.
- Pomponius Mela:** *Cosmographia, sive De situ orbis. Prisciani ex Dionysio de orbis situ interpretatio*, Erhardus Ratdolt, Venezia 1482. Enretigita de la Nacia Biblioteko de Izraelo: <http://aleph500.huji.ac.il/nl/dig/books/bk001261445.html>.
- Polybius:** *The Histories*. Text with an English translation by W.R. Paton. Harvard University Press, Cambridge, Mass. MCMLXXX.
- Procopii Caesariensis:** *Opera omnia*. Ed. Jacob Haury. Teubner, Leipzig 1905-1913, mit Ergänzungen und Korrekturen von Gerhard Wirth. Teubner, Leipzig 1962–1964.
- Ptolemaios:** *Geographia Universalis*. Basileae: apud Henricum Petrum, mense Martio, Venezia, 1540. Enretigita de AMS Historica: <http://amshistorica.unibo.it/187>.
- Στραβωνος:** *Γεογραφικων Βιβλιοι ζ. Strabonis: Geographical libri XVII*. Isaacus Casaubonus recensuit ... emendavit ac commentariis illustravit. Adiecta ... Guilielmi Xylandri Augustani Latina

- versio. Excudebat Eustachius Vignon Atrebat. MDLXXXVII. Enretigita de la Bavara Ŝtata Biblioteko: http://books.google.de/books/about/Res_Geographica.html?id=KiBDAAAACAAJ&redir_esc=y.
- Senecae L. Aenaei:** *Medea*. Ed. H. M. Hime. Aris & Phillips, Warminster 2000. Enretigo: <http://www.thelatinlibrary.com/sen/sen.medea.shtml>.
- Strabons:** *Geographika*. Band 1: *Prolegomena. Buch I-IV: Text und Übersetzung*. Hrsg. Stefan Radt. Vandenhoeck & Ruprecht, Göttingen 2002.
- Tacitus, Publius Cornelius:** *De vita et moribus Iulii Agricolae liber*. Ed. Carl Peter, 1876. Enretigo: <http://www.thelatinlibrary.com/tacitus/tac.agri.shtml>.
- Thilo, Georg Christian & Hermann Hagen:** *Servii Grammatici qui feruntur in Vergilii carmina commentarii*. Teubner, Leipzig 1881-1902, 3 Bde. in 4 Teilen. Nachdruck: Olms, Hildesheim 1961 k. 1986.
- Trojanow, Ilija:** *Nomade auf vier Kontinenten. Auf den Spuren von Sir Richard Francis Burton*. Eichhorn Verlag, Frankfurt am Main 2007.

La interretaj adresoj estis lastfoje kontrolitaj la 30-an de aprilo 2013.

